Termino (85/317) enhavanta kelkajn leksemojn (85/346). Ĝi estas aŭ → kunmetita vorto (85/354), aŭ → derivita vorto (85/355) aŭ vortkomplekso (85/353). Ekzemploj: =85/354,355,359,360. \*b laŭ \*a  
 Fon: \*a R1087; \*b ej;

### 85/342

Rim: =[86/058] =93/061 [94-02-26]  
 57

{U1} 001.425.1 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} termin/o-analiz/o \*b  
 {eo2} gramatik/a analiz/o (de termino) \*c  
 {eo3} struktur/a analiz/o de termin/o \*ĉ  
 {de1} Analyse der grammatischen Form (eines Terminus) \*a  
 {de2} grammatische Analyse (eines Terminus) \*a  
 {en1} analysis of the grammatical form (of a term) \*a  
 {en2} grammatical analysis (of a term) \*a  
 {fr1} analyse de la forme grammaticale (d'un terme) \*a  
 {fr2} analyse grammaticale (d'un terme) \*a

Disigo de → kompleksa termino (85/342) en ĝiaj komponantoj (85/344). \*b laŭ \*a  
 Fon: \*a R1087; \*b ej; \*c go; \*ĉ wor;

### 85/343 =ApE85 #030

Rim: ej (89-06-05): Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53. Kvankam en la terminoj en la etnaj lingvoj troviĝas la vorto "gramatika", la difino diras nur, ke termino estas disigita en siaj komponantoj. Tial laŭ mi {eo1} pli klare indikas, pri kio temas. Vidu la aplikon de tiu termino en 85/344.

wor (90-07-19): Ŝajnas al mi, ke temas pri du nocioj: unu de la difino kaj la alia de la terminoj. Pri tiu de la donita difino: sufiĉus diri "termin/o-dis/ig/o", ĉar temas pri "iaj elementoj". En tio mankas postulo pri gramatikaj kriterioj pri senpereco. PIV-e analizo <2> celas al specoj kaj funkcioj, kio signifas inter-elementajn rilatojn aŭ gramatikon. Se temos pri disigo en senperajn komponantojn, tio unuvorte estas gramatika. Pri tiu de la terminoj: la vorto gramatiko celas, ke la disigo

analize klarigu gramatikan strukturon -- ekz. per konstato de la senperaj komponantoj. La plena termino do povas esti: "gramatika analizo de termino"; {eo1} kaj "gramatika analizo" estas mallongigoj. Iom pli preciza estus {eo3}. <93-11-13>  
 58

{U1} 001.425.1 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} kompon/ant/o (de termino) \*b  
 {de1} Bestandteil \*a  
 {de2} Konstituente \*a  
 {de3} Komponente (eines Terminus) \*a  
 {en1} constituant \*a  
 {en2} component (of a term) \*a  
 {fr1} composant (d'un terme) \*a

Iu ajn parto de → kompleksa termino (85/342), kiu havas propran signifon (85/369). Komponanto estas aŭ nedividebla elemento, morfemo (85/345), aŭ denove kompleksa termino. La unua paŝo de termino-analizo (85/343) apartigas la "tuj ekkoneblajn komponantojn" [senperaj komponantoj]. Kutime ekzistas du. Ekzemplo: \La oblikva streko en la termino "skrapatoro / por tranĉado de rapidumaj dentoj" apartigas la du tuj ekkoneblajn komponantojn.\i \*b laŭ \*a  
 Fon: \*a R1087; \*b ej;

### 85/344

Rim: ej: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53.

wor (90-07-19): Ĉi tie temas pri analizo laŭ senperaj komponantoj, kiu konstatigante arbostrukturon de la analizado, laŭ mi konstatigas gramatikan informon. Ĝi do ne kuniras kun la difino en 85/343.

ej (92-01-27): Ŝajnas al mi, ke mi atribuas pli malvastan sencon al gramatiko ol go kaj wor.  
 <93-11-13>  
 59

{U1} 001.425.1 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} morfem/o <2> \*b  
 {eo2} fin/a kompon/ant/o (de termino) \*b  
 {de1} letzte Konstituente (eines Terminus) \*a  
 {de2} Morphem \*a  
 {de3} Worthelement \*a  
 {en1} ultimate constituent (of a term) \*a  
 {en2} morpheme \*a  
 {en3} word element \*a  
 {fr1} morphème \*a

Iu ajn nedividebla komponanto de termino (85/317); t.e. komponanto, kiu ne povas esti disigata en aliajn elementojn sen perdo de ĝia signifo (85/369). Morfemo povas esti radiko (85/347), aŭ afikso (85/348), aŭ finaĵo (85/351). Ekzemplo: \En la termino "skrap/ator/o / por / tranĉ/ad/o / de rapid/um/a/j / dent/o/j" la morfemoj estas apartigitaj per oblikvaj strekoj.\i \*b laŭ \*a  
 Fon: \*a R1087; \*b ej;

## 85/345

Rim: =86/051

wor (90-07-19): La vorto "fina" en {eo2} estas ambigua, ĉar ĝi mispensigis min pri morfemo <1>. =93/054 [94-02-26]  
60

{U1} 001.425.1 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} terminologi/a morfem/o \*b EVIT \*b  
{eo2} leksem\*\*/o \*b  
{eo3} leksikon/a morfem/o \*b  
{de1} terminologisches Morphem \*a  
{en1} terminological morpheme \*a  
{fr1} morphème terminologique \*a

Iu ajn morfemo (85/345), kiu esprimas pli ol nur sintaksajn rilatojn; t.e. iu, kiu ne estas finaĵo (85/351). Ĝi estas radiko (85/347) aŭ afikso (85/348). \*b laŭ \*a

Iu ajn morfemo, kiu esprimas pli ol nur sintaksajn rilatojn; t.e. morfemo, kiu ne estas finaĵo. En Esperanto ĝi estas radiko, parto de radiko aŭ afikso. \La vorto "hidrozoo" ekzistas el la du ~oj ("hidro" kaj "zo") kaj el la finaĵo "o".i \*b  
Fon: \*a R1087; \*b ej;

## 85/346 =ApE85 #031

Rim: ei: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53.

kav (88-04-30): La difino devus esti modifita: "Ajna morfemo, kiu esprimas pli ol nur sintaksajn rilatojn. Ĝi estas radikero, afikso aŭ radiko, sed ne finaĵo. Ekz-e "hidrozoo" konsistas el la du leksemoj "hidro-" kaj "-zo-" ambaŭ interpretendaj en Esperanto kiel leksemaj radikeroj, ne afiksoj.

ei: La termino "radikero" ne ekzistas en PIV; tie tiu leksemo nomiĝas "vortero". Estas diskutinde, ĉu ni en Esperanto bezonas plian terminon, kiu ne ekzistas etno-lingve. Nek en PIV nek en PAG mi trovis difinon por "radikero" aŭ "vortero". Ĉu la difino por "radiko" ne estas sufiĉe vasta por esti aplikebla ankaŭ por "hidro-" kaj "-zo-"? (=85/347), PAG, p371: "La radikoj estas silaboj aŭ silabaroj, kiuj signas ian koncepton: objekton, nocion." Krome la sufikso -er/ indikas konsistigan elementon de de kutime homogena substanco. Nek "radikero" nek "vortero" estus homogenaj.

go: Forigu {eo2}.

ei (89-06-05): Kial? Laŭ mia memoro {eo2} estis uzata de sze kaj ankaŭ de aliaj lingvikistoj. Sed mi vane serĉis fontojn. Kiu povus komuniki al mi aplikojn de {eo2}, por ke mi povu aldoni ilin? Ne estis mi, kiu inventis la terminon "leksemo", ankaŭ kav uzis ĝin en la diskuto. Kvankam mi origine proponis la terminon {eo1} mi nun opinias, ke ĝi estas evitinda, ĉar ĝi pensigas, ke temas pri morfemo, kiun terminologoj aplikas, kiuj studas la nociojn kaj terminojn troviĝantajn en fakaj lingvoj (=86/100). Oni uzas etnolingve \terminologisch, terminological, terminologique\i, ĉar oni atribuas al \Terminologie, terminology,

terminologie\i la signifon de "terminaro", kion mi taksas evitinda (=85/323).

wor (90-07-19): Ne estas certe, ĉu {eo2} taŭgas por ĉi tiu komplekso. Sencon de Angla \lexeme\i difinas Pei66: "Signifo-porta parolata formo (vorto aŭ stamo) kiu estas ero de vortprovizo, abstraktita de frazaj vortoj; kompleta gramatika formo. Sinonimo: leksa monemo (En. \lexical moneme\i)". Tiel radiko kun siaj fleksioj estus unu leksemo (ekz: skrib-, skribi, skribadi, skribas, skribis, skribota, ekskribi, ...). Derivaĵo kun siaj fleksioj konstituus alian leksemon (ekz: skribist-, skribisto, skribistoj, skribista, ...). Tia leksemo estas pli vasta ol la nocio de tiu ĉi komplekso; en Esperanto ĝi ampleksas radikojn, sufiksoidojn, prefiksoidojn kaj radikalojn.

ei (91-08-09): En miaj Anglaj konsult-libroj nur <Termi-of-doc> listigis la terminon \lexeme\i (=88/113). Sed per la tute nova Germana <DUD-U> mi lernis, ke la vorto \Lexem\i venis en la Germanan lingvon tra la Rusa kaj signifas: \\"Einheit des Wortschatzes, die die begriffliche Bedeutung trägt. Bestandteil des Lexikons (3)".i "Unuo de vokablaro [1] (88/189), kiu portas la nocian sencon. Konsistiga parto de leksikono <3> (88/181)". Kaj "Lexikon (3)" estis difinita en <DUD-U>: \\"3a Gesamtheit der selbständigen bedeutungstragenden Einheiten einer Sprache: Wortschatz im Unterschied zur Grammatik einer Sprache; 3b (in der generativen Grammatik:) Sammlung der Lexikoneinheiten einer Sprache".i 3a Tutaĵo de la memstaraj signifon portantaj unuoj en iu lingvo: la vortrezoro kontraste al la gramatiko de iu lingvo. 3b (en generativa gramatiko:) Kolekto de leksikonaj unuoj de unu lingvo." Al mi nun ŝajnas, ke kav donis tre bonan ekzemplon por "leksemo" en nia lingvo, kiu parte akordiĝas kun la malklara difino de Pei, escepte, ke ne temas pri "kompleta gramatika formo". Tial wor atribuas malsaman signifon al la termino. Estus interese scii, kiun sencon oni atribuas en la Rusa lingvo al tiu ĉi vorto. Mi suspektas, ke temas pri "memstaraj signifon portanta unuo en iu lingvo, kiu povus esti ankaŭ radik-parto, kiel la de kav donita ekzemplo montras. Laŭ tiu interpreto mi prezentis en la difin-kampo ankaŭ alian al Esperanto adaptitan difinon por "leksemo", kiun ni pro 88/181 povus nomi ankaŭ "leksikona morfemo". Tiukaze fonemo, morfemo kaj leksemo estus ĉiuj diversaj specoj de monemoj, de la plej malgrandaj konsistigaj elementoj de lingvo, kio faciligus memori ilin. «93-11-13»

61

{U1} 001.425.1 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} radik/o (3) \*b\*c  
{de1} Stamm \*a  
{de2} Wurzel \*a  
{en1} stem \*a  
{en2} root \*a

{fr1} racine \*a  
{fr2} radical \*a

Leksemo (85/346), kiu povas esti uzata memstare kiel vorto (85/352), radik-vorto (85/356) - aŭ kiel bazo por → derivita vorto (85/355). Ekzemploj: \La vortoj "en", "dek". En la vortoj "t r a n ĉ /ado" kaj "s k r a p /atoro" la radikoj estas interspacigitaj. \i \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei; \*c PIV;

**85/347**

Rim: =86/049, [86/050] =93/053 [94-02-26]

62

{U1} 001.425.1 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} afiks/o (1) \*b\*c  
{de1} Affix \*a  
{en1} affix \*a  
{fr1} affixe \*a

Leksemo (85/346), kiu «en etnaj lingvoj» ĝenerale estas nur alpendaĵo al radikoj (85/347). Afikso estas sufikso (85/349) aŭ prefikso (85/350). \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei; \*c PIV;

**85/348**

Rim: =86/052 go: Ankoraŭ unu speco de afikso estas "infikso" interne de vorto.

ei: Jes, sed en tiu ĉi difino, kiu estas traduko de norm-verko, mi ne rajtas aldoni tion. La difino de "infiks/o" troviĝas en PIV, do ne necesas krei apartan Pekoteko-komplekson.

=93/055 [94-02-26]

63

{U1} 001.425.1 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} sufiks/o (1) \*b\*c  
{de1} Suffix \*a  
{en1} suffix \*a  
{fr1} suffixe \*a

Afikso (85/348), kiu rekte sekvas radikojn (85/347) aŭ alian sufikson. Ekzemplo: \En la vorto "skrap/ator/o" la leksemo "ator" estas sufikso indikanta grandparte aŭtomate funkciantan maŝinon. \i \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei; \*c PIV

**85/349**

Rim: =86/054] =93/057 [94-02-26]

64

{U1} 001.425.1 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} prefiks/o (1) \*b\*c  
{de1} Präfix  
{en1} prefix  
{fr1} préfixe

Afikso (85/348), kiu rekte antaŭiras radikojn (85/347) aŭ alian prefikson. Ekzemplo: \En la vorto "antaŭiras" la morfemo "antaŭ" estas prefikso indikanta pliproksimecon en spaco aŭ tempo, aŭ

"apartenanta al la fronto" \i. \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei; \*c PIV

**85/350**

Rim: =86/053] =93/056 [94-02-26]

65

{U1} 001.425.1 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} fin/aĵ/o (1) \*b\*c  
{de1} Endung \*a  
{en1} ending \*a  
{en2} termination \*a  
{fr1} désinence \*a

Fina morfemo (85/345) de vorto (85/352,353), kiu esprimas gramatikan fleksion, t.e. la kazon kaj nombron de substantivoj, la tempon [tenson] kaj modon de verboj. Ekzemploj: \En la vorto "rapid/um/a/j" kaj "dent/o/j" la morfemo "j" indikas la pluralon. \i \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei; \*c PIV;

**85/351**

Rim: go: Estas bezonata ankaŭ morfemo havanta la samajn funkciojn ĉe la komenco de vorto; eble "komencaĵo".

=86/055] =93/058 [94-02-26]

66

{U1} 001.425.1 (+)  
{U2} 801.316.0 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} vort/o <6> \*b\*c  
{eo2} vort/o en sintaks/a senc/o \*b  
{de1} Wort \*a  
{de2} Wort im syntaktischen Sinn \*a  
{en1} word \*a  
{en2} word in syntactic sense \*a  
{fr1} mot (du point de vue syntaxique) \*a

Termino (85/317), kiu ne estas kompleksa (sed radik-vorto 85/356), aŭ kiu estas → nesintaksa vortgrupo (85/360). En la Angla lingvo vorto en sintaksa senco povas esti skribata ofte kiel unu aŭ pli da → ortografiaj vortoj (85/353), ekz-e: \ "slideway" \i aŭ: \I "slide way" \i « = glitejo». \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei; \*c PIV;

**85/352**

Rim: ei: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53.

go: Forigu {eo1}.

ei: Mi konsentas, ke {eo2} pli precize indikas la noción, sed en ĉiutaga vivo oni ja uzas por tiu nocio la terminon {eo1}. Ĉar oni same agas etno-lingve, {eo1} ne estas foriginda. «93-11-13»

67

{U1} 001.425.1 (+)  
{U2} 801.316.0 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} ortografi/a vort/o \*b  
{eo2} vort/o (1) \*b\*c  
{de1} orthografisches Wort \*a

{de2} Wort \*a  
 {en1} orthographic word \*a  
 {en2} word \*a  
 {fr1} mot (du point de vue orthographique) \*a  
 Termino (85/317), kies skrib-formo (85/328) estas apartigita de la alia teksto per du spacetoj unu post la alia. Ekzemploj: A: \slideway; slide-way; \i F: \glissière; chemin; \i G: \Bahn \i. \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ej; \*c PIV

### 85/353

Rim: ej: Tio estas la laŭvorta traduko laŭ A, F kaj G, kiu tamen ne faras sencon al mi, ĉar la en la originala Angla teksto donitaj ekzemploj ne montras tiujn du spacetojn. Ĉu la difino ne devus teksti: "... per du spacetoj unu antaŭ kaj la alia post la termino?" Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53.

go: Forigu "vorto".

ej: vidu mian rimarkigon en 85/352.

=93/049 [94-02-26]

68

{U1} 001.425.1 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} kun'met/it/a vort/o \*b  
 {de1} zusammengesetztes Wort \*a  
 {de2} Zusammensetzung \*a  
 {de3} Kompositum \*a  
 {en1} compound \*a  
 {en2} compound word \*a  
 {fr1} mot composé \*a

Vorto - → ortografia vorto (85/353) aŭ antaŭ ĉio → vorto en sintaksa senco (85/352), kies senperaj komponantoj (=85/344) estas radikoj (85/347) aŭ derivaĵoj (85/355). Ekzemploj: \slide way; slideway; gvidrelo; gvid-relo. \i \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ej;

### 85/354

Rim: ej: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53 kaj ankaŭ ne en R 1087 de 1990. =93/062 [94-02-26]

69

{U1} 001.425.1 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} deriv/aĵ/o (1) \*b\*c  
 {eo2} deriv/it/a vort/o \*b  
 {de1} abgeleitetes Wort \*a  
 {de2} Ableitung \*a  
 {de3} Derivation \*a  
 {en1} derivative \*a  
 {en2} derivative word \*a  
 {en3} derived word \*a  
 {fr1} mot dérivé \*a

→ Ortografia vorto (85/353), en kiu unu « en Esperanto estas aldonenda: aŭ pli » el la → senperaj komponantoj (=85/344) estas afikso(j) (85/348). Ekzemploj: \skrap/ator/o; antaŭ'ir/i. \i \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ej; \*c PIV;

### 85/355

Rim: =[86/056] =93/059 [94-02-26]

70

{U1} 001.425.1 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} radik-vort/o \*b  
 {de1} Stammwort \*a  
 {de2} Wurzelwort \*a  
 {en1} root-word \*a  
 {en2} morpheme-word \*a  
 {fr1} mot-racine \*a

→ Ortografia vorto (85/353), kiu konsistas el unu sola leksemo (85/346), el radikoj (85/347). « En Esperanto radik-vorto enhavas aŭ ne enhavas gramatikan finaĵon (65) » Ekzemploj: \termin/o; vort/oj; rel/on; unu; por. \i \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ej;

### 85/356

Rim: ej: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53. «93-11-13»

71

{U1} 001.425.1 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} vort-famili/o \*b  
 {de1} Wortfamilie \*a  
 {en1} word family \*a  
 {fr1} famille de mots \*a

Grupo de → derivitaj vortoj (85/355) el unu sama radikoj kaj de kunmetitaj vortoj (85/354) kun tiu radikoj. Ekzemploj: \patr/o; patr/in/o; bo'patr/o; bo'ge'patr/oj; patr/uj/o; patr/o-land/o. \i \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ej;

### 85/357

Rim: ej: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53. «93-11-13»

72

{U1} 001.425.1 (+)  
 {U2} 801.314.6 (+)  
 {U3} 801.561.8  
 {T1} RBN  
 {eo1} vort-grup/o \*b  
 {de1} Phrase \*a  
 {de2} Wortgruppe \*a  
 {en1} phrase \*a  
 {en2} word group \*a  
 {fr1} locution \*a  
 {fr2} groupe (de mots) \*a

Termino (85/317) konsistanta el kelkaj → ortografiaj vortoj (85/353). Ekzemploj: =85/359, 360. \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ej;

### 85/358

Rim: =86/060, 88/122

wor (90-07-19): Nek {en1}, nek {en2} devas konsisti el pli ol unu ortografiaj vortoj. Por mi ankaŭ ne "vort-grupo" tion devas. Klariga analogio: molekulo ne devas havi pli ol unu atomo. «93-11-13»

{U1} 001.425.1 (+)  
 {U2} 801.314.6 (+)  
 {U3} 801.561.8  
 {T1} RBN  
 {eo1} sintaks/a vort-grupo \*b  
 {de1} syntaktische Phrase \*a  
 {en1} syntactic phrase \*a  
 {fr1} groupe syntaxique (de mots) \*a  
 Vort-grupo (85/358), kies komponantoj (85/344) estas sintakse interligataj, t.e. per rilato karakteriza por fraz-strukturoj. Ekzemploj: V Skrapatoro por tranĉado de rapidumaj dentoj; tranĉado de dentoj; konikaj dentoj. \i \*b laŭ \*a  
Fon: \*a R1087; \*b ei;

**85/359**

Rim: ei: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53. «93-11-13»  
 74

{U1} 001.425.1 (+)  
 {U2} 801.314.6 (+)  
 {U3} 801.561.8  
 {T1} RBN  
 {eo1} ne'sintaks/a vort-grupo \*b  
 {de1} asyntaktische Phrase \*a  
 {en1} asyntactic phrase \*a  
 {fr1} groupe asyntaxique (de mots) \*a  
 Vort-grupo (85/358), kies komponantoj (85/344) estas nesintakse interligataj, t.e. per rilato karakteriza por la strukturo de → kunmetitaj vortoj (85/354). « Nesintaksaj vort-grupoj ne ekzistas en Esperanto. » Ili estas maloftaj en la Franca, Germana kaj Rusa, sed ne en la Angla. Ekzemplo: V La nesintaksa vort-grupo "slide way" estas sinonima kun la ortografia vorto (85/353) "slideway". \i \*b laŭ \*a  
Fon: \*a R1087; \*b ei;

**85/360**

Rim: ei: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53. «93-11-13»

3.4.2 Terminologia analizo de kompleksaj terminoj (n-roj 75 ĝis 79)

75

{U1} 001.425.2 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} terminologi/a signif/o-analiz/o (de termino) \*b  
 {de1} terminologische Analyse (eines Terminus) \*a  
 {de2} terminologische Analyse der Bedeutung (eines Terminus) \*a  
 {en1} terminological analysis (of a term) \*a  
 {en2} terminological analysis of the meaning (of a term) \*a  
 {fr1} analyse terminologique (du sens) (d'un terme) \*a  
 La studo pri la signifo (85/369) de la

komponantoj (85/344) de → kompleksa termino (85/342), pri la implicitaj ideoj, kaj pri la → rezulta signifo (85/370) de la termino. Ekzemplo: =85/363. \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei;

**85/361**

Rim: =86/102. wor (90-07-19): Bv. kompari (85/343) kaj noti, ke ĉi tie analizo ne egalas dismeton. «93-11-13»  
 76

{U1} 001.425.2 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} determin/it/a kompon/ant/o \*b  
 {de1} bestimmte Konstituente \*a  
 {de2} bestimmtes Glied \*a  
 {en1} determined constituent \*a  
 {en2} determined member \*a  
 {fr1} composant déterminé \*a

La baza komponanto (85/344) de → kompleksa termino (85/342). Ĝi estas la superordigita nocio (85/291) por la → rezulta signifo (85/370) de la termino. Ekzemplo: =85/363. \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei;

**85/362**

Rim: ei: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53. «93-11-13»  
 77

{U1} 001.425.2 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} determin/ant/a kompon/ant/o \*b  
 {de1} bestimmende Konstituente \*a  
 {de2} bestimmendes Glied \*a  
 {de3} Bestimmungsglied \*a  
 {en1} determining constituent \*a  
 {en2} determining member \*a  
 {en3} sub-member \*a  
 {fr1} composant déterminant \*a

La al → kompleksa termino (85/342) aldonita komponanto. Ĝi indikas karakterizaĵon (85/289), kiu transformas la superordigitan nocion (85/291), kiu estas specifita per → determinita komponanto (85/362), en subordigitan nocion (85/292).

V Ekzemplo:\i En la termino "rabot-maŝino" la komponanto "maŝino" estas la → determinita komponanto (76), la resto de la termino estas la determinanta komponanto. \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei;

**85/363**

Rim: ei: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53. «93-11-13»

78

{U1} 001.425.2 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} logik/a radik/o (en vort-familio) \*b  
 {de1} logische Wurzel (einer Wortfamilie) \*a

{en1} logical root (of a word family) \*a  
 {fr1} racine logique (d'une famille de mots) \*a  
 Radiko (85/347) de vort-familio (85/357),  
 indikanta fundamentan nocion (85/288) komunan al  
 la tuta familio.

Ĝenerale la logikan radikon formas radik-  
 vorto (85/356). En kelkaj lingvoj tamen ne ekzistas  
 radik-vorto, aŭ ĝi ekzistas nur etimologie.

VI Ekzemploj: \i La radik-vortoj de la  
 «Anglaj» vort- familioj "eruption, eruptive" kaj  
 "intelligent, intelligence" estis uzataj en la Latina  
 (erumpere, intelligere); en la Franca tamen ili  
 malaperis. En la Angla nur la modifita radik-vorto  
 "erupt" restis. «Sed en Esperanto ekzistas la radiko  
 "erupci/" kaj la radik-vortoj "erupcio, erupcia,  
 erupcii".» \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ej;

### 85/364

Rim: ej: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53. «93-  
 11-13»  
 79

{U1} 001.425.2 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} sistem/aj termin/oj \*b  
 {de1} systematische Termini \*a  
 {en1} systematic terms \*a  
 {fr1} termes systématiques \*a

Serio de → kompleksaj terminoj (56), kies  
 strukturo reflektas la strukturon de nocio-sistemo  
 (9). VI Ekzemploj: \i La kemiaj terminoj VI metano,  
 etano, propano, butano, pentano, heksano, heptano,  
 oktano ktp.; eteno/etileno, propeno/ propileno, \i...  
 ktp. (La terminoj finiĝantaj per -ileno estas pli  
 malnovaj, sed en etnaj lingvoj ankoraŭ pli uzataj ol  
 tiuj finiĝantaj per -eno, kvankam la lastaj estas  
 rekomenditaj de la Internacia Unio por Pura kaj  
 Aplikata Kemio.) \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ej;

### 85/365

Rim: ej: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53.  
 wor (90-07-19): La senco de "sistema" ĉi tie ŝajnas  
 malpli vasta ol tiu en 85/300 kaj 85/302.  
 «93-11-13»

3.4.3 Senco-transigo (n-roj 80 ĝis 82)  
 80

{U1} 001.425.3 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} trans'ig/it/a termin/o \*b  
 {de1} übertragener Terminus \*a  
 {en1} transferred term \*a  
 {fr1} terme transféré \*a

Termino (31) uzata kun modifita  
 ("transigita", 82) senco. \i Ekzemploj: \i Vidu 82. \*b  
 laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ej;

### 85/366

Rim: ej: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53. «93-  
 11-13»

81

{U1} 001.425.3 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} primar/a senc/o \*b  
 {eo2} baz/a senc/o \*b  
 {eo3} origin/a senc/o \*b  
 {eo4} primar/a signif/o \*b  
 {eo5} baz/a signif/o \*b  
 {eo6} origin/a signif/o \*b  
 {de1} ursprüngliche Bedeutung \*a  
 {en1} primary meaning \*a  
 {en2} basic meaning \*a  
 {en3} original meaning \*a  
 {en4} primary sense \*a  
 {en5} basic sense \*a  
 {en6} original sense \*a  
 {fr1} sens propre \*a

La primitiva signifo de → transigita  
 termino (80). \i Ekzemplo: \i Vidu 82. \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ej;

### 85/367

Rim: ej: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53.  
 go: Forigu {eo1}, {eo2}, {eo3}, uzu nur "signifo".  
ej: Laŭ la difino de 85/367 la terminoj kun "senco"  
 estas pli trafaj, ĉar ĝin PIV difinas: "Maniero, kiel  
 vorto aŭ frazo estas komprenota", dum signifo:  
 "Esenca kaj kerna ideo montrita de io". "Oni povas  
 paroli pri la signifo de signo, sed ne pri ties senco.  
 Celo de Pekoteko estas indiki ĉiujn eblajn tradukojn  
 por difinitaj nocioj. Do {eo1-3} devus resti. «93-11-  
 13»

82

{U1} 001.425.3 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} trans'ig/it/a senc/o \*b  
 {eo2} trans'ig/it/a signif/o \*b  
 {de1} übertragene Bedeutung \*a  
 {en1} transferred meaning \*a  
 {fr1} sens transféré \*a

La → rezulta signifo (84) de → transigita  
 termino (80). Transigita senco naskiĝas el la →  
 primara senco (81) aŭ per signifo-limigo  
 (specialigo), per simileco (metaforo) aŭ per  
 proksimeco (metonimio). Ekzemploj: \i El  
 "kamero" (=ĉambreto) naskiĝis "kamero" (= fermita  
 spaco en aparato) (signifo-limigo); el "kapo" (de  
 besto) venis "kapo" (de bolto) (metaforo); "veneno"  
 estas proksima al "morto", tial: verŝi al iu la morton  
 (metonimio). \i \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ej;

### 85/368

Rim: ej: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53.  
 wor (90-07-19): Kial ne allasi, ke transigita  
 senco naskiĝu el alia jam ekzistanta transigita senco?  
 Kial ankaŭ ne allasi peron de signifo-vastigo?

ej (91-08-10): Ĉar tiu ĉi registraĵo estas  
 traduko de norm-verko. Sed nenio malhalpas  
 proponi alian difinon en alia nocio-komplekso.

«93-11-13»

3.5 Interrespondado inter termino  
kaj nocio (nroj 83 ĝis 94)

83

{U1} 001.426 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} signif/o (1) \*b\*c  
{eo2} senc/o (1) \*b\*c  
{de1} Bedeutung (eines Terminus) \*a  
{en1} meaning (of a term) \*a  
{en2} significance (of a term) \*a  
{en3} sense (of a term) \*a  
{fr1} sens (d'un terme) \*a  
{fr2} signification (d'un terme) \*a  
Nocio (85/288) respondanta al iu termino (85/317). \*b laŭ \*a  
Fon: \*a R1087; \*b ej;

**85/369**

Rim: ej: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53. «93-11-13»

84

{U1} 001.426 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} rezult/a senc/o (de termino) \*b  
{eo2} rezult/a signif/o (de termino) \*b  
{de1} resultierende Bedeutung (eines Terminus) \*a  
{en1} resultant meaning (of a term) \*a  
{fr1} sens résultant (d'un terme) \*a  
Signifo (85/36983) de → kompleksa termino (85/342) aŭ de → transigita termino (85/366) kiel rezulto de → terminologia signifoanalizo (85/361). Antonimo: → laŭmorfema senco (85/340). Ekzemplo: =85/368. \*b laŭ \*a  
Fon: \*a R1087; \*b ej;

**85/370**

Rim: ej: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53. «93-11-13»

85

{U1} 001.426 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} noci/o-nom/o \*b  
{eo2} nom/o (de nocio) \*b  
{de1} verbale Bezeichnung \*a  
{de2} Bezeichnung \*a  
{de3} Name (eines Begriffs) \*a  
{en1} verbal designation \*a  
{en2} designation \*a  
{en3} name (of a concept) \*a  
{fr1} dénomination \*a  
{fr2} appellation \*a  
{fr3} nom (d'une notion) \*a  
Termino (85/317), kiu respondas al iu nocio (85/288). \*b laŭ \*a  
Fon: \*a R1087; \*b ej;

**85/371**

Rim: ej: =93/036 [94-02-26]

86

{U1} 001.426 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} unu-senc/a (termino) \*b  
{eo2} unu-signif/a (termino) \*b  
{de1} einwertig (ein Terminus) \*a  
{de2} monovalent \*a  
{en1} one-valued (a term) \*a  
{en2} single-valued (a term) \*a  
{en3} monovalent (a term) \*a  
{fr1} à un seul sens (terme) \*a  
{fr2} monovalent \*a  
Havanta nur unu solan sencon [signifon] (85/369). Substantivo indikanta tiun kvaliton: unu-senceco [unusignifeco]. \*b laŭ \*a  
Fon: \*a R1087; \*b ej;

**85/372**

Rim: ej: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53. «93-11-13»

87

{U1} 001.426 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} monosemi\*\*/a (termino) \*b  
{de1} monosem (ein Terminus) \*a  
{en1} monosemantic (a term) \*a  
{en2} monosemous (a term) \*a  
{fr1} monosémique \*a  
Ne estanta polisemia (85/375). Substantivo indikanta tiun kvaliton: monosemio. \*b laŭ \*a  
Fon: \*a R1087; \*b ej;

**85/373**

Rim: =86/038 ej: Kio estas la diferenco inter 85/372 kaj 373?, =85/375.  
=93/037 [94-02-26]

88

{U1} 001.426 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} plur'signif/a (termino) \*b  
{eo2} plur'senc/a (termino) \*b  
{de1} mehrwertig (ein Terminus) \*a  
{de2} multivalent (ein Terminus) \*a  
{de3} plurivalent (ein Terminus) \*a  
{en1} many-valued (a term) \*a  
{en2} multiple-valued (a term) \*a  
{en3} plurivalent (a term) \*a  
{fr1} à plusieurs sens (terme) \*a  
{fr2} plurivalent \*a  
Havanta du aŭ pli da signifoj [sencoj] (85/369). Substantivo indikanta tiun ĉi kvaliton: plursenceco. Polisemio (=85/375) aŭ homonimio (=85/376) havas la kvaliton de plursenceco. \*b laŭ \*a  
Fon: \*a R1087; \*b ej;

**85/374**

Rim: ej: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53. «93-11-13»

{U1} 001.426 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} polisemi\*\*/a (termino) \*b  
 {de1} polysem (ein Terminus) \*a  
 {en1} polysemantic (a term) \*a  
 {en2} polysemous (a term) \*a  
 {fr1} polysémique (terme) \*a

Havanta du aŭ pli da interdependaj sencoj (85/369). Substantivo indikanta tiun kvaliton: polisemio. Polisemia termino estas nomata "polisemo". Polisemion kaŭzas senc-transigo (=85/368) aŭ malsama interpreto de → kompleksa termino (85/342). Ekzemplo: \La vorto "kapo" povas indiki parton de vivanta korpo aŭ parton de objekto. \i \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ej;

### 85/375

Rim: =86/040 go: Kion signifas "interdependaj sencoj?" Ĉu la kvin signifoj de "kanono" en PIV estas interdependaj aŭ sendependaj?

ej: Mi tradukis : \Having two or more interdependent meanings/ Qui a plusieurs sens interdépendants. \i En la ekzemploj donitaj \thead\talon \temas pri transigitaj signifoj. La tri signifoj de "kanono" en PIV laŭ mia opinio estas sendependaj, ĉar ne temas pri transigitaj signifoj.

=93/040 [94-02-26]

90

{U1} 001.426 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} homonim/aj (terminoj) \*b  
 {de1} homonym (mehrere Termini) \*a  
 {en1} homonymous (several terms) \*a  
 {fr1} homonymes (adj. termes) \*a

Identaj laŭ ilia ekstera formo (85/326 aŭ 328), sed malsimilaj laŭ origino kaj signifoj (85/369). Du homonimoj estas "homofonoj" aŭ "homografoj" depende ĉu identas iliaj son-formoj (85/326) aŭ skrib-formoj (85/328). Tiu ĉi difino respondas al la uzado en la plej multaj lingvoj. La Anglaj terminoj "homonymous" kaj "homonyms" tamen multe pli ofte estas uzataj en la pli mallarĝa signifo de homofona kaj homofono. Ekzemploj: \A: "son"(=filo) "sun" (=suno) estas homofonoj. \i « Homofonoj ne ekzistas en Esperanto.»

La du Anglaj vortoj "tear" prononcataj aŭ kiel "tir" (=larmo) aŭ kiel "ter" (=ŝiri) estas homografoj. « Ankaŭ homografoj ne ekzistas en Esperanto. Tamen ekzistas en ĝi malmultaj veraj homonimoj: ero (=parto), ero (=erao).»

Rimarkigo: Ofte oni ne distingas en terminologia leksikografio inter homonimoj kaj diversaj signifoj de polisemoj (=85/375). Ĉi-okaze la termino homonimo estas pli larĝsence uzata kaj entenas ambaŭ terminojn. \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ej;

### 85/376

Rim: =86/041 go: Homofonoj ja ekzistas en Esperanto: "bato" kaj "bat'o"; "koro" kaj "kor'o". Ankaŭ homografoj troviĝas en la lingvo: "ero" (elemento de objekto) kaj "ero" (jarkalkulo). Ankaŭ du ekzemploj: "vasko" (gentnomo) kaj "vasko" (konkego de fontano); kaj "basko" (gentnomo) kaj "basko" (parto de vesto).

ej: "bat'o", "kor'o" estis provoj de Zamenhof per artefikaĵo eviti homonimojn. Laŭ mia scio feliĉe neniu post Zamenhof aplikis tiun trukon ĉe aliaj vortoj por eviti homonimecon, ĉar lerni tiujn distingojn estus pli malfacila ol je paronimoj. go evidente miskomprenis la signifon de "homografo". La 9-a Regulo de la 16-regula gramatiketo de Esperanto postulas: "Ĉiu vorto estas legata, kiel ĝi estas skribita". Tial ne povas ekzisti en nia lingvo vortoj, kiuj estas same skribitaj sed malsame prononcataj, kiel ekz-e en la Angla \lead\i, kiu estas prononcenda "li:d", se temas pri gvida funkcio aŭ rolo, kaj "led", se temas pri plumbo (= homografoj). "ero" estas homonimo kaj ne homografo, kiel mi menciis supre. "vasko" kaj "basko" estas homonimoj kaj ne homografoj, se oni skribas ilin kiel go. Ili fariĝas homofonoj, se oni distingas la gento-nomojn per majuskulaj komencaj literoj, kio ŝajnas al mi rekomendinda. =93/041 [94-02-26]  
 91

{U1} 001.426 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} ambigu/a (termino) \*b\*c  
 {de1} mehrdeutig (ein Terminus) \*a  
 {de2} uneindeutig \*a  
 {en1} ambiguous (a term) \*a  
 {en2} equivocal (a term) \*a  
 {fr1} équivoque (adj., terme) \*a

Havanta kelkajn signifojn (85/374), kiuj povus trafi eĉ en kunteksto (85/381). Antonimo: malambigua. \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ej; \*c PIV;

### 85/377

Rim: ej: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53. «93-11-13»

92

{U1} 001.426 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} sinonim/aj (terminoj) \*b\*c  
 {de1} synonym (mehrere Termini) \*a  
 {en1} synonymous (several terms) \*a  
 {fr1} synonymes (adj., termes) \*a

Havantaj la saman signifon (85/369) - ekzakte aŭ proksimume - sed malsamajn → eksterajn formojn (85/325). Substantivo: sinonimo. Ekzemploj: \I gazono - razeno; cefalalgio - kapdoloro. \i Rimarkigo: La plej multaj sinonimoj estas nur kvazaŭ-sinonimoj (85/379). \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ej; \*c PIV

### 85/378

Rim: =[86/039] =93/039 [94-02-26]

{U1} 001.426 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} kvazaŭ-sinonim/aj (terminoj) \*b  
 {de1} quasi-synonym (mehrere Termini) \*a  
 {en1} quasi-synonymous (several terms) \*a  
 {fr1} quasi-synonymes (adj., termes) \*a  
 Havantaj preskaŭ la saman signifon, sed malsamajn → eksterajn formojn (85/325).  
 Ekzemploj: \lemblemo - simbolo; kalva - senhara.  
 \i\*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei;

### 85/379

Rim: =86/039 «93-11-13»

94

{U1} 001.426 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} respond/a ali/lingv/a termin/o \*b  
 {eo2} traduk/a ekivalent/o \*c  
 {eo3} fremd-lingv/a ekivalent/o \*c  
 {eo4} laŭtermin/a traduk/o \*ĉ  
 {eo5} laŭvort-grup/a traduk/o \*ĉ  
 {de1} fremdes Äquivalent \*a  
 {de2} Übersetzungsäquivalent \*a  
 {de3} entsprechender fremdsprachiger Terminus \*a  
 {de4} fremde Entsprechung \*a  
 {en1} foreign equivalent \*a  
 {en2} translational equivalent \*a  
 {en3} corresponding foreign term \*a  
 {fr1} équivalent étranger \*a

Termino el alia lingvo havanta la saman → rezultan signifon (85/370). La → laŭmorfemaj sencoj (85/340) de du respondaj terminoj povas esti malsamaj; tiukaze unu ne estas "traduko" de la alia. Ekzemplo: \La Franca ekvivalento de la Angla termino "head" (of a key) (=ŝlosil-kapo) estas "talon", kies laŭmorfema traduko estus "kalkano" \i. \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei; \*c go; \*ĉ wor;

### 85/380 =ApE85 #032

Rim: =93/042 [94-02-26]

4. Vortaroj, glosaroj kaj terminaroj  
 (Estos havebla en suplemento al tiu ISO-rekomendo.)

5. Apliko-kondiĉoj de terminoj (nro 94a)

94a

{U1} 001.427 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} kun'tekst/o (de termino) \*b  
 {de1} Kontext (eines Terminus) \*a  
 {en1} context (of a term) \*a  
 {fr1} contexte (d'un terme) \*a

La teksto ĉirkaŭanta la terminon (85/317) aŭ la situacio, en kiu la termino estas uzata. \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei;

### 85/381

Rim: =[86/081] =93/089 [94-02-27]

{U1} 501  
 {U2} 53.085  
 {U3} 681.32  
 {T1} KBE  
 {eo1} diĝit"/a \*a\*b\*c\*d  
 {eo2} cifer/ec/a \*g  
 {de1} digital \*d\*f\*ĝ  
 {en1} digital \*c\*ĉ  
 {fr1} numérique \*ĉ  
 {fr2} digital(e) \*h\*i  
 {N11} digitaal \*j

Funkcianta per, respondanta al, aŭ alimaniere rilatanta al la uzado de nekontinuaĵoj (ili povas esti ciferoj) por prezenti aritmetikajn nombrojn, alproksimiĝojn al nombroj de kontinuo, aŭ por prezenti logikajn esprimojn aŭ variablojn. Antonimo: analoga (85/412). \*e

Apartenanta al dataoj (85/476), kiuj estas prezentataj per ciferoj. \*e laŭ ĉ.

Apartenanta al dataoj en formo de ciferoj. (85/487) \*e laŭ \*j.

Fon: \*a SV 69/13a; \*b IK 84/3; \*c Comp; \*ĉ GES/NGI-12; \*d KBT; \*e ei; \*f Mikro-comp-Lex; \*g Cab; \*ĝ iwt-Wö; \*h TANDY; \*i ShZ; \*j McGraw; \*j DEE;

### 85/382

Rim: pok: La malkontinuaĵoj matematike ekvivalentas al ciferoj, kio pravigas la metaforon {eo2}, uzatan en Ru kaj Fr (male al En kaj De).

ei: pok pravas: la Esperanta termino por la Angla \digit\i estas "cifero" (=88/073). Tamen {eo1} estas laŭ mi preferinda, ĉar temas pri ofte ankaŭ en aliaj fakoj aplikata nova nocio, kiu meritas apartan radikon: diĝita horloĝo, diĝitigita bildo, diĝita sonregistraĵo. Mi intencas publikigi registraĵ-serion en kiu {eo1} pli taŭgas ol {eo2}.

«91-08-09»

{U1} 681.327.28  
 {T1} KCA  
 {eo1} blat/o <2> \*a  
 {eo2} ĉip/o (1) \*b\*c\*d  
 {eo3} split/o <3> \*j  
 {de1} Chip \*f\*ĝ\*h  
 {de2} Halbleiterchip \*ĥ  
 {en1} chip \*e  
 {fi1} siru \*j  
 {fr1} puce \*ĉ  
 {fr2} microplaquette \*ĉ  
 {fr3} pastille \*ĉ

Duonpreta duonkonduktanta aranĝaĵo, formita substrato (85/433), en kiu troviĝas jam ĉiuj aktivaj kaŭ (85/409) pasivaj elementoj de transistoro, diodo, ico (85/410), ktp., produktitaj per procedoj de difuzado, pasivigo, maskado, foto-rezistado kaŭ → epitaksia kreskado. (89/274). Se ~o

estas provizita per kontaktiloj oni nomu ĝin integrita cirkvitaro aŭ ico (85/410), sed fak-ĵargone la vorto ~o estas uzata ankaŭ kiel sinonimo por ico. Ekzistas jenaj tipoj: logikaj ~oj (89/275), memor-~oj (89/276), sur-~aj komputiloj (89/277), andikoj (89/278), special-celaj ~oj (89/279), programeraj ~oj (89/280) bit-diskaj ~oj (89/281) \*g laŭ \*i;

Fon: \*a hal, AkSt85,p315; \*b IK85/2; \*c SV77/25c; \*ĉ GES/NGI-12; \*d PIVS \*f CHIP; \*g ei; \*ĝ iwt-Wö; \*h Mikro-comp-Lex, \*ĥ CE; \*i ComGlo; \*j rau en EP94/4,p1;

**85/383** =ApD3.7 #516, =ApE85 #033

Rim: «94-01-30»

{U1} 159.955.1  
{T1} REA  
{eo1} kognitiv\*\*/a \*a\*b  
{de1} kognitiv  
{en1} cognitive  
{fr1}

Konscia (pri si mem kaj la ĉirkaŭo); heŭristike komprenkapabla, pens-kapabla. \*a

Fon: \*a AkSt85,p315; \*b E-log2,p212;

**85/384**

Rim: «88-12-16»

{U1} 771.42  
{U2} 778.1  
{T1} LEC  
{eo1} mask/o <7> \*a  
{de1} Kopiermaske \*d  
{en1} masking frame \*b  
{fr1} cache \*c

Maldiafana folio el kartono, plasto aŭ metalo uzata de fotografisto por ~i <4>, por ke sur la kopio aŭ printaĵo (85/001) aperu nur parto de la reproduktota bildo aŭ teksto. =85/387. EB 112/22. \*a

Fon: \*a SV 72/25a; \*b DB-En; \*c DB-Fr; \*d DB-De;

**85/385**

Rim: «88-12-16»

{U1} 621.391.7  
{U2} 681.325.53  
{T1} KEE  
{eo1} mask/o <8> \*a  
{de1} Maske f\*b  
{en1} mask \*b\*c  
{fr1} masque \*c

8a Karto traruita per rektanguletoj, laŭ interkonsentita distribuo, por elstarigi nur la en tiuj "fenestroj" aperantajn vortojn aŭ simbolojn, ekz-e por povi legi sekretan mesaĝon kaŝitan interne de banala teksto.

8b Analoga sistemo por elektronika elfiltrado de informoj. \*a

Karakto-paterno (89/087) uzata por determini la retenon aŭ eliminon de partoj de alia karakto-paterno. \*ĉ laŭ \*c

Fon: \*a hal AkSt85,p315; \*b iwt-Wö; \*c GES/NGI-12; \*ĉ ei;

**85/386**

Rim: «91-01-11»

{U1} 771.42  
{U2} 778.1  
{T1} LEC  
{eo1} mask/o-kadr/o \*a  
{de1} Abdeckrahmen \*d  
{de2} Vergrößerungsrahmen \*d  
{en1} composing frame \*b  
{en2} enlargement frame \*b  
{fr1} cadre de recouvrement \*c  
{fr2} cadre d'agrandissement \*c

Parto de projekcia print-aparato (85/001), kiu forprenas la ne reproduktotan bild-parton. EB 112/34. \*a

Fon: \*a SV72/25a; \*b DB-En; \*c DB-Fr; \*d DB-De

**85/387**

Rim: «88-12-16»

{U1} 681.326.3  
{T1} KEG  
{eo1} metagraf\*\*/i tr \*a  
{eo2} kompil/i <2> \*b  
{eo3} kompil/i \*b  
{eo4} kompil/um/i \*c\*e  
{de1} kompilieren \*f  
{de2} übersetzen \*d\*f  
{de3} umwandeln \*f  
{en1} compile \*ĉ  
{fr1} compiler \*ĉ

Prepari komputoran programon pere de alilingva programo. Transskribi programon. (el: meta = trans; graf = skrib) \*a

Traduki komputoran programon el problem-orientita lingvo (86/180) al komputor-orientita lingvo (86/179). \*e laŭ ĉ

Fon: \*a hal (AkSt85,p315); \*b Comp; \*c KKV; \*ĉ GES/NGI-12; \*d Mikro-comp-Lex; \*e ei; \*f iwt-Wö;

**85/388** =ApE85 #034

Rim: ei: "metagrafi" indikas per Grekaj radikoj nenion alian ol "transskribi". Tial tiu termino laŭ mi ne estas sufiĉe priskriba. {eo2} havas en nia lingvo jam tute alian signifon, kiu povus kaŭzi miskomprenon. {eo3} (= uzi kompilieron <PIV>) eblas. Sed la termino "kompilero" mispensigas pri ero de kompila laboro (=85/389). Tial, kvankam mi klopodas eviti la -um-vortojn, la termino "kompilumi" ŝajnas al mi la plej taŭga.

wor (90-07-19): Pri {eo1}: Laŭ mi ne sufiĉe analizita. Uzo de "graf" mem ŝajnas ne PIV-a. Pri {eo3}: Malkonsilinda, ĉar Anglisma k ĉar "-er" vole nevole estas sufikso ("kompil" ja estas radiko kun koncerna senco). Tiu "-er" havas mortan sencon pri ilo. Ak ei pri konfuzeblo kun viva senco pri elemento. Pri {eo4}: La sufikso /-um/, kiam ne sistema (85/365) (ekz: nazumo, kolumo, plandumo,

...), estas laŭ mi afiksa paronimigilo. Por lingvo-uzanto paronimoj estas multe pli konfuzaj ol estas homonimoj. Se oni nun akceptos {eo4}-n, la sufikso "-um" vole nevole laŭ mi poste forfalos.

Pri {eo2}: Angle ~i kaj kompili (1) maksimume estas "homonimaj"; tio miasperte ne konfuzas la lingvo-uzanton. Fakte, ~i estas ekzemplo aŭ hiponimo de kompili (1), ĉar la maŝino ja deprenas el aliaj pretaj fontoj instrukciar-blokojn k, kunmetante tiujn blokojn laŭ plano priskribita en la "tradukata" teksto, verkas neoriginale. Tio estas multe pli simpla agado ol tradukado -- ĝi proksimas al transkribado. Ŝajnas do pli logike forigi numeron "<2>" en {eo2}, ĉar "kompili (1)" jam ampleksas la celatan sencon.

Trafa serĉo por nova termino por 85/388 el la perspektivo, traduki, celu laŭ mi la jenajn karakterizaĵojn: 1. stamo ne pli longa ol estas "kompil/"; 2. evito de paronimoj; 3. sinmotiveco: (a) aludo al tradukado; (b) aludo al direkto de tradukado -- de blokaj diroj al ties eroj (tian aludon faras {eo2}). Iuj eblaĵoj: "fajnduki" (el "fajnage traduki"), erduki (erige traduki), erigi kaj malbloki (surbaze de bloko <3>).

ei (91-08-10): Mi ne konsentas kun wor: kompili <2> estas tute alispeca agado ol kompili (1), kiu nepre meritas distingon terminon: Se mi per apliko de makrooj (89/317) duon-aŭtomate kompilas indekson por Pekoteko-terminoj pere de mia komputoro, tiam tio estas tute alispeca agado ol konverti programon aŭ registraĵon al maŝin-kodo. Se oni ŝpareme uzas "-um/" ĝi ja estas utila -- neniu dirus "nazo" aŭ "kolo" anstataŭ "nazumo" aŭ "kolumo", kaj same mi ne opinias, ke "-um" forfalos el "kompilumi". Ni zorgu, ke nia lingvo ne fariĝu same ambigua kiel la Angla. Ni povas kontraŭi tiuspecan degeneradon, la Angla-lingvanoj ne, ĉar ili uzas dekomence ambiguajn terminojn. Tio povos esti decida avantaĝo por Esperanto.

wor (91-11-11): "um" en "kompilumi" kaj "um" en "nazumo", "kolumo" ktp ne estas laŭ mi kompareblaj, ĉar, kiel mi atentigis supre en 90-07-19, tiuj lastaj estas sistemaj kaj ilia "um" signifas ion kiel: 'portajo destinita por la koncerna korpoparto'.

ei (91-12-31): La baza difino por "-um/" laŭ PIV. estas: \Suf. sen difinita senco\i. Do ĝi estas utiligebla ĉiucele por atribui novan distingindan signifon al iu ajn vorto. Ne ĝenas, ke krome ekzistas kvar difineblaj signifoj de "-um/". Kontraste al la de wor proponitaj novaj terminoj {eo4} estas facile memorigebla, ĉar \to compile\i estas internacie vaste konata.

«91-12-31»

{U1} 681.326.3  
 {T1} KEG  
 {eo1} kompilero (1) \*a  
 {eo2} kompil/il/ero \*b\*c\*d  
 {eo3} kompil/um/ap\*\*/ero \*e  
 {de1} Kompilierer \*d\*f\*ĝ

{de2} Übersetzer \*f  
 {de3} Compiler \*ĝ  
 {en1} compiler \*d  
 {fr1} compilateur \*ĉ\*d  
 {fr2} programme de compilation \*ĉ

Programo, kiu tradukas altnivelan komputoran lingvon en absolutan kodaĵon aŭ en asemblan lingvon (85/450). La fonto-kodaĵo metata en la ~on estas priskribo de algoritmo (91/017) aŭ programo en al iu problemo adaptita program-lingvo. La eliranta kodaĵo estas la ekvivalenta priskribo de la algoritmo en maŝin-taŭga lingvo. \*e laŭ \*g

Font: \*a PIV; \*b Comp; \*c IK 84/3; \*ĉ GES/NGI-12; \*d KBT; \*e ei; \*f Mikro-comp-Lex; \*g COMPUT; \*ĝ iwt-Wö;

85/389 =ApE85 #035

Rim: ei (88-12-16): {eo1} ne plaĉas al mi, ĉar ĝi pensigas pri ero de kompilaĵo; {eo2} ne plaĉas al mi, ĉar temas pri ilo, kiu "kompilas" (= verki ne originale). Mi rekomendus uzi la sufikson -il- kiel eble plej malofte (=89/380), kaj trovi por specialaj iloj novajn vortojn aŭ sufiksojn. Por komputora programo mi elpensis la sufikson -ap-. (85/432).

wor (1990-07-19): Pri {eo2}: Ĝis ĝenerala (esperinda) akcepto de -ap-, {eo2} estas laŭ mi konvena, ĉar logika. Laŭ mi, ~o ja estas ilo (=tio, kio servas por efektiviĝi ion) uzata de la maŝino por kompili <1> (=verki ne originale); (=85/388). Pri "-il-": Laŭ mia kompreno pri Esperantismo, sub intergenta interkompreno ĉefcelo estas Klaro. Post tio en ordinara teksto pli gravas Facilo ol Precizo, dum en teĥnika faka teksto pli gravas Precizo ol Facilo. Do, en ordinara teksto -il- estas preferinda ĉiam, kiam la rezulta senco en kunteksto ne tiom ampleksas, ke klareco difektiĝas. Tiaokaze, oni bezonus hiponimon. En preciza teĥnika teksto tamen oni povas prave preferi hiponimon. Konklude: "kompililo" eksterfake, kaj "kompilapo" enfake. «91-08-10»

{U1} 621.394.67  
 {U2} 681.3.023.42 (+)  
 {T1} KED  
 {eo1} modem"/o (1) \*a\*b  
 {de1} Modem \*b\*f  
 {de2} MODEM \*e  
 {de3} Akustikkoppler m \*f  
 {en1} modem \*c\*ĉ  
 {fr1} modem \*c\*ĉ

Akronimo el "modulato" kaj "demulato" (=malmodulato). Aparato por konverti diĝitajn (85/382) signalojn al analogaj (85/390) signaloj taŭgaj por transmisio tra analogaj komunik-kanalo (=modulato) kaj por rekonverti la ricevatajn analogajn signalojn al diĝitaj (=malmodulato). Oni dezajnas (85/411) ~ojn por akordigi ilin kun naciaj kaj internaciaj normoj, por ke aparatoj de diversaj fabrikintoj povu "paroli" al aparatoj de aliaj fabrikintoj. \*d laŭ \*c

Fon: \*a Comp; \*b KTB; \*c COMPUT; \*ĉ GES/NGI-12; \*d ej; \*e Mikro-comp-Lex; \*f iwt-Wö;

85/390

Rim: «93-11-13»

{U1} 6  
{U2} 621.3  
{U3} 681.3  
{T1} KEE  
{T2} KGM  
{eo1} modjul"/o (1,2) \*a\*b  
{eo2} modul/o <5> \*c\*ĉ\*d  
{de1} Modul *m* \*d\*f  
{de2} Baustein *m* \*f  
{de3} Funktionseinheit *f* \*f  
{de4} Baukasten *m* \*g  
{de5} Element *n* \*g  
{en1} module \*e\*f  
{fr1} module \*e

1. Disigebla kaj kun aliaj ~oj interŝanĝebla materia parto de kompleksa sistemo. ~a konstruado de domoj kaj mebloj; ~a ŝranko EB#44/25; sur-Luniĝa ~o. Evidente tiu ĉi nocio estas tre ĝenerala: kartoĉoj estas cilindraj ~oj; komputoraj kartoj, disketoj, kasedoj, ĉiuj estas disigeblaj kaj interŝanĝeblaj kaj pro tio ~oj. Pli ĝeneralan nocion havas unajo (89/044), kiu ne devas esti interŝanĝebla, do laŭnorme farita. Aliflanke unajonieniam estas programo. \*a

2. Programo, kiu estas apartigebla kaj identigebla, ekz. ŝargapo (85/441) aŭ rezult-modjulo (85/456). ~a programado; \*a laŭ \*e.

Fon: \*a ej en AkSt85.p.241 kaj en EB; \*b PIVS; \*c Comp; \*ĉ IK 84/3; \*d KBT; \*e GES/NGI-12; \*f Mikro-comp-Lex; \*g iwt-Wö;

85/391 =ApE85 #036

Rim: ej: {eo2} laŭ mia opinio ne taŭgas por tiu nocio, ĉar "modulo" havas jam kvar aliajn signifojn en PIV, kaj krome ekzistas la verbo "moduli" kun ankoraŭ aliaj sencoj. Ekzistas nun multaj aliaj module konstruitaj skatoloj aŭ ujoj utiligataj por stori dataojn. Por ili mi proponas la novan akronimon modujo (91/003). «91-03-06»

{U1} 681.327.634  
{T1} KDE  
{eo1} mol-disk/o \*a\*d  
{eo2} disk/et/o (1) \*b\*c\*h  
{eo3} disked\*\*/o \*d\*i  
{eo4} fleks/abl/a disk/o \*ĝ\*h  
{eo5} fleks/a disk/o \*ĥ  
{eo6} supl/a disk/o \*ĥ  
{de1} Floppy-Disk \*f\*g  
{de2} Diskette \*f\*g  
{de3} Floppy \*g  
{en1} floppy disk (in an 8" square envelope) \*ĉ\*c\*  
{en2} diskette \*b\*e  
{en3} minifloppy (in a 5 1/4" square envelope) \*ĉ

{en4} microfloppy (in a rigid 3 1/2" cartridge) \*ĉ  
{fr1} disque souple \*e  
{fr2} disquette \*e  
{fr3} minidisque \*e

Elkomputorigebla stor-medio (94/672), unuopa ronda fleksebla disko interne de kvadrata ujo aŭ mujo (91/003) uzata en multaj komputoroj kaj teksto-prilaboraj sistemoj. Same kiel magneta bendo ~o estas registrebla, forviŝebla kaj reuzebla denove kaj denove. Kp: durdisko (85/393) \*d laŭ \*ĉ Fon: \*a hal en AkSt85.p.316; \*b Comp; \*c IK; \*ĉ ComGlo; \*d ej; \*e GES/NGI-12; \*f Mikro-comp-Lex; \*g iwt-Wö; \*ĝ pre en WEs88,p79; \*h PIVS; \*ĥ wor; \*i @pfei93-01-06; \*j

85/392 =ApE85 #037

Rim: ej (94-02-20): Ŝajnas al mi nun preferinde atribui laŭ \*i al ĉiuj tiuspecaj stor-medioj la terminon {eo3}, ĉar la stor-medioj mem povas esti molaj aŭ flekseblaj, sed ili troviĝas en pli-malpli rigidaj ujoj. «94-02-28»

{U1} 681.327.635 (+)  
{T1} KDE  
{eo1} dur-disk/o \*a\*ĉ\*i  
{eo2} Winchester-disk/o \*b EVIT \*ĉ  
{eo3} vinĉestr\*\*/o \*e EVIT \*ĉ  
{eo4} vinĉestr\*\*/a disk/o \*g EVIT \*ĉ  
{eo5} firm-disk/o \*ĝ EVIT \*ĉ  
{eo6} mal'mol/a disk/o \*h  
{eo7} rigid-disk/o \*j  
{eo8} disk/o <4> \*j\*1 EVIT \*ĉ  
{de1} Magnetplatte *f* \*d\*f\*k  
{de2} Hartplatte *f* \*k  
{en1} hard disk \*c\*d\*k  
{en2} metallic disk \*c  
{en3} magnetic disk \*k  
{fr1} disque dur \*ĥ

Ne el disko-drajvo (85/394) elprenebla disko por magneta registrado kune kun la drajva hardvo (85/398). La dur-disko mem konsistas el unu aŭ pluraj diskoj unu super la alia el dura alumina substrato (85/433) kovrita per aparte maldika magnetigebla tavolo. Pro la maldiko de la magnetigebla tavolo oni atingas multe pli grandan storivon ol ĉe disketo (85/392). Al la hardvo de la durdiska drajvo apartenas flosantaj kapoj (87/500). ~a drajvo estas havebla ankaŭ sur karto, kiun oni metas kiel aliajn kartojn en personan komputoron por pligrandigi ties komputivon (=~ako 89/172). Ekzistas krome elpreneblaj ~oj, kiujn oni povas sendi per la poŝto, la t.n. data-pakoj (90/294) enmeteblaj en data-pakingon. Tiuj datapakoj fakte estas kompletaj drajvoj, en kiuj neelpreneble troviĝas ~o. La plej novaj ~oj estas moveblaj ~oj, kiuj similas al data-pakoj, sed ili ne bezonas data-pakingon, nur kablonekondan al la kablingo por la printatoro, kaj 12-voltan kurento-provizilon. Tiel oni facile povas movi grandan kvanton da dataoj de unu komputoro al alia. \*ĉ

Fon: \*a hal en AkSt85,p316; \*b IK 84/3,p48; \*c COMPUT; \*ĉ ej; \*d Mikro-comp-Lex; \*e pok en letero al ej 87-07-19; \*f iwt-Wö; \*g kav; \*ĝ pre en WEs88, p79; \*h MpP8; \*ĥ WP5.1Fr; \*i PIVS; \*j wor; \*ĵ @pfei93-01-06; \*k CE; \*l MON94/2,p12;

85/393 =ApE85 #038

**Rim:** ej: Enkonduki vortojn kun ne-Esperantaj literoj laŭ mi ne estas rekomendinda. Mi ankaŭ rekomendus nek la neologismon de pok nek la terminon de kav, ĉar la termino VWinchester diskli jam arkaiĝis en la Angla. Ankaŭ {eo5} ne taŭgas, ĉar durdiskoj ne estas firmaj (laŭ PIV: "tiel fiksita, ke ne eblas ŝanceliĝo"). Tute male: Malavantaĵo de malnovaj durdiskaj drajvoj estis, ke ili estis tre sensivaj kontraŭ malgrandaj skuoj. (Tial iliaj dum uzado flosantaj lego- aŭ registro-kapoj estas "parkadendaj" dum neuzo de drajvo.) ej (94-02-20): Nepre evitinda ŝajnas al mi ankaŭ la termino {eo8}, ĉar la disko mem estas nur relative malgranda parto en tiu ĉi komplika periferia aparato, kiu nepre devus havi klare distingeblan nomon, precipe se oni provas, kiel en la Monato-artikolo, klarigi la funkciadon de komputoro al komencantoj. «94-02-20»

{U1} 681.327.634  
 {T1} KDE  
 {eo1} disk/o-drajv"/o \*a\*1  
 {eo2} disk-aparat/o \*b  
 {eo3} disk/il/o \*c  
 {eo4} disk/et-funkci/ig/il/o \*ĉ  
 {eo5} fleks/abl/a disk/il/o \*d  
 {eo6} fleks/abl/a disk-unu/o \*e  
 {eo7} disk-unu/o \*f  
 {eo8} disk/o-staci/o \*k  
 {eo9} disk-funk\*\*/ig/il/o \*n  
 {eo10} disked\*\*/il/o \*o  
 {eo11} disked\*\*-aparato/o \*a  
 {eo12} disked\*\*\_unaĵ\*\*/o \*a  
 {de1} Laufwerk \*h  
 {de2} Diskettenlaufwerk \*h  
 {de3} Plattenlaufwerk \*h\*j\*ĵ  
 {en1} disk drive \*g  
 {en2} disk unit \*g  
 {fr1} mécanisme d'entraĜnement de disques \*i  
 {fr2} unité de disquettes \*m

Periferia aparato konektebla al aŭ konstruita en komputoro, kun rotaci-mekanismo, lego- kaj registro-kapoj kaj cirkvitaroj. ~o servas por registri datajn (85/476) sur magnetaj aŭ optikaj diskoj kaj por legi ilin. =85/385 \*a

Fon: \*a ej; \*b IK83 p38; \*c IK84/1 p42; \*ĉ IK85/2 p59; \*d IK84/2 p19; \*e IK83 p4; \*f Comp; \*g COMPUT; \*h CHIP; \*i GES/NGI-12; \*j Mikro-comp-Lex; \*ĵ iwt-Wö; \*k mau; \*l PIVS; \*m WP5.1Fr Ini.p6; \*n wor; \*o MON94/2,12;

85/394 =ApE85 #039, #040

**Rim:** ej: Neologismo ŝajnas al mi preferinda, ĉar "drajvo" utilas por multaj aliaj nocioj. "disko" laŭ

BU,KR,WE signifas per numerdisko sur telefon-aparato elekti telefon-abonanton. Do "diskilo" devus esti nun ekzistanta aparato, kiu faciligas tiun elekton. "Disketfunkciigilo" ankaŭ ne taŭgas, ĉar disko neniam funkcias, do oni ne povus funkciigi ĝin. "Unuo" laŭ PIV estas abstrakta aŭ difinita kvanto. "stacio" estas loko, kie haltas publikaj trafikiloj, por ŝargi aŭ malŝargi pasaĝerojn aŭ varojn. En benzinstacio oni provizas sin per benzino, per la nocio de ĉi tiu komplekso oni ne provizas sin per diskoj, tial {eo8} laŭ mi ne trafas. Per ĝi oni ankaŭ ne povus traduki kompleksojn 85/395 kaj 85/396.

W. Prent (WEs 88/9, p.79) opinias, ke "disko-aparato" estus taŭga. Laŭ mi tiu esprimo estas multe tro ĝenerala. Diskoaparato estas ankaŭ gramofono, disko-gurdo (EB 306/8), disko-ŝanĝilo (EB 306/32), disko-turnilo (EB 237/14), codoroma (89/164) legatoro (89/159) kaj multaj aliaj aparatoj, kiuj utiligas diskojn.

Drajvo (85/395) ne ĉiam estas aparato, kiun oni uzas kun diskoj. Ĝi povas esti parto de komputora memoro, kiun la programo tiel prezentas al la centra procesoro, ke tiu ĉi traktas ĝin kvazaŭ ĝi estus diskeda aŭ durdiska aparato. (=85/396)

wor (90-07-19): Mi akordas kun ej pri {eo5,6, 7} kaj malforte pri {eo2,3,4,8}. {eo4-6} estas tro longaj. Pri {eo2,3}: Mi akordas kun ej, ke ili estas ne precizaj. Tamen ili estas laŭ mi ĝustaj kaj uzeblaj eksterfakte. Pri {eo3}: temas pri mll de io, kiel "disk/o-uz/il/o" aŭ "disk/o-turn/il/o" aŭ {eo4}. Pri {eo4}: Disketo estas artefaritaĵo al kiu uzanto atribuas celon. Ĝi do estas ilo (=tio, kio servas por efektiviĝi ion). Kiam artefaritaĵo aŭ ilo difektiĝas kaj tial ne plu povas plenumi sian celon, oni diras, ke ĝi ne funkcias. Kiam disketo ne estas difekta kaj ja plenumas sian celon, kial oni ne diru, ke ĝi funkcias (=Plenumi la propran difinitan taskon)? Pri {eo9}: Mll de {eo4} sen la balastaĵo "ci". Pri {eo1} (=85/395).

ej (91-08-10): Kvankam PIV atribuas funkciadon al ĝenerale ĉia ilo, mi havas la impreson, ke oni en la vere uzata lingvo ne faras tion. Se mi ekzemple volas fosi per ŝpato, kaj mi konstatas, ke mi ne povus plenumi tiun laboron, ĉar fosota grundo estas tro malmola, mi ne dirus "la ŝpato ne funkcias", sed "ŝpato ne estas utiligebla por tiu ĉi laboro." Mi almenaŭ neniam dirus pri gramofona disko, ke ĝi ne funkcias, se ĝi difektiĝis kaj se pro tio la nadlo restas ĉiam en la sama kanelo. Mi dirus: "La disko ne plu estas uzebla". Sed se la turn-mekanismo ne turnas la diskon, tiam mi ja dirus, ke la gramofono ne funkcias. Analogie diskodrajvo povas funkcii aŭ ne, sed neniam disko. Mi ne opinias, ke ni devus elimini ĉiun balastaĵon. Oni laŭ mia opinio pli facile memoros "funkcii" ol "funkti". Tiu ĉi estus falsa amiko por Germanoj, kiuj opinias, ke temas pri radio-telegrafado.

wor (91-11-11): Se fosota grundo tro malmolas, nur ironie mi povus diri, ke "la ŝpato ne funkcias". Malmoleco de grundo ne estas difekto de

ilo, ŝpato. Se, kontraŭe, dum grundo sufiĉe molas, la tranĉa eĝo estas tro ŝirita kaj kurbigita, tiam mi certe diras, ke "La ŝpato ne funkcias". Verŝajne, proponinto de {eo4} ne atribuas la saman nocion al "funkcii", kiel ei. Pli grave: S^ajnas al mi nekonsilinde ŝanĝi la vastecon de PIV-a vorto sen aparta Pekoteka registraĵo "korektanta" PIV-on. Plej grave: "funkcii" estas komun-lingva vorto; laŭ mi, PIV-an konstaton pri tiesa signifo oni povas dementi nur per pli profunda esploro ol tiu de PIV.

ei (91-12-31): Jen tipa ekzemplo, kiel la denaska lingvo influas. En la Germana mi uzas la el la Franca pruntitan \funktionieren\ nur, se temus pri pli-malpli komplika aparato, kiu plenumas sian funkcion per kunago de diversaj teknikaj procedoj. Sed en la Angla \to function\ simple signifas "plenumi specifan agon", tial por Usonano "La ŝpato ne funkcias" ŝajnas esti tute bona frazo. La problemon kaŭzas ne sufiĉe preciza difino en PIV: \Plenumi la propran difinitan taskon, pp organo, maŝino k ĝenerale ĉia ilo aŭ organizo.\i "...ĉia ilo" subtenus la opinion de wor, sed la poste indikitaj ekzemploj montras, ke nek ŝpato nek disko estas funkciigeblaj. Laŭ mi la Esperanta difino devus akordiĝi kun la Franca difino: (\FONCTIONNER Remplir sa fonction; être mis en action: machine qui fonctionne automatiquement\i). Bv. en la enketilo indiki, la signifon, kiun ni devus atribui al "funkcii (2)".

ei (94-03-03): Post mia akcepto de "diskedo" (85/392) {eo10} eble estas akceptebla, ĉar "diskedo" estas multe pli specifa termino ol la simpla "disko". Tamen mi jam ofte konsilis la kiel eble plej ŝpareman aplikon de la tre vast-signifa "-il/" (89/380). Tial {eo11} aŭ {eo12} ŝajnas al mi preferindaj, se oni nepre volas eviti la terminon {eo1}. «94-03-03»

{U1} 681.327.11  
 {T1} KEE  
 {eo1} drajv"/o \*a\*d  
 {de1} Laufwerk \*b\*c  
 {en1} drive \*b  
 {fr1} répertoire \*e

Parto de komputora sistemo aŭ de ĝia memoro, izolita de aliaj ~oj. Ĝi povas esti periferia aparato aŭ mekanismo konstruita en la komputoro mem por manipuli persistantan memoron (85/472). Ĝi povas ankaŭ esti per programo apartigita parto de la efemera memoro (85/415). Komputoro povas havi unu, du, tri aŭ pli da ~oj: A--o, B--o, C--o, ktp. Prompto (85/413) vidigas al la komputoranto, ke la komputoro atendas ordonon kaj al kiu ~o ĝi estas konektita. Je ekfunkciigo komputoro estas konektita al la defaŭlta ~o (85/414), kiu kutime estas la A--o, kaj kiun la maprodo (85/403) DOS indikas per: A>. En DOS oni povas ŝanĝi la ~ojn per komando, kiu konsistas el dupunkto post la litero de la dezirata ~o: A:, B:, C:. ~o-specoj: disko--o (85/394) diskeda aŭ durdiska; magnet-bend--o

(86/166); ram--o (85/396). \*a

Fon: \*a Letriks; \*b Mikro-comp-Lex; \*c iwt-Wö; \*d PIVS; \*e WP5.1Fr-Ini.p6;

### 85/395

Rim: wor: (90-07-19) Pri la difino: La donita difino estas miksaĵo de nocioj, difinoj, komentoj, kaj komentoj pri marka normo, kiuj pli konvene trakiĝu aparte unu de la aliaj. Provo al pli bona difino:

Difino: Parto de komputora sistemo aŭ de ties memoro, izolita de aliaj ~oj.

Kom: Subnocioj:

~ [a]: periferia aparato aŭ mekanismo konstruita en la komputoro mem por manipuli neefemeran memoron. Ekz: disko--o (85/394) moldiska aŭ durdiska; magnet-bend--o (86/166).

~ [b]: per programo apartigita parto de la efemera memoro. Ekz: ram--o (85/396).

Kom: Pri ~oj ĝenerale: Komputoro povas havi unu, du, tri aŭ pli da ~oj. Prompto (85/413) vidigas al la komputoranto, ke la komputoro atendas ordonon kaj al kiu ~o ĝi estas (idee) konektita. Je ekfunkciigo komputoro estas (idee) konektita al la defaŭlta ~o (85/414), kiun oni povas ŝanĝi per komando.

Kom: Pri IBM-a maprodo (85/403) normo DOS: La ~oj nomiĝas A--o, B--o, C--o, ktp. La defaŭlta ~o kutime estas A--o. DOS indikas ĝin per: A>, ktp. La komando por ŝanĝi ~on konsistas el dupunkto post la litero de la dezirata ~o: A:, B:, C:..

Mi celis objektivan reformulon kaj mi sentas la rezulton ankoraŭ pliboniginda. Ekz:

1. La difina frazo ne sufiĉe limigas la nocion. Ekz. la elektran draton al la muro oni sendube ne konsideras ~o.

2. La difino entenu ĉiujn karakterizaĵojn, kiujn komune entenas la diversaj subnocioj. Ilin bone konstati postulas kompletan liston de subnocioj. Plibonigo eble entenu la vorton "manipuli".

Pri la nocio:

3. Ŝajnas, ke la sola kialo por la nocio ~o estas ke ~ [a] kaj ~ [b] prezentigas same al la uzanto. Se jes, el tiu perspektivo, ~o estas posteno aŭ iluzio, kaj ~o [a] kaj ~o [b] plenumantoj. Ĝuste kiel viro kaj virino ne estas hiponimoj de instruisto, tiel ~o [a] kaj ~o [b] ne konsideriĝu subnocioj de ~o. Tiaokaze, la terminoj por ~o [a] (=85/394), (=86/166) kaj ~o [b] (=85/396) ne entenu la vorton "drajvo".

4. Iomete maltrankviligas min, ke nocio pri aĵo, ~[a], kaj nocio pri ties simulaĵo, ~[b], ĉi tie ŝajnas prezentigi kiel subnocioj de la sama nocio ~o. Ĉu terminologoj ĝenerale akceptas tion en nocio-sistemo? Se jes, ĉu ~[a] kaj ~[b] havas la saman → gradon de abstrakteco (=85/299)?

Pri {eo1}:

5. Mi kredas malkonsilinda la elekton de Angledevena termino post kontrolo de nur du lingvoj! (a) Kiam ne eblas purisma solvo kaj ne ekzistas Eŭrope internacia formo, tiam ni nepre pli bone kontrolu la plej gravajn ne-Eŭropajn lingvojn. (b) Mi kredas

ĝenerale evitinda plian similigon de Esperanto al la Angla.

ej (91-08-10): Mi volonte konsentas, ke la difino estas pliboniginda, kaj mi dankas pro la klopodoj de wor. La problemo pri tiu nocio-komplekso estas, ke mi ĝis nun vane serĉis en miaj multaj konsult-libroj tradukindan difinon. Mi trovis difinojn por "disko-drajvo", sed ne por drajvo ĝenerale. La nocio estas tiel baza, ke ĝi troviĝas en neniu glosaro de iom detala instrulibro pri komputorado, kaj ankaŭ ne en komputika libro por komencantoj, kiu ĝenerale klarigas, kiel komputoroj funkcias. Eĉ <McGraw>, en kiu mi preskaŭ ĉiam trovis utiligeblajn difinojn, neniel helpis. Tie estis trovebla difino nur por *disk drive*. Sub *drive* sole <McGraw> menciis nociojn de tiu termino nur en la kampoj de elektroniko (=ekscito), mekanika inĝeriko, minado kaj psikologio. Tial mi sentis min devigita, mem krei la difinon. Ankaŭ mia literaturo en aliaj lingvoj ne helpis min. Por la ĝenerala nocio de {en1} la termino {de1} ofte ne taŭgas. En <CE> {en1} estis tradukita per *Antrieb*, kio estus la Germana termino por la nocio de "pel-instalaĵo". Ankaŭ la termino {fr1}, kiun mi trovis en la Franc-Kanada versio de Vopo 5.1, kaj kiu signifas tradukita al Esperanto "repertuaro", ŝajnas esti maltrafa termino-elekto. Mi volonte enkondukus radikojn el aliaj lingvoj. Sed komputoroj estas fabrikataj ĉefe en Anglalingvaj landoj, aŭ almenaŭ oni aldonas uzo-instrukciojn preskaŭ nur en la Angla. Ni ne povos atendi, ĝis oni eble en iu lingvo kreos pli konvenajn terminojn. Se ni volas konkuri kun la Angla, niaj terminoj devas esti pretaj tuj, kiam oni bezonas ilin por iu novaĵo. Do ne estas eviteble, ke ni uzos la Anglan kiel font-lingvon por Esperantaj terminoj. Ankaŭ en etnaj lingvoj oni komence uzas Anglajn terminojn, kiuj estas multe pli ĝenaj tie, ĉar Anglaj terminoj devigas la homojn lerni la Anglan prononcon, dum ni en Esperanto povas devigi la homojn prononci niajn terminojn kiel Esperantajn vortojn. Cetere, ĝis nun mi ne trovis etnolingvan tradukon de Angla termino, kiu estus servinta kiel pli taŭga elirbazo por Esperanta termino. Do atendado ne estus helpinta. Ni teoriumu pri tiaj aferoj, tamen ni ne neglektu nian ĉefan taskon: rapide provizi uzeblajn terminojn, por ke ni povu apliki nian lingvon en ĉiuj novaj fakoj. <91-08-10>

{U1} 681.327.11  
 {T1} KDD  
 {T2} KEG  
 {eo1} ram-drajv"/o \*a\*d  
 {de1} virtuelles Diskettenlaufwerk *n* \*c  
 {de2} virtuelles Laufwerk *n* \*c  
 {en1} RAM drive \*f  
 {en2} electronic drive  
 {en3} dynamic drive  
 {en4} semidisk \*f  
 {en5} virtual disk \*b\*c\*g

{en6} memory drive \*c  
 {en7} RAM disk \*g  
 {en8} E-disk \*g  
 {en9} emulated disk \*g  
 {en10} pseudo disk \*g  
 {fr1} diske virtuel \*e

Drajvo (85/395) kreita per programo en la ramo (85/393). ~o rapidigas data-traktadon, ĉar neniu mekana (87/237) funkciado kiel en disko-drajvo (85/394) necesas, nur data transigo en la memoro. \*a laŭ \*g

Fon: \*a ej; \*b WP5.1p458; \*c iwt-Wö; \*d PIVS; \*e WP5.1Frp476; \*f PMH; \*g ComGlo;

85/396

Rim: <92-01-05>

{U1} 681.327.2  
 {T1} KDD  
 {eo1} ram/o <3> \*a\*h  
 {eo2} RAM- \*b  
 {eo3} operaci/a stor"/o \*c  
 {eo4} operativ\*\*/a stor"/o \*ĉ  
 {eo5} ajn-vic/a stor"/o \*d\*k  
 {eo6} ajn-vic/a memor/o \*a\*k  
 {eo7} konvenci/a memor/o \*a  
 {eo8} set"/ebl/a stor"/o \*q  
 {de1} Randspeicher \*d\*j  
 {de2} Speicher mit wahlfreiem Zugriff \*d\*j  
 {de3} Direktzugriffsspeicher \*j  
 {de4} RAM \*j  
 {de5} Schreib-/Lesespeicher \*j\*j  
 {en1} random-access memory \*g\*h\*i\*j  
 {en2} RAM \*g\*h\*i  
 {en3} random access storage \*i  
 {en4} random access store \*d\*j  
 {en5} read-write memory \*i  
 {en6} direct access storage \*i\*j  
 {en7} conventional memory \*l  
 {fr1} mémoire à accès sélectif \*i  
 {fr2} mémoire à accès direct \*h\*i  
 {fr3} mémoire vive \*h\*i  
 {fr4} mémoire active \*i  
 {fr5} mémoire conventionelle \*m  
 {fr6} RAM \*m  
 {fr7} antémémoire \*m  
 {N11} RAM \*p  
 {N12} interne geheugen \*p

Legebla kaj registrebla memoro en komputoro, en kiu la baza memorero (91/018) kapablas registri unu biton da informo. Larĝaj memoroj estas formitaj kiel dudimensiaj memoreroj. Individua memorero estas identigebla per laŭvicaj kaj laŭkolumnaj adresoj, kiuj estas derivitaj per malkodigo de adresvorto provizita de la uzanto. En ~o ĉiu memorero estas sendependa de la aliaj memoreroj kaj povas esti alirata en iu ajn sinsekvo dum sama tempoperiodo, tial la nomo: "random access" = ajnvica. ~o estas kutime efemera memoro (85/415) kaj uzata por dumtempa enmemorigo de dataoj (85/476) aŭ programoj. \*a laŭ \*g.

Fon: \*a ej; \*b IK83 p41; \*c IK85/2 p23; \*ĉ IK84/3, p15; \*d KKV; \*e Comp; \*f KTB; \*g COMPUT; \*h GS1; \*ĥ PIVS; \*i GES/NGI-12; \*j Mikro-comp-Lex; \*k iwt-Wö; \*l WP5.1p455; \*m WP5.1Fr,p475; \*p DOS-hl; \*q wor;

**85/397** =ApE85 #041

Rim: ej (89/12/10): =86/140, 86/187. Laŭ \*i {en1} kaj {en5} estas sinonimoj, tamen oni uzas diversajn terminojn por substreki diversajn ecojn de la sama objekto.

wor (90-07-19): {en1-4} estas misnomoj en la Angla, ĉar ankaŭ ROM estas ajnvica. Tial al mi ŝajnas malkonsilindaj {eo5,6} por la nuna nocio. {eo5,6} konvenas por la supernocio de RAM kaj ROM. Manke de referenco al registraĵo pri "operativa" aŭ "operat-", {eo4} estas laŭ mi evitinda. Ĝi ŝajnas paronimo de "operacio", do denove evitinda. La fina parto "-iv" estas aŭ balastaĵao aŭ sufikso. Balastaĵoj ne estas enkondukindaj -- paronimo eĉ malpli. Ĝis kiam ni trovos plene kontentigan solvon {eo2} ŝajnas taŭga provizoraĵo. Pri {eo8} =85/451. «91-08-10»

{U1} 681.322.25 (+)  
{T1} KDG  
{eo1} rigid/aĵ/ar/o \*a  
{eo2} hardvar/o (1) \*b\*c  
{eo3} aparat/ar/o \*b\*ĉ\*d  
{eo4} maŝin-var/o \*f  
{eo5} il-var/o \*g  
{eo6} hard\*\*/o \*ĥ  
{eo7} hardv\*\*/o \*h  
{eo8} aparat/aĵ/o \*ĝ  
{eo9} mal'mol/aĵ/o \*l  
{eo10} durv\*\*/o \*k  
{de1} Hardware \*j  
{de2} materielle Ware \*ĉ  
{en1} hardware \*e\*i  
{fr1} matériel \*e\*i  
{N11} hardware \*k

La materia parto de komputora sistemo, inkluzive de a) elektraj, b) elektronikaj, c) elektromekanikaj kaj ĉ) mekanaj konstru-elementoj. Ekzemploj: por a): ŝaltiloj; por b): icoj (85/410), monitoroj (85/416); por c): diskodrajvoj (85/394); por ĉ): komputora kesto. (=85/399) \*h

Fon: \*a hal en AkSt.85 p316; \*b Comp; \*c PIV; \*ĉ KBT; \*d KKV; \*e GS1; \*f al en letero al ej (86-06-20); \*g al en letero al ej (86-07-24) kaj en cirkulero 153 de la Akademio; \*ĝ bcu; \*h ej; \*ĥ tau; \*i GES/NGI-12; \*j Mikro-comp-Lex; \*k wor; \*l ton en publika diskuto dum Esperantologio-konferenco 1990;

**85/398** =ApE85 #042

Rim: ej: Mia difino estis tradukita laŭ diversaj Anglalingvaj verkoj. Ĝi estas pli preciza ol tiu de \*ĉ: IĈiuj teknikaj partoj de komputiloĵi, ĉar sub ~o oni komprenas ne nur "teknikajn partojn", sed ankaŭ kompletajn aparatojn, ekz-e la komputoron mem, aŭ aparatojn konektotajn al komputoro, ekz.

printatoron, monitoron, modemon. PIV difinas pli trafe (bedaŭrinde - ĉar "hard/" ne estas Esperanta prefikso - sub la radiko "var"): \IKonvencia nomo por montri ĉiujn fizikajn elementojn de informadika sistemo, komputero ks.\i

Pure Esperanta termino ŝajnas al mi preferinda al la ĝis nun kutime uzata tro Anglisma "hardvaro" <Comp, PIV>. Tamen ankaŭ {eo1} ne ŝajnas al mi kontentiga, ĉar ne ĉiu ~o estas rigida. Moldiskoj, konekto-kabloj kaj multaj aliaj partoj de komputora sistemo estas flekseblaj. {eo3} ne sufiĉe precize priskribas la enhavon de la nocio, ĉar simplajn konstru-elementojn ni ne nomas "aparato". En <Comp> troviĝas krome "materialo" kaj "ilaro" kiel eblaj tradukoj por la Angla termino. Ambaŭ certe ne taŭgas, precipe ĉar en <Comp> oni uzas la sufikson -il- por indiki ankaŭ programon. Do "ilaro" estus interpretebla ankaŭ kiel "programaro"!

Ankaŭ la proponoj de al ({eo4}, {eo5}) laŭ mi ne taŭgas. Mia difino klarigas, ke temas nek pri maŝinoj nek pri iloj.

bcu: Eĉ unu ŝraŭbo povas esti "hardware", sed tio estas "aĵo" kaj ne "aro"; tiu termino havas amas-karakteron, almenaŭ en la angla. Do mi proponas {eo8} anstataŭ {eo3}.

ej: {eo6} estis rekomendita al mi de s-ro Taurat, kiam mi vizitis Berlinon en 1987. Por la mala nocio li uzis "softo". Mi uzis tiun terminon kelkfoje, sed ankaŭ ĝi ne kontentigis min, ĉar ĝi mise pensigas pri iu hardco. Mi nun preferas la terminon {eo7}, laŭ kiu oni analogie povas formi la terminojn: softvo (85/399), ŝarvo (89/074), firmvo (89/087), frivo (89/112), komvo (89/165), grupvo (89/181), kiuj sufiĉe similas al la Anglalingvaj originaloj kaj tial estas facile memorigeblaj, sed kiuj tamen ne impresas kiel Anglismoj kaj kaj ankaŭ ne havas la malavantaĝojn de la aliaj proponoj. Mi tial rekomendas, provu tiujn ĉi terminojn. Sed estu selektema kelkfoje {eo3} povas esti pli taŭga, ĉar ne tiel ĝenerala kiel {eo7}: \NI ankoraŭ ne finis nian transloĝiĝon, sed ni jam movis la aparataron. \i

ej: (90-08-30) Pri {eo9} vidu Rim. en 85/399.

wor (90-07-19): {eo10} estas pli klara, pli sinmotiva, pli purisma k malpli Anglisma ol formoj kun "hard". Ĝi evitas pensigon pri hardco kaj havas la avantaĝojn de la v-familio de ej (hardvo, ŝarvo, ktp). Laŭ mi ĝi estas pli klara kaj pli facile prononcebla ol "hardvo".

wor (91-11-11): Starigo de la v-familio egalas starigi terminon -v\*\*/o kiel teĥnika termino en la fako komputiko. G^ia signifo: 'aĵo aŭ afero, kiu, laŭ koncerna difino, manifestas koncernan econ (de flank-elemento).

ej (91-12-31): Ne ĉiu "hardvo" estas "dura" (ekz-e konekto-kablo). Laŭ mi "-v\*\*/" neniam povas fariĝi vera sufikso, ĉar forpreninte la literon, oni ne ĉiam ricevas Esperantan radikon. Ĝi do estas nur radik-fina konsonanto, kiu en fako komputiko indikas grupon da programoj aŭ materiaĵoj. Ĵus mi

trovis pliajn tiajn terminojn en la Angla: \businessware, gameware, learningware, homeware\i <PC-Comp92/1,p140>, kiujn ni povus traduki per "negocvo, ludvo, lernvo kaj hejmvvo". «91-12-31»

{U1} 681.3.06  
 {T1} KEE  
 {eo1} supl/aj/ar/o \*a  
 {eo2} softvar/o (1) \*b\*c  
 {eo3} program/ar/o \*b\*d\*e  
 {eo4} program-var/o \*f  
 {eo5} mens-var/o \*g  
 {eo6} soft\*\*/o \*h  
 {eo7} softv\*\*/o \*ĉ  
 {eo8} program/aj/o \*ĝ  
 {eo9} mol/aj/o \*l  
 {eo10} farv\*\*/o \*ĵ  
 {de1} Software \*j  
 {de2} immaterielle Ware \*d  
 {en1} software \*h\*i  
 {fr1} périlogie \*d  
 {fr2} logiciel \*h\*i  
 {N11} software \*k

Ĝenerala termino por tiuj partoj de komputora sistemo, kiuj ne estas palpeblaj aŭ materiaj, sed kiuj tamen povas esti vendataj pere de palpeblaj diskoj aŭ bendoj. La termino estas plej ofte uzata por programoj kontraste al 85/398. Kvankam la nocio de ĉi tiu komplekso kutime estas komerce havebla ~o, oni komprenas sub ĝi ne nur funkci-pretajn sed ankaŭ nur sur papero ellaboritajn programojn. Oni distingas inter sistema ~o, la programaro bezonata por ebligi la uzadon de komputora sistemo, kaj aplika ~o aŭ aplik-programoj, kiuj plenumas taskojn utilajn al la finuzanto. \*ĉ

Fon: \*a hal en AkSt.85 p316; \*b Comp; \*c PIV; \*ĉ ei; \*d KBT; \*e KKV; \*f al en letero al ei 86-06-19; \*g al en letero al ei 86-07-24 kaj en Cirk 153 de la Akademio; \*ĝ bcu; \*h GS1; \*h tau; \*i GES/NGI-12; \*j Mikro-comp-Lex; \*j wor; \*k MMC; \*l ton en publika diskuto dum Esperantologio-konferenco

1990; 85/399 =ApE85 #043

Rim: ei: PIV difinas sub "var/o": \I "soft~o: Konvencia nomo por montri la tuton de la programoj necesaj por utiligi informadkan sistemon, komputeron ks (=interelektroniko)\i.

KBT difinas: \I Ĉiuj programoj por la komputilo konsistantaj el la funkciadsistemoj kaj la programoj uzablaj por ĝeneralaj problemoj.\i Tamen {eo3} ŝajnas al mi iom tro ĝenerala termino, ĉar iun ajn aron da programoj ni nomas "programaro".

hal difinas sian terminon en AkSt85: \Ŝanĝataj, plejparte ne metalaj, partoj de elektronika instalaĵo; akcesoraĵoj de komputoro; programaro. Ekzemple, se magnetofono estas rigidaĵo, la kasedo aŭ bendo, kiun oni metas en ĝin, estas suplaĵo.\i Tiu difino korekte atentigas pri tio, ke oni uzas la vorton "software" en la Angla ne nur sur la kampo de

komputoriko, sed en la elektronika industrio ĝenerale. Oni ekz-e malrekomendis la aĉeton de tipo da videomagnetofonoj, ĉar por ili ne estas havebla sufiĉe da "software". En la difino de hal estas i.a.malguste, ke kasedo aŭ bendo estas suplaĵo. La bendo kaj la kasedo mem estas (laŭ hal) "rigidaĵo", nur la sur la rigidaĵo registritaj programoj estas "suplaĵo".

{eo4} ŝajnas al mi pli trafa ol {eo5}, ĉar ankaŭ maŝinoj kaj iloj estas produkto de mensa laboro. Sed kiel ni nomu la aliajn ankoraŭ ne tradukitajn komputikajn terminojn kun "ware" je la fino? Ekz. "firmware" (programoj neforviŝeble registritaj), "shareware" (programoj por ŝari (89/021), kiujn ĉiu rajtas kopii kaj libere uzi kaj por kiuj oni libervole pagu por registriĝo al la program-aŭtoro)? Diskutinda ŝajnas al mi, ĉu ni naturisme nomu ilin softvar/o, hardvar/o, firmvar/o kaj ŝarvar/o (kiel kompletaj radikoj + finaĵo) aŭ ĉu ni kreu ilin per kunmeto kun la vorto "varo", aŭ ĉu ni kreu el Esperantaj radikoj tute novajn terminojn. Pli facile memorigeblaj estas verŝajne la naturismaj neologismoj, kaj tial mi pledus por ili, sed ili ja malplaĉas al Esperantistoj, kiuj unue renkontas ilin, pro ilia evidenta Anglalingva deveno. En KBT oni donis kiel Germanan tradukon "immaterielle Ware", kiu sendube korekte esprimas la sencon de la nocio, tamen, kvankam mi abonis por tuta jaro la Germanan fakrevuon "Chip", mi legis en ĝi nur la terminon "Software". Evidente tiu termino ŝajnis pli taŭga al la artikol-verkintoj kaj anoncintoj. Mi tial ne mirus, se ankaŭ en nia lingvo "softvaro" kaj "hardvaro" venkus. Tio certe okazos, se ne iu povos proponi pli taŭgajn terminojn.

bcu: Eĉ unu linio de kodaĵo estas "software", sed tio estas "aĵo" kaj ne "aro". Vidu miajn komentojn pri 85/398. Mi preferus eviti la radikon "varo", ĉar oni ofte produktas tion ne por vendi.

ei: Mi konsentas kun bcu pri evitado de la radiko var', tamen mi hezitas apliki la sufikson -aj/ por ĉi tiuj du nocioj: aparato jam estas io konkreta, kiel aj/ povus fari ĝin ankoraŭ pli konkreta? Se unu linio da kodaĵo same kiel kompleksega programaro estas "software", kial la konkretiga sufikso -aj/ indiku tion? La ĝeneraleco de la nocioj 85/398 kaj 399 malfaciligas al ni apliki iun el niaj nunaj sufiksoj.

ei (1989-12-01): La terminoj de tau (softo kaj hardo) donis al mi la ideon krei {eo7}. Legu pri tio en 85/398.

ei: (90-08-30) ton esprimis la opinion, ke {eo9} kaj "malmolaĵo" taŭgus por nocioj 85/398 kaj 85/399. Mi opinias, ke tiuj terminoj estas tro ĝeneralaj por indiki tiujn ĉi tre specifajn nociojn. "Molaĵo" povus esti iu ajn mola objekto, ekz-e spongo, kato, viandopeco, ŝlimo, ĵeleo. Atribui terminon kun tiel ĝenerala nocio al la nocio de "programo aŭ programaro" laŭ mia sento devas kaŭzi konfuzon. Krome la nocio de 85/398

konsistas ofte el molaj objektoj (moldisko, konektilaro). Estus konfuzige atribui al tiuj objektoj la terminon "malmolaĵo", ĉar tio ĉi laŭ mia kompreno estas iu ajn malmola objekto, ekz-e ŝtono, koralo, ŝtalo, diamanto. La termino-proponojn de ton mi ĝis nun nenie renkontis en nia faka literaturo, kaj mi certe ne rekomendas ilin. wor (90-07-19): Bv legi miajn komentojn en 85/398, kiuj plejparte validas ankaŭ ĉi tie. La termino {eo10} esprimu esencon kaj estu bela paro kun tiu de 85/398. Flanke, pri {de2}: Estus interese scii, ĉu oni sentas la malsukceson rezulto de ĝia longeco kompare kun {de1}? Pri {en1}: Dum televida intervjuo la ĉefministro de Singapuro parolante pri triamonda evoluigo uzis la vortojn "hardware" kaj "software" por fabrikoj, vojoj, telefonoj unuflanke kaj eduko kaj kutimoj aliflanke.

ei (91-08-10): La propono de wor "durvo" por \hardware vi plaĉis al mi, sed al mi ŝajnas, ke ĝi ne formas belan paron kun "farvo". Analogie al durdisko/moldisko ni devus diri "molvo". Sed ĉu ni per tio ne tro distancigu de la originaj terminoj? Mi opinias, ke "hardvo" kaj "softvo" estas multe pli facile memorigeblaj. Ĝuste ĉar \hardware vi kaj \software vi nun estas aplikataj ne nur en la kampo de informado-sciencoj (88/011), ni bezonas trafajn terminojn en nia lingvo por tiuj nocioj. Mi petas pensu pri ĉiuj argumentoj kaj proponoj kaj indiku viajn preferojn, por ke niaj rekomendoj baziĝu sur firma grundo. «93-11-13»

{U1} 681.3.065.21 (+)  
 {T1} KEG  
 {eo1} data"\_baz/ap\*\*/ar/o \*a  
 {de1} Datenbankssoftware f\*c  
 {en1} database program \*b  
 {en2} data base software \*c  
 {fr1}

{nl1} database programmatuur \*ĉ  
 Programaro por krei kaj mastrumi → databazajn dosierojn (89/105) kaj tiel databazon (89/142). La plej uzata ~o estas \dBase III vi aŭ \dBase IV vi. Pli malmultekostaj estas la 3-diska ŝarvo (89/074) \IPC-File:dB vi aŭ la ~o, kiu troviĝas en la programaro \PC Tools vi. \*a  
Fon: \*a ei; \*b PCTools.p279; \*c CE; \*ĉ es \InfWoord [ei];

### 89/100

Rim: «93-12-07»

{U1} 681.3.065.5 (+)  
 {T1} KEG  
 {eo1} desegn/ap\*\*/o \*a  
 {de1} Zeichenprogramm n \*c  
 {en1} drawing program \*b  
 {en2} graphics program \*b  
 {fr1}  
 {nl1} tekenprogramma \*ĉ

Programo por fari ilustraĵojn, teknikajn desegnaĵojn aŭ grafikaĵojn. Ŝarvo (89/074): \IPC-Key-Draw vi (3 diskaj). \*a

Fon: \*a ei; \*b ReaSol89/11.p17; \*c pb; \*ĉ es \InfWoord [ei];

### 89/101

Rim: «93-12-07»

{U1} 681.3.065.67 (+)  
 {T1} KEG  
 {eo1} tri-dimensi/a desegn/ap\*\*/o \*a  
 {de1} dreidimensionales Zeichenprogramm n \*c  
 {en1} three-dimensional drawing program \*b  
 {fr1}  
 {nl1} drie-dimensionaal tekenprogramma \*ĉ

Programo por desegni 3-dimensiajn objektojn, kiujn oni povas movi, rotacii, pligrandigi aŭ malpligrandigi. Ŝarvo (89/074): \Image-3D vi. \*a  
Fon: \*a ei; \*b ReaSol89/11.p16; \*c pb; \*ĉ es \InfWoord [ei];

### 89/102

Rim: «93-12-07»

{U1} 681.3.065.54 (+)  
 {T1} KEG  
 {eo1} difin- kaj sinonim-vortar/ap\*\*/o \*a  
 {de1}  
 {en1} RAM-resident dictionary/thesaurus  
 {fr1}  
 {nl1} verklarende synoniemenlijst \*c

Elektronika vortara programo, kiu enhavas difinojn kaj sinonimojn. En la softvo (85/399) \CHOICE WORDS vi estas registritaj la difinoj por 80 000 Anglaj vortoj kaj pli ol 470 000 sinonimoj. Ĝi funkcias kun 35 skribapoj (85/442). \*a laŭ \*b.  
Fon: \*a ei; \*b PeCo89/1.p158; \*c es [ei];

### 89/103

Rim: «93-12-07»

{U1} 681.3.065.21 (+)  
 {T1} KEG  
 {eo1} instru/ap\*\*/o \*a  
 {de1} Tutorssystem n \*c  
 {en1} tutorial \*b  
 {en2} tutorial system \*c  
 {en3} courseware \*ĉ  
 {fr1}  
 {nl1} lessen \*d

Komputora programo por instrui ion. ~oj por maprodo (85/403) DOS troviĝas en la ŝarvoj (89/074) \The DOS Learning System vi kaj \Computer/DS-TUTOR vi. La version 5.0 de Vopo oni povas lerni per la ŝarvo \WordPerfect 5.0 Learning vi (2 diskaj). Ekzistas ankaŭ programo, por ke oni povu prepari siajn proprajn ~ojn: \TUTOR.COM vi. \*a laŭ \*b.

Fon: \*a ei; \*b ReaSol89/11; \*c CE; \*ĉ she en letero al ei; \*d es WP5.1NIGb [ei];

### 89/104

Rim: «93-12-07»

{U1} 681.3.065.63 (+)  
 {T1} KEG  
 {eo1} data"\_baz/a dosier/o \*a  
 {de1} Datenbankdatei f\*c\*ĉ  
 {en1} database file \*b  
 {fr1}  
 {nl1} databasebestand \*d

Dosiero (85/434) en databazo (89/142). Ĝi konsistas el dareoj (85/445), el kiuj ĉiu konsistas el strikte difinitaj kampoj. □o ekz-e povas enhavi liston de klientoj. Se oni surekranigas ĝin, aperas fenestro (86/189) en kiu aperas ĉiam samloke: nomo, adreso, urbo, ŝtato, poŝt-kodaĵo, telefonnumero, kaj iuj rimarkoj. Por aliaj dosier-specoj =85/434. \*a laŭ \*b.

Fon: \*a ej; \*b PCTools,p280; \*c CE=Datenbank, =Datei; \*ĉ pb; \*d es InfWoord[ej];

**89/105**

Rim: <93-12-07>

{U1} 681.3.065.63 (+)  
 {T1} KEG  
 {eo1} dur-disk/a dosier-ord/ig/ap\*\*/o kaj ŝarg/ap\*\*/o \*a  
 {de1}  
 {en1} hard disk file organizer  
 {fr1}  
 {nl1} bestandsorganisatie-programma voor harde schijf \*c

Softvo (85/399) por interligi programajn dosierojn kun tekstaj aŭ dataj dosieroj. Ĝi ebligas per unu klavofrapo ŝargi la komputoran memoron per dosiero kune kun la por tiu dosiero bezonata aplikapo (85/401), transigi tekstojn inter dosieroj de diversaj aplikapoj, kaj reordigi dosierojn sur durdisko. \VIEWLINKi estas tiuspeca softvo. \*a laŭ \*b.

Fon: \*a ej; \*b PeCo89/7,p113; \*c es[ej];

**89/106**

Rim: <93-12-07>

{U1} 681.3.065.15 (+)  
 {T1} KEG  
 {eo1} data"-kun'prem/ap\*\*/o \*a  
 {de1} Datenverdichtungsprogramm n \*c  
 {en1} compressor \*b  
 {fr1}  
 {nl1} comprimeerprogramma \*d

Programo por kunpremi registraĵojn, por ŝpari spacon sur disko aŭ transendo-tempon. Al ĝi apartenas alia programo, kiu malkunpremas la kunpremitajn registraĵojn, se oni bezonas legi aŭ prilabori ilin. \*a laŭ \*b

Fon: \*a ej; \*b ComGlo; \*c CE=Datenverdichtung; \*ĉ pb; \*d es laŭ InfWoord[ej];

**89/107**

Rim: <93-12-07>

{U1} 681.3.065.63 (+)

{T1} KEG  
 {eo1} dur-disk/a kaŝ-memor/ap\*\*/o \*a  
 {de1} Schattenspeicherprogramm n \*ĉ  
 {de2} Schnellpufferspeicherprogramm n \*ĉ  
 {en1} hard disk cache program \*c  
 {en2} disk cacher \*b  
 {fr1}

Programo por krei kaŝ-memoron, en rezervita ramo-parto (85/397), en → etendita memoro (89/288) aŭ en → ekspansiigita memoro (89/180). Se iu registraĵo estas legata, larĝa databloko estas kopiata en la kaŝ-memoron. Se poste la sama data-bloko estas bezonata, la programo ne devas legi ĝin de la registraĵo, sed ĝi povas multe pli rapide kopii ĝin el la kaŝ-memoro. Ankaŭ je registrado la en la kaŝ-memoro troviĝantaj datablokoj ebligas pli rapidan tasko-plenumon. \*a laŭ \*b.

Fon: \*a ej; \*b Hard,p341; \*c Reklamilo de TC! Power; \*ĉ CE=Schattenspeicher;

**89/108**

Rim: <93-12-07>

{U1} 681.3.065.15 (+)  
 {T1} KEG  
 {eo1} en'ram"/a fenestr/o-redakt/ap\*\*/o \*a  
 {de1}  
 {en1} memory resident window editor \*b  
 {fr1}  
 {nl1} vensterzet-programma \*c

Programo por krei kaj redakti enramajn (85/397) fenestrojn (86/189), kiuj estas aldoneblaj al iu ajn programo por regi ties funkciojn. \Flash-Upi estas tiuspeca programo. \*a laŭ \*b.

Fon: \*a ej; \*b PeCo89/3,p96; \*c es[ej];

**89/109**

Rim: <93-12-07>

{U1} 681.3.065.61 (+)  
 {T1} KEG  
 {eo1} kalendar/ap\*\*/o \*a  
 {de1}  
 {en1} infinite calendar \*b  
 {en2} calendar maker \*c  
 {fr1}  
 {nl1} calender \*ĉ

Programo por surekranigi aŭ printi kalendaron por iu ajn monato aŭ jaro, en kiu oni povas fari notojn. \Multiplusi enhavas tiuspecan programon. \Calendar Makeri estas tiuspeca ŝarvo (89/074). \*a.

Fon: \*a ej; \*b PeCo89/3,p167; \*c ReaSol89/11,p22; \*ĉ esInfWoord[ej];

**89/110**

Rim: <93-12-07>

{U1} 681.3.065.61 (+)  
 {T1} KEG  
 {eo1} etiked/ap\*\*/o \*a  
 {de1}

{en1} label printing program \*b  
{en2} Labels feature \*c  
{fr1}  
{nl1} label-printprogramma \*ĉ  
Programo por produkti diversspecajn etiketojn. La ŝarvo (89/074) \IMr. Label\i kapablas importi dataojn de tekstaj dosieroj (85/434) por adresi kovertojn, kaj por printi adres-, dosier- kaj disk-etikedojn. \*a laŭ \*b. \IWordPerfect 5.1\i enhavas ankaŭ ~on. \*c  
Fon: \*a ej; \*b ReaSol89/11,p22; \*c WP-5.1,p349; \*ĉ es[ej];

**89/111**

Rim: <93-12-07>

{U1} 681.3.062 (+)  
{T1} KEG  
{eo1} friv\*\*/o \*a  
{de1}  
{en1} freeware \*b  
{en2} public domain software \*b  
{fr1}

Softvo (85/399), kiun oni rajtas senpage uzi. (=89/074, 89/087) \*a laŭ \*b.

Fon: \*a ej; \*b ComGlo;

**89/112**

Rim: <93-12-07>

{U1} 681.3.065.2 (+)  
{T1} KEG  
{eo1} faktur/ap\*\*/ar/o \*a  
{de1} Fakturierprogramm *n* \*c  
{en1} invoicing program \*b  
{fr1}

{nl1} factuereerprogramma \*ĉ  
Programaro apartenanta al kontada softvo (85/399), ekz-e \IProfitwise\i, servanta por prepari fakturojn, aldoni mesaĝojn al ili, kaj por pere de la inventaria (89/113) modjulo (85/391) aŭtomate remendi stokojn. \*a laŭ \*b.

Fon: \*a ej; \*b PeCo89/3,p154; \*c CE=Fakturierung; \*ĉ es[ej];

**89/113**

Rim: <93-12-07>

{U1} 681.3.065.22 (+)  
{T1} KEG  
{eo1} financ/a kalkul/ap\*\*/o \*a  
{de1}  
{en1} financial calculator \*b  
{fr1}

{nl1} financieel rekenprogramma \*c  
Kalkul-programo speciale taŭga por financaj kalkuloj. □o estas parto de la programaro \IPC TOOLS\i. \*a

Fon: \*a ej; \*b PCTools,p425; \*c esInfWoord [ej];

**89/114**

Rim: <93-12-07>

{U1} 681.3.065.52 (+)  
{T1} KEG  
{eo1} mastr/um/ap\*\*/ar/o por person/aj financ/oj \*a  
{de1}  
{en1} personal finance manager \*c  
{en2} money management program \*b  
{fr1}

{nl1} persoonlijke financien-beheerder \*ĉ  
Programaro por individua persono por i.a.:

\* mastri ies kontantan kaj surbankan monon kaj ties kredit-kartojn; \* prepari ies buĝeton kaj por kompari ĝin kun la veraj rezultoj; \* printi ĉekojn, financajn deklarojn kaj ĝeneralan kontlibron; \* taksii pagotajn impostojn; \* analizi financajn opciojn. \*a laŭ \*c

Fon: \*a ej; \*b PeCo89/1,p37,p133; \*c PeCo89/12,p59 Money Counts; \*ĉ es[ej];

**89/115**

Rim: =89/116 <93-12-07>

{U1} 681.3.065.22 (+)  
{T1} KEG  
{eo1} financ/ap\*\*/ar/o \*a  
{de1} Finanzbuchhaltungs-Software *f* \*c  
{en1} financial software \*b  
{fr1}

{nl1} financieprogrammatuur \*ĉ  
Softvo (85/399) por prepari financajn raportojn, pri enspezoj kaj elspezoj, pri ludonitaj posedaĵoj, labor-kostoj, pagendaj fakturoj, ricevotaj kontoj. Ĝi eĉ skribas ĉekojn kaj rekalkulas la kontobalancojn. \IQuicken\i estas tiuspeca financa softvo. \*a

Fon: \*a ej; \*b PeCo89/1,p221; \*c CE; \*ĉ es[ej];

**89/116**

Rim: =89/115 <93-12-07>

{U1} 681.3.065.2 (+)  
{T1} KEG  
{eo1} formulari\*\*kre/ap\*\*/ar/o \*a  
{de1} Software *f* für Formularentwurf *m* \*c  
{en1} form design software \*b  
{fr1}

{nl1} formulier-ontwerpprogrammatuur \*ĉ  
Softvo (85/399), por faciligi la kreadon de formularioj (87/126). Inter la programaroj de \FormTool\i ekzistas jam 120 predezajnitaj (85/411) formularioj, taŭgaj por adapti ilin al specialaj bezonoj. Per malmultaj klavo-frapoj oni povas ŝanĝi kadrojn, retojn kaj rearanĝi ilin. \*a laŭ \*b.

Fon: \*a ej; \*b PeCo89/7,p124; \*c CE=Formularentwurf; \*ĉ es laŭ InfWoord[ej];

**89/117**

Rim: <93-12-07>

{U1} 681.3.065.2 (+)  
{T1} KEG  
{eo1} formulari\*\*plen/ig/ap\*\*/o \*a  
{de1}

{en1} form filler \*b  
 {fr1}  
 {nl1} formulier-invuller \*c  
 Programo por faciligi la plenigon de jam presitaj formularioj (87/126). La programo \FormFiller\i lokas plenigendajn spacojn en formulario per tio, ke ĝi printas kradon sur ĝin. De tiu krado ĝi kreas aŭtomate "mastro-ŝablonon", kiu difinas kampojn por ĉiu respondenda demando. Utiligantoj de la programo simple klavas <Tab> por movi de unu kampo al la neksta (87/682). \*a laŭ \*b.  
 Fon: \*a ei; \*b PeCo89/7,p115; \*c es laŭ InfWoord [ei];

**89/118**

Rim: =89/119 <93-12-07>

{U1} 681.3.065.2 (+)  
 {T1} KEG  
 {eo1} formulari\*\*/ap\*\*/o \*a  
 {de1}  
 {en1} forms program  
 {fr1}  
 {nl1} formulierprogramma \*c  
 Programo por krei formulariojn (87/126) kaj por plenigi ilin (=89/117,118). La programaro \FormWorx\i ebligas facilan teksto-enigon en jam presitajn aŭ fotokopiitajn formulariojn, kiuj estis dezajnitaj per ĉi tiu programo, aŭ la printadon de jam plenigitaj formularioj. \*a laŭ \*b.  
 Fon: \*a ei; \*b PeCo89/1,p22; \*c es laŭ InfWoord [ei];

**89/119**

Rim: <93-12-07>

{U1} 681.3.065.52 (+)  
 {T1} KEG  
 {eo1} genealogi/ap\*\*/ar/o \*a  
 {de1}  
 {en1} genealogy system \*b  
 {fr1}  
 {nl1} genealogisch programma \*c  
 Programaro por sisteme aranĝi gravajn dokumentojn kaj okazintaĵojn en historio de familio. La ~o \Family Reunion\i kreas malgrandan databazon (89/142) da informoj, kiun povas aranĝi en diversaj formatoj de genealogiaj arboj. \*a laŭ \*b  
 Fon: \*a ei; \*b PeCo89/7,p122; \*c es [ei];

**89/120**

Rim: <93-12-07>

{U1} 681.3.065.5 (+)  
 {T1} KEG  
 {eo1} grafik/aĵ-kre/ap\*\*/o \*a  
 {de1} Programm n für graphische Eingabe \*c  
 {en1} graph utility \*b  
 {fr1}  
 {nl1} graaf-utiliteit \*ĉ  
 Program por krei divers-specajn grafikaĵojn rekte de dataaroj. La programo \Graph-in-the-Box\i surekranigas kaj printas 11 diversajn grafikaĵ-tipojn

pere de nombroj kaptitaj rekte de la ekrano. \*a laŭ \*b.

Fon: \*a ei; \*b PeCo89/1,p23; \*c CE=Eingabe, graphische; \*ĉ esInfWoord [ei];

**89/121**

Rim: <93-12-07>

{U1} 681.3.065.5 (+)  
 {T1} KEG  
 {eo1} grafik/ap\*\*/o \*a  
 {de1} Programm n für Bildverarbeitung \*c  
 {en1} program for mixing text with pictures \*b  
 {fr1}  
 {nl1} grafisch/beeld met tekst/programma \*ĉ  
 Grafika programo por printi tekston kun borderoj, grafikaĵoj kaj ilustraĵoj. Se temas pri multe da teksto, oni uzu je la programo \Fontasy\i skribapon por surdiskigi la tekston en ASCII-formato, kiun \Fontasy\i poste formatigas sur la ekrano aldonante la grafikaĵojn. \*a laŭ \*b.  
 Fon: \*a ei; \*b Fontasy; \*c CE=Bildverarbeitung; \*ĉ es [ei];

**89/122**

Rim: <93-12-07>

{U1} 681.3.065.54 (+)  
 {T1} KEG  
 {eo1} grafologi/ap\*\*/o \*a  
 {de1}  
 {en1} handwriting analyser \*b  
 {fr1}  
 {nl1} handschrift analyseerprogramma \*c  
 Programo por analizi manskribon por malkaŝi ies personecon. La programo \Write n' Tell\i produktas por la analizanto facile respondeblajn demandojn. Laŭ ricevitaj respondoj ĝi kompilas multipaĝan raporton. \*a laŭ \*b.  
 Fon: \*a ei; \*b PeCo89/11,p62; \*c es [ei];

**89/123**

Rim: <93-12-07>

{U1} 681.3.065.4 (+)  
 {T1} KEG  
 {eo1} grup-produkt/iv/ec-  
 pli'grand/ig/ap\*\*/ar/o \*a  
 {de1}  
 {en1} group productivity software \*b  
 {fr1}  
 {nl1} groepsproductiviteit programmatuur \*c  
 Programaro por pligrandigi la produktivon de per komputora reto kunligata labor-grupo. La softvo (85/399) \Office Works\i plenumas 5 funkciojn: 1. Elektronikaj mesaĝoj al personoj konektitaj al via reto kaj pere de telekopio (89/182), telekso (89/183) aŭ ordinara poŝto al aliaj personoj. 2. Ŝedjulado (89/125) de labortaskoj kaj kunvenoj per aŭtomata trovado de la minimume konfliktantaj tempoj, per provizora notado de tiuj tempoj, kaj petante konfirmon de la koncernaj personoj. 3. Dosier-kontrolado. Aŭtomate indeksanta sistemo por

komputoraj kaj paperaj dosieroj, programoj kaj aliaj oficejaĵoj. 4. Databazo (89/142) por nomoj, adresoj, telefon-numeroj de klientoj, vendistoj kaj aliaj personoj. Per tiu ĉi programo oni povas selekti, ordigi kaj printi kovertojn aŭ adrešetikedojn. 5. Telefonaj mesaĝoj. La programaro informas vin pri respondendaj telefonaj mesaĝoj. Oni ricevos ĉiujn gravajn informojn: daton kaj tempon, nomon kaj numeron de la telefoninto, kaj la tekston de la mesaĝo. La programo eĉ povas numerumi la numeron de la telefoninto. \*a laŭ \*b.

Fon: \*a ei; \*b PeCo89/1,p107; \*c esei;

### 89/124

Rim: «93-12-07»

{U1} 65.012.2  
 {U2} 681.3.065.69 (+)  
 {T1} AFZ  
 {eo1} ŝedjul\*\*/i \*a  
 {de1} terminieren \*c  
 {en1} schedule *tr* \*b  
 {fr1}  
 {nl1} scheduleren \*ĉ

Prepari ~on aŭ enmeti ion en ~on, tempo-plani. ~o 1. Nombro da taskoj aŭ okazontajoj kutime laŭtempe listigitaj kaj kun la daŭro atribuita al ĉiu. 2. Farindaĵoj dum tempo-periodo. \*a laŭ \*b. ~apo ~-programo (A: \schedulers; G: \Zeitzuordnungsprogramm); ~apo por dungitoj (89/141); ~ita bontenado Bontenado de maŝinoj aŭ aparatoj laŭ ~o. (A: \scheduled maintenance) \*a  
Fon: \*a ei; \*b Rand; \*c Wah; \*ĉ es laŭ InfWoord ei;

### 89/125

Rim: «93-12-07»

{U1} 681.3.065.71 (+)  
 {T1} KEG  
 {eo1} impost-deklar/ap\*\*/ar/o \*a  
 {de1} Steuererklärungsoftware *f*\*a  
 {en1} income tax return preparation software \*b  
 {fr1}  
 {nl1} aangifte programma \*c

Softvo (85/399) por faciligi impost-deklarojn.

La programaro \Tax Shop li sur-ekranigas tekstojn, kiuj similas al la veraj impost-formularioj (87/126), kaj post enmeto de la dataoj, ĝi kalkulas la pagendan imposton. \*a laŭ \*b.

Fon: \*a ei; \*b PeCo89/1,p84; \*c esCIB91/3,p17ei;

### 89/126

Rim: «93-12-07»

{U1} 681.3.065.22 (+)  
 {T1} KEG  
 {eo1} integr/it/a kont/ad/ap\*\*/ar/o \*a  
 {de1} integriertes Abrechnungssystem *n* \*c  
 {en1} integrated accounting system \*b  
 {fr1}  
 {nl1} geïntegreerd accountantsprogrammatuur \*ĉ

Softvo (85/399), en kiu estas integritaj diversaj kontaktaĵoj. En \Bedford's integrated accounting system li ekz-e troviĝas jenaj kontaktaĵoj: ĉeflibrapo (89/017), salajro-pagapo (89/159), kontaktaĵo por pagontaj klientoj (89/138), kontaktaĵo por pagotaj fakturoj (89/138), stok-kontaktaĵo (89/162), laborkost-kontaktaĵo (89/181). \*a laŭ \*b.

Fon: \*a ei; \*b PeCo89/1,p243; \*c cE@; \*ĉ es laŭ InfWoord ei;

### 89/127

Rim: «93-12-07»

{U1} 681.3.065.68 (+)  
 {T1} KEG  
 {eo1} inter'skrib/ap\*\*/a dosier-konvert/ap\*\*/ar/o \*a  
 {de1} Umsetzprogramm *n* \*c  
 {en1} conversion program \*c  
 {fr1}  
 {nl1} conversieprogramma \*ĉ

Programoj por konverti dosierojn al la formatoj de diversaj skribapoj (85/442) aŭ tekstoprilaboraj programoj. La softvo (85/399) \Word For Word li povas konverti 25 paĝojn da registraĵoj dum unu minuto al iu alia formato de 12 teksto-prilaborapoj. \*a laŭ \*b.

Fon: \*a ei; \*b PeCo89/7,p124; \*c CE; \*ĉ esInfWoord ei;

### 89/128

Rim: «93-12-07»

{U1} 681.3.065.2 (+)  
 {U2} 681.3.065.70 (+)  
 {T1} KEG  
 {eo1} invest-konsil/ap\*\*/o \*a  
 {de1}  
 {en1} personal investment system  
 {en2} portfolio manager  
 {fr1}  
 {nl1} investeringsprogramma \*c

Fon: \*a ei; \*b ?; \*c esei;

### 89/129

Rim: «93-12-07»

{U1} 681.3.065.22 (+)  
 {T1} KEG  
 {eo1} kalkul/ap\*\*/o \*a  
 {de1} Rechnerprogramm *n* \*ĉ  
 {en1} calculator \*b\*c  
 {nl1} rekenprogramma \*d

Kalkul-programo por ĝeneralaj aŭ specialaj celoj. ~o por financaj komputadoj, ~o por \----- programistoj, ~o por sciencaj komputadoj, \----- ~o por statistikaj komputadoj, ~o por \----- unito-konvertado. \*a laŭ \*b kaj \*c.

Fon: \*a ei; \*b PC Tools; \*c PeCo89/3; \*ĉ CE; \*d esei;

### 89/130

Rim: «93-12-07»

{U1} 681.3.065.52 (+)  
 {T1} KEG  
 {eo1} kalori-kalkul/ap\*\*/o \*a  
 {de1}  
 {en1} program for weight control \*b  
 {fr1}

Programo por konsili sanigan dieton. La programo \MDietHelper\i kalkulas manĝitajn kaloriojn kaj registras la konsumon de kuir-salo, kolesterolo, fibroj kaj de 20 aliaj nutraĵ-elementoj. \*a laŭ \*b.

Fon: \*a ei; \*b PeCo89/11,62;

**89/131**

Rim: «93-12-07»

{U1} 681.3.065.21 (+)  
 {T1} KEG  
 {eo1} katalog/ad/ap\*\*/o \*a  
 {de1} Katalogprogramm n \*c  
 {en1} cataloging program \*b  
 {fr1}  
 {nl1} catalogusprogramma \*ĉ

Databazapo (89/100) por prepari katalogojn pri libroj, diskoj, kasedoj ktp. La programo \SuperCat\i povas katalogi laŭ temoj, aŭtoroj, artistoj, komponistoj, titoloj ktp. \*a

Fon: \*a ei; \*b PeCo89/11,62; \*c CE=Katalog; \*ĉ es laŭ InfWoord [ei];

**89/132**

Rim: «93-12-07»

{U1} 681.3.065.5 (+)  
 {T1} KDA  
 {eo1} komputor"-help/at/a dezajn"  
 -sistem/o \*a  
 {eo2} kohed\*\*/o \*a  
 {de1} rechnerunterstützter Entwurf m \*c  
 {de2} CAD \*c  
 {en1} computer assisted design \*b  
 {en2} CAD \*b  
 {en3} computer-aided design \*c  
 {fr1}  
 {nl1} automatisch ontwerpsysteem \*ĉ

Kohedo-sistemo konsistas el alt-kapablaj personaj komputoroj, kiuj utiligas por dezajnado (85/411) kohedo-softvon (89/136) kaj enigatorojn (85/404) kiel diĝigitan tabuleton (89/191) kaj skenatorojn (87/327). \*a laŭ \*b.

Fon: \*a ei; \*b ComGlo; \*c CE; \*ĉ es InfWoord [ei];

**89/133**

Rim: «93-12-07»

{U1} 681.3.065.5 (+)  
 {T1} KEG  
 {eo1} kivivi-e-kiviros\*\*-ebl/ig/ap\*\*/o \*a  
 {eo2} real-vid/ig/ap\*\*/o \*d  
 {eo3} pridprek\*\*/ap\*\*/o \*e  
 {de1} Wysiwyg \*c  
 {de2} Programm n für druckidentische

Bildschirmdarstellung \*e

{de3} WYSIWYG-Programm n" \*e  
 {en1} preview utility \*b  
 {en2} WYSIWYG (pron.:wiziwig) preview utility  
 \*b\*ĉ  
 {fr1}

Programo por surekranigi printotan tekston, kiu aspektu precize tiel, kiel ĝi poste printiĝos. En la Angla oni nomas tiun econ sloganece \WYSIWYG - What You See Is What You Get\i, kiun ni povus traduki Esperanten per "kivivi-e-kiviros" (kion vi vidas estas kion vi ricevos). Tiu ĉi programo ekzistas kiel subprogramo en teksto-prilaborapoj (85/442) kaj ankaŭ kiel memstara programo en \PrintVision\i. \*a laŭ \*b.

Fon: \*a ei; \*b PeCo??; \*c CE; \*ĉ BYTE89/12,p372; \*d es[ei]; \*e pb;

**89/134 =ApE89 #268**

Rim: pb (91-04-13): 1 Mi proponas deiri ne de traduko de la Angla WYSIWYG, oportune nur en tiu lingvo, ĉar ĉiu vorto konsistas el nur unu silabo, sed de - eble akronime mallongigita - priskriba termino, kiel 1.1 ekran-bildo egala al printaĵo, 1.2 ekran-prezento identa al printota teksto, 1.3 print-identita sur-ekrana tekst-prezento, 1.4 print-identita prezento sur la ekrano; do: pridprek\*\*/o. Malpli longe, pli bone prononcebla k eble pli facile memorebla ol la tre Volapukeca {eo1}.

2 Laŭ mi {de1} estas malĝusta, ĉar ĝi celas nur la tekst-prezenton sur la ekrano, k ne la programon, kiu ebligas tion. Do devus esti "WYSIWYG-Programm n".

ei (91-09-10): Certe ankoraŭ multaj aliaj traduk-proponoj eblas, kaj eble ni trovos iun, kiu klare estos preferata. Bv, voĉdoni kaj fari proponojn. «93-12-07»

{U1} 681.3.065.54 (+)  
 {T1} KEG  
 {eo1} klav-instru/ap\*\*/o \*a  
 {de1}  
 {en1} typing program \*b  
 {en2} typing instructor \*c  
 {fr1}  
 {nl1} typeprogramma \*ĉ

Programo, kiu instruas rapidan kaj akuratan tuŝ-tajpadon aŭ tuŝ-klavadon. La programo \IMavis Beacon Teaches Typing\i enhavas horloĝon kaj metronomon, ĉar ritma tajpado helpas al nov-tajpantoj rapidigi kaj akuratiĝi la tajpadon. La programo \ITYPING INSTRUCTOR Encore\i vidigas la klavaron sur la ekrano, kaj diagnozas rapidon kaj akuraton de ĉiu fingro kaj klavo. \*a laŭ \*b\*c.

Fon: \*a ei; \*b PeCo89/7,p118; \*c PeCo89/1,p75; \*ĉ es laŭ VDwoord[ei];

**89/135**

Rim: «93-12-07»

{U1} 681.3.065.5 (+)

{T1} KEG  
 {eo1} kohed\*\*/o-softv\*\*/o \*a  
 {de1} CAD Software \*c  
 {en1} CAD software \*b  
 {fr1}  
 {nl1} CAD-programmatuur \*ĉ  
 Softvo (85/399) por kohedo (89/133). Ĝin oni preparis por ĝenerala aŭ specialigita uzado, ekz-e por arkitekturo, aŭ dezajnado (85/411) de elektraĵoj aŭ mekanaj aparatoj. Ĝi estas ankaŭ utiligata por produkti presitajn konduktilarojn (89/193) kaj icojn (85/410). \*a laŭ \*b.  
 Fon: \*a ei; \*b ComGlo; \*c CE=CAD; \*ĉ es[ei];

**89/136**

Rim: «93-12-07»

{U1} 681.3.065.65 (+)  
 {T1} KEG  
 {eo1} klip-memor/ap\*\*/o \*a  
 {de1}  
 {en1} clipboard application program \*b  
 {fr1}  
 {nl1} prikbord-utiliteit \*c  
 Programo, kiu ebligas la konservadon kaj retrovon de notoj, kiujn oni povas per tiu ĉi programo kopii inter diversaj aplikapoj (85/401). Temas do pri elektronika versio de klip-tabuleto.  
 Fon: \*a ei; \*b PCTools,p407; \*c es[ei];

**89/137**

Rim: «93-12-07»

{U1} 681.3.065.22 (+)  
 {T1} KEG  
 {eo1} kont/ad/ap\*\*/o \*a  
 {de1} Abrechnungsprogramm n \*ĉ  
 {de2} Buchhaltungsprogramm n \*ĉ  
 {en1} accounting program \*b  
 {en2} money management program \*b  
 {fr1}  
 {nl1} boekhoudprogramma \*d  
 Programo por faciligi kontadon. Ekzistas multaj diversaj ~oj por specialaj celoj: persona ~o (89/146); ~o por salajroj (89/159); ~o por deprezeblaj (.../...) posedaĵoj \fixed assets program\i; ~o por labor-kostoj \job costing program\i; ~o por pagotaj fakturoj \accounts payable program\i; ~o por pagotaj klientoj \accounts receivable program\i; laborkost-~o (89/181). \*a laŭ \*b+c.  
 Fon: \*a ei; \*b PeCo89/1,p37; \*c PeCo89/3,p154; \*ĉ CE; \*d es laŭ VDwoord[ei];

**89/138**

Rim: «93-12-07»

{U1} 681.3.065.63 (+)  
 {T1} KEG  
 {eo1} kre/ap\*\*/ar/o por ekspansi/ig/it/a memor/o \*a  
 {de1}

{en1} expanded memory simulator \*b  
 {en2} expanded memory builder \*c  
 {en3} expanded memory software \*c  
 {fr1}  
 {nl1} geheugenuitbreidingsprogramma \*ĉ  
 Softvo (85/399), kiu ebligas utiligon de etendita memoro (89/288) por → ekspansiigita memor-specifo (89/180), kaj kiu utiligas spacon sur dur-disko por imiti ekspansiigitan memoron. Tiuspecaj programoj estas: \AboveDISC\i kaj \MTC!POWER\i.  
 Fon: \*a ei; \*b PeCo89/7,p112; \*c TC!Power; \*ĉ es laŭ InfWoord;

**89/139**

Rim: =89/172 «93-12-07»

{U1} 681.3.065.68 (+)  
 {T1} KEG  
 {eo1} kre/ap\*\*/ar/o por jur/aj dokument/oj \*a  
 {de1}  
 {en1} program to prepare legal documents  
 {fr1}  
 {nl1} wetboekprogramma \*c  
 Softvo (85/399) por krei jurajn dokumentojn por kutimaj situacioj. Utiligante demando- kaj respondo-metodon specialaj programoj intervjuas la komputoranton ĝis ĉiuj bezonataj dataoj (85/476) estas donitaj, post tio ĝi povas surekranigi kaj printi la pretajn dokumentojn. \Personal Lawyer\i estas tiuspeca programo. \*a laŭ \*b.  
 Fon: \*a ei; \*b PeCo89/7,p123; \*c es[ei];

**89/140**

Rim: «93-12-07»

{U1} 681.3.065.69 (+)  
 {T1} KEG  
 {eo1} ŝedjul\*\*/ap\*\*/o por dung/it/oj \*a  
 {de1} Zeitzuordnungsprogramm n für Angestellte \*c  
 {en1} scheduling program for employees \*b  
 {fr1}  
 Programo por ŝedjuli (89/125) dungitojn. \Who Works When\i estas tiuspeca programo. \*a laŭ \*b.

Fon: \*a ei; \*b PeCo89/11,223; \*c CE=Zeitzuordnungsprogramm;

**89/141**

Rim: «93-12-07»

{U1} 336.717.16  
 {U2} 681.3.065.21 (+)  
 {T1} KBE  
 {eo1} data"\_baz/o \*a  
 {eo2} datum\*\*/-bank/o \*g  
 {de1} Datenbank f \*c  
 {de2} Datenbasis f \*c  
 {en1} database \*b\*ĉ  
 {en2} data base \*c\*d  
 {en3} data bank \*d

{fr1} base de données \*ĉ  
{nl1} database \*e  
{nl2} kaartenbak \*f  
Kolekto da logike interrilatantaj dareoj (85/445) aŭ dosieroj (85/434). En ~o kuniĝis multegaj dareoj antaŭe storitaj en apartaj dosieroj, tiel ke komuna arego da dareoj servas kiel sola centra dosiero por multaj aplikapoj (85/401). \*a laŭ \*d.

Fon: \*a ej; \*b PCTools,p280; \*c iwt-Wö; \*ĉ COMPUT; \*d WebComp; \*e esInfwoord[ej]; \*f esInfWoord[ej]; \*g IK85/1,18[ej];

**89/142** =ApE89 #269

Rim: ej (92-05-16): "bazo (2)" laŭ mi trafas por tiu ĉi nocio pli ol iu el la signifoj de "banko". «93-12-07»

{U1} 681.3.065.53  
{T1} KEG  
{eo1} lud/ap\*\*/o \*a  
{de1}  
{en1} computer game \*b  
{fr1}

{nl1} computerspel \*c  
Tub-juntilo kun junta ŝraŭbingo, al kiu oni fiksas tubon pere de enranĉa ringo. \*a

Fon: \*a Hidr;

**85/265**

Rim: «87-08-13»  
9.16\---

{U1} 62-821.18 (+)  
{T1} SCC  
{eo1} flanĝ/a tub-junt/o \*a  
{de1} Flanschverbindung \*a  
{en1} flange joint \*a  
{fr1} raccord à brides \*a

Tubjunto, ĉe kiu por kunigo oni uzas flanĝojn fiksitajn ĉe la tub-ekstretoj, ekz. per veldado, per surŝraŭbado, tuboborderado k.s.. \*a

Fon: \*a Hidr;

**85/266**

Rim: «87-08-13»  
9.17\---

{U1} 62-821.18 (+)  
{T1} SCC  
{eo1} rapid-kupl/a fitting/o \*a  
{de1} Schnellkupplung \*a  
{en1} quick-disconnect coupling \*a  
{fr1} raccord rapide  
{fr2} coupler rapide \*a

Elemento ebliganta rapidan kuplon kaj malkuplon de du partoj de hosoj (85/258), sen uzo de helpiloj aŭ ilaro. En malkuplita stato ĝi malebligas elfluon de likvo aŭ gaso el la kondukilo. \*a

Fon: \*a Hidr;

**85/267**

Rim: «87-08-13»  
9.18\---

{U1} 62-821.18 (+)  
{T1} SCC  
{eo1} aer-el'las/a valv/o \*a  
{de1} Entlüftungsventil \*a  
{en1} bleeding valve \*a  
{fr1} soupape purgeur d'air \*a

Valvo instalita sur la plej altaj lokoj de hidraŭla sistemo kaj servanta por ellasado de aero el kondukiloj aŭ elementoj. Oni konstruas ĝin aŭ kiel permane regatan, aŭ kiel aŭtomate funkciantan. \*a

Fon: \*a Hidr;

**85/268**

Rim: «87-08-13»  
GLOSARO EL: "MONDO DE TRAVIVAJXOJ"\--  
-----  
de Tibor Sekelj, Edistudio, Pizo, Italujo, 1981

{U1} 340.12  
{T1} FDA  
{eo1} anun\*\*/o \*a  
{de1} ungeschriebenes Recht  
{en1}  
{fr1}

(el araba) Neskribita, kutima leĝo. \*a

Fon: \*a Mondo;

**85/269**

Rim: «87-08-13»

{U1} 294.527  
{U2} 613.71  
{T1} RDC  
{eo1} asan\*\*/o \*a  
{de1}  
{en1}  
{fr1}

(el sanskrito) Korpa pozo praktikata de joganoj. \*a

Fon: \*a Mondo;

**85/270**

Rim: «87-08-13»

{U1} 613.81  
{U2} 397(8)  
{T1} RFP  
{eo1} ĉiĉ\*\*/o \*a  
{de1}  
{en1}  
{fr1}

(el sudamerika indiĝena) Duonfermentita aŭ fermentita trinkaĵo el maĉita maizo. \*a

Fon: \*a Mondo;

**85/271**

Rim: «87-08-13»

{U1} 347 : 800.866  
{T1} FDA  
{eo1} ĉomb\*\*/o \*a  
{de1} beweglicher Besitz \*b  
{en1}  
{fr1}

(el ŝuahilia) La tuto de moveblaj havaĵoj de persono. \*a

Fon: \*a Mondo; \*b ej;

**85/272**

Rim: «87-08-13»

{U1} 681.818  
{U2} 397  
{T1} LOD

{eo1} diĝeridu\*\*/o \*a  
{de1}  
{en1}  
{fr1}  
(el aŭstralia indiĝena) Aŭstralia  
blovinstrumento el simpla ligna tubo. \*a  
Fon: \*a Mondo;  
**85/273**

Rim: «87-08-13»

{U1} 551.481.2  
{T1} SDN  
{eo1} fadam\*\*/o \*a  
{de1}  
{en1}  
{fr1}  
(el haŭsa) Marĉo kun densa vegetaĵaro. \*a  
Fon: \*a Mondo;  
**85/274**

Rim: «87-08-13»

{U1} 683.93  
{U2} 397  
{T1} RLC  
{eo1} ĝik\*\*/o \*a  
{de1}  
{en1}  
{fr1}  
(el ŝuahilia) Aperta fajrujo meze de la domo. \*a  
Fon: \*a Mondo;  
**85/275**

Rim: «87-08-13»

{U1} 397  
{T1} RLC  
{eo1} malok\*\*/o \*a  
{de1}  
{en1}  
{fr1}  
(el brazilia indiĝena) Komuna domo de tribo, klano aŭ vilaĝo. \*a  
Fon: \*a Mondo;  
**85/276**

Rim: «87-08-13»

{U1} 299.6  
{T1} RDO  
{T2} RLC  
{eo1} mugang\*\*/o \*a  
{de1}  
{en1}  
{fr1}  
(el ŝuahilia) Indiĝena religia estro, konanto de tradicioj, kun sorĉkapablo uzata nur favore al la komunumo. \*a  
Fon: \*a Mondo;  
**85/277**

Rim: «87-08-13»

{U1} (=082)  
{T1} RLC  
{eo1} olaĝ\*\*/o \*a  
{de1}  
{en1}  
{fr1}  
(el joruba) Indiĝeno asimilita al okcidenta civilizo. \*a  
Fon: \*a Mondo;  
**85/278**

Rim: «87-08-13»

{U1} (=2)  
{T1} RLC  
{eo1} pakeh\*\*/o \*a  
{de1}  
{en1}  
{fr1}  
(el maoria) Blankulo, iom admirata iom malamata. \*a  
Fon: \*a Mondo;  
**85/279**

Rim: «87-08-13»

{U1} 391.2  
{T1} TNB  
{eo1} puropur\*\*/o \*a  
{de1}  
{en1}  
{fr1}

(el melanezia) Jupio el pendantaj strioj de herbo aŭ alia materialo. \*a  
Fon: \*a Mondo;  
**85/280**

Rim: «87-08-13»

{U1} 397  
{T1} DNA  
{eo1} ramuh\*\*/o \*a  
{eo2} palafit/o (2) \*b  
{de1} Pfahlbauhütte \*c  
{en1} pile dwelling \*ĉ  
{en2} pile house \*ĉ  
{fr1} hutte sur pilotis \*d  
(el indonezia) Loĝdomo sur fostoĵ.  
EB#335/33. \*a  
Fon: \*a Mondo; \*b PIV; \*c DB-De; \*ĉ DB-En; \*d DB-Fr;

**85/281**

Rim: «87-08-13»

{U1} 801.25  
{T1} RLC  
{eo1} sapam\*\*/i \*a  
{de1}  
{en1}  
{fr1}  
(el joruba) Fuĝi por sin kaŝi de danĝero. \*a

Fon: \*a Mondo;

**85/282**

Rim: «87-08-13»

{U1} 801.25  
{T1} RLC  
{eo1} svejalt\*\*/i \*a  
{de1}  
{en1}  
{fr1}

(el ĉina) Malrapide, heziteme iri, pro timo aŭ singardo. \*a

Fon: \*a Mondo;

**85/283**

Rim: «87-08-13»

{U1} 397  
{U2} 633.52  
{T1} RLC  
{eo1} tap\*\*/o \*a  
{de1}  
{en1}  
{fr1}

(el polinezia) Subŝela teksaĵo de iuj arboj, en Polinezio uzata por vestaĵo, kovrilo ktp. \*a

Fon: \*a Mondo;

**85/284**

Rim: «87-08-13»

{U1} 397  
{T1} RLC  
{eo1} toa\*\*/o \*a  
{de1}  
{en1}  
{fr1}

(el maoria) Plenaĝa, plenforta viro ĉiam preta por batalo. \*a

Fon: \*a Mondo;

**85/285**

Rim: «87-08-13»

{U1} 801.25  
{T1} RLC  
{eo1} tutus\*\*/i \*a  
{de1}  
{en1} grope about in dark ∞ to \*b  
{fr1}

{Sŭ1} tatusa \*b  
(el sŭahilia) Palpe marŝi aŭ serĉi en mallumo aŭ kun fermitaj okuloj. \*a

Fon: \*a Mondo; \*b worCSEP[ei];

**85/286**

Rim: «1988-11-06»

Provtraduko de ISO RECOMMENDATION R 1087\-----

VOCABULARY OF TERMINOLOGY\-----

-----

1-a eldono, 1969:

\WTERMINOLOGIA VORTARO\-----

Je la traduko kunlaboris: Rüdiger Eichholz, Conrad Fisher, d-ro Erich Dieter Krause kaj inĝ. Jan Werner. La tradukon kaj komentojn surdiskigis R. Eichholz.

En 1990 ISO nuligis tiun ĉi rekomendon kaj anstataŭigis ĝin per la rekomendo "Terminology principles and co-ordination", kies terminojn mi publikigis en termino-kompleksoj 93/001 ĝis 93/129. Mi decidis tial ne plu aldoni ion al la komentoj pri kompleksoj 85/288 ĝis 85/380 kaj 86/001 ĝis 86/106. Anstataŭe mi referencis al la terminoj en la 1993-a serio, en kiu la diskuto pri la malnovaj nocioj povas esti daŭrigata. La "fermon" de nocio-komplekso mi indikas per grase printita fina dato kaj per tio, ke tiu ĉi dato ne plu estas ĉirkaŭita per duoblaj pintaj krampoj sed per rektaj krampoj. Se nocio-kompleksoj mankas en la nova rekomendo, oni rajtas aldoni ankoraŭ komentojn al la malnovaj kompleksoj. Tial en ili la duoblaj pintaj krampoj restas.

1. LA UNIVERSO (n-ro 1)\-----

1

{U1} 001.40 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} individu/a objekt/o \*b  
{eo2} apart/a objekt/o \*b  
{eo3} individu/o <2> \*b  
{de1} individuelles Objekt \*a  
{de2} Einzelobjekt \*a  
{de3} Individuum \*a  
{en1} individual object \*a  
{en2} particular object \*a  
{en3} individual \*a  
{fr1} objet individuel \*a  
{fr2} individu \*a

Iu ajn fenomeno en la ekstera aŭ interna mondo, kiu estas observata (aŭ estas observebla) fare de homo je donita momento. Ekzemploj: \Sokrato kiel tuŝebla, vivanta persono; tiu ĉi arbo en nia ĝardeno; difinita loko sur tiu ĉi arbo; la falo de tiu arbo; tiu korpa aŭ psika doloro, kiun mi sentas je iu momento, tiu percepto aŭ mensa imago. \i\*b laŭ \*a

Fon: \*a 1087/69; \*b ei;

**85/287**

Rim: ei: En ISO/N53 la nocio ricevis pli simplan difinon kaj la termino estas simple "objekto" = [86/001]. =93/002 [94-02-26]

2. NOCIOJ KAJ DIFINOJ (n-roj 2 ĝis 30)\-----

2.1 Nocioj kaj nocio-sistemoj (n-roj 2 ĝis 26)\-----

2.1.1 Nocioj (n-roj 2 ĝis 8)\-----

2

{U1} 001.411.1 (+)  
{U2} 161.1  
{T1} RBN  
{eo1} noci/o (2) \*b\*c  
{de1} Begriff \*a  
{en1} concept \*a

{fr1} notion \*a  
{fr2} concept \*a

Iu ajn pens-elemento, ĝenerale esprimita per termino (85/317), → litera simbolo (85/334) aŭ per iu ajn alia simbolo. Nocioj povas esti la mensaj prezentaĵoj ne nur de estaĵoj aŭ objektoj (esprimitaj per substantivoj), sed pli larĝ-signife ankaŭ de kvalitoj (esprimitaj per adjektivoj aŭ substantivoj), de agoj (esprimitaj per verboj aŭ substantivoj), kaj eĉ de lokoj, situacioj aŭ rilatoj (esprimitaj per adverboj, prepozicioj, konjunkcioj aŭ substantivoj). Nocio povas reprezenti nur unu → individuan objekton (85/287) aŭ - per abstraktado - ĉiujn individuojn, kiuj komune havas iujn karakterizaĵojn (85/289). Krome nocio povas estiĝi el kombino de aliaj nocioj eĉ sen rilato al realeco. La nombro de nocioj (reprezentataj per terminoj), kiuj povas esti kombinitaj por formi novan nocion (terminon) estas limigita per la fakto, ke en propozicio nocio povas esti nur aŭ subjekto aŭ predikato, sed ne ambaŭ kune. Ekzemploj: \La nocioj esprimitaj per la terminoj Sokrato, Grekujo; homo, martelo, krucmartelo; ronda, rondeco, magneta permeablo; rotacii, rivoluo, nombro de rivoluoj dum temp-unuo; spaco, forto, kvadrata radiko; super, antaŭ, dum; centaŭro, Neptuno (la planedo jam konata per kalkulado antaŭ ĝia malkovro), I ekasilicio (t.e. la kemia elemento prognozita fare de Mendelevo en lia perioda sistemo, poste nomita germaniumo). \*b laŭ \*a

Fon: \*a 1087/69; \*b ei; \*c TerKu;

### 85/288

Rim: ei: En ISO/N53 tiu ĉi nocio ricevis pli mallongan difinon = [86/004]. =93/005 [94-02-26]  
3

{U1} 001.411.1 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} karakteriz/aj/o (1) (de nocio) \*b\*ĉ  
{eo2} indic/o <4> \*c\*d  
{eo3} trajt/o <2> \*e  
{eo4} atribut/o <3> \*e  
{de1} Merkmal *n* (eines Begriffes) \*a\*f  
{de2} Charakteristikum *n* \*f  
{de3} Eigenschaft *f* \*f  
{en1} characteristic (of a concept) \*a\*f  
{en2} quality \*f  
{en3} property \*f  
{es1} característica \*f  
{es2} cualidad \*f  
{es3} carácter \*f  
{es4} propiedad \*f  
{fr1} caractère \*a\*f  
{fr2} caractéristique (d'une notion) \*a\*f  
{fr3} qualité \*f  
{ru1} \2priznak\1\-- \*f  
{ru2} \2svoystvo\1\--- \*f  
{ru3} \2harakteristika\1\---- \*f

Iu ajn el la ecoj, kiuj konsistigas nocion (85/288). Ekzemplo: \Inter la karakterizaĵoj de la

nocio "arbo" troviĝas reproduktivo, ligna trunko kaj disbranĉiĝo je certa alto. \i Kelkaj karakterizaĵ-tipoj, precipe karakterizaĵoj rilatantaj al materiaj objektoj, estas nomitaj sub 85/307 ĝis 85/311. \*b laŭ \*a.

Fon: \*a 1087/69; \*b ei; \*c TerKu; \*ĉ al; \*d dehl; \*e pok; \*f Termi-of-doc;

### 85/289 =ApE85 #007

Rim: ei: Je 86-10-16 mi skribis post studo de la verko \Terminologia Kurso\i al we: \Vian novan "indico de nocio" mi aldonos ĉe 85/289 kaj 86/014, kvankam ĝi tute ne plaĉas al mi. "Indico" jam havas du bazajn tute malsamajn signifojn (indikaĵo kaj cifero aŭ nombro), krome en komputiko oni uzas super- kaj sub-indico. Aldoni ankoraŭ alian signifon al "indico" ne ŝajnas al mi rekomendinda. Ankaŭ la Franca uzas "caractère, caractéristique". Mi ne povas kompreni, kion vi havas kontraŭ "karakterizaĵo". \i

we respondis (86-10-23):

\KARAKTERIZ/AJx-O estas laŭ PIV 1 "Io, kio karakterizas". La fonta verbo signifas 1. Montri, difini la karakteron de io, 2. Konsistigi, estigi la karakteron de io. Sume-resume eblas aserti, ke KARAKTERIZAJxO montras, difinas aŭ konsistigas, estigas la karakteron de io. Sed tio ne estas en la angla "characteristic", sed "characterization". La angla "characteristic" estas unu karakter/iz/a trajto. Kaj unu trajto ne prezentas karakteron, tio bezonas la sumon aŭ almenaŭ cewrtan konvene elektitan aron de trajtoj, kiuj nur kune montras, difinas aŭ konsistigas la karakteron de io. Se ni nepre volus ĉerpi el la angla, ni povus doni al la Ea karakteristiko novan signifon. Gxi estus akceptebla. /Flanka mencio: Karakterizilo ne indas pro la kialo de mi eksplikita en la antaŭparolo de "Terminologia kurso", ĉe la Szerdahelyi-propono de "markilo". \i

ei: La Angla \characteristic\i havas jenajn signifojn: 1. kiel adjektivo: karakteriza, 2. kiel substantivo: \la distinguishing feature or quality, \ido: distinga trajto aŭ kvalito. Laŭ mi por tiu nocio tre bone taŭgas karakterizaĵo = io, kio karakterizas, do montras, difinas la karakteron (6) de io. 3. kiel substantivo: \the integral part of a common logarithm, \ido: = karakteristiko. Mi tute ne komprenas, kial vi devus doni al "karakteristiko" alian signifon, se oni akceptos "karakterizaĵo" por la nocio de 85/289, por kiu en "Terminology of documentation" por la Rusa jena traduko estas indikita: \2 harakteristika\1 kaj por la Hispana: \característica, carácter.\i En la Germana oni aldonis \Charakteristikum, Eigenschaft. \ido etnolingva vorto rilatanta al la radiko karakteriz' estas sendube plej ofte uzata por priskribi la nocion de 85/289. La Anglan \characterization\i ni tradukas en Esperanto per karakterizado. Mi konsentas kun vi: Unu karakterizaĵo ne sufiĉas por difini tutan karakteron. Tio estas klare esprimita ankaŭ en la ISO-difino. Do laŭ mi viaj kontraŭargumentoj ne estas trafaj. En via

ANTAŬPAROLO al VTerminologia Kurso ĵi vi riproĉas al "karakterizaĵo", ke "ĝi estas tro larĝsignifa komuna nomo". En mia menso ĝi kreas precize la ĝustan bildon, male via "indico" estas laŭ PIV 1. indikaĵo por io Ĵruĝa koloro de grundo estas ~o pri fereco; ~oj de kulpeco. 2. logaritmo de rilatumo. 3. karakterizanta nombro aŭ granda. Tial "indico" kreas en mi maltrafan bildon. Ankaŭ vi certe ne dirus: "karakterizaĵoj de kulpeco". Temas pri malsamaj nocioj, kiuj certe devus ricevi apartajn terminojn.

dehl preferas nun la terminon indico anstataŭ karakterizaĵo, "ĉar ĝi estas la pli konciza." (ol {eo1}) (87-02-07).

pok skribis en letero al ei: "traĵto estas la rekta traduko de la greka etimo, do interne internacia; mi proponis ĝin en BI, n-ro 152, junio 83, p.12. Atributo ŝajnas la plej trafa vorto."

ei: En Termino-of-doc {eo4} estas hiponimo (86/010) de {eo1} (=88/022). Do ankaŭ ĝi ne taŭgas. En ISO/N53 tiu nocio ricevis novan difinon (=86/014).

wor (90-07-12): PIV ne ĉiam estas kiom eble plej klara kaj konsekvenca. Gxia difino Mo, kio [montras, difinas, konsistigas aŭ estigas la karakteron de io] ĵi ŝajnas subteni we-on. Sed ĝia ekzemplo "la arbitreco estas la karakterizaĵo de ĉiu ludo" subtenas ei-on.

Por {eo1} ankaŭ estas tio: sentebla diferenco inter la sencoj de "-o" kaj "-aĵo". (Kp: manĝo -- manĝaĵo", idiomo -- idiomaĵo, lingvo -- lingvaĵo, mondo -- mondaĵo, vero -- veraĵo, bono -- bonaĵo, belo -- belaĵo, bovo -- bovaĵo.) Tiuj paroj, ne strikte analogaj inter si, ilustras tre ĝeneralan rilaton, laŭ kiu, la unua membro de ĉiu paro povas iel enteni plurajn ekzemplojn da la dua membro, dum inversa interpreto impresas bizara. Analoge la PIV-a difino de "karakterizaĵo" tia, kian klarigas we, taŭgas prefere al "karakterizo", dum konvenas al "karakterizaĵo" la nocio de ~o tia, kiel klarigis ei.

La vorto "karaktero" troviĝas en grupo 7 de la Baza Radikaro Oficiala, dum "traĵto" troviĝas nur poste en grupo 8 kaj "atributo" n mi tie ne trovis. Do "karaktero" kaj "karakterizaĵo" estas pli komunaj kaj taŭgaj por parolo ordinara,

Tamen en tiaj diskutoj, kie abunde bezoniĝas la nocio, mi preferas pli mallongan kaj nerifrazan formon: {eo3}.

=93/014 [94-02-26]

4

{U1} 001.411.1 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} noci/o-en'hav/o \*b  
 {eo2} en'hav/o (2) \*c\*ĉ\*d  
 {de1} Inhalt *m* (eines Begriffes) \*a  
 {de2} Intension *f* (eines Begriffes) \*a  
 {de3} Begriffsinhalt *m* \*f  
 {en1} connotation \*a\*f

{en2} intension (of a concept) \*a\*e\*f

{es1} intensión \*f

{fr1} compréhension (d'une notion) \*a\*f

{ru1} \2soderxanie (pon/ti)\1\--- \*f

La tutaĵo de ĉiuj karakterizaĵoj (85/289), kiuj formas nocion. \*b laŭ \*a.

La kompleto de ĉiuj atributoj (88/022), kiuj formas klason (88/706) aŭ nocion. \*b laŭ \*f.

Fon: \*a 1087/69; \*b ei; \*c TerKu; \*ĉ pok; \*d go; \*e Fel,p116; \*f Termino-of-doc (88/041);

### 85/290

Rim: wor (90-07-12): Laŭ mia kompreno {en1} por 85/290 estas fak-termino de logiko. Ekster tio, ĝi signifas 'tiujn signifojn, kiuj ne estas parto de difino de vorto'; ekz. por ni "verda" signifas Esperantia-n.

ei (92-03-10): =86/016. Sxajnas al mi utile aldoni la ekzemplon por la nocio de tiu ĉi komplekso, kiun mi tradukis laŭ \*e: \La nocio-enhavo de aeroplano ampleksas jenajn karakterizaĵojn: aer-veturilo pli peza ol aero, pelata per fizika povo, havanta portajn surfacaĵojn, kiuj restas fiksitaĵ sub donitaj flug-kondiĉoj.\i =93/016 [94-02-26]

5

{U1} 001.411.1 (+)

{T1} RBN

{eo1} super'ord/ig/it/a noci/o \*b

{eo2} super'ord/it/a noci/o \*c

{eo3} super'ord/a noci/o \*ĉ

{eo4} super'noci/o \*ĉ

{de1} Gattung *f* (von ...) \*a

{en1} genus (of ...) \*a

{fr1} genre (par rapport à ...) \*a

La nocio a estas superordigita nocio de b, se b posedas la samajn karakterizaĵojn (3) kiel a, kaj unu aŭ pli da kromaj karakterizaĵoj. Ekzemplo: \La nocio "arbo" estas superordigita nocio de "pom-arbo".i. \*b laŭ \*a

Fon: \*a 1087/69; \*b ei; \*c TermKu; \*ĉ wor;

### 85/291 =ApE85 #008

Rim: ei: En ISO/N53 {en1} fariĝis nerekomendita termino (=86/008), tial la antaŭa "genra nocio" ne plu ŝajnas al mi rekomendinda. "ordi" troviĝas en PIV apud "ordigi", tial {eo2} estas uzebla, tamen "ordigi" estas pli kutima. PIV mencias nur kunordigi, malordigi, subordigi, kaj ne tiujn verbojn sen "ig". El 85/291 fariĝis du nocio-kompleksoj: 86/007 + 86/008.

wor (90-07-12): {eo1} kaj {eo2} ambaŭ ĝustas je antaŭa ago. Tiu povus esti la enklasiga ago mem, sed tiu ago ŝajnas esence ekstertema. Se a estas ~o de b pro tio, ke b posedas ĉiujn trajtojn de a plus aliajn, tio estas la esenco de la nocio, kiun komuniku la termino. Kial ne plej simple diri "superorda nocio" aŭ "supernocio". La oportuno por la lingvo kiel tuto ŝajnas al mi pli grava ol konjekteteblo maloportuno por botanikistoj.

=93/007 [94-02-26]

{U1} 001.411.1 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} sub'noci/o (de ...) \*b  
 {eo2} sub'ord/ig/it/a nocio \*b  
 {eo3} sub'ord/it/a noci/o \*c  
 {eo4} speci/a noci/o (de ...) \*ĉ  
 {de1} Art *f* (von ...) \*a  
 {en1} species (of ...) \*a  
 {fr1} espèce (par rapport à ...) \*a  
 Nocio b estas subordinata nocio de a, se a estas superordigita nocio (5) de b.

¶ Ekzemplo: La nocio "pom-arbo" estas subordinata nocio de "arbo". \*b laŭ \*a

Fon: \*a 1087/69; \*b ej; \*c TermKu; \*ĉ go;

**85/292** =ApE85 #009

Rim: ej: Cxar {en1} en ISO/N53 fariĝis nerekomendinda termino (el ĝi fariĝis du nocio-kompleksoj: 86/010 kaj 86/011) ankaŭ {eo4} ne plu estas konsiderinda. "ordi" estas Zamenhofa, tial oni ankaŭ rajtas uzi {eo3}, tamen "ordigi" ŝajnas al mi pli kutima. =93/010 [94-02-26]

7

{U1} 001.411.1 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} noci/o-ampleks/o \*b  
 {eo2} ampleks/o (3) \*c  
 {eo3} spec/ar-ampleks/o de noci/o \*d  
 {eo4} spec/ar-ampleks/o \*d  
 {eo5} spec/ar/o \*d  
 {de1} Umfang *m* \*a  
 {de2} Begriffsumfang *m* \*ĉ  
 {de3} Extension *f* \*a  
 {en1} extension  $\mathbb{F}1f$  (by resemblance) \*a  
 {en2} denotation \*a  
 {fr1} extension  $\mathbb{F}1f$  (par ressemblance) \*a  
 {ru1}  $\mathbb{2}ob=e^3m$  (pon/ti)\1\---- \*ĉ

La tutaĵo de ĉiuj imageblaj subnocioj (85/292) de nocio (85/288) konsiderataj aparte. Ankaŭ la tutaĵo de ĉiuj → individuaj objektoj (85/287) iam inkluditaj en tiu nocio. Ĉiuj specifaj nocioj konsiderataj devas havi la saman gradon de abstrakteco (=85/299). Ekzemplo: La nocio-amplekso de la plantgenro "abio" inkludas (laŭ la nuna scio) 30 speciojn, inter ili ekz. "Abio Blanka", "Abio Kaŭkaza" (el Kaŭkazo) kaj "Abio Balzama" (el Kanado).i \*b laŭ \*a

Fon: \*a 1087/69; \*b ej; \*c TermKu; \*ĉ Termino-ofdoc 12-14; \*d wor; \*e Fel,p116;

**85/293** =ApE85 #010

Rim: wor (90-07-12): =mian komenton en 85/294.

ej (91-08-08): La majuskligo de la arbonomoj en la ekzemploj estis ŝanĝita. (Detaloj pri skribado de plantnomoj estas troveblaj sur paĝo 610).

ej (92-03-10): Mi aldonas ankoraŭ alian ekzemplon, kiun mi tradukis laŭ \*e: La nocio-amplekso de aer-veturilo pli peza ol aero estas:

aeroplano, glis-avio, kajto, helikoptero, ornitoptero (aeroplano, kies flugiloj batas, kiel tiuj de birdo).i = [86/017].

=93/017 [94-02-26]

8

{U1} 001.411.1 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} noci/o-ampleks/o laŭ konsist/o \*b  
 {eo2} signif/o-ampleks/o \*c  
 {eo3} part/ar-ampleks/o de noci/o \*ĉ  
 {eo4} part/ar-ampleks/o \*ĉ  
 {eo5} part/ar/o \*ĉ  
 {de1} Extension  $\mathbb{F}2f$  (nach Zusammensetzung) \*a  
 {en1} extension  $\mathbb{F}2f$  (by composition) \*a  
 {fr1} extension  $\mathbb{F}2f$  (par composition) \*a

La tutaĵo de ĉiuj partoj de iu kunaĵo, kiuj estas aparte konsiderataj. Ekzemplo: Ĉiuj radoj de radaro, eĉ se ĝi estas malmuntita.i \*b laŭ \*a.

Fon: \*a 1087/69; \*b ej; \*c we; \*ĉ wor;

**85/294** =ApE85 #011

Rim: ej: Laŭ ISO/N53 oni uzu terminon {en1} ne por partecaj nocioj (=86/017).

wor (90-10-10): La nokia diferenco inter ~ o kaj 85/293 estas grava. Sed la terminoj estas neklaraj. Tial mi proponas terminojn {eo3}-{eo5}. {eo3} estas plej preciza; {eo5} plej oportuna. 86/017 ŝajnas al mi supernocio de kaj 85/294 kaj 85/295.

=93/017 [94-02-26]

2.1.2 Nocio-sistemoj (n-roj 9 ĝis 20)

9

{U1} 001.411.4 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} noci/o-sistem/o \*b  
 {de1} Begriffssystem \*a  
 {en1} system of concepts \*a  
 {fr1} ensemble de notions liées \*a

Nociaro interligata per logikaj aŭ ontologiaj rilatoj. Tia sistemo konsistas el horizontalaj aŭ vertikalaj serioj de nocioj (=85/299), aŭ almenaŭ el unu tia serio.

L o g i k a j rilatoj baziĝas sur simileco de nocioj. Tipe ili formas → sistemon de super- kaj sub-nocioj (85/296).

O n t o l o g i a j rilatoj baziĝas sur la apudeco, t.e. sur la kontakto - en spaco kaj tempo - de la individuoj (85/287), kiujn la nocioj prezentas. La tipoj de ontologiaj sistemoj plej gravaj en teknologio estas la → sistemo de partoj kaj tutejoj (85/297) kaj la evolua sistemo (ekz-e la genealogia tabelo de individua besto, de produkto aŭ de lingvo). Ekzemploj: =85/296,297,298,299. \*b laŭ \*a.

Fon: \*a 1087/69; \*b ej;

**85/295**

Rim: ej: Pli mallonga difino en ISO/53: (=86/028).

wor: (91-10-10) Ne estas tute klare en la difino, ĉu "horizontalaj aŭ vertikalaj" ankaŭ permesas al sistemo konsisti el horizontalaj kaj

vertikalaj serioj". Ekzemple, la perioda tabelo de elementoj konsistas el horizontalaj kaj vertikalaj serioj. Alia ekzemplo:

Anglo \>Franco \>Germano \>Ruso  
\>Usonano

Mejĝr \>Miterand \>Kol

\>Gorbaĉof \>Buŝ

Iuj serioj estas vertikalaj, aliaj horizontalaj. La tuto konsistas el ambaŭ.

ei (91-11-03): Mi opinias, ke horizontala aŭ vertikala ne aludas, kiel io estas registrita en tabelo, sed kiel 85/299 montras, ĉu la serio konsistas el sub- kaj superordigitaj nocioj (vertikala serio) aŭ el samnivelelaj terminoj (horizontala serio). Tial "kaj" ne estas aplikebla. =93/027 [94-02-26]

10

{U1} 001.411.4 (+)

{T1} RBN

{eo1} sistem/o de super- kaj sub-noci/oj \*b

{eo2} sistem/o genr/o-speci/o \*c

{de1} Gattung-Art-System \*a

{en1} genus-species system \*a

{fr1} ensemble espèce-genre \*a

Nocio-sistemo (85/295) formata per logika rilato nome per la genra-specifa rilato (=85/291, 292). Ekzemplo: \La flaŭro de la mondo aŭ de regiono analizita laŭ la parenceco de la plantoj. (=85/299) \*b laŭ \*a.

Fon: \*a 1087/69; \*b ei; \*c go;

**85/296**

Rim: ei: =85/291,292. Laŭ la pli nova ISO/N53 la Angla termino \genus\i estu aplikata nur al objektoj sed ne al nocioj. Tial laŭ mia opinio ankaŭ la Esperanta "genro" estas evitinda por karakterizi nociojn. Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53 kaj ankaŭ ne en R 1087 de 1990. «94-02-26»

11

{U1} 001.411.4 (+)

{T1} RBN

{eo1} sistem/o de part/oj kaj tut/oj \*b

{de1} Teil-Ganzes-System \*a

{en1} whole-and-part system \*a

{fr1} ensemble partie-tout \*a

Nocio-sistemo (9) formata per unu el la ontologiaj rilatoj (vidu 9), nome per la parteca-tuteca rilato. Ekzemploj: \La flaŭro de la mondo aŭ de regiono analizita laŭ geografia distribuo de la plantoj; la tutaĵo de nocioj respondantaj al la partoj de maŝino, aŭ al la landoj, provincoj aŭ distriktoj de kontinento.\i (=85/299) \*b laŭ \*a.

Fon: \*a 1087/69; \*b ei; \*c we;

**85/297**

Rim: ei: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53 kaj ankaŭ ne en R 1087 de 1990. «94-02-26»

12

{U1} 001.411.4 (+)

{T1} RBN

{eo1} miks/it/a noci/o-sistem/o \*b

{de1} gemischtes Begriffssystem \*a

{en1} mixed system of concepts \*a

{fr1} ensemble de notions mixtes \*a

Nocio-sistemo (85/295) formata per pli ol unu rilat-tipo (=85/295), precipe per la kombino de → sistemo de super- kaj sub-nocioj (85/296) kun → sistemo de partoj kaj tutoj (85/297). Ekzemplo: \La nocioj klasifitaj en la Universala Decimale Klasifiko (UDK).\i. \*b laŭ \*a.

Fon: \*a 1087/69; \*b ei; \*c we;

**85/298**

Rim: ei: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53 kaj ankaŭ ne en R 1087 de 1990. «94-02-26»

13

{U1} 001.411.4 (+)

{T1} RBN

{eo1} sekvenc/o de noci/oj \*b

{eo2} noci/o-seri/o \*b

{de1} Begriffsreihe \*a

{en1} series of concepts \*a

{fr1} série de notions \*a

Sinsekvo de parencaj nocioj (85/288), en kiu ĉiu nocio havas nur unu senperan antaŭanton kaj unu senperan sekvanton. Unu aŭ pluraj nocio-serioj formas nocio-sistemon (85/295). Serio estas lineara sistemo. En "horizontala serio" la nocioj estas kunordigitaj, t.e. ili havas la saman → gradon de abstrakteco (.../...) aŭ subdivido. Tia serio estiĝas per varioj de karakterizaĵo (85/289). En "vertikala serio" la nocioj estas subordigitaj unu al la aliaj. Ekzemploj de logika-- serio (1): (1.1) Horizontala: \Ĉiuj specioj de plant-genro; la gradoj de militistaj rangoj aŭ de temperaturo, diversaj grandoj, ktp.\i (1.2) Vertikala: \La specioj, la genro, la familio kaj la klaso al kiu iu planto apartenas.\i Ekzemploj de ontologia--serio (2): (2.1) Horizontala: \La kapo, kolumo, tigo kaj fina ekstremaĵo de bolto.\i (2.2) Vertikala: \La tabelo de geologiaj epokoj; la sinsekvo de (viraj) antaŭuloj de homo.\i \*b laŭ \*a

Fon: \*a 1087/69; \*b ei; \*c we;

**85/299**

Rim: ei: "sekvenco" havas iom pli malvastan sencon ol "serio". Laŭ la ekzemploj donitaj en PIV ekzistas strikta rilato inter la membroj de "sekvenco": la bildoj, scenoj aŭ ludkartoj devas sekvi iun antaŭe aranĝitan ordon. Tio taŭgas por kelkaj el la ekzemploj donitaj en (85/299), sed ne por ĉiuj. Tial ambaŭ terminoj estis menciitaj. Aliaj ekzemploj: Horizontala logika serio: \La naciaj lingvoj.\i. Vertikala logika serio: \ldialekto, regiona lingvo, nacia lingvo, Esperanto.\i Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53 kaj ankaŭ ne en R 1087 de 1990. «94-02-26»

14

{U1} 001.411.4 (+)

{T1} RBN  
 {eo1} klasif\*\*/it/a noci/o-sistem/o \*b  
 {eo2} klasifik/o \*b\*ĉ  
 {eo3} klas/it/a noci/o-sistem/o \*c  
 {eo4} klasif\*\*/o \*c  
 {de1} klassifiziertes Begriffssystem \*a  
 {de2} Klassifikation \*a  
 {en1} classified system of concepts \*a  
 {en2} classification \*a  
 {fr1} ensemble classifié de notions \*a  
 {fr2} classification \*a

Nocio-sistemo (85/295), kies strukturo estas specifita. Ekzemploj: Ĉia klasifiko de plantoj; la Universala Decimala Klasifiko (UDK).i \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei; \*c pok; \*ĉ PIV;

**85/300** =ApD5.11 #562-566

Rim: ei: Mi opinias, ke utilis distingi inter "klasifiko" (= kompleksa strukturita nocio-sistemo) kaj simpla "klasifo". Se mi ordigas librojn en privata aŭ kluba biblioteko, aŭ por la libro-katalogo de UEA, tiam mi klasifas ilin (Butler verkis libron kun la titolo "Klasifo de Esperantaj temoj"), sed se mi atribuas al ili la UDK-nomojn, tiam mi klasifikas ilin. Same oni povus en Esperanto distingi inter klasifado kaj klasifikado de plantoj.

pok: (en let al ei (87-04-29): klasifi ! klasi; klasifiki ! klasifi; klasifita nocio-sistemo ! klasifa nocio-sistemo (afero de belgusto, apenaŭ motivebla).

wor (90-07-19): La celoj de ĉi tiu rimarkigo estas du: 1. Bremsi emon fari nemotivitan rompon kun nia tradicia lingvo. 2. Esploreti kiaj ekzistas motivoj por ŝanĝoj bazitaj ne precipe sur gustoj.

Konstatoj:

1. Temas pri du nociaroj neŭtrale nomeblaj "1" kaj "2". Nociaro 1 prias ordigojn sen referenco al ia jam ekzistanta ~o. Nociaro 2 prias la atribudadon el jama ~o al fenomenaro.

2. Produkto nocia de la ago de nociaro 1 estas kreo de ~o. Jaman tian produkton postulas nociaro 2. Tial iu termino ~o emfazas rilaton kun nociaro 1 kaj para alia emfazas rilaton kun nociaro 2.

3. Ambaŭ nociaroj ampleksas plurajn nociojn. Krom baza nocio, "klaso", traktindas: ago (kp. kisi), agado-nomo (kp. kizado), fakto aŭ ago kiel tuto (kp. kiso), rezulto (kp. kisitulo) kaj produkto (kp. intimo).

4. La proponoj kompariĝas jene: (interkrampe aperas konjektoj.) (Mil: n-s -- nocio-sistemo; tr -- transitiva verbo; ad -- agado-nomo; -o -- fakto; it -- rezulto; np -- nocia produkto.)

Tradicio:	Proponoj:		
	PIV	Eo1+2	
Eo3+4	( <u>ei</u> <1>)	(pok, <u>ei</u> <2>)	
Baza nocio:	klaso	klaso	klaso
Terminaro por Nociaro 1	(sen antaŭa sistemo):		
tr	klasi,	klasifi	klasi
	enklasigi		

ad	klasado	klasifado	
klasado			
-o	--, enklasigo	klasifo	-- [= 1a truo]

it	(klasitaĵo)	(klasifitaĵo),	
	(klasitaĵo)		
Produkto nocia de la ago de nociaro 1 -- 85/300:			
np	(klasita n-s)	klasifita n-s	klasita n-s,
	{eo3}	{eo1}	{eo3}
		klasifa n-s,	
	klasifiko	klasifiko	klasifo
	{eo2}	(Eo2)	{eo4}

Terminaro por Nociaro 2 (per antaŭa sistemo):

tr	klasifiki	klasifiki	klasifi
ad	klasifikado	klasifikado	
klasifado			
-o	--	--	--
	-- [= 2a truo]		

it (klasifikitaĵo) (klasifikitaĵo) (klasifitaĵo)

5. La PIV-a terminaro havas du "truojn"; ne eblas nomi la simplajn agojn tutajn (kp. kiso), ĉar "klaso" kaj "klasifiko" estas ali-sence okupataj. PIV aludas pansaĵon ("enklasigo") por la 1-a truo. Sed por la 2-a truo oni devas kontentiĝi je "klasifikado".

6. ei<1> por nociaro 2 kaj parte por ~o ("klasifiko") uzas la PIV-ajn terminojn. Estas malavantaĝo, ke la 2-a truo restas vaka.

Por nociaro 1 ei<1> uzas ne-PIV-an stamon: "klasif". Tio havas la avantaĝon ŝtopi la 1-an truon; eblas: "la Butlera klasifo de temoj" por "la Butlera ago klasifi la temojn". PIV-e eblis nur "la Butlera enklasigo de temoj". (Nekonante la verkon de Butler mi atentis nur la komenton de ei.)

7. pok&ei<2> reiras al la PIV-a nociaro 1.

Por nociaro 2 kaj por ~o foriĝas la balasta sufikso "-ik". Ak kun ei, ke tio estas avantaĝa (laŭ la laŭmode strikta difino pri "-ik"). Estas malavantaĝo, ke denove estas du truoj.

Aliaj Problemoj:

1. La sona diferenco inter la terminoj por la 2 nociaroj duoniĝas (de la tradicia dusilaba "ifik") al nur unu silabo: "-ik" ĉe ei<1> kaj "-if" ĉe pok&ei<2>. Nek "-ik" nek "-if" havas en Esperanto signifon kaj akceptitan kaj laŭcelan. Mi inklinas pensi, ke tia duoniĝo malfaciligus la lernadon kaj uzon. La terminoj proksimiĝas esti paronimoj.

2. La PIV-aj terminoj por 85/300 sedube estus Eo3+2. Tio ĝis nun en 85/300 estis senreliefa! Ni neniam elektu sen klare prezenti kaj kompari la tradiciajn formojn kaj sistemon.

3. Oni rekonas simile bonaj la du proponojn, Eo1+2 kaj Eo3+4. Sed tio, dum unu kongruas kun PIV-aj terminoj por nociaro 2 kaj la alia kun PIV-aj terminoj por nociaro 1! Por kio do oni volas fari ŝanĝon?

4. Mi ne komprenas, kial ni voĉdonu surbaze precipe de plaĉo kaj gusto. Kvazaŭ Esperanto ne havas tradicion kaj ne havas PIV-on!

Oportunoj kaj Sugestoj:

Mi vidas du sufiĉe motiveblajn solvojn:

1. Resti ĉe la PIV-aj terminoj. Avantaĝoj: a) tradicio; b) longeco de la sona diferenco, kiu faciligas memori kiu estas kiu; c) ŝparo de nia energio por pli gravaj aferoj. Malavantaĝoj: a) truo kie estu ago-nomo en la terminaroj; b) uzo de sendifina "-if" kaj uzo de ne laŭmoda "ik".

2. Restante ĉe la PIV-a solvo por nociaro 1 (Avantaĝo: tradicio. Malavantaĝo: truo (ŝtopebla per "enklasigo").), Esperantigi la terminojn de nociaro 2. T.e., fortranĉi (aŭ redifini) la sufikson "ik" kies laŭmoda signifo apenaŭ taŭgas, kaj fortranĉi (aŭ difini) la sufikson "if". Se ni fortranĉus kaj "ik" kaj "if"-on, ni povas anstataŭigi ilin per io jam difinita.

Ebla tia propono: Logika kandidato estas la sufikso "-iz". Eta vastigo de ties signifo <1> allasus la sencon: "apliko (aŭ atribuo) de jam ekzistantaj nocioj". PIV jam, spite al ĝia propra analizo, faras tion per "karakterizi". Terminoj tiaj estus:

Klarigo	Termino
Produkto de Nociaro 1:	
~	
klas/ita noci/o-sistem/o	
~	
klas/iz/a noci/o-sistem/o	
~	
klas/iz/o-sistem/o	
Nociaro 2:	
ago	klas/iz/i
agado	
klas/iz/ad/o	
nomo de agotuto	klas/iz/o
rezulto	klas/iz/it/aĵ/o

Avantaĝoj: 1. forigo de ĉiuj sendifinaj balastaĵoj (if, ik); 2. Uzo de la difino-hava sufikso ("iz"), 2a) kio kongruas la spiriton de Esperanto, 2b) kaj faciligas memori kiu vorto estas kiu; 3. pro la verbeco de "iz", konservo de "klasizo" por la simpla ago tiel ŝtopante la duan truon. Malavantaĝo: nova uzo de morta sufikso emas ŝoki.

Aliaj ŝanĝoj konjekteblas, sed eble ne egale facile motiveblas.

ei (92-11-18): Komuniku viajn preferojn respondante la enketilon (p.1675, #562-566)

«93-11-13»

15

{U1}	001.411.4 (+)
{T1}	RBN
{eo1}	desegn/a prezent/o de klasifik/o *b
{eo2}	desegn/a prezent/o de klasif**/o *c
{eo3}	grafik/a prezent/o de klasif**/o *ĉ
{eo4}	arb/a prezent/o de klasifik/o *d
{de1}	grafische Darstellung einer Klassifikation *a
{en1}	graphical representation of a classification *a
{fr1}	représentation graphique d'une classification *a

Tabelo de nocioj (85/288), kiu formas nocio-sistemon (85/295), en kiu la interrilatoj inter la nocioj estas montrataj per piramidsimila aranĝo (= per genealogia arbo). \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei; \*c pok; \*ĉ go; \*d wor;

**85/301** =ApE85 #012

Rim: ei: Pri {eo1} aŭ {eo2} =85/300. Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53.

wor (90-07-19): Pli konsekvenca ol {eo2} estas {eo3}, ĉar (sen metaforo) la prezento ne desegnas. Pli klara ol ambaŭ estas {eo4}. Mi sentas la vorton "tabelo" en la difino neoportuna, ĉar ĝi pensigas pri la ne-arba (ne-piramidsimila) ŝak-tabula aranĝo de la tabel-vortoj -- sed mi ne trovas klaran subtenon por tiu sento en PIV.

«93-11-13»

16

{U1}	001.411.4 (+)
{T1}	RBN
{eo1}	klas/it/a noci/o-list/o *b
{eo2}	sistem/a list/o de noci/oj *b
{eo3}	ŝtup/a list/o de noci/oj *c
{de1}	Begriffsverzeichnis *a
{en1}	schedule of concepts *a
{fr1}	liste systématique de notions *a

Listo de nocioj (85/288), kiuj formas nocio-sistemon (85/295), en kiu la interrilatoj inter la nocioj estas montrataj per lineara sinsekvo kombinita per laŭŝtupa aranĝo, kiu utiligas diversajn tipografiajn litertipojn aŭ notacion. \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei; \*c wor;

**85/302** =ApE85 #013

Rim: ei: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53.

wor (90-07-19): La signifon de la vorto "sistemo" precizigas la resto de la termino {eo2}. Ju pli la komponantaj vortoj (kiel "sistema") ricevas signifon de la tuta termino (kiel {eo2}), des pli tiu tuta temino ŝajnas lernenda kvazaŭ aparta vorto. Kaj des malpli la tuta termino sin motivas.

Metaforaj vortoj, kiuj komparas konkretaĵojn ("ŝtupa") igas la uzadon pli flua kaj tuje klara. «93-11-13»

17

{U1}	001.411.4 (+)
{T1}	RBN
{eo1}	fak/o (2) de scio *c EVIT *ĉ
{eo2}	stud-objekt/o *b
{eo3}	stud-kamp/o *b
{eo4}	stud-teren/o *ĉ
{eo5}	stud-sfer/o *ĉ
{de1}	Wissensgebiet *a
{en1}	field (of knowledge) *a
{en2}	subject (field) *a
{fr1}	domaine (du savoir) *a

Specialigita ago-sfero de homa menso.

¶ Ekzemploj: \i Iu branĉo de scienco; la labor-metodo de iu aparta profesio. \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ej; \*c PIV (2); \*ĉ go;

**85/303** =ApE85 #014

Rim: ej: Tiu ĉi nocio estas simile difinita en ISO/N53: =[86/002].

go: {eo1} ne estas rekomendinda, ĉar "fako" = A. \Mbranch\i, ne \field\i.

wor (90-07-19): Kongrue al PIV ak go pri la signifo de "fako". La diferenco inter "fako" kaj "kampo" estas perspektiva. La difino supra taŭgas (sed ne sufiĉas) kaj por "fako" (branĉo) kaj por "kampo". Por klare difini la du nociojn oni bezonas kontrastajn difinojn kaj ekzemplojn:

kampo <5>: Tutaĵo de la aferoj pri iu temo, kiujn povas atingi ies agado.

fako <2\*>: Aparta dividaĵo de kampo; subkampo.

En la ekzemploj la vorto "de" en grupo K havas sencon malsaman ol havas la vorto "de" en grupo F:

Grupo K

kampo de la praktiko = kampo Praktiko;

kampo de E-sta diskutado = kampo E. Diskutado;

kampo de la historio = kampo Historio;

kampo de ĥemio = kampo Hxemio.

Grupo F ekz:

fako de ĥemio estas fako Bioĥemio;

fako de historio estas fako Antikva Historio;

fako de scienco estas fako Hxemio;

fako de scio estas fako Arto.

En grupo K temas pri konsisto (La kompo de ĥemio konsistas el ĥemio; PAG 133C.e), dum en grupo F temas pri posedo (Fakon de ĥemio (ekz, bioĥemio) posedas ĥemio; PAG 133A.c). Interkrampe estas ekzemplaj propra-nomaj ekvivalentoj (PAG 133 Rim III).

Sxajnas al mi, ke la esenco de la diferenco inter la signifoj de "kampo" kaj "fako" kuŝas en tio, ke ili funkciigas malsamajn signifojn de la vorto "de".

=93/003 [94-02-26]

18

{U1} 001.411.1 (+)

{T1} RBN

{eo1} kamp-specif/a noci/o (en difinita stud-kampo) \*b

{eo2} speci/a noci/o (en difinita sfero) \*c

{de1} spezieller Begriff (in einem bestimmten Wissensgebiet) \*a

{en1} specific concept (in a given field) \*a

{fr1} notion propre (au domaine en question) \*a

Nocio (85/288) apartenanta ĉefe al unu stud-kampo (85/303). Ekzemploj: \I En aŭtomobila inĝeriko (89/052) la nocioj "aŭtomobilo" kaj "limuzino" \i. \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ej; \*c go;

**85/304** =ApE85 #015

Rim: ej: Tre simile difinita en ISO/N53: =86/005. {eo2} Estas miskomprenebla kiel nocio rilatanta al

botanika aŭ zoologia specio. «93-11-13»

19

{U1} 001.411.1 (+)

{T1} RBN

{eo1} prunt/e-pren/it/a noci/o \*b

{eo2} prunt-noci/o \*c

{de1} geliehener Begriff \*a

{en1} borrowed concept \*a

{fr1} notion empruntée \*a

Nocio (85/288) ofte uzata en difinita stud-kampo (85/303), sed apartenanta ĉefe al alia fako. Ekzemploj: \IEn aŭtomobila inĝeriko (89/052) la nocioj "lubrikiga oleo", "fuelo" kaj "ŝafto" \i. \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ej; \*c wor;

**85/305** =ApE85 #016

Rim: ej: Preskaŭ sama difino en ISO/N53: =86/006. «93-11-13»

20

{U1} 001.411.1 (+)

{T1} RBN

{eo1} noci/o trans difin/it/a sfer/o \*c

{eo2} noci/o super/ant/a difin/it/an stud-kamp/on \*b

{eo3} super'kamp/a noci/o \*ĉ

{de1} über das Wissensgebiet hinausreichender Begriff \*a

{en1} concept exceeding the given field \*a

{fr1} notion dépassant le domaine \*a

Nocio (85/288) apartenanta al pli larĝa stud-kampo (85/303), de kiu donita stud-objekto formas parton. Ekzemplo: \IEn aŭtomobila inĝeriko (89/052) la nocio "rado" \i. \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ej; \*c go; \*ĉ wor;

**85/306** =ApE85 #017

Rim: ej: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53.

wor (1990-07-19): {eo1} laŭ mi taŭgas al ia supernocio de {eo3}. «93-11-13»

2.1.3 Tipoj de karakterizaĵoj (n-roj 21 ĝis 25)

21

{U1} 001.411.5 (+)

{T1} RBN

{eo1} intrinsek\*\*/a karakteriz/aĵ/o \*b EVIT \*b

{eo2} esenc/e propr/a karakteriz/aĵ/o \*b

{eo3} intrins\*\*/a karakteriz/aĵ/o \*c\*b

{eo4} en/o-pri/a karakteriz/aĵ/o \*c

{eo5} en/o-tem/a karakteriz/aĵ/o \*c

{de1} inhärentes Merkmal \*a

{en1} intrinsic characteristic \*a

{en2} inherent characteristic \*a

{fr1} caractère intrinsèque \*a

{fr2} caractère inhérent \*a

Karakterizaĵo (85/289) apartenanta al objekto mem kaj ne al ĝiaj rilatoj al aliaj objektoj. \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ej; \*c wor;

**85/307** =ApE85 #018

**Rim:** ei: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53.  
 wor (90-07-19): A. Sxajnas al mi malkonsilinde  
 bonvenigi balastajon "-ek": 1. Se "-ik" estas  
 ĝenerale evitinda pro ebla konfuzo kun tekniko, "-  
 ek" estas simile evitinda pro ebla konfuzo kun speco  
 de rapideco. Depende de la resto de la vorto, eble  
 pli evitinda; 2. Cele al tio, ke Esperanto estu facila,  
 ni kutime strebas, ke ĝiaj vortoj estu kiom eble plej  
 antaŭkonjekteblaj. Se lasi flanke teknikojn, se la  
 vortoj, kiuj en Eŭropaj lingvoj finiĝas per "-ic",  
 montriĝas en Esperanto jen stumpaj (En. \sonic\i --  
 >"sona") kaj jen finiĝantaj per "-ek" tio estas  
 malfacilaĵo. 3. Nuna akcepto de {eo1} simple  
 rezultigos laŭ mi, ke iam poste oni stumpigos ĝin.  
 B. {eo2} havas unuavidan allogon, sed mi ne  
 sukcesis ricevi de ĝi la difinitan signifon surbaze de  
 nia gramatiko kun la PIV-aj difinoj de la apartaj  
 vortoj (t.e. klaran → rezultan signifon (85/370)), kio  
 implicas, ke ĝi estus aparte lernenda kiel nova radiko  
 aŭ idiomaĵo. C. Kiel purisma paro kion pri  
 "eno-pria karakterizaĵo" kaj "ekstero-pria  
 karakterizaĵo"?

ei (91-08-09): Mi markis mian unuan proponon  
 EVIT. Je ĝi malplaĉis al mi ĉefe, ke oni povus esti  
 misgvidata pensi pri iu seka afero. {eo3} nun ŝajnas  
 al mi preferinda, sed {eo2} eblus, se iu volas nepre  
 eviti neologismojn. La signifo de {eo4} kaj {eo5}  
 por mi ne estus divenebla. «93-11-13»  
 22

{U1} 001.411.5 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} ekstrinsek\*\*/a karakteriz/aĵ/o \*b EVIT \*b  
 {eo2} ne esenc/e propr/a karakteriz/aĵ/o \*b  
 {eo3} ekstrins\*\*/a karakteriz/aĵ/o \*c\*b  
 {eo4} ekster/o-pri/a karakteriz/aĵ/o \*c  
 {eo5} ekster/o-tem/a karakteriz/aĵ/o \*c  
 {de1} nicht weseneigenes Merkmal \*a  
 {en1} extrinsic characteristic \*a  
 {fr1} caractère extrinsèque \*a

Karakterizaĵo (85/289) de objekto nur pro  
 ties rilatoj al aliaj objektoj. Oftaj tipoj de □oj estas  
 la → karakterizaĵo de origino (85/309) kaj la →  
 karakterizaĵo de celo (85/310). \*b laŭ \*a  
Fon: \*a R1087; \*b ei; \*c wor;

**85/308** =ApE85 #019

**Rim:** ei (88-12-16): Tiu ĉi nocio ne troviĝas en  
 ISO/N53. we preferas "adhera karaktro" kaj por  
 (85/307) "inhera karaktro". - "karakterizaĵo" ŝajnas  
 al mi pli klara ol "karaktro", kiu jam estas  
 hiperonimo (86/008) por majuskla aŭ minuskla  
 litero, cifero, interpunkcia signo kaj por speciala  
 tipografia signo kiel @, #, &, ktp. (=85/452).  
 "Adhera" impresas min kiel tro "glua". "adhera  
 karaktro" laŭ mi estas "e", kiu formas ligaturon kun  
 "a". La karakterizaĵoj de celo kaj origino ne estas  
 algluitaj al la nocio, sed troviĝas ekstere de ĝi. La  
 inventinto de objekto ne adheras al ĝi! wor (90-  
 07-19): =85/307. Mi akordas kun ei pri "adhera" k  
 pri "karaktro"; aliaj solvoj per "-her-" (aŭ "-trins-")

ne devus havi la saman problemon.

ei (91-08-09): =85/307. «93-11-13»

23

{U1} 001.411.5 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} karakteriz/aĵ/o de origin/o \*b EVIT \*b  
 {eo2} karakteriz/aĵ/o pri origin/o \*c  
 {de1} Herkunftsmerkmal \*a  
 {en1} characteristic of origin \*a  
 {fr1} caractère de provenance \*a

→ Ekstrinsa karakterizaĵo (85/308), kiu  
 indikas kie, per kiu aŭ kiel objekto estiĝis, uziĝis aŭ  
 konatiĝis. Ekzemploj: \La malkovrinto, inventinto  
 aŭ priskribinto de objekto, ĝia produktinto aŭ  
 liverinto, la loko de produktado (urbo, lando), la  
 fabrikad-maniero.\i \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei; \*c wor;

**85/309**

**Rim:** ei (91-08-09): Tiu ĉi nocio ne troviĝas en  
 ISO/N53. Mi markis mian unuan terminon EVIT,  
 ĉar {eo2} pli trafe priskribas la nocion. «93-11-13»  
 24

{U1} 001.411.5 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} karakteriz/aĵ/o de cel/o \*b EVIT \*b  
 {eo2} karakteriz/aĵ/o pri cel/o \*c  
 {de1} Zweckmerkmal \*a  
 {en1} characteristic of purpose \*a  
 {fr1} caractère de destination \*a  
 {fr2} caractère d'emploi \*a

→ Ekstrinsa karakterizaĵo (85/308), kiu  
 indikas la celon de iu objekto. Ekzemploj: \La  
 uzo-maniero; la apliko-fako; la loko aŭ situo en  
 muntaĵo.\i \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei; \*c wor;

**85/310**

**Rim:** ei (91-08-09): Tiu ĉi nocio ne troviĝas en  
 ISO/N53. Mi markis mian unuan terminon EVIT,  
 ĉar {eo2} pli trafe priskribas la nocion. «93-11-13»  
 25

{U1} 001.411.5 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} ekvivalent/aj karakteriz/aĵ/oj \*b  
 {de1} äquivalente Merkmale \*a  
 {en1} equivalent characteristics \*a  
 {fr1} caractères équivalents \*a

Malsamaj karakterizaĵoj (85/289), kiuj  
 tamen estas substitueblaj inter si en difinita nocio-  
 enhavo (85/290) sen ŝanĝo de la nocio-amplekso  
 (85/293). La inter-ŝanĝebleco de karakterizaĵoj estas  
 kaŭzata per hazarda → ontologia rilato (=85/295) ne  
 per logika ekvivalento. Ekzemploj: \La  
 karakterizaĵoj "egallatera" (= havanta egalajn  
 laterojn) kaj "egal-angula" (= havanta egalajn  
 angulojn) en la nocio "egallatera [egal-angula]  
 triangulo"; "konvekso lenso" = "konverĝiga  
 lenso".\i \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei;

### 85/311

Rim: ei: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53. «93-11-13»

2.1.4 Kombino de nocioj (n-ro 26)  
26

{U1} 001.411.6 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} losuril\*\*/o \*b EVIT \*b  
{eo2} losukomb\*\*/o \*b EVIT \*b  
{eo3} log\*\*-sum/o \*ĉ  
{eo4} log\*\*-sum/ig/o \*ĉ  
{de1} Disjunktion \*a\*c  
{de2} logische Addition \*a  
{de3} Umfangsvereinigung \*c  
{en1} disjunction \*a\*c  
{en2} logical addition \*a  
{fr1} disjonction \*a\*c  
{fr2} addition logique \*a

Adicio de la nocio-ampleksoj (85/293) de kelkaj nocioj (85/288). La rezulto estas supernocio (85/291) de la originaj nocioj, kaj tiuj estas subnocioj (85/292) de la rezulta nocio. Ekzemplo: \llogsumigo de la subnocioj "knabo" kaj "knabino" kreas la supernocion "infano".\i \*b laŭ \*a

Difino de {eo3} laŭ (88/030): Rilato (88/682) formita per la → logika sumo (89/048) de du unuoj. Difino de {eo4} laŭ (88/031): La kombinado de du nocioj (88/026) per kreo de ilia → logika sumo (88/048). \*b laŭ \*c

Fon: \*a R1087; \*b ei; \*c Termi-of-doc; \*ĉ wor;

### 85/312

Rim: ei (89-11-23): Uzu {eo3} se vi volas indiki rilaton inter du nocioj; uzu {eo4} se vi volas indiki la procezon, per kiu integriĝis aŭ kombiniĝis du nocioj. Ekz-e homo = viro aŭ virino. wor (90-07-19): Mi akordas kun la divido en du registraĵojn. La terminojn {eo3} kaj {eo4} mi trovas multege pli tuje klaraj, facile memoreblaj kaj uzeblaj. (Laŭ mi, /log/ ja estas la radiko de log\*\*/ik/o, spite la pretendon de PIV.)

ei (91-08-09): Mi akordas kun wor kaj tial markis terminojn {eo1} kaj {eo2} EVIT. «93-11-13»

2.2 Difinoj (n-roj 27 ĝis 30)  
27

{U1} 001.412 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} difin/o (1) \*b\*c  
{de1} Definition \*a  
{en1} definition \*a  
{fr1} définition \*a

Pervorta priskribo de nocio (85/288).

\*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei; \*c PIV;

### 85/313

Rim: =93/028 [94-02-26]

28

{U1} 001.412 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} difin/o per super'noci/o kaj diferenc/o \*b  
{eo2} difin/o per noci/o-en'hav/o \*b  
{eo3} difin/o (1) (en ĝia klasika signifo) \*b  
{de1} Definition durch Gattungsbegriff und Unterschied \*a  
{de2} Definition durch Intension \*a  
{de3} Definition durch Konnotation \*a  
{de4} intentionale Definition \*a  
{de5} Definition (in klassischem Sinn) \*a  
{en1} definition by genus and difference \*a  
{en2} definition by intension \*a  
{en3} definition by connotation \*a  
{en4} intensional definition \*a  
{en5} definition (in its classical meaning) \*a  
{fr1} définition spécifique \*a  
{fr2} définition (au sens classique) \*a

Determino de la nocio-enhavo (85/290) de nocio (85/288). Ekzemplo: \l"Aera flug-aparato" estas iu ajn aer-subtenata veturilo.\i \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei;

### 85/314

Rim: =[86/030] =93/029 [94-02-26]  
29

{U1} 001.412 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} difin/o per noci-ampleks/o \*b  
{eo2} difin/o per signif-etend/iĝ/o \*b  
{eo3} difin/o per signif-amplekso \*c  
{eo4} difin/o per ekzempl/oj \*ĉ  
{de1} Definition durch Extension \*a  
{de2} Definition durch Denotation \*a  
{de3} extensionale Definition \*a  
{en1} definition by extension \*a  
{en2} definition by denotation \*a  
{en3} extensional definition \*a  
{fr1} définition générique \*a

Difino per determino de la nocio-amplekso (85/293) de nocio (85/288). Ekzemplo: \lLa nocio "aera flug-aparato" entenas balonojn, → direkteblajn balonojn [zepelinojn], kajtojn, glisilojn kaj flugmaŝinojn.\i \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei; \*c we; \*ĉ wor;

### 85/315 =ApE85 #020

Rim: ei (89-12-16): =[85/293, 86/031]  
=93/030 [94-02-26]  
30

{U1} 001.412 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} difin/o per kun'tekst/o \*b  
{eo2} kun'tekst/a difin/o \*b  
{de1} Definition durch Kontext \*a  
{de2} kontextuale Definition \*a  
{en1} definition by context \*a  
{en2} contextual definition \*a

{fr1} définition par l'emploi \*a  
Difino (85/313) per ekzemplo de vera apliko, tio estas per subkomprenata ekvacio. La difinota termino (85/317) estas montrata en frazo, kies tuta signifo estas konata aŭ povas esti divenata. Ekzemplo: \Li vojaĝis de Eŭropo al Ameriko en 24 horoj uzante ... (avion).li \*b laŭ \*a  
Fon: \*a R1087; \*b ej;

### 85/316

Rim: ej: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53. «93-11-13»

3. TERMINOJ (n-roj 31 ĝis 94)

3.1 Gxeneralajoj (n-roj 31 ĝis 38)

31

{U1} 001.420 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} termin/o (1) (por nocio) \*b\*c  
{de1} Terminus (für einen Begriff) \*a  
{en1} term (for a concept) \*a  
{fr1} terme \*a

Iu ajn konvencia simbolo por nocio (85/288), kiu konsistas el prononceblaj sonoj aŭ el ties skriba reprezentaĵo (=el literoj). Termino povas esti vorto (85/352) aŭ vortgrupo (85/358). Ekzemploj por ~o en 85/318,319. \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ej; \*c PIV;

### 85/317

Rim: =[86/036] =93/035 [94-02-26]

32

{U1} 001.420 (+)  
{U2} 801.316.4  
{T1} RBN  
{eo1} teknik/a termin/o \*b  
{eo2} tehnik/a termin/o \*c  
{eo3} fak/a termin/o \*b  
{de1} Terminus technicus \*a  
{en1} technical term \*a  
{fr1} terme technique \*a

Termino (85/317) kies uzo kaj signifo (85/369) estas limigata al specialistoj de difinita stud-kampo (85/303). Ekzemploj: \rivoluo; nombro de revoluo; nombro de revoluo dum tempo-uno.li \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ej; \*c we;

### 85/318 =ApE85 #021

Rim: ej: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53. «93-11-13»

33

{U1} 001.420 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} ĝeneral/a termin/o \*b EVIT \*b  
{eo2} komun-lingv/a termin/o \*b  
{eo3} komun-lingv/a vort/o \*b  
{de1} allgemeiner Terminus \*a  
{en1} general term \*a  
{fr1} terme commun \*a

Termino (85/317) formanta parton de la

komuna lingvo. Ekzemploj: \numero; tempo; per; de.li \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ej;

### 85/319

Rim: ej (88-12-16): Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53. =88/106. «93-11-13»

34

{U1} 001.420 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} prefer/at/a termin/o \*b  
{de1} Vorzugsterminus \*a  
{en1} preferred term \*a  
{fr1} terme à employer de préférence \*a  
Termino (85/317) rekomendita en norm-verko. \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ej;

### 85/320

Rim: =[86/063] =93/066 [94-02-26]

35

{U1} 001.420 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} permes/it/a termin/o \*b  
{de1} zulässiger Terminus \*a  
{en1} preferred term \*a  
{fr1} terme toléré \*a

Termino (85/317), kies uzo kiel sinonimo (85/378) de → preferata termino (85/320) estas permesita en norm-verko. \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ej;

### 85/321

Rim: =[86/064] =93/067 [94-02-26]

36

{U1} 001.420 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} ne'rekomend/it/a termin/o \*b  
{eo2} ne'norm/a termin/o \*c  
{eo3} evit/ind/a termin/o \*ĉ  
{de1} abgelehnter Terminus \*a  
{en1} deprecated term \*a  
{fr1} terme à éviter \*a

{eo5} laŭvort-grup/a traduk/o \*ĉ  
{de1} fremdes Äquivalent \*a  
{de2} Übersetzungsäquivalent \*a  
{de3} entsprechender fremdsprachiger Terminus \*a  
{de4} fremde Entsprechung \*a  
{en1} foreign equivalent \*a  
{en2} translational equivalent \*a  
{en3} corresponding foreign term \*a  
{fr1} équivalent étranger \*a

Termino el alia lingvo havanta la saman → rezultan signifon (85/370). La → laŭmorfemaj sencoj (85/340) de du respondaj terminoj povas esti malsamaj; tiuokaze unu ne estas "traduko" de la alia. Ekzemplo: \La Franca ekvivalento de la Angla termino "head" (of a key) (=ŝlosil-kapo) estas "talon", kies laŭmorfema traduko estus "kalkano".\i \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ej; \*c go; \*ĉ wor;

**85/380** =ApE85 #032

Rim: =93/042 [94-02-26]

4. Vortaroj, glosaroj kaj terminaroj (Estos havebla en suplemento al tiu ISO-rekomendo.)

5. Apliko-kondiĉoj de terminoj (nro 94a)  
94a

{U1} 001.427 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} kun'tekst/o (de termino) \*b  
{de1} Kontext (eines Terminus) \*a  
{en1} context (of a term) \*a  
{fr1} contexte (d'un terme) \*a

La teksto ĉirkaŭanta la terminon (85/317) aŭ la situacio, en kiu la termino estas uzata. \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ej;

**85/381**

Rim: =[86/081] =93/089 [94-02-27]

{U1} 501  
{U2} 53.085  
{U3} 681.32  
{T1} KBE  
{eo1} diĝit'/a \*a\*b\*c \*d  
{eo2} cif(er)ec/a \*g  
{de1} digital \*d\*f\*ĝ  
{en1} digital \*c\*ĉ  
{fr1} numérique \*ĉ  
{fr2} digital(e) \*h\*i  
{N11} digitaal \*ĵ

Funkcianta per, respondanta al, aŭ alimaniere rilatanta al la uzado de nekontinuaĵoj (ili povas esti ciferoj) por prezenti aritmetikajn nombrojn, alproksimiĝojn al nombroj de kontinuo, aŭ por prezenti logikajn esprimojn aŭ variablojn. Antonimo: analoga (85/412). \*e

Apartenanta al dataoj (85/476), kiuj estas prezentataj per ciferoj. \*e laŭ ĉ.

Apartenanta al dataoj en formo de ciferoj. (85/487) \*e laŭ \*j.

Fon: \*a SV 69/13a; \*b IK 84/3; \*c Comp; \*ĉ GES/NGI-12; \*d KBT; \*e ei; \*f Mikro-comp-Lex; \*g Cab; \*ĝ iwt-Wö; \*h TANDY; \*i ShZ; \*j McGraw; \*j DEE;

### 85/382

Rim: pok: La malkontinuaĵoj matematike ekvivalentas al ciferoj, kio pravigas la metaforon {eo2}, uzatan en Ru kaj Fr (male al En kaj De).

ei: pok pravas: la Esperanta termino por la Angla *digit* estas "cifero" (=88/073). Tamen {eo1} estas laŭ mi preferinda, ĉar temas pri ofte ankaŭ en aliaj fakoj aplikata nova nocio, kiu meritas apartan radikon: diĝita horloĝo, diĝitigita bildo, diĝita sonregistraĵo. Mi intencas publikigi registraĵserion en kiu {eo1} pli taŭgas ol {eo2}.

«91-08-09»

{U1} 681.327.28  
{T1} KCA  
{eo1} blat/o <2> \*a  
{eo2} ĉip/o (1) \*b\*c\*d  
{eo3} split/o <3> \*j  
{de1} Chip \*f\*ĝ\*h  
{de2} Halbleiterchip \*ĥ  
{en1} chip \*e  
{fi1} siru \*j  
{fr1} puce \*ĉ  
{fr2} microplaquette \*ĉ  
{fr3} pastille \*ĉ

Duonpreta duonkonduktanta aranĝaĵo, formita substrato (85/433), en kiu troviĝas jam ĉiuj aktivaj kaŭ (85/409) pasivaj elementoj de transistoro, diodo, ico (85/410), ktp., produktitaj per procedoj de difuzado, pasivigo, maskado, foto-rezistado kaŭ → epitaksia kreskado. (89/274). Se ~o estas provizita per kontaktiloj oni nomu ĝin integrita cirkvitaro aŭ ico (85/410), sed fak-ĵargone la vorto ~o estas uzata ankaŭ kiel sinonimo por ico. Ekzistas jenaj tipoj: logikaj ~oj (89/275), memor-~oj (89/276), sur-~aj komputiloj (89/277), andikoj (89/278), special-celaj ~oj (89/279), programeraĵoj (89/280) bit-diskaj ~oj (89/281) \*g laŭ \*i;

Fon: \*a hal, AkSt85,p315; \*b IK85/2; \*c SV77/25c; \*ĉ GES/NGI-12; \*d PIVS \*f CHIP; \*g ei; \*ĝ iwt-Wö; \*h Mikro-comp-Lex, \*ĥ CE; \*i ComGlo; \*j rau en EP94/4,p1;

### 85/383

=ApD3.7 #516, =ApE85 #033

Rim: «94-01-30»

{U1} 159.955.1  
{T1} REA  
{eo1} kognitiv\*\*/a \*a\*b  
{de1} kognitiv  
{en1} cognitive  
{fr1}

Konscia (pri si mem kaj la ĉirkaŭo);

heŭristike komprenkapabla, pens-kapabla. \*a

Fon: \*a AkSt85,p315; \*b E-log2,p212;

### 85/384

Rim: «88-12-16»

{U1} 771.42  
{U2} 778.1  
{T1} LEC  
{eo1} mask/o <7> \*a  
{de1} Kopiermaske \*d  
{en1} masking frame \*b  
{fr1} cache \*c

Maldiafana folio el kartono, plasto aŭ metalo uzata de fotografisto por ~i <4>, por ke sur la kopio aŭ printaĵo (85/001) aperu nur parto de la reproduktota bildo aŭ teksto. =85/387. EB 112/22. \*a

Fon: \*a SV 72/25a; \*b DB-En; \*c DB-Fr; \*d DB-De;

### 85/385

Rim: «88-12-16»

{U1} 621.391.7  
{U2} 681.325.53  
{T1} KEE  
{eo1} mask/o <8> \*a  
{de1} Maske f \*b  
{en1} mask \*b\*c  
{fr1} masque \*c

8a Karto tratruita per rektanguletoj, laŭ interkonsentita distribuo, por elstarigi nur la en tiuj "fenestroj" aperantajn vortojn aŭ simbolojn, ekz-e por povi legi sekretan mesaĝon kaŝitan interne de banala teksto.

8b Analoga sistemo por elektronika elfiltrado de informoj. \*a

Karakto-paterno (89/087) uzata por determini la retenon aŭ eliminon de partoj de alia karakto-paterno. \*ĉ laŭ \*c

Fon: \*a hal AkSt85,p315; \*b iwt-Wö; \*c GES/NGI-12; \*ĉ ei;

### 85/386

Rim: «91-01-11»

{U1} 771.42  
{U2} 778.1  
{T1} LEC  
{eo1} mask/o-kadr/o \*a  
{de1} Abdeckrahmen \*d  
{de2} Vergrößerungsrahmen \*d  
{en1} composing frame \*b  
{en2} enlargement frame \*b  
{fr1} cadre de recouvrement \*c  
{fr2} cadre d'agrandissement \*c

Parto de projekcia print-aparato (85/001), kiu forprenas la ne reproduktotan bild-parton. EB 112/34. \*a

Fon: \*a SV72/25a; \*b DB-En; \*c DB-Fr; \*d DB-De

### 85/387

Rim: «88-12-16»

{U1} 681.326.3  
 {T1} KEG  
 {eo1} metagraf\*\*/i tr \*a  
 {eo2} kompil/i <2> \*b  
 {eo3} kompil/i \*b  
 {eo4} kompil/um/i \*c\*e  
 {de1} kompilieren \*f  
 {de2} übersetzen \*d\*f  
 {de3} umwandeln \*f  
 {en1} compile \*ĉ  
 {fr1} compiler \*ĉ

Prepari komputoran programon pere de alilingva programo. Transskribi programon. (el: meta = trans; graf = skrib') \*a

Traduki komputoran programon el problem-orientita lingvo (86/180) al komputor-orientita lingvo (86/179). \*e laŭ ĉ

Fon: \*a hal (AkSt85,p315); \*b Comp; \*c KKV; \*ĉ GES/NGI-12; \*d Mikro-comp-Lex; \*e ĉi; \*f iwt-Wö;

### 85/388 =ApE85 #034

Rim: ĉi: "metagrafi" indikas per Grekaj radikoj nenion alian ol "transskribi". Tial tiu termino laŭ mi ne estas sufiĉe priskriba. {eo2} havas en nia lingvo jam tute alian signifon, kiu povus kaŭzi miskomprenon. {eo3} (= uzi kompilon <PIV>) eblus. Sed la termino "kompilero" mispensigas pri ero de kompila laboro (=85/389). Tial, kvankam mi klopodas eviti la -um-vortojn, la termino "kompilumi" ŝajnas al mi la plej taŭga.

wor (90-07-19): Pri {eo1}: Laŭ mi ne sufiĉe analizita. Uzo de "graf" mem ŝajnas ne PIV-a. Pri {eo3}: Malkonsilinda, ĉar Anglisma k ĉar "-er" vole nevole estas sufikso ("kompil" ja estas radiko kun concerna senco). Tiu "-er" havas mortan sencon pri ilo. Ak ĉi pri konfuzeblo kun viva senco pri elemento. Pri {eo4}: La sufikso /-um/, kiam ne sistema (85/365) (ekz: nazumo, kolumo, plandumo, ...), estas laŭ mi afiksa paronimigilo. Por lingvo-uzanto paronimoj estas multe pli konfuzaj ol estas homonimoj. Se oni nun akceptos {eo4}-n, la sufikso "-um" vole nevole laŭ mi poste forfalos.

Pri {eo2}: Angle ~i kaj kompili (1) maksimume estas "homonimaj"; tio miasperte ne konfuzas la lingvo-uzanton. Fakte, ~i estas ekzemplo aŭ hiponimo de kompili (1), ĉar la maŝino ja deprenas el aliaj pretaj fontoj instrukciar-blokojn k, kunmetante tiujn blokojn laŭ plano priskribita en la "tradukata" teksto, verkas neoriginale. Tio estas multe pli simpla agado ol tradukado -- ĝi proksimas al transkribado. Sxajnas do pli logike forigi numeron "<2>" en {eo2}, ĉar "kompili (1)" jam ampleksas la celatan sencon.

Trafa serĉo por nova termino por 85/388 el la perspektivo, traduki, celu laŭ mi la jenajn karakterizaĵojn: 1. stamo ne pli longa ol estas "kompil/"; 2. evito de paronimoj; 3. sinmotiveco: (a) aludo al tradukado; (b) aludo al direkto de tradukado -- de blokaj diroj al ties eroj (tian aludon

faras {eo2}). Iuj eblaĵoj: "fajnduki" (el "fajnage traduki"), erduki (erige traduki), erigi kaj malbloki (surbaze de bloko <3>).

ĉi (91-08-10): Mi ne konsentas kun wor: kompili <2> estas tute alispeca agado ol kompili (1), kiu nepre meritas distingitan terminon: Se mi per apliko de makrooj (89/317) duon-aŭtomate kompilas indekson por Pekoteko-terminoj pere de mia komputoro, tiam tio estas tute alispeca agado ol konverti programon aŭ registraĵon al maŝin-kodo. Se oni ŝpareme uzas "-um/" ĝi ja estas utila -- neniu dirus "nazo" aŭ "kolo" anstataŭ "nazumo" aŭ "kolumo", kaj same mi ne opinias, ke "-um" forfalos el "kompilumi". Ni zorgu, ke nia lingvo ne fariĝu same ambigua kiel la Angla. Ni povas kontraŭi tiuspecan degeneradon, la Angla-lingvanoj ne, ĉar ili uzas dekomence ambiguajn terminojn. Tio povos esti decida avantaĝo por Esperanto.

wor (91-11-11): "um" en "kompilumi" kaj "um" en "nazumo", "kolumo" ktp ne estas laŭ mi kompareblaj, ĉar, kiel mi atentigis supre en 90-07-19, tiuj lastaj estas sistemaj kaj ilia "um" signifas ion kiel: 'portaĵo destinita por la concerna korpoparto'.

ĉi (91-12-31): La baza difino por "-um/" laŭ PIV. estas: \Suf. sen difinita senco\i. Do ĝi estas utiligebla ĉiucele por atribui novan distingindan signifon al iu ajn vorto. Ne ĝenas, ke krome ekzistas kvar difineblaj signifoj de "-um/". Kontraste al la de wor proponitaj novaj terminoj {eo4} estas facile memorigebla, ĉar \to compile\i estas internacie vaste konata.

<91-12-31>

{U1} 681.326.3  
 {T1} KEG  
 {eo1} kompilero (1) \*a  
 {eo2} kompil/il/o \*b\*c\*d  
 {eo3} kompil/um/ap\*\*/o \*e  
 {de1} Kompilierer \*d\*f\*ĝ  
 {de2} Übersetzer \*f  
 {de3} Compiler \*ĝ  
 {en1} compiler \*d  
 {fr1} compilateur \*ĉ\*d  
 {fr2} programme de compilation \*ĉ

Programo, kiu tradukas altnivelan komputoran lingvon en absolutan kodaĵon aŭ en asemblan lingvon (85/450). La fonto-kodaĵo metata en la ~on estas priskribo de algoritmo (91/017) aŭ programo en al iu problemo adaptita program-lingvo. La eliranta kodaĵo estas la ekvivalenta priskribo de la algoritmo en maŝin-taŭga lingvo. \*e laŭ \*g

Fon: \*a PIV; \*b Comp; \*c IK 84/3; \*ĉ GES/NGI-12; \*d KBT; \*e ĉi; \*f Mikro-comp-Lex; \*g COMPUT; \*ĝ iwt-Wö;

### 85/389 =ApE85 #035

Rim: ĉi (88-12-16): {eo1} ne plaĉas al mi, ĉar ĝi pensigas pri ero de kompilaĵo; {eo2} ne plaĉas al mi, ĉar temas pri ilo, kiu "kompilas" (= verki ne originale). Mi rekomendus uzi la sufikson -il- kiel

eble plej malofte (=89/380), kaj trovi por specialaj iloj novajn vortojn aŭ sufiksojn. Por komputora programo mi elpensis la sufikson -ap-. (85/432).

wor (1990-07-19): Pri {eo2}: Gxis ĝenerala (esperinda) akcepto de -ap-, {eo2} estas laŭ mi konvena, ĉar logika. Laŭ mi, ~o ja estas ilo (=tio, kio servas por efektiviĝi ion) uzata de la maŝino por kompili <1> (=verki ne originale); (=85/388). Pri "-il": Laŭ mia kompreno pri Esperantismo, sub intergenta interkompreno ĉefcelo estas Klaro. Post tio en ordinara teksto pli gravas Facilo ol Precizo, dum en teĥnika faka teksto pli gravas Precizo ol Facilo. Do, en ordinara teksto -il- estas preferinda ĉiam, kiam la rezultita senco en kunteksto ne tiom ampleksas, ke klareco difektiĝas. Tiaokaze, oni bezonus hiponimon. En preciza teĥnika teksto tamen oni povas prave preferi hiponimon. Konklude: "kompililo" eksterfake, kaj "kompilapo" enfake. «91-08-10»

{U1} 621.394.67  
 {U2} 681.3.023.42 (+)  
 {T1} KED  
 {eo1} modem"/o (1) \*a\*b  
 {de1} Modem \*b\*f  
 {de2} MODEM \*e  
 {de3} Akustikkoppler m \*f  
 {en1} modem \*c\*ĉ  
 {fr1} modem \*c\*ĉ

Akronimo el "modulato" kaj "demodulato" (=malmodulato). Aparato por konverti diĝitajn (85/382) signalojn al analogaj (85/390) signaloj taŭgaj por transmision tra analogaj komunik-kanalo (=modulado) kaj por rekonverti la ricevatajn analogajn signalojn al diĝitaj (=malmodulado). Oni dezajnas (85/411) ~ojn por akordigi ilin kun naciaj kaj internaciaj normoj, por ke aparatoj de diversaj fabrikintoj povu "paroli" al aparatoj de aliaj fabrikintoj. \*d laŭ \*c

Fon: \*a Comp; \*b KTB; \*c COMPUT; \*ĉ GES/NGI-12; \*d ej; \*e Mikro-comp-Lex; \*f iwt-Wö;

### 85/390

Rim: «93-11-13»

{U1} 6  
 {U2} 621.3  
 {U3} 681.3  
 {T1} KEE  
 {T2} KGM  
 {eo1} modjul"/o (1,2) \*a\*b  
 {eo2} modul/o <5> \*c\*ĉ\*d  
 {de1} Modul m \*d\*f  
 {de2} Baustein m \*f  
 {de3} Funktionseinheit f\*f  
 {de4} Baukasten m \*g  
 {de5} Element n \*g  
 {en1} module \*e\*f  
 {fr1} module \*e

1. Disigebla kaj kun aliaj ~oj interŝanĝebla

materia parto de kompleksa sistemo. ~a konstruado de domoj kaj mebloj; ~a ŝranko EB#44/25; sur-Luniĝa ~o. Evidente tiu ĉi nocio estas tre ĝenerala: kartoĉoj estas cilindraj ~oj; komputoraj kartoj, disketoj, kasedoj, ĉiuj estas disigeblaj kaj interŝanĝeblaj kaj pro tio ~oj. Pli ĝeneralan nocion havas unajo (89/044), kiu ne devas esti interŝanĝebla, do laŭnorme farita. Aliflanke unajo neniam estas programo. \*a

2. Programo, kiu estas apartigebla kaj identigebla, ekz. ŝargapo (85/441) aŭ rezult-modjulo (85/456). ~a programado; \*a laŭ \*e.

Fon: \*a ej en AkSt85,p.241 kaj en EB; \*b PIVS; \*c Comp; \*ĉ IK 84/3; \*d KBT; \*e GES/NGI-12; \*f Mikro-comp-Lex; \*g iwt-Wö;

### 85/391 =ApE85 #036

Rim: ej: {eo2} laŭ mia opinio ne taŭgas por tiu nocio, ĉar "modulo" havas jam kvar aliajn signifojn en PIV, kaj krome ekzistas la verbo "moduli" kun ankoraŭ aliaj sencoj. Ekzistas nun multaj aliaj module konstruitaj skatoloj aŭ ujoj utiligataj por stori dataojn. Por ili mi proponas la novan akronimon modujo (91/003). «91-03-06»

{U1} 681.327.634  
 {T1} KDE  
 {eo1} mol-disk/o \*a\*d  
 {eo2} disk/et/o (1) \*b\*c\*h  
 {eo3} disked\*\*/o \*d\*i  
 {eo4} fleks/eb/a disk/o \*ĝ\*h  
 {eo5} fleks/a disk/o \*ĥ  
 {eo6} sup/a disk/o \*ĥ  
 {de1} Floppy-Disk \*f\*g  
 {de2} Diskette \*f\*g  
 {de3} Floppy \*g  
 {en1} floppy disk (in an 8" square envelope) \*ĉ\*e\*  
 {en2} diskette \*b\*e  
 {en3} minifloppy (in a 5 1/4" square envelope) \*ĉ  
 {en4} microfloppy (in a rigid 3 1/2" cartridge) \*ĉ  
 {fr1} disque souple \*e  
 {fr2} disquette \*e  
 {fr3} minidisque \*e

Elkomputorigebla stor-medio (94/672), unuopa ronda fleksebla disko interne de kvadrata ujo aŭ mujo (91/003) uzata en multaj komputoroj kaj teksto-prilaboraj sistemoj. Same kiel magneta bendo ~o estas registrebla, forviŝebla kaj reuzebla denove kaj denove. Kp: durdisko (85/393) \*d laŭ \*ĉ Fon: \*a hal en AkSt85,p.316; \*b Comp; \*c IK; \*ĉ ComGlo; \*d ej; \*e GES/NGI-12; \*f Mikro-comp-Lex; \*g iwt-Wö; \*ĝ pre en WEs88,p79; \*h PIVS; \*ĥ wor; \*i @pfei93-01-06; \*j

### 85/392 =ApE85 #037

Rim: ej (94-02-20): Sxajnas al mi nun preferinde atribui laŭ \*i al ĉiuj tiuspecaj stor-medioj la terminon {eo3}, ĉar la stor-medioj mem povas esti molaj aŭ flekseblaj, sed ili troviĝas en pli-malpli rigidaj ujoj. «94-02-28»

{U1} 681.327.635 (+)  
 {T1} KDE  
 {eo1} dur-disk/o \*a\*ĉ\*i  
 {eo2} Winchester-disk/o \*b EVIT \*ĉ  
 {eo3} vinĉestr\*\*/o \*e EVIT \*ĉ  
 {eo4} vinĉestr\*\*/a disk/o \*g EVIT \*ĉ  
 {eo5} firm-disk/o \*ĝ EVIT \*ĉ  
 {eo6} mal'mol/a disk/o \*h  
 {eo7} rigid-disk/o \*j  
 {eo8} disk/o <4> \*j\*1 EVIT \*ĉ  
 {de1} Magnetplatte f\*d\*f\*k  
 {de2} Hartplatte f\*k  
 {en1} hard disk \*c\*d\*k  
 {en2} metallic disk \*c  
 {en3} magnetic disk \*k  
 {fr1} disque dur \*h

Ne el disko-drajvo (85/394) elprenebla disko por magnetaj registradoj kune kun la drajva hardvo (85/398). La dur-disko mem konsistas el unu aŭ pluraj diskoj unu super la alia el dura alumina substrato (85/433) kovrita per aparte maldika magnetigebla tavolo. Pro la maldiko de la magnetigebla tavolo oni atingas multe pli grandan storivon ol ĉe disketo (85/392). Al la hardvo de la durdiska drajvo apartenas flosantaj kapoj (87/500). ~a drajvo estas havebla ankaŭ sur karto, kiun oni metas kiel aliajn kartojn en personan komputoron por pligrandigi ties komputivon (=~ako 89/172). Ekzistas krome elpreneblaj ~oj, kiujn oni povas sendi per la poŝto, la t.n. data-pakoj (90/294) enmetebaj en data-pakingon. Tiuj datapakoj fakte estas kompletaj drajvoj, en kiuj neelpreneble troviĝas ~o. La plej novaj ~oj estas moveblaj ~oj, kiuj similas al data-pakoj, sed ili ne bezonas data-pakingon, nur kablajn konektendajn al la kablino por la printatoro, kaj 12-voltan kurento-provizilon. Tiel oni facile povas movi grandan kvanton da dataoj de unu komputoro al alia. \*ĉ

**Fon:** \*a hal en AkSt85,p316; \*b IK 84/3,p48; \*c COMPUT; \*ĉ ej; \*d Mikro-comp-Lex; \*e pok en letero al ej 87-07-19; \*f iwt-Wö; \*g kav; \*ĝ pre en WEs88, p79; \*h MpP8; \*ĥ WP5.1Fr; \*i PIVS; \*j wor; \*j @pfei93-01-06; \*k CE; \*l MON94/2,p12;

**85/393** =ApE85 #038

**Rim:** ej: Enkonduki vortojn kun ne-Esperantaj literoj laŭ mi ne estas rekomendinda. Mi ankaŭ rekomendus nek la neologismon de pok nek la terminon de kav, ĉar la termino \Winchester diskli jam arkaiĝis en la Angla. Ankaŭ {eo5} ne taŭgas, ĉar durdiskoj ne estas firmaj (laŭ PIV: "tiel fiksita, ke ne eblas ŝanceliĝo"). Tute male: Malavantaĝo de malnovaj durdiskaj drajvoj estis, ke ili estis tre sensivaj kontraŭ malgrandaj skuoj. (Tial iliaj dumuzado flosantaj lego- aŭ registro-kapoj estas "parkadendaj" dum neuzo de drajvo.)

ej (94-02-20): Nepre evitinda ŝajnas al mi ankaŭ la termino {eo8}, ĉar la disko mem estas nur relative malgranda parto en tiu ĉi komplika periferia aparato, kiu nepre devus havi klare distingeblan

nomon, precipe se oni provas, kiel en la Monato-artikolo, klarigi la funkciadon de komputoro al komencantoj. «94-02-20»

{U1} 681.327.634  
 {T1} KDE  
 {eo1} disk/o-drajv"/o \*a\*1  
 {eo2} disk-aparat/o \*b  
 {eo3} disk/il/o \*c  
 {eo4} disk/et-funkci/ig/il/o \*ĉ  
 {eo5} fleks/eb/a disk/il/o \*d  
 {eo6} fleks/eb/a disk-unu/o \*e  
 {eo7} disk-unu/o \*f  
 {eo8} disk/o-staci/o \*k  
 {eo9} disk-funk\*\*/ig/il/o \*n  
 {eo10} disked\*\*/il/o \*o  
 {eo11} disked\*\*-aparato/o \*a  
 {eo12} disked\*\*-unaj\*\*/o \*a  
 {de1} Laufwerk \*h  
 {de2} Diskettenlaufwerk \*h  
 {de3} Plattenlaufwerk \*h\*j\*j  
 {en1} disk drive \*g  
 {en2} disk unit \*g  
 {fr1} mécanisme d'entraĜnement de disques \*i  
 {fr2} unité de disquettes \*m

Periferia aparato konektebla al aŭ konstruita en komputoro, kun rotaci-mekanismo, lego- kaj registro-kapoj kaj cirkvitaroj. ~o servas por registri dataojn (85/476) sur magnetaj aŭ optikaj diskoj kaj por legi ilin. =85/385 \*a

**Fon:** \*a ej; \*b IK83 p38; \*c IK84/1 p42; \*ĉ IK85/2 p59; \*d IK84/2 p19; \*e IK83 p4; \*f Comp; \*g COMPUT; \*h CHIP; \*i GES/NGI-12; \*j Mikro-comp-Lex; \*j iwt-Wö; \*k mau; \*l PIVS; \*m WP5.1Fr Ini.p6; \*n wor; \*o MON94/2,12;

**85/394** =ApE85 #039, #040

**Rim:** ej: Neologismo ŝajnas al mi preferinda, ĉar "drajvo" utilas por multaj aliaj nocioj. "disko" laŭ BU, KR, WE signifas per numerdisko sur telefon-aparato elekti telefon-abonanton. Do "diskilo" devus esti nun ekzistanta aparato, kiu faciligas tiun elekton. "Disketfunkciigilo" ankaŭ ne taŭgas, ĉar disko neniam funkcias, do oni ne povus funkciigi ĝin. "Unuo" laŭ PIV estas abstrakta aŭ difinita kvanto. "stacio" estas loko, kie haltas publikaj trafikiloj, por ŝargi aŭ malŝargi pasaĝerojn aŭ varojn. En benzinstacio oni provizas sin per benzino, per la nocio de ĉi tiu komplekso oni ne provizas sin per diskoj, tial {eo8} laŭ mi ne trafas. Per ĝi oni ankaŭ ne povus traduki kompleksojn 85/395 kaj 85/396.

W. Prent (WEs 88/9, p.79) opinias, ke "disko-aparato" estus taŭga. Laŭ mi tiu esprimo estas multe tro ĝenerala. Diskoaparato estas ankaŭ gramofono, disko-gurdo (EB 306/8), disko-ŝanĝilo (EB 306/32), disko-turnilo (EB 237/14), codoroma (89/164) legatoro (89/159) kaj multaj aliaj aparatoj, kiuj utiligas diskojn.

Drajvo (85/395) ne ĉiam estas aparato, kiun oni uzas kun diskoj. Gxi povas esti parto de komputora memoro, kiun la programo tiel prezentas

al la centra procesoro, ke tiu ĉi traktas ĝin kvazaŭ ĝi estus diskeda aŭ durdiska aparato. (=85/396)

wor (90-07-19): Mi akordas kun ei pri {eo5,6, 7} kaj malforte pri {eo2,3,4,8}. {eo4-6} estas tro longaj. Pri {eo2,3}: Mi akordas kun ei, ke ili estas ne precizaj. Tamen ili estas laŭ mi ĝustaj kaj uzablaj eksterfakte. Pri {eo3}: temas pri mll de io, kiel "disk/o-uz/il/o" aŭ disk/o-turn/il/o" aŭ {eo4}. Pri {eo4}: Disketo estas artefaritaĵo al kiu uzanto atribuas celon. G<sup>^</sup>i do estas ilo (=tio, kio servas por efektiviĝi ion). Kiam artefaritaĵo aŭ ilo difektiĝas kaj tial ne plu povas plenumi sian celon, oni diras, ke ĝi ne funkcias. Kiam disketo ne estas difekta kaj ja plenumas sian celon, kial oni ne diru, ke ĝi funkcias (=Plenumi la propran difinitan taskon)? Pri {eo9}: Mll de {eo4} sen la balastaĵo "ci". Pri {eo1} (=85/395).

ei (91-08-10): Kvankam PIV atribuas funkciadon al ĝenerale ĉia ilo, mi havas la impreson, ke oni en la vere uzata lingvo ne faras tion. Se mi ekzemple volas fosi per ŝpato, kaj mi konstatas, ke mi ne povus plenumi tiun laboron, ĉar fosota grundo estas tro malmola, mi ne dirus "la ŝpato ne funkcias", sed "ŝpato ne estas utiligebla por tiu ĉi laboro." Mi almenaŭ neniam dirus pri gramofona disko, ke ĝi ne funkcias, se ĝi difektiĝis kaj se pro tio la nadlo restas ĉiam en la sama kanelo. Mi dirus: "La disko ne plu estas uzbla". Sed se la turn-mekanismo ne turnas la diskon, tiam mi ja dirus, ke la gramofono ne funkcias. Analogie diskodrajvo povas funkcii aŭ ne, sed neniam disko. Mi ne opinias, ke ni devus elimini ĉiun balastaĵon. Oni laŭ mia opinio pli facile memoros "funkcii" ol "funkci". Tiu ĉi estus falsa amiko por Germanoj, kiuj opinius, ke temas pri radio-telegrafado.

wor (91-11-11): Se fosota grundo tro malmolas, nur ironie mi povus diri, ke "la ŝpato ne funkcias". Malmoleco de grundo ne estas difekto de ilo, ŝpato. Se, kontraŭe, dum grundo sufiĉe molas, la tranĉa eĝo estas tro ŝirita kaj kurbigita, tiam mi certe diras, ke "La ŝpato ne funkcias". Verŝajne, proponinto de {eo4} ne atribuas la saman nocion al "funkcii", kiel ei. Pli grave: S<sup>^</sup>ajnas al mi nekonsilinde ŝanĝi la vastecon de PIV-a vorto sen aparta Pekoteka registraĵo "korektanta" PIV-on. Plej grave: "funkcii" estas komun-lingva vorto; laŭ mi, PIV-an konstato pri tiesa signifo oni povas dementi nur per pli profunda esploro ol tiu de PIV.

ei (91-12-31): Jen tipa ekzemplo, kiel la denaska lingvo influas. En la Germana mi uzus la el la Franca pruntitan \funktionieren<sup>^</sup> nur, se temus pri pli-malpli komplika aparato, kiu plenumas sian funkcion per kunago de diversaj teknikaj procedoj. Sed en la Angla \to function<sup>^</sup> simple signifas "plenumi specifan agon", tial por Usonano "La ŝpato ne funkcias" ŝajnas esti tute bona frazo. La problemon kaŭzas ne sufiĉe preciza difino en PIV: \Plenumi la propran difinitan taskon, pp organo, maŝino k ĝenerale ĉia ilo aŭ organizo.<sup>^</sup> "...ĉia ilo" subtenus la opinion de wor, sed la poste indikitaj

ekzemploj montras, ke nek ŝpato nek disko estas funkciigeblaj. Laŭ mi la Esperanta difino devus akordiĝi kun la Franca difino: (\IFONCTIONNER Remplir sa fonction; être mis en action: machine qui fonctionne automatiquement<sup>^</sup>). Bv. en la enketilo indiki, la signifon, kiun ni devus atribui al "funkcii (2)".

ei (94-03-03): Post mia akcepto de "diskedo" (85/392) {eo10} eble estas akceptebla, ĉar "diskedo" estas multe pli specifa termino ol la simpla "disko". Tamen mi jam ofte konsilis la kiel eble plej ŝpareman aplikon de la tre vast-signifa "-il/" (89/380). Tial {eo11} aŭ {eo12} ŝajnas al mi preferindaj, se oni nepre volas eviti la terminon {eo1}. «94-03-03»

{U1} 681.327.11  
{T1} KEE  
{eo1} drajv<sup>^</sup>/o \*a\*d  
{de1} Laufwerk \*b\*c  
{en1} drive \*b  
{fr1} répertoire \*e

Parto de komputora sistemo aŭ de ĝia memoro, izolita de aliaj ~oj. Gxi povas esti periferia aparato aŭ mekanismo konstruita en la komputoro mem por manipuli persistanan memoron (85/472). Gxi povas ankaŭ esti per programo apartigita parto de la efemera memoro (85/415). Komputoro povas havi unu, du, tri aŭ pli da ~oj: A--o, B--o, C--o, ktp. Prompto (85/413) vidigas al la komputoranto, ke la komputoro atendas ordonon kaj al kiu ~o ĝi estas konektita. Je ekfunkciigo komputoro estas konektita al la defaŭlta ~o (85/414), kiu kutime estas la A--o, kaj kiun la maprodo (85/403) DOS indikas per: A>. En DOS oni povas ŝanĝi la ~ojn per komando, kiu konsistas el dupunkto post la litero de la dezirata ~o: A:, B:, C:. ~o-specoj: disko--o (85/394) diskeda aŭ durdiska; magnet-bend--o (86/166); ram--o (85/396). \*a Fon: \*a Letriks; \*b Mikro-comp-Lex; \*c iwt-Wö; \*d PIVS; \*e WP5.1Fr-Ini.p6;

### 85/395

Rim: wor (90-07-19) Pri la difino: La donita difino estas miksaĵo de nocioj, difinoj, komentoj, kaj komentoj pri marka normo, kiuj pli konvene trakiĝu aparte unu de la aliaj. Provo al pli bona difino:

Difino: Parto de komputora sistemo aŭ de ties memoro, izolita de aliaj ~oj.

Kom: Subnocioj:

~ [a]: periferia aparato aŭ mekanismo konstruita en la komputoro mem por manipuli neefemeran memoron. Ekz: disko--o (85/394) moldiska aŭ durdiska; magnet-bend--o (86/166).

~ [b]: per programo apartigita parto de la efemera memoro. Ekz: ram--o (85/396).

Kom: Pri ~oj ĝenerale: Komputoro povas havi unu, du, tri aŭ pli da ~oj. Prompto (85/413) vidigas al la komputoranto, ke la komputoro atendas ordonon kaj al kiu ~o ĝi estas (idee) konektita. Je ekfunkciigo komputoro estas (idee) konektita al la

defaŭlta ~o (85/414), kiun oni povas ŝanĝi per komando.

Kom: Pri IBM-a maproda (85/403) normo DOS: La ~oj nomiĝas A~o, B~o, C~o, ktp. La defaŭlta ~o kutime estas A~o. DOS indikas ĝin per: A>, ktp. La komando por ŝanĝi ~on konsistas el dupunkto post la litero de la dezirata ~o: A:, B:, C:.

Mi celis objektivan reformulon kaj mi sentas la rezulton ankoraŭ pliboniginda. Ekz:

1. La difina frazo ne sufiĉe limigas la nocion. Ekz. la elektran draton al la muro oni sendube ne konsideras ~o.

2. La difino entenu ĉiujn karakterizaĵojn, kiujn komune entenas la diversaj subnocioj. Ilin bone konstati postulas kompletan liston de subnocioj. Plibonigo eble entenu la vorton "manipuli".

Pri la nocio:

3. Sxajnas, ke la sola kialo por la nocio ~o estas ke ~[a] kaj ~[b] prezentiĝas same al la uzanto. Se jes, el tiu perspektivo, ~o estas posteno aŭ iluzio, kaj ~o [a] kaj ~o [b] plenumantoj. Gxuste kiel viro kaj virino ne estas hiponimoj de instruisto, tiel ~o [a] kaj ~o [b] ne konsideriĝu subnocioj de ~o. Tiaokaze, la terminoj por ~o [a] (=85/394), (=86/166) kaj ~o [b] (=85/396) ne entenu la vorton "drajvo".

4. Iomete maltrankviligas min, ke nocio pri aĵo, ~[a], kaj nocio pri ties simulaĵo, ~[b], ĉi tie ŝajnas prezentiĝi kiel subnocioj de la sama nocio ~o. Cxu terminologoj ĝenerale akceptas tion en nocio-sistemo? Se jes, ĉu ~[a] kaj ~[b] havas la saman → gradon de abstrakteco (=85/299)?

Pri {eo1}:

5. Mi kredas malkonsilinda la elekton de Angle-devena termino post kontrolo de nur du lingvoj! (a) Kiam ne eblas purisma solvo kaj ne ekzistas Eŭrope internacia formo, tiam ni nepre pli bone kontrolu la plej gravajn ne-Eŭropajn lingvojn. (b) Mi kredas ĝenerale evitinda plian similigon de Esperanto al la Angla.

ei (91-08-10): Mi volonte konsentas, ke la difino estas pliboniginda, kaj mi dankas pro la klopodoj de wor. La problemoj pri tiu nocio-komplekso estas, ke mi ĝis nun vane serĉis en miaj multaj konsult-libroj tradukindan difinon. Mi trovis difinojn por "disko-drajvo", sed ne por drajvo ĝenerale. La nocio estas tiel baza, ke ĝi troviĝas en neniuj glosaro de iom detala instrulibro pri komputado, kaj ankaŭ ne en komputika libro por komencantoj, kiu ĝenerale klarigas, kiel komputoroj funkcias. Eĉ <McGraw>, en kiu mi preskaŭ ĉiam trovis utiligeblajn difinojn, neniel helpis. Tie estis trovebla difino nur por \disk drive\i. Sub \drive\i sole <McGraw> menciis nociojn de tiu termino nur en la kampoj de elektroniko (=ekscito), mekanika inĝenieriko, minado kaj psikologio. Tial mi sentis min devigita, mem krei la difinon. Ankaŭ mia literaturo en aliaj lingvoj ne helpis min. Por la ĝenerala nocio de {en1} la termino {de1} ofte ne taŭgas. En <CE> {en1} estis tradukita per \Antrieb\i, kio estus la

Germana termino por la nocio de "pel-instalaĵo". Ankaŭ la termino {fr1}, kiun mi trovis en la Franc-Kanada versio de Vopo 5.1, kaj kiu signifas tradukita al Esperanto "repertuaro", ŝajnas esti maltrafa termino-elekto. Mi volonte enkondukus radikojn el aliaj lingvoj. Sed komputoroj estas fabrikataj ĉefe en Anglalingvaj landoj, aŭ almenaŭ oni aldonas uzo-instrukciojn preskaŭ nur en la Angla. Ni ne povos atendi, ĝis oni eble en iu lingvo kreos pli konvenajn terminojn. Se ni volas konkuri kun la Angla, niaj terminoj devas esti pretaj tuj, kiam oni bezonas ilin por iu novaĵo. Do ne estas eviteble, ke ni uzos la Anglan kiel font-lingvon por Esperantaj terminoj. Ankaŭ en etnaj lingvoj oni komence uzas Anglajn terminojn, kiuj estas multe pli ĝenaj tie, ĉar Anglaj terminoj devigas la homojn lerni la Anglan prononcon, dum ni en Esperanto povas devigi la homojn prononci niajn terminojn kiel Esperantajn vortojn. Cetere, ĝis nun mi ne trovis etnolingvan tradukon de Angla termino, kiu estus servinta kiel pli taŭga elirbazo por Esperanta termino. Do atendado ne estus helpinta. Ni teoriumu pri tiaj aferoj, tamen ni ne neglektu nian ĉefan taskon: rapide provizi uzeblajn terminojn, por ke ni povu apliki nian lingvon en ĉiuj novaj fakoj. «91-08-10»

{U1} 681.327.11  
{T1} KDD  
{T2} KEG  
{eo1} ram-drajv"/o \*a\*d  
{de1} virtuelles Diskettenlaufwerk n \*c  
{de2} virtuelles Laufwerk n \*c  
{en1} RAM drive \*f  
{en2} electronic drive  
{en3} dynamic drive  
{en4} semidisk \*f  
{en5} virtual disk \*b\*c\*g  
{en6} memory drive \*c  
{en7} RAM disk \*g  
{en8} E-disk \*g  
{en9} emulated disk \*g  
{en10} pseudo disk \*g  
{fr1} diske virtuel \*e

Drajvo (85/395) kreita per programo en la ramo (85/393). ~o rapidigas data-traktadon, ĉar neniuj mekanaj (87/237) funkciadoj kiel en disko-drajvo (85/394) necesas, nur data transigo en la memoro. \*a laŭ \*g

Fon: \*a ei; \*b WP5.1p458; \*c iwt-Wö; \*d PIVS; \*e WP5.1Frp476; \*f PMH; \*g ComGlo;

85/396

Rim: «92-01-05»

{U1} 681.327.2  
{T1} KDD  
{eo1} ram/o <3> \*a\*ĥ  
{eo2} RAM- \*b  
{eo3} operaci/a stor"/o \*c  
{eo4} operativ\*\*/a stor"/o \*ĉ

{eo5} ajn-vic/a stor"/o \*d\*k  
 {eo6} ajn-vic/a memor/o \*a\*k  
 {eo7} konvenci/a memor/o \*a  
 {eo8} set"/ebl/a stor"/o \*q  
 {de1} Randspeicher \*d\*ĵ  
 {de2} Speicher mit wahlfreiem Zugriff \*d\*j  
 {de3} Direktzugriffsspeicher \*ĵ  
 {de4} RAM \*j  
 {de5} Schreib-/Lesespeicher \*j\*ĵ  
 {en1} random-access memory \*g\*h\*i\*ĵ  
 {en2} RAM \*g\*h\*i  
 {en3} random access storage \*i  
 {en4} random access store \*d\*ĵ  
 {en5} read-write memory \*i  
 {en6} direct access storage \*i\*ĵ  
 {en7} conventional memory \*i  
 {fr1} mémoire à accès sélectif \*i  
 {fr2} mémoire à accès direct \*h\*i  
 {fr3} mémoire vive \*h\*i  
 {fr4} mémoire active \*i  
 {fr5} mémoire conventionelle \*m  
 {fr6} RAM \*m  
 {fr7} antémémoire \*m  
 {N11} RAM \*p  
 {N12} interne geheugen \*p

Legebla kaj registrebla memoro en komputoro, en kiu la baza memorero (91/018) kapablas registri unu biton da informo. Larĝaj memoroj estas formitaj kiel dudimensiaj memoreroj. Individua memorero estas identigebla per laŭvicaj kaj laŭkolumnaj adresoj, kiuj estas derivitaj per malkodigo de adresvorto provizita de la uzanto. En ~o ĉiu memorero estas sendependa de la aliaj memoreroj kaj povas esti alirata en iu ajn sinsekvo dum sama tempoperiodo, tial la nomo: "random access" = ajnvica. ~o estas kutime efemera memoro (85/415) kaj uzata por dumtempa enmemorigo de dataoj (85/476) aŭ programoj. \*a laŭ \*g.

**Fon:** \*a ej; \*b IK83 p41; \*c IK85/2 p23; \*ĉ IK84/3, p15; \*d KKV; \*e Comp; \*f KTB; \*g COMPUT; \*h GS1; \*ĥ PIVS; \*i GES/NGI-12; \*j Mikro-comp-Lex; \*ĵ iwt-Wö; \*k pok; \*l WP5.1p455; \*m WP5.1Fr.p475; \*p DOS-hl; \*q wor;

**85/397 =ApE85 #041**

**Rim:** ej (89/12/10): =86/140, 86/187. Laŭ \*i {en1} kaj {en5} estas sinonimoj, tamen oni uzas diversajn terminojn por substreki diversajn ecojn de la sama objekto.

wor (90-07-19): {en1-4} estas misnomoj en la Angla, ĉar ankaŭ ROM estas ajnvica. Tial al mi ŝajnas malkonsilindaj {eo5,6} por la nuna nocio. {eo5,6} konvenas por la supernocio de RAM kaj ROM. Manke de referenco al registraĵo pri "operativa" aŭ "operat-", {eo4} estas laŭ mi evitinda. Gxi ŝajnas paronimo de "operacio", do denove evitinda. La fina parto "-iv" estas aŭ balastajao aŭ sufikso. Balastajaoj ne estas enkondukindaj -- paronimo eĉ malpli. Gxis kiam ni trovos plene kontentigan solvon {eo2} ŝajnas taŭga provizoraĵo. Pri {eo8} =85/451. «91-08-10»

{U1} 681.322.25 (+)  
 {T1} KDG  
 {eo1} rigid/aj/ar/o \*a  
 {eo2} hardvar/o (1) \*b\*c  
 {eo3} aparat/ar/o \*b\*ĉ\*d  
 {eo4} maŝin-var/o \*f  
 {eo5} il-var/o \*g  
 {eo6} hard\*\*/o \*ĥ  
 {eo7} hardv\*\*/o \*h  
 {eo8} aparat/aĵ/o \*ĝ  
 {eo9} mal'mol/aĵ/o \*l  
 {eo10} durv\*\*/o \*k  
 {de1} Hardware \*j  
 {de2} materielle Ware \*ĉ  
 {en1} hardware \*e\*i  
 {fr1} matériel \*e\*i  
 {N11} hardware \*k

La materia parto de komputora sistemo, inkluzive de a) elektroj, b) elektronikaj, c) elektromekanikaj kaj ĉ) mekanaj konstru-elementoj. Ekzemploj: por a): ŝaltiloj; por b): icoj (85/410), monitoroj (85/416); por c): diskodrajvoj (85/394); por ĉ): komputora kesto. (=85/399) \*h

**Fon:** \*a hal en AkSt.85 p316; \*b Comp; \*c PIV; \*ĉ KBT; \*d KKV; \*e GS1; \*f al en letero al ej (86-06-20); \*g al en letero al ej (86-07-24) kaj en cirkulero 153 de la Akademio; \*ĝ bcu; \*h ej; \*ĥ tau; \*i GES/NGI-12; \*j Mikro-comp-Lex; \*k wor; \*l ton en publika diskuto dum Esperantologio-konferenco 1990;

**85/398 =ApE85 #042**

**Rim:** ej: Mia difino estis tradukita laŭ diversaj Anglalingvaj verkoj. Gxi estas pli preciza ol tiu de \*ĉ: IĈxiuj teknikaj partoj de komputilo, ĉar sub ~o oni komprenas ne nur "teknikajn partojn", sed ankaŭ kompletajn aparatojn, ekz-e la komputoron mem, aŭ aparatojn konektotajn al komputoro, ekz. printatoron, monitoron, modemon. PIV difinas pli trafe (bedaŭrinde - ĉar "hard/" ne estas Esperanta prefikso - sub la radiko "var"): \IKonvencia nomo por montri ĉiujn fizikajn elementojn de informadika sistemo, komputero ks.\i

Pure Esperanta termino ŝajnas al mi preferinda al la ĝis nun kutime uzata tro Anglisma "hardvaro" <Comp, PIV>. Tamen ankaŭ {eo1} ne ŝajnas al mi kontentiga, ĉar ne ĉiu ~o estas rigida. Moldiskoj, konekto-kabloj kaj multaj aliaj partoj de komputora sistemo estas flekseblaj. {eo3} ne sufiĉe precize priskribas la enhavon de la nocio, ĉar simplajn konstru-elementojn ni ne nomas "aparato". En <Comp> troviĝas krome "materialo" kaj "ilaro" kiel eblaj tradukoj por la Angla termino. Ambaŭ certe ne taŭgas, precipe ĉar en <Comp> oni uzas la sufikson -il- por indiki ankaŭ programon. Do "ilaro" estus interpretebla ankaŭ kiel "programaro"!

Ankaŭ la proponoj de al ({eo4}, {eo5}) laŭ mi ne taŭgas. Mia difino klarigas, ke temas nek pri maŝinoj nek pri iloj.

bcu: Eĉ unu ŝraŭbo povas esti "hardware",

sed tio estas "aĵo" kaj ne "aro"; tiu termino havas amas-karakteron, almenaŭ en la angla. Do mi proponas {eo8} anstataŭ {eo3}.

ei: {eo6} estis rekomendita al mi de s-ro Taurat, kiam mi vizitis Berlinon en 1987. Por la mala nocio li uzis "softo". Mi uzis tiun terminon kelkfoje, sed ankaŭ ĝi ne kontentigis min, ĉar ĝi mise pensigas pri iu hardeco. Mi nun preferas la terminon {eo7}, laŭ kiu oni analogie povas formi la terminojn: softvo (85/399), ŝarvo (89/074), firmvo (89/087), frivo (89/112), komvo (89/165), grupvo (89/181), kiuj sufiĉe similas al la Anglalingvaj originaloj kaj tial estas facile memorigeblaj, sed kiuj tamen ne impresas kiel Anglismoj kaj kaj ankaŭ ne havas la malavantaĝojn de la aliaj proponoj. Mi tial rekomendas, provu tiujn ĉi terminojn. Sed estu selektema kelkfoje {eo3} povas esti pli taŭga, ĉar ne tiel ĝenerala kiel {eo7}: \Ni ankoraŭ ne finis nian transloĝigon, sed ni jam movis la aparataron. \i

ei: (90-08-30) Pri {eo9} vidu Rim. en 85/399.

wor (90-07-19): {eo10} estas pli klara, pli sinmotiva, pli purisma k malpli Anglisma ol formoj kun "hard". Gxi evitas pensigon pri hardeco kaj havas la avantaĝojn de la v-familio de ei (hardvo, ŝarvo, ktp). Laŭ mi ĝi estas pli klara kaj pli facile prononcebla ol "hardvo".

wor (91-11-11): Starigo de la v-familio egalas starigi terminon -v\*\*/o kiel teĥnika termino en la fako komputiko. G^ia signifo: 'aĵo aŭ afero, kiu, laŭ koncerna difino, manifestas koncernan econ (de flank-elemento).

ei (91-12-31): Ne ĉiu "hardvo" estas "dura" (ekz-e konekto-kablo). Laŭ mi "-v\*\*/" neniam povas fariĝi vera sufikso, ĉar forpreninte la literon, oni ne ĉiam ricevas Esperantan radikon. Gxi do estas nur radik-fina konsonanto, kiu en fako komputiko indikas grupon da programoj aŭ materiaĵoj. Jxus mi trovis pliajn tiajn terminojn en la Angla: \businessware, gameware, learningware, homeware\i <PC-Comp92/1,p140>, kiujn ni povus traduki per "negocvo, ludvo, lernvo kaj hejmvo". «91-12-31»

{U1} 681.3.06  
 {T1} KEE  
 {eo1} supl/aj/ar/o \*a  
 {eo2} softvar/o (1) \*b\*c  
 {eo3} program/ar/o \*b\*d\*e  
 {eo4} program-var/o \*f  
 {eo5} mens-var/o \*g  
 {eo6} soft\*\*/o \*ĥ  
 {eo7} softv\*\*/o \*ĉ  
 {eo8} program/aj/o \*ĝ  
 {eo9} mol/aj/o \*l  
 {eo10} farv\*\*/o \*ĵ  
 {de1} Software \*j  
 {de2} immaterielle Ware \*d  
 {en1} software \*h\*i  
 {fr1} périologie \*d

{fr2} logiciel \*h\*i  
 {N11} software \*k

Gxenerala termino por tiuj partoj de komputora sistemo, kiuj ne estas palpeblaj aŭ materiaj, sed kiuj tamen povas esti vendataj pere de palpeblaj diskoj aŭ bendoj. La termino estas plej ofte uzata por programoj kontraste al 85/398. Kvankam la nocio de ĉi tiu komplekso kutime estas komerce havebla ~o, oni komprenas sub ĝi ne nur funkci-pretajn sed ankaŭ nur sur papero ellaboritajn programojn. Oni distingas inter sistema ~o, la programaro bezonata por ebligi la uzadon de komputora sistemo, kaj aplika ~o aŭ aplik-programoj, kiuj plenumas taskojn utilajn al la finuzanto. \*ĉ

Fon: \*a hal en AkSt.85 p316; \*b Comp; \*c PIV; \*ĉ ei; \*d KBT; \*e KKV; \*f al en letero al ei 86-06-19; \*g al en letero al ei 86-07-24 kaj en Cirk 153 de la Akademio; \*ĝ bcu; \*h GS1; \*ĥ tau; \*i GES/NGI-12; \*j Mikro-comp-Lex; \*ĵ wor; \*k MMC; \*l ton en publika diskuto dum Esperantologio-konferenco

1990; **85/399** =ApE85 #043

Rim: ei: PIV difinas sub "var/o": \i "soft~o: Konvencia nomo por montri la tuton de la programoj necesaj por utiligi informadkan sistemon, komputeron ks (=interelektroniko)\i.

KBT difinas: \i Cxiuj programoj por la komputilo konsistantaj el la funkciadsistemoj kaj la programoj uzeblaj por ĝeneralaj problemoj.\i Tamen {eo3} ŝajnas al mi iom tro ĝenerala termino, ĉar iun ajn aron da programoj ni nomas "programaro".

hal difinas sian terminon en AkSt85: \iSxanĝataj, plejparte ne metalaj, partoj de elektronika instalaĵo; akcesoraĵoj de komputoro; programaro. Ekzemple, se magnetofono estas rigidaĵo, la kasedo aŭ bendo, kiun oni metas en ĝin, estas suplaĵo.\i Tiu difino korekte atentigas pri tio, ke oni uzas la vorton "software" en la Angla ne nur sur la kampo de komputoriko, sed en la elektronika industrio ĝenerale. Oni ekz-e malrekomendis la aĉeton de tipo da videomagnetofonoj, ĉar por ili ne estas havebla sufiĉe da "software". En la difino de hal estas i.a.malguste, ke kasedo aŭ bendo estas suplaĵo. La bendo kaj la kasedo mem estas (laŭ hal) "rigidaĵo", nur la sur la rigidaĵo registritaj programoj estas "suplaĵo".

{eo4} ŝajnas al mi pli trafa ol {eo5}, ĉar ankaŭ maŝinoj kaj iloj estas produkto de mensa laboro. Sed kiel ni nomu la aliajn ankoraŭ ne tradukitajn komputikajn terminojn kun "ware" je la fino? Ekz. "firmware" (programoj neforviŝeble registritaj), "shareware" (programoj por ŝari (89/021), kiujn ĉiu rajtas kopii kaj libere uzi kaj por kiuj oni libervole pagu por registriĝo al la program-aŭtoro)? Diskutinda ŝajnas al mi, ĉu ni naturisme nomu ilin softvar/o, hardvar/o, firmvar/o kaj ŝarvar/o (kiel kompletaj radikoj + finaĵo) aŭ ĉu ni kreu ilin per kunmeto kun la vorto "varo", aŭ ĉu ni kreu el Esperantaj radikoj tute novajn terminojn. Pli facile memorigeblaj estas verŝajne la naturismaj

neologismoj, kaj tial mi pledus por ili, sed ili ja malplaĉas al Esperantistoj, kiuj unue renkontas ilin, pro ilia evidenta Anglalingva deveno. En KBT oni donis kiel Germanan tradukon "immaterielle Ware", kiu sendube korekte esprimas la sencon de la nocio, tamen, kvankam mi abonis por tuta jaro la Germanan fakrevuon "Chip", mi legis en ĝi nur la terminon "Software". Evidente tiu termino ŝajnis pli taŭga al la artikol-verkintoj kaj anoncintoj. Mi tial ne mirus, se ankaŭ en nia lingvo "softvaro" kaj "hardvaro" venkus. Tio certe okazos, se ne iu povos proponi pli taŭgajn terminojn.

bcu: Eĉ unu linio de kodaĵo estas "software", sed tio estas "aĵo" kaj ne "aro". Vidu miajn komentojn pri 85/398. Mi preferus eviti la radikon "varo", ĉar oni ofte produktas tion ne por vendi.

ej: Mi konsentas kun bcu pri evitado de la radiko var', tamen mi hezitas apliki la sufikson -aj/ por ĉi tiuj du nocioj: aparato jam estas io konkreta, kiel aj/ povus fari ĝin ankoraŭ pli konkreta? Se unu linio da kodaĵo same kiel kompleksega programaro estas "software", kial la konkreta sufikso -aj/ indiku tion? La ĝeneraleco de la nocioj 85/398 kaj 399 malfaciligas al ni apliki iun el niaj nunaj sufiksoj.

ej (1989-12-01): La terminoj de tau (softo kaj hardo) donis al mi la ideon krei {eo7}. Legu pri tio en 85/398.

ei: (90-08-30) ton esprimis la opinion, ke {eo9} kaj "malmolaĵo" taŭgus por nocioj 85/398 kaj 85/399. Mi opinias, ke tiuj terminoj estas tro ĝeneralaj por indiki tiujn ĉi tre specifajn nociojn. "Molaĵo" povus esti iu ajn objekto, ekz-e spongo, kato, viandopeco, ŝlimo, ĵeleo. Atribui terminon kun tiel ĝenerala nocio al la nocio de "programo aŭ programaro" laŭ mia sento devas kaŭzi konfuzon. Krome la nocio de 85/398 konsistas ofte el molaj objektoj (moldisko, konektilaro). Estus konfuzige atribui al tiuj objektoj la terminon "malmolaĵo", ĉar tio ĉi laŭ mia kompreno estas iu ajn malmola objekto, ekz-e ŝtono, koralo, ŝtalo, diamanto. La termino-proponojn de ton mi ĝis nun nenie renkontis en nia faka literaturo, kaj mi certe ne rekomendas ilin. wor (90-07-19): Bv legi miajn komentojn en 85/398, kiuj plejparte validas ankaŭ ĉi tie. La termino {eo10} esprimu esencon kaj estu bela paro kun tiu de 85/398. Flanke, pri {de2}: Estus interese scii, ĉu oni sentas la malsukceson rezulto de ĝia longeco kompare kun {de1}? Pri {en1}: Dum televida intervjuo la ĉefministro de Singapuro parolante pri triamonda evoluigo uzis la vortojn "hardware" kaj "software" por fabrikoj, vojoj, telefonoj unuflanke kaj eduko kaj kutimoj aliflanke.

ei (91-08-10): La propono de wor "durvo" por \hardware\i plaĉis al mi, sed al mi ŝajnas, ke ĝi ne formas belan paron kun "farvo". Analogie al durdisko/moldisko ni devus diri "molvo". Sed ĉu ni per tio ne tro distancigu de la originaj terminoj? Mi

opinias, ke "hardvo" kaj "softvo" estas multe pli facile memorigeblaj. Gxuste ĉar \hardware\i kaj \software\i nun estas aplikataj ne nur en la kampo de informado-sciencoj (88/011), ni bezonas trafajn terminojn en nia lingvo por tiuj nocioj. Mi petas pensu pri ĉiuj argumentoj kaj proponoj kaj indiku viajn preferojn, por ke niaj rekomendoj baziĝu sur firma grundo. «93-11-13»

14

{U1} 001.411.4 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} klasif\*\*/it/a noci/o-sistem/o \*b  
 {eo2} klasifik/o \*b\*ĉ  
 {eo3} klas/it/a noci/o-sistem/o \*c  
 {eo4} klasif\*\*/o \*c  
 {de1} klassifiziertes Begriffssystem \*a  
 {de2} Klassifikation \*a  
 {en1} classified system of concepts \*a  
 {en2} classification \*a  
 {fr1} ensemble classifié de notions \*a  
 {fr2} classification \*a

Nocio-sistemo (85/295), kies strukturo estas specifita. Ekzemploj: \la klasifiko de plantoj; la Universala Decimale Klasifiko (UDK).i \*b laŭ \*a  
 Fon: \*a R1087; \*b ei; \*c pok; \*ĉ PIV;

**85/300 =ApD5.11 #562-566**

Rim: ei: Mi opinias, ke utilus distingi inter "klasifiko" (= kompleksa strukturita nocio-sistemo) kaj simpla "klasifo". Se mi ordigas librojn en privata aŭ kluba biblioteko, aŭ por la libro-katalogo de UEA, tiam mi klasifas ilin (Butler verkis libron kun la titolo "Klasifo de Esperantaj temoj"), sed se mi atribuas al ili la UDK-nomojn, tiam mi klasifikas ilin. Same oni povus en Esperanto distingi inter klasifado kaj klasifikado de plantoj.

pok: (en let al ej (87-04-29): klasifi ! klasi; klasifiki ! klasifi; klasifita nocio-sistemo ! klasifa nocio-sistemo (afero de belgusto, apenaŭ motivebla).

wor (90-07-19): La celoj de ĉi tiu rimarkigo estas du: 1. Bremsi emon fari nemotivitan rompon kun nia tradicia lingvo. 2. Esplori kiaj ekzistas motivoj por ŝanĝoj bazitaj ne precipe sur gustoj.

Konstatoj:

1. Temas pri du nociaroj neŭtrale nomeblaj "1" kaj "2". Nociaro 1 prias ordigojn sen referenco al ia jam ekzistanta ~o. Nociaro 2 prias la atribudadon el jama ~o al fenomenaro.

2. Produkto nokia de la ago de nociaro 1 estas kreo de ~o. Jaman tian produkton postulas nociaro 2. Tial iu termino ~o emfazas rilaton kun nociaro 1 kaj para alia emfazas rilaton kun nociaro 2.

3. Ambaŭ nociaroj ampleksas plurajn nociojn. Krom baza nocio, "klaso", traktindas: ago (kp. kisi), agado-nomo (kp. kisado), fakto aŭ ago kiel tuto (kp. kiso), rezulto (kp. kisitulo) kaj

produkto (kp. intimo).

4. La proponoj kompariĝas jene: (interkrampe aperas konjektoj.) (MI: n-s -- nocio-sistemo; tr -- transitiva verbo; ad -- agado-nomo; -o -- fakto; it -- rezulto; np -- nokia produkto.)

Tradicio:	Proponoj:	
PIV	Eo1+2	
Eo3+4 (eĵ<1>)	(pok, eĵ<2>)	
Baza nocio:	klaso	klaso
Terminaro por Nociaro 1 (sen antaŭa sistemo):	klasi,	klasifi
tr	enklasigi	klasi
ad	klasado	klasifado
klasado		
-o	--, enklasigo	klasifo
truo]		-- [= 1a
it	(klasitaĵo)	(klasifitaĵo),
(klasitaĵo)		

Produkto nokia de la ago de nociaro 1 -- 85/300:

np	(klasita n-s)	klasifita n-s	klasita
n-s,	{eo3}	{eo1}	{eo3}
	klasifiko	klasifiko	klasifo
	{eo2}	{Eo2}	{eo4}

Terminaro por Nociaro 2 (per antaŭa sistemo):

tr	klasifiki	klasifiki	klasifi
ad	klasifikado	klasifikado	
klasifado			
-o	--	--	--
	-- [= 2a truo]		
it	(klasifikitaĵo)	(klasifikitaĵo)	(klasifitaĵo)

5. La PIV-a terminaro havas du "truojn"; ne eblas nomi la simplajn agojn tutajn (kp. kiso), ĉar "klaso" kaj "klasifiko" estas ali-sence okupataj. PIV aludas pansaĵon ("enklasigo") por la 1-a truo. Sed por la 2-a truo oni devas kontentiĝi je "klasifikado".

6. eĵ<1> por nociaro 2 kaj parte por ~o ("klasifiko") uzas la PIV-ajn terminojn. Estas malavantaĝo, ke la 2-a truo restas vaka.

Por nociaro 1 eĵ<1> uzas ne-PIV-an stamon: "klasif". Tio havas la avantaĝon ŝtopi la 1-an truon; eblas: "la Butlera klasifiko de temoj" por "la Butlera ago klasifi la temojn". PIV-e eblis nur "la Butlera enklasigo de temoj". (Nekonante la verkon de Butler mi atentis nur la komenton de eĵ.)

7. pok&eĵ<2> reiras al la PIV-a nociaro 1.

Por nociaro 2 kaj por ~ foriĝas la balasta sufikso "-ik". Ak kun eĵ, ke tio estas avantaĝa (laŭ la laŭmode strikta difino pri "-ik"). Estas malavantaĝo, ke denove estas du truoj.

Aliaj Problemoj:

1. La sona diferenco inter la terminoj por la 2 nociaroj duoniĝas (de la tradicia dusilaba "ifik") al nur unu silabo: "-ik" ĉe eĵ<1> kaj "-if" ĉe pok&eĵ<2>. Nek "-ik" nek "-if" havas en Esperanto signifon kaj akceptitan kaj laŭcelan. Mi inklinas pensi, ke tia duoniĝo malfaciligus la lernadon kaj uzon. La terminoj proksimiĝas esti paronimoj.

2. La PIV-aj terminoj por 85/300 sedube estus Eo3+2. Tio ĝis nun en 85/300 estis senreliefa! Ni neniam elektu sen klare prezenti kaj kompari la tradiciajn formojn kaj sistemon.

3. Oni rekonas simile bonaj la du proponojn, Eo1+2 kaj Eo3+4. Sed tio, dum unu kongruas kun PIV-aj terminoj por nociaro 2 kaj la alia kun PIV-aj terminoj por nociaro 1! Por kio do oni volas fari ŝanĝon?

4. Mi ne komprenas, kial ni voĉdonu surbaze precipe de plaĉo kaj gusto. Kvazaŭ Esperanto ne havas tradicion kaj ne havas PIV-on!

Oportunoj kaj Sugestoj:

Mi vidas du sufiĉe motiveblajn solvojn:

1. Resti ĉe la PIV-aj terminoj. Avantaĝoj: a) tradicio; b) longeco de la sona diferenco, kiu faciligas memori kiu estas kiu; c) ŝparo de nia energio por pli gravaj aferoj. Malavantaĝoj: a) truoj kie estu ago-nomo en la terminaroj; b) uzo de sendifina "-if" kaj uzo de ne laŭmoda "ik".

2. Restante ĉe la PIV-a solvo por nociaro 1 (Avantaĝo: tradicio. Malavantaĝo: truo (ŝtopebla per "enklasigo").), Esperantigi la terminojn de nociaro 2. T.e., fortranĉi (aŭ redifini) la sufikson "ik" kies laŭmoda signifo apenaŭ taŭgas, kaj fortranĉi (aŭ difini) la sufikson "if". Se ni fortranĉus kaj "ik" kaj "if"-on, ni povas anstataŭigi ilin per io jam difinita.

Ebla tia propono: Logika kandidato estas la sufikso "-iz". Eta vastigo de ties signifo <1> allasus la sencon: "apliko (aŭ atribuo) de jam ekzistantaj nocioj". PIV jam, spite al ĝia propra analizo, faras tion per "karaktarizi". Terminoj tiaj estus:

Klarigo Termino

Produkto de Nociaro 1:

~  
klas/ita noci/o-sistem/o  
~  
klas/iz/a noci/o-sistem/o  
~  
klas/iz/o-sistem/o

Nociaro 2:

ago klas/iz/i  
agado  
klas/iz/ad/o  
nomo de agotuto klas/iz/o  
rezulto klas/iz/it/aj/o

Avantaĝoj: 1. forigo de ĉiuj sendifinaj balastaĵoj (if, ik); 2. Uzo de la difino-hava sufikso ("iz"), 2a) kio kongruas la spiriton de Esperanto, 2b) kaj faciligas memori kiu vorto estas kiu; 3. pro la verbeco de "iz", konservo de "klasizo" por la simpla ago tiel ŝtopante la duan truon. Malavantaĝo: nova uzo de morta sufikso emas ŝoki.

Aliaj ŝanĝoj konjekteblas, sed eble ne egale facile motiveblas.

eĵ (92-11-18): Komuniku viajn preferojn respondante la enketilon (p.1675, #562-566)

«93-11-13»

15

{U1} 001.411.4 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} desegn/a prezent/o de klasifik/o \*b  
 {eo2} desegn/a prezent/o de klasif\*\*/o \*c  
 {eo3} grafik/a prezent/o de klasif\*\*/o \*ĉ  
 {eo4} arb/a prezent/o de klasifik/o \*d  
 {de1} grafische Darstellung  
 einer Klassifikation \*a  
 {en1} graphical representation  
 of a classification \*a  
 {fr1} représentation graphique d'une  
 classification \*a

Tabelo de nocioj (85/288), kiu formas nocio-sistemon (85/295), en kiu la interrilatoj inter la nocioj estas montrataj per piramidsimila aranĝo (= per genealogia arbo). \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei; \*c pok; \*ĉ go; \*d wor;

**85/301** =ApE85 #012

Rim: ei: Pri {eo1} aŭ {eo2} =85/300. Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53.

wor (90-07-19): Pli konsekvenca ol {eo2} estas {eo3}, ĉar (sen metaforo) la prezento ne desegnas. Pli klara ol ambaŭ estas {eo4}. Mi sentas la vorton "tabelo" en la difino neoportuna, ĉar ĝi pensigas pri la ne-arba (ne-piramidsimila) ŝak-tabula aranĝo de la tabel-vortoj -- sed mi ne trovas klaran subtenon por tiu sento en PIV.

«93-11-13»

16

{U1} 001.411.4 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} klas/it/a noci/o-list/o \*b  
 {eo2} sistem/a list/o de noci/oj \*b  
 {eo3} ŝtup/a list/o de noci/oj \*c  
 {de1} Begriffsverzeichnis \*a  
 {en1} schedule of concepts \*a  
 {fr1} liste systématique de notions \*a

Listo de nocioj (85/288), kiuj formas nocio-sistemon (85/295), en kiu la interrilatoj inter la nocioj estas montrataj per lineara sinsekvo kombinita per laŭŝtupa aranĝo, kiu utiligas diversajn tipografiajn litertipojn aŭ notacion. \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei; \*c wor;

**85/302** =ApE85 #013

Rim: ei: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53.

wor (90-07-19): La signifon de la vorto "sistemo" precizigas la resto de la termino {eo2}. Ju pli la komponantaj vortoj (kiel "sistema") ricevas signifon de la tuta termino (kiel {eo2}), des pli tiu tuta termino ŝajnas lernenda kvazaŭ aparta vorto. Kaj des malpli la tuta termino sin motivas.

Metaforaj vortoj, kiuj komparas konkretaĵojn ("ŝtupa") igas la uzadon pli flua kaj tuje klara. «93-11-13»

17

{U1} 001.411.4 (+)  
 {T1} RBN

{eo1} fak/o (2) de scio \*c EVIT \*ĉ  
 {eo2} stud-objekt/o \*b  
 {eo3} stud-kamp/o \*b  
 {eo4} stud-teren/o \*ĉ  
 {eo5} stud-sfer/o \*ĉ  
 {de1} Wissensgebiet \*a  
 {en1} field (of knowledge) \*a  
 {en2} subject (field) \*a  
 {fr1} domaine (du savoir) \*a

Specialigita ago-sfero de homa

menso.

∩ Ekzemploj:∩ Iu branĉo de scienco; la labor-metodo de iu aparta profesio. \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei; \*c PIV (2); \*ĉ go;

**85/303** =ApE85 #014

Rim: ei: Tiu ĉi nocio estas simile difinita en ISO/N53: =[86/002].

go: {eo1} ne estas rekomendinda, ĉar "fako" = A. ∩branch∩i, ne ∩field∩i.

wor (90-07-19): Kongrue al PIV ak go pri la signifo de "fako". La diferenco inter "fako" kaj "kampo" estas perspektiva. La difino supra taŭgas (sed ne sufiĉas) kaj por "fako" (branĉo) kaj por "kampo". Por klare difini la du nociojn oni bezonas kontrastajn difinojn kaj ekzemplojn:

kampo <5>: Tutajo de la aferoj pri iu temo, kiujn povas atingi ies agado.

fako <2\*>: Aparta dividaĵo de kampo; subkampo.

En la ekzemploj la vorto "de" en grupo K havas sencon malsaman ol havas la vorto "de" en grupo F:

Grupo K

kampo de la praktiko = kampo Praktiko;  
 kampo de E-sta diskutado = kampo E. Diskutado;  
 kampo de la historio = kampo Historio;  
 kampo de ĥemio = kampo Hxemio.

Grupo F

fako de ĥemio estas fako Bioĥemio;  
 fako de historio estas fako Antikva Historio;  
 fako de scienco estas fako Hxemio;  
 fako de scio estas fako Arto.

En grupo K temas pri konsisto (La kompo de ĥemio konsistas el ĥemio; PAG 133C.e), dum en grupo F temas pri posedo (Fakon de ĥemio (ekz, bioĥemio) posedas ĥemio; PAG 133A.c). Interkrampe estas ekzemplaj propra-nomaj ekvivalentoj (PAG 133 Rim III).

Sxajnas al mi, ke la esenco de la diferenco inter la signifoj de "kampo" kaj "fako" kuŝas en tio, ke ili funkciigas malsamajn signifojn de la vorto "de".

=93/003 [94-02-26]

18

{U1} 001.411.1 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} kamp-specif/a noci/o (en difinita stud-kampo) \*b

{eo2} speci/a noci/o (en difinita sfero) \*c  
 {de1} spezieller Begriff (in einem bestimmten Wissensgebiet) \*a  
 {en1} specific concept (in a given field) \*a  
 {fr1} notion propre (au domaine en question) \*a  
 Nocio (85/288) apartenanta ĉefe al unu stud-kampo (85/303). Ekzemploj: \En aŭtomobila inĝeriko (89/052) la nocioj "aŭtomobilo" kaj "limuzino".\i. \*b laŭ \*a  
Fon: \*a R1087; \*b ej; \*c go;

**85/304** =ApE85 #015

Rim: ej: Tre simile difinita en ISO/N53: =86/005.  
 {eo2} Estas miskomprenebla kiel nocio rilatanta al botanika aŭ zoologia specio. «93-11-13»  
 19

{U1} 001.411.1 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} prunt/e-pren/it/a noci/o \*b  
 {eo2} prunt-noci/o \*c  
 {de1} geliehener Begriff \*a  
 {en1} borrowed concept \*a  
 {fr1} notion empruntée \*a  
 Nocio (85/288) ofte uzata en difinita stud-kampo (85/303), sed apartenanta ĉefe al alia fako. Ekzemploj: \En aŭtomobila inĝeriko (89/052) la nocioj "lubrikiga oleo", "fuelo" kaj "ŝafto".\i \*b laŭ \*a  
Fon: \*a R1087; \*b ej; \*c wor;

**85/305** =ApE85 #016

Rim: ej: Preskaŭ sama difino en ISO/N53: =86/006.  
 «93-11-13»  
 20

{U1} 001.411.1 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} noci/o trans difin/it/a sfer/o \*c  
 {eo2} noci/o super/ant/a difin/it/an stud-kamp/on \*b  
 {eo3} super'kamp/a noci/o \*ĉ  
 {de1} über das Wissensgebiet hinausreichender Begriff \*a  
 {en1} concept exceeding the given field \*a  
 {fr1} notion dépassant le domaine \*a  
 Nocio (85/288) apartenanta al pli larĝa stud-kampo (85/303), de kiu donita stud-objekto formas parton. Ekzemplo: \En aŭtomobila inĝeriko (89/052) la nocio "rado".\i. \*b laŭ \*a  
Fon: \*a R1087; \*b ej; \*c go; \*ĉ wor;

**85/306** =ApE85 #017

Rim: ej: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53.  
wor (1990-07-19): {eo1} laŭ mi taŭgas al ia supernocio de {eo3}. «93-11-13»  
 2.1.3 Tipoj de karakterizaĵoj (n-roj 21 ĝis 25)  
 21

{U1} 001.411.5 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} intrinsek\*\*/a karakteriz/aj/o \*b EVIT \*b  
 {eo2} esenc/e propr/a karakteriz/aj/o \*b

{eo3} intrins\*\*/a karakteriz/aj/o \*c\*b  
 {eo4} en/o-pri/a karakteriz/aj/o \*c  
 {eo5} en/o-tem/a karakteriz/aj/o \*c  
 {de1} inhärentes Merkmal \*a  
 {en1} intrinsic characteristic \*a  
 {en2} inherent characteristic \*a  
 {fr1} caractère intrinsèque \*a  
 {fr2} caractère inhérent \*a  
 Karakterizaĵo (85/289) apartenanta al objekto mem kaj ne al ĝiaj rilatoj al aliaj objektoj. \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ej; \*c wor;

**85/307** =ApE85 #018

Rim: ej: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53.  
wor (90-07-19): A. Sxajnas al mi malkonsilinde bonvenigi balastaĵon "-ek": 1. Se "-ik" estas ĝenerale evitinda pro ebla konfuzo kun tekniko, "-ek" estas simile evitinda pro ebla konfuzo kun speco de rapideco. Depende de la resto de la vorto, eble pli evitinda; 2. Cele al tio, ke Esperanto estu facila, ni kutime strebas, ke ĝiaj vortoj estu kiom eble plej antaŭkonjekteblaj. Se lasi flanke teknikojn, se la vortoj, kiuj en Eŭropaj lingvoj finiĝas per "-ic", montriĝas en Esperanto jen stumpaj (En. \sonic\i -->"sona") kaj jen finiĝantaj per "-ek" tio estas malfacilaĵo. 3. Nuna akcepto de {eo1} simple rezultigos laŭ mi, ke iam poste oni stumpigos ĝin. B. {eo2} havas unuavidan allogon, sed mi ne sukcesis ricevi de ĝi la difinitan signifon surbaze de nia gramatiko kun la PIV-aj difinoj de la apartaj vortoj (t.e. klaran → rezultan signifon (85/370)), kio implicas, ke ĝi estus aparte lernenda kiel nova radiko aŭ idiomaĵo. C. Kiel purisma paro kion pri "eno-pria karakterizaĵo" kaj "ekstero-pria karakterizaĵo"?

ej (91-08-09): Mi markis mian unuan proponon EVIT. Je ĝi malplaĉis al mi ĉefe, ke oni povus esti misgvidata pensi pri iu seka afero. {eo3} nun ŝajnas al mi preferinda, sed {eo2} eblus, se iu volas nepre eviti neologismon. La signifo de {eo4} kaj {eo5} por mi ne estus divenebla. «93-11-13»  
 22

{U1} 001.411.5 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} ekstrinsek\*\*/a karakteriz/aj/o \*b EVIT \*b  
 {eo2} ne esenc/e propr/a karakteriz/aj/o \*b  
 {eo3} ekstrins\*\*/a karakteriz/aj/o \*c\*b  
 {eo4} ekster/o-pri/a karakteriz/aj/o \*c  
 {eo5} ekster/o-tem/a karakteriz/aj/o \*c  
 {de1} nicht weseneigenes Merkmal \*a  
 {en1} extrinsic characteristic \*a  
 {fr1} caractère extrinsèque \*a  
 Karakterizaĵo (85/289) de objekto nur pro ties rilatoj al aliaj objektoj. Oftaj tipoj de □oj estas la → karakterizaĵo de origino (85/309) kaj la → karakterizaĵo de celo (85/310). \*b laŭ \*a  
Fon: \*a R1087; \*b ej; \*c wor;

**85/308** =ApE85 #019

Rim: ej (88-12-16): Tiu ĉi nocio ne troviĝas en

ISO/N53. we preferas "adhera karaktero" kaj por (85/307) "inhera karaktero". - "karakterizaĵo" ŝajnas al mi pli klara ol "karakto", kiu jam estas hiperonimo (86/008) por majuskla aŭ minuskla litero, cifero, interpunkcia signo kaj por speciala tipografia signo kiel @, #, &, ktp. (=85/452). "Adhera" impresas min kiel tro "glua". "adhera karaktero" laŭ mi estas "e", kiu formas ligaturon kun "a". La karakterizaĵoj de celo kaj origino ne estas algluitaj al la nocio, sed troviĝas ekstere de ĝi. La inventinto de objekto ne adheras al ĝi! wor (90-07-19): =85/307. Mi akordas kun ei pri "adhera" k pri "karakto"; aliaj solvoj per "-her-" (aŭ "-trins-") ne devus havi la saman problemon.

ei (91-08-09): =85/307. <93-11-13>

23

{U1} 001.411.5 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} karakteriz/aj/o de origin/o \*b EVIT \*b  
 {eo2} karakteriz/aj/o pri origin/o \*c  
 {de1} Herkunftsmerkmal \*a  
 {en1} characteristic of origin \*a  
 {fr1} caractère de provenance \*a  
 → Ekstrinsa karakterizaĵo (85/308), kiu indikas kie, per kiu aŭ kiel objekto estiĝis, uziĝis aŭ konatiĝis. Ekzemploj: \La malkovrinto, inventinto aŭ priskribinto de objekto, ĝia produktinto aŭ liverinto, la loko de produktado (urbo, lando), la fabrikad-maniero.\i \*b laŭ \*a  
Fon: \*a R1087; \*b ei; \*c wor;

**85/309**

Rim: ei (91-08-09): Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53. Mi markis mian unuan terminon EVIT, ĉar {eo2} pli trafe priskribas la nocion. <93-11-13>  
 24

{U1} 001.411.5 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} karakteriz/aj/o de cel/o \*b EVIT \*b  
 {eo2} karakteriz/aj/o pri cel/o \*c  
 {de1} Zweckmerkmal \*a  
 {en1} characteristic of purpose \*a  
 {fr1} caractère de destination \*a  
 {fr2} caractère d'emploi \*a  
 → Ekstrinsa karakterizaĵo (85/308), kiu indikas la celon de iu objekto. Ekzemploj: \La uzo-maniero; la apliko-fako; la loko aŭ situo en muntaĵo.\i \*b laŭ \*a  
Fon: \*a R1087; \*b ei; \*c wor;

**85/310**

Rim: ei (91-08-09): Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53. Mi markis mian unuan terminon EVIT, ĉar {eo2} pli trafe priskribas la nocion. <93-11-13>  
 25

{U1} 001.411.5 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} ekvivalent/aj karakteriz/aj/oj \*b  
 {de1} äquivalente Merkmale \*a

{en1} equivalent characteristics \*a  
 {fr1} caractères équivalents \*a

Malsamaj karakterizaĵoj (85/289), kiuj tamen estas substitueblaj inter si en difinita nocio-enhavo (85/290) sen ŝanĝo de la nocio-amplekso (85/293). La inter-ŝanĝebleco de karakterizaĵoj estas kaŭzata per hazarda → ontologia rilato (=85/295) ne per logika ekvivalento. Ekzemploj: \La karakterizaĵoj "egallatera" (= havanta egalajn laterojn) kaj "egal-angula" (= havanta egalajn angulojn) en la nocio "egallatera [egal-angula] triangulo"; "konvekso lenso" = "konverĝiga lenso".\i \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei;

**85/311**

Rim: ei: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53. <93-11-13>

2.1.4 Kombino de nocioj (n-ro 26)  
 26

{U1} 001.411.6 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} losuril\*\*/o \*b EVIT \*b  
 {eo2} losukomb\*\*/o \*b EVIT \*b  
 {eo3} log\*\*\*-sum/o \*ĉ  
 {eo4} log\*\*\*-sum/ig/o \*ĉ  
 {de1} Disjunktion \*a\*c  
 {de2} logische Addition \*a  
 {de3} Umfangsvereinigung \*c  
 {en1} disjunction \*a\*c  
 {en2} logical addition \*a  
 {fr1} disjonction \*a\*c  
 {fr2} addition logique \*a

Adicio de la nocio-ampleksoj (85/293) de kelkaj nocioj (85/288). La rezulto estas supernocio (85/291) de la originaj nocioj, kaj tiuj estas subnocioj (85/292) de la rezulta nocio. Ekzemplo: \logsumigo de la subnocioj "knabo" kaj "knabino" kreas la supernocion "infano".\i \*b laŭ \*a

Difino de {eo3} laŭ (88/030): Rilato (88/682) formita per la → logika sumo (89/048) de du unuoj. Difino de {eo4} laŭ (88/031): La kombinado de du nocioj (88/026) per kreo de ilia → logika sumo (88/048). \*b laŭ \*c

Fon: \*a R1087; \*b ei; \*c Termi-of-doc; \*ĉ wor;

**85/312**

Rim: ei (89-11-23): Uzu {eo3} se vi volas indiki rilaton inter du nocioj; uzu {eo4} se vi volas indiki la procezon, per kiu integriĝis aŭ kombiniĝis du nocioj. Ekz-e homo = viro aŭ virino. wor (90-07-19): Mi akordas kun la divido en du registraĵojn. La terminojn {eo3} kaj {eo4} mi trovas multege pli tuje klaraj, facile memoreblaj kaj uzeblaj. (Laŭ mi, /log/ ja estas la radiko de log\*\*\*/ik/o, spite la pretendon de PIV.)

ei (91-08-09): Mi akordas kun wor kaj tial markis terminojn {eo1} kaj {eo2} EVIT. <93-11-13>

2.2 Difinoj (n-roj 27 ĝis 30)

{U1} 001.412 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} difin/o (1) \*b\*c  
 {de1} Definition \*a  
 {en1} definition \*a  
 {fr1} définition \*a  
 Pervorta priskribo de nocio (85/288).

\*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ej; \*c PIV;

### 85/313

Rim: =93/028 [94-02-26]

28

{U1} 001.412 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} difin/o per super'noci/o kaj diferenc/o \*b  
 {eo2} difin/o per noci/o-en'hav/o \*b  
 {eo3} difin/o (1) (en ĝia klasika signifo) \*b  
 {de1} Definition durch Gattungsbegriff und Unterschied \*a  
 {de2} Definition durch Intension \*a  
 {de3} Definition durch Konnotation \*a  
 {de4} intentionale Definition \*a  
 {de5} Definition (in klassischem Sinn) \*a  
 {en1} definition by genus and difference \*a  
 {en2} definition by intension \*a  
 {en3} definition by connotation \*a  
 {en4} intensional definition \*a  
 {en5} definition (in its classical meaning) \*a  
 {fr1} définition spécifique \*a  
 {fr2} définition (au sens classique) \*a

Determino de la nocio-enhavo (85/290) de nocio (85/288). Ekzemplo: \La nocio "aera flug-aparato" estas iu ajn aer-subtenata veturilo.ĵi \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ej;

### 85/314

Rim: =[86/030] =93/029 [94-02-26]

29

{U1} 001.412 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} difin/o per noci-ampleks/o \*b  
 {eo2} difin/o per signif-etend/iĝ/o \*b  
 {eo3} difin/o per signif-amplekso \*c  
 {eo4} difin/o per ekzempl/oj \*ĉ  
 {de1} Definition durch Extension \*a  
 {de2} Definition durch Denotation \*a  
 {de3} extensionale Definition \*a  
 {en1} definition by extension \*a  
 {en2} definition by denotation \*a  
 {en3} extensional definition \*a  
 {fr1} définition générique \*a

Difino per determino de la nocio-amplekso (85/293) de nocio (85/288). Ekzemplo: \La nocio "aera flug-aparato" entenas balonojn, → direkteblajn balonojn [zepelinojn], kajtojn, glisilojn kaj flugmaŝinojn.ĵi \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ej; \*c we; \*ĉ wor;

### 85/315 =ApE85 #020

Rim: ej (89-12-16): =[85/293, 86/031]

=93/030 [94-02-26]

30

{U1} 001.412 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} difin/o per kun'tekst/o \*b  
 {eo2} kun'tekst/a difin/o \*b  
 {de1} Definition durch Kontext \*a  
 {de2} kontextuale Definition \*a  
 {en1} definition by context \*a  
 {en2} contextual definition \*a  
 {fr1} définition par l'emploi \*a

Difino (85/313) per ekzemplo de vera apliko, tio estas per subkomprenata ekvacio. La difinota termino (85/317) estas montrata en frazo, kies tuta signifo estas konata aŭ povas esti divenata. Ekzemplo: \Li vojaĝis de Eŭropo al Ameriko en 24 horoj uzante ... (avion).ĵi \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ej;

### 85/316

Rim: ej: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53. <93-11-13>

3. TERMINOJ (n-roj 31 ĝis 94)

3.1 Gxeneralajoj (n-roj 31 ĝis 38)

31

{U1} 001.420 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} termin/o (1) (por nocio) \*b\*c  
 {de1} Terminus (für einen Begriff) \*a  
 {en1} term (for a concept) \*a  
 {fr1} terme \*a

Iu ajn konvencia simbolo por nocio (85/288), kiu konsistas el prononceblaj sonoj aŭ el ties skriba reprezentajo (=el literoj). Termino povas esti vorto (85/352) aŭ vortgrupo (85/358). Ekzemploj por ~o en 85/318,319. \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ej; \*c PIV;

### 85/317

Rim: =[86/036] =93/035 [94-02-26]

32

{U1} 001.420 (+)  
 {U2} 801.316.4  
 {T1} RBN  
 {eo1} teknik/a termin/o \*b  
 {eo2} teĥnik/a termin/o \*c  
 {eo3} fak/a termin/o \*b  
 {de1} Terminus technicus \*a  
 {en1} technical term \*a  
 {fr1} terme technique \*a

Termino (85/317) kies uzo kaj signifo (85/369) estas limigata al specialistoj de difinita stud-kampo (85/303). Ekzemploj: \rivoluo; nombro de rivoluoj; nombro de rivoluoj dum tempo-nombro.ĵi \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ej; \*c we;

### 85/318 =ApE85 #021

Rim: ei: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53. «93-11-13»  
33

{U1} 001.420 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} ĝeneral/a termin/o \*b EVIT \*b  
{eo2} komun-lingv/a termin/o \*b  
{eo3} komun-lingv/a vort/o \*b  
{de1} allgemeiner Terminus \*a  
{en1} general term \*a  
{fr1} terme commun \*a

Termino (85/317) formanta parton de la komuna lingvo. Ekzemploj: \numero; tempo; per; de.\i \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei;

### 85/319

Rim: ei (88-12-16): Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53. =88/106. «93-11-13»  
34

{U1} 001.420 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} prefer/at/a termin/o \*b  
{de1} Vorzugsterminus \*a  
{en1} preferred term \*a  
{fr1} terme à employer de préférence \*a

Termino (85/317) rekomendita en norm-verko. \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei;

### 85/320

Rim: =[86/063] =93/066 [94-02-26]  
35

{U1} 001.420 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} permes/it/a termin/o \*b  
{de1} zulässiger Terminus \*a  
{en1} preferred term \*a  
{fr1} terme toléré \*a

Termino (85/317), kies uzo kiel sinonimo (85/378) de → preferata termino (85/320) estas permesita en norm-verko. \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei;

### 85/321

Rim: =[86/064] =93/067 [94-02-26]  
36

{U1} 001.420 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} ne'rekomend/it/a termin/o \*b  
{eo2} ne'norm/a termin/o \*c  
{eo3} evit/ind/a termin/o \*ĉ  
{de1} abgelehnter Terminus \*a  
{en1} deprecated term \*a  
{fr1} terme à éviter \*a

Termino (85/317), kiu laŭ norm-verko estas evitinda. En Britaj norm-verkoj ekzistas ankoraŭ kategorio inter nerekomenditaj kaj → permesitaj terminoj (85/321). Gxi nomiĝas "alternativaj

terminoj". Tiuj terminoj ne estas malbonaj sed superfluaĵ, kaj ili estas eliminendaj iom post iom. \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei; \*c we; \*ĉ go;

### 85/322 =ApE85 #022

Rim: ei: Laŭ mi {eo2} ne estas trafa traduko, ĉar ĝi povas signifi, ke la termino ne troviĝas en norm-verko. Multaj bonaj terminoj ne troviĝas en norm-verkoj. Kontraste al tio la supra difino klare indikas, ke la termino estas taksita "evitinda" en norm-verko. =[86/065] =93/068 [94-02-26]  
37

{U1} 001.43 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} termin/ar/o <2> \*b  
{eo2} nomenklatur/o (1) \*b  
{eo3} terminologi/o (1) \*c EVIT \*b  
{eo4} termin/o-proviz/o \*b  
{de1} Terminologie \*a  
{de2} Nomenklatur \*a  
{en1} terminology \*a  
{en2} nomenclature \*a  
{fr1} terminologie \*a

La kolekto de terminoj (85/317) prezentanta nociosistemon (85/295) precipe en speciala stud-kampo (85/303). En kelkaj kampoj {eo1} kaj {eo2} ne estas plene sinonimaj (85/378). En biologio, ekze, nomenklaturilo rilatas al la nomoj de plantoj kaj bestoj; terminaro, kontraŭe, rilatas al iliaj partoj kaj ecoj. \*b laŭ \*a

Aro da terminoj uzataj en unu scienco aŭ tekniko: \bona, kompleta ~o estas nepra kondiĉo de progreso.\i \*c

Fon: \*a R1087; \*b ei; \*c PIV;

### 85/323 =ApE85 #023

Rim: ei (88-12-16): Laŭ PIV "terminaro" estas nur vortaro, tamen mi opinas, ke pro la strukturo de nia lingvo "terminaro" devas esti ankaŭ la termino por ĉi tiu nocio. =86/087

wor (90-07-19): Mi akordas kun ei, ke ni akceptu {eo1}. Por "terminaro" la PIV-a difino ĉe "-ar/" unuavice pensigas pri 85/323. Strikte akcepti la difinon ĉe "terminaro" do parte faras el ĝi idiotismon. Plie, se ni konsekvence donus preferon al la 4-a difino ĉe "-ar/", ni devus kredemi, ke "homaro" signifas telefon-libron! Aliflanke, por eviti konfuzon, mi foje diras: "terminara libro". =93/031, =93/032 [94-02-26]  
38

{U1} 001.44 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} terminologi/o <2> \*b  
{de1} Terminologie (Wissenschaft) \*a  
{en1} terminology (science) \*a  
{fr1} terminologie \*a

Stud-kampo, kiu okupiĝas pri la formado kaj nomado de nocioj (85/288), aŭ kiel speciala stud-objekto aŭ kiel komunaĵo de ĉiuj stud-objektoj. \*b

laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ej;

**85/324** =ApE85 #024

Rim: Laŭ PIV {eo1} estas: "Aro de la terminoj, uzataj en unu scienco aŭ tekniko: \bona, kompleta terminologio estas neprakondiĉo de progreso.\ Mi opinias, ke la termino por ĉi tiu nocio devus esti "terminaro". Se oni etnolingve atribuas diversajn signifojn al {en1}, {fr1}, {de1}, tio ne signifas, ke ankaŭ ni devus fari tion. =[86/100]

=93/121 [94-02-26]

3.2 Ekstera formo de terminoj (n-roj 39 ĝis 49)

39

{U1} 001.421 (+)

{T1} RBN

{eo1} ekster/a form/o (de termino) \*b

{de1} äußere Form (eines Terminus) \*a

{en1} external form (of a term) \*a

{fr1} forme (d'un terme) \*a

La tutaĵo de sonoj aŭ fonemoj (85/327) aŭ de literoj, kiuj konsistigas terminon (85/317).

\*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ej;

**85/325**

Rim: ej (88-12-16): Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53.

wor (90-07-19): Mankas referenco al mala termino aŭ nocio, "interna formo ..." aŭ "ena formo ...". Tia referenco utilis por ĝuste enfokusigi la signifon. Pro tiu manko kaj pro la difino de "termino" ĉe 85/317 la vorto "ekstera" ŝajnas pleonasma.

ei (91-08-09): Temas pri traduko de verko, en kiu la mala termino ne ekzistas. Mi ĝojus, se iu kreus ĝin kaj registrus ĝin en Pekoteko. «93-11-13»

40

{U1} 001.421 (+)

{T1} RBN

{eo1} son-form/o \*b

{eo2} prononc/a form/o \*c

{eo3} fonetik/a form/o \*c

{eo4} akustik/a form/o \*c

{eo5} fonetism/a form/o \*b

{eo6} fonet\*\*/a form/o \*ĉ

{de1} phonetische Form \*a

{en1} phon(et)ic form \*a

{fr1} forme phonique \*a

La → ekstera formo (85/325) de termino (85/317) formita per sonoj aŭ fonemoj (85/327). \*b

laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ej; \*c go; \*ĉ wor;

**85/326** =ApE85 #025

Rim: ei (89-06-04): Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53. Se la simpla {eo1}, kiu formas belan paron kun {eo1} de 85/328, ne ŝajnas esti sufiĉe scienca por iu apliko, mi preferas terminon {eo5}, ĉar la nocio rilatas nek al branĉo de gramatiko nek al branĉo de fiziko, sed al la sona konsisto de vorto, do

laŭ PIV al fonetismo.

wor (90-07-19): Divers-punkte: 1. Mi akordas kun ei. Krom {eo1}, plej taŭgas por la difino {eo5}. 2. {eo1} estas svaga kaj la difino estas ĝenerala. 3. La kritiko de ei kontraŭ {eo3,4} baziĝas sur la uzo de sufikso "-ik", dum ne temas pri teĥniko. Post stumpigo restas "akust\*\*a" kaj "fonet\*\*a". 4. Akustika fonetiko estas fako de fonetiko, kiu studas la karakterizaĵojn de parolaj sonoj en la aero. Taŭga termino por la parola sonformo en la aero estas "akust\*\*a fonet\*\*a formo" aŭ mll-e "akust\*\*a formo". "Akust\*\*a formo" do estas tradicio (86/010) de la nocio. 5. Akustika fonetiko tradicie ankaŭ studas la aŭdajn karakterizaĵojn de parolaj sonoj. Tiakaze "akust\*\*a formo" denove estas hiponimo de la nocio. 6. "Fonet\*\*a formo" ŝajnas pli konsekvenca nomo por la nocio ol estas {eo5}. Se "-iko" mispensigas pri teĥniko, ankaŭ "-ismo" mispensigas pri filosofio. 7. Ankaŭ {eo2} estas hiponimo por la nocio de ĉi tiu komplekso, ĉar ĉe {eo2} temas pri la enbuŝaj karakterizaĵoj. 8. Mi akordas kun ei, ke "sonformo" formas belan paron kun "skribformo". Estas tre utile laŭ mi, ĉiam celi tiajn belajn parojn. Sed bv ankaŭ noti, ke la nuna paro ne estas perfekta, ĉar "son/" traktiĝas substantive, dum "skrib/" traktiĝas verbe. 9. La difino per la vortoj "de termino" limigas la terminojn al la fako terminologio. Sed ĉiuj tiuj terminoj {eo1-5} apartenas al nocioj superkampaj (85/306). Tia difino riskas, ke terminologio kaj ĝia (laŭ mi) superkampo, lingvistiko, malsame difinas samajn terminojn. Se temas pri zorgo ne fari pretendojn ekster la nune traktata kampo (terminologio), mi plenkore aprobas. Tiaokaze, klare estus komenci difinojn per la etiketaj vortoj: "(En terminologio)". 10. Se oni preferus alternativan terminon surbaze nur de nesufiĉa sciencoco de {eo1} kaj opinius ĝin (ekz. {eo5}) samsignifa, tio efikus, (a) ke {eo1} estas egale precizaj kaj (b) ke "sufiĉe scienca" signifus sufiĉe pufe impona.

ei (91-08-09): wor pravas, ke estus bone enkonduki difinojn de la "Terminologia Vortaro" (85/287 - 85/381) per (En terminologio:), precipe se iu kopias iun komplekson por utiligi ĝin en argumento pri iu ne terminologia afero. La UDK-numero 001.4 indikas la kampon "terminologio", tamen probable malmultaj izantoj de la verko scias tion. {eo6} nun ŝajnas al mi preferinda, tamen "foneta" estas unue difinenda. «93-11-13»

41

{U1} 001.421 (+)

{U2} 801.41

{T1} RBN

{eo1} fonem/o (1) \*b\*c

{de1} Phonem \*a

{en1} phoneme \*a

{fr1} phonème \*a

Iu ajn distinga son-elemento en donita lingvo, se eble prezentata per unu litero. Du aŭ pli

da malsamaj sonoj formas en lingvo nur unu fonemon, se ili estas interŝanĝeblaj en parolataj vortoj sen signifoŝanĝo. Ekzemplo: \En la Franca la sonoj "l" kaj "r" estas du fonemoj, ĉar vortoj kiel F "galant" kaj F "garant" prezentas malsamajn nociojn. En la Japana kontraŭe la sonoj "l" kaj "r" formas nur unu fonemon; ili povas esti interŝanĝataj sen signifoŝanĝo de vorto.\i \*b\*ĉ laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei; \*c PIV; \*ĉ wor;

### 85/327

Rim: ei: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53. «93-11-13»

42

{U1} 001.421 (+)  
 {U2} 003.081  
 {T1} RBN  
 {eo1} skrib-form/o \*b  
 {eo2} grafik/a form/o \*c  
 {eo3} grafi\*\*/o [1] \*c  
 {eo4} grafism/a form/o \*b  
 {de1} geschriebene Form \*a  
 {de2} schriftliche Form \*a  
 {de3} Schriftform \*a  
 {en1} written form \*a  
 {fr1} forme graphique \*a  
 {fr2} graphie \*a

La → ekstera formo (85/325) de termino (85/317) formita per literoj. \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei; \*c go;

### 85/328 =ApE85 #026

Rim: ei: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53. La termino "grafismo" estas laŭ PIV unu el la signifo de la ambigua "grafiko", tial {eo4} saĝas al mi preferinda, se la simpla {eo1}, kiu formas belan paron kun {eo1} de 85/326, ne sufiĉas. «93-11-13»

43

{U1} 001.421 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} prototip/o <3> \*b  
 {eo2} prototip/a form/o \*b  
 {de1} Prototypform \*a  
 {de2} Prototyp \*a  
 {en1} prototype form \*a  
 {en2} prototyp \*a  
 {fr1} (forme) prototype \*a

La modelo, laŭ kiu estas formita la → ekstera formo (85/325) de aliaj vortoj. Por vortoj konstruitaj el Grekaj aŭ Latinaj morfemoj (85/345) la prototipo prezentas tiun evolu-stadion, kiu ankoraŭ ne montras naciajn apartaĵojn, sed de kiu la naciaj formoj povas esti derivataj per regula transponado (85/330). Ekzemplo: \La prototipo "radi/a/t/or" respondas al la sekvantaj naciaj (etno-lingvaj) formoj, kiuj estas same regulaj: AGR: radiator, F: radiateur, I: radiatore, H: radiador.\i \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei;

### 85/329

Rim: ei: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53. «93-11-13»

44

{U1} 001.421 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} transpon/ad/o <3> \*b  
 {eo2} transpren/ad/o \*b  
 {de1} Transposition \*a  
 {en1} transposition \*a  
 {fr1} transposition \*a

La regula asimilo el iu lingvo de la → ekstera formo (85/325) de vortoj (85/352,353), kiuj estis regule konstruitaj en alia lingvo el Grekaj aŭ Latinaj morfemoj. Por ekzemploj =85/329. b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei;

### 85/330

Rim: ei: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53. «93-11-13»

45

{U1} 001.420 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} mal'long/ig/it/a termin/o \*b  
 {eo2} stump/ig/it/a termin/o \*c  
 {de1} abgekürzter Terminus \*a  
 {en1} abbreviated term \*a  
 {fr1} terme abrégé \*a

Termino (85/317) formita per ellaso de unu aŭ pluraj partoj el donita termino. Gxi estas aŭ mallongigita son-formo (85/326) aŭ prononcata mallongigo (85/332). Ekzemploj de mallongigitaj son-formoj: \aŭto (=aŭtomobilo), buso (=aŭtobuso).\i \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei; \*c wor laŭ PIV;

### 85/331

Rim: =86/044

wor (90-07-19): {eo2} estas pli kolora ol {eo1}. Tio helpas nin teni nin vekaj. =93/044 [94-02-26]

46

{U1} 003.083  
 {U2} 801.18  
 {T1} RBN  
 {eo1} mal'long/ig/o \*b  
 {de1} Abkürzung \*a  
 {en1} abbreviation \*a  
 {fr1} abréviation \*a

Mallongigita skrib-formo (85/328) de termino (85/317). Multaj mallongigoj estas ankaŭ prononcataj, t.e. uzataj kiel → mallongigitaj terminoj (85/331). Ekzemploj de ne-prononcataj mallongigoj: \s-ro (=sinjoro); Ca (=kalcio); sin (=sinuso).\i

Ekzemploj de literumataj mallongigoj: \ktp. (kotopo = kaj tiel plu); UN (Uno = Unuiĝintaj Nacioj); PV (Povo = Plena Vortaro); PIV (Poivo = Plena Ilustrita Vortaro).\i. Ekzemploj de prononcataj mallongigoj: =85/333. \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ej;

**85/332**

Rim: =[86/045] =93/045 [94-02-26]

47

{U1} 001.423 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} akronim"/o (1) \*b\*c  
{de1} Akronym *n* \*a\*c  
{de2} Kurzwort *n* \*c  
{en1} acronym \*a\*c  
{es1} palabras siglas \*c  
{es2} sigla \*c  
{fr1} acronyme *m* \*c  
{fr2} mot-sigle \*a\*c

Origine mallongigo (85/332) formita el komencaj literoj (aŭ silaboj) de kelkaj vortoj (85/353) kaj uzata kiel parolata vorto, t.e. kiel → mallongigita termino (85/331). Ekzemploj: \Unesko (= UNESKO); lasero (= lum-amplifilo per stimulata eligo de radioj); UEA; SAT; KELI; PIV.ĵi \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ej; \*c BibTer;

**85/333**

Rim: =[86/046, 86/047] =93/047 [94-02-26]

48

{U1} 001.421 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} liter/a simbol/o \*b  
{de1} Buchstabensymbol \*a  
{en1} letter symbol \*a  
{fr1} symbole littéral \*a

Simbolo por nocio (85/288) konsistanta el unu aŭ pluraj literoj skribataj sen punkto(j); precipe simbolo, kiu indikas fundamentan sciencan nocion (kvanton, uniton [unuon], kemian elementon, ktp.). Ekzemploj: \cm (=centimetron); kg (=kilogramo); h (=horo).ĵi \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ej;

**85/334**

Rim: ej: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53. «93-11-13»

49

{U1} 001.421 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} grafik/a simbol/o \*b  
{de1} grafisches Symbol \*a  
{en1} graphical symbol \*a  
{fr1} symbole graphique \*a

Desegnato reprezentanta (89/306) nocion (85/288). Ekzemploj: \Fulma sago kiel avert-simbolo kontraŭ elektromortigo. Du interligitaj ringoj kiel simbolo por edzeco.ĵi \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ej;

**85/335**

Rim: ej (91-07-14): Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53. En 86/128 troviĝas la sama termino kun iom alia difino. «93-11-13»

3.3 Skribado [ortografio] (n-roj 50-53)

50

{U1} 001.422 (+)  
{U2} 801.14  
{T1} RBN  
{eo1} fonetik/a ortografi/o \*b  
{eo2} fonetik/a alfabet/o \*b  
{eo3} laŭ'son/a skrib-sistem/o \*c  
{eo4} laŭ'son/a notaci/o \*c  
{eo5} laŭ'son/a ortografi/o \*c  
{eo6} laŭ'son/a alfabet/o \*c  
{de1} phonetische Schrift \*a  
{de2} phonetisches Alphabet \*a  
{en1} phonetic spelling \*a  
{en2} phonetic writing \*a  
{en3} phonetic alphabet \*a  
{fr1} écriture phonétique \*a  
{fr2} alphabet phonétique \*a

Sistemo de literoj (aŭ ĝia uzo), en kiu unu litero interrespondas al aŭ difinita sono aŭ difinita fonemo (85/327). Ekzemplo de fonetika ortografio (strikte fonetika alfabeto): \La alfabeto de la Internacia Fonetika Asocio.ĵi Ekzemploj de proksimume fonetikaj ortografioj ("fonemaj alfabetoj"): \La Esperanto-alfabeto (uzata en la "logatoms" establita por la mezurado de komprenebleco fare de la Internacia Konsultiĝa Komitato pri Telegrafio kaj Telefonio); la Cirila alfabeto.ĵi \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ej; \*c wor;

**85/336 =ApE85 #027**

Rim: ej: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53.

go: Esperantigo kaj difino "logatoms". Anstataŭ "Cirila" uzo la formon "Kirila".

ej: "logatoms" ne estas difinita en la originalaj etnolingvaj versioj de ĉi tiu norm-verko, do mi ne povas doni la difinon. Kiu povus helpi? "Cirila" troviĝas en PIV. Kial devii de ĝi?

wor (90-07-19): Laŭ la nuna difino, temas pri svagaj → komun-lingvaj terminoj (85/319) laŭ mi evitindaj, kiuj nomas supernocion de du → tehnikaj terminoj (85/318):

fonemika notacio aŭ ortografio -- fonema alfabeto fonetika notacio aŭ ortografio -- fonet\*\*a alfabeto Poststrece estas laŭ mi proponindaj ekvivalentoj. Uzo de la vorto "proksimume" en la difino efikas erarige. La "proksimumeco" reciprokas. La du fakoj kaj ortografioj havas sendependajn celojn; nek unu nek la alia celas esti proksimuma versio de la alia. Ekzistas aliaj. Aparte menciinda estas:

silabika notacio aŭ ortografio -- silabaro en kiu la simbolata sono estas silabo. Pli taŭgaj terminoj por la svaga ĝenerala nocio, ~o, estas {eo3-6}. «93-11-13»

51

{U1} 001.422 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} histori/a ortografi/o \*b

{eo2} etimologi/a ortografi/o \*b  
 {de1} historische Schreibung \*a  
 {de2} etymologische Schreibung \*a  
 {en1} historical spelling \*a  
 {en2} etymological spelling \*a  
 {fr1} écriture historique \*a  
 {fr2} écriture étymologique \*a

Ortografia sistemo en kiu iuj fonemoj (85/327) estas skribataj malsame depende de la vortorigino. Ekzemploj: (Angla:) \f fool\i, sed \f phonetic.\i (Franca:) \f fou\i, sed \f phonétique.\i. \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei;

### 85/337

Rim: ei: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53. «93-11-13»

52

{U1} 001.422 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} trans'liter/ad/o \*b\*c  
 {de1} Transliteration \*a  
 {en1} transliteration \*a  
 {fr1} translittération \*a

Transformado de teksto, litero post litero, en alian alfabeton sen konsidero pri la aktuala prononco de la sonoj. Ekzemplo: \La internacia ISO-sistemo por transliterado de literoj el la Cirila alfabeto en la Latinan.\i \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei; \*c go;

### 85/338

Rim: =[86/097] =93/105 [94-02-26]

53

{U1} 001.422 (+)  
 {U2} 003.035  
 {T1} RBN  
 {eo1} trans'skrib/ad/o (1) \*b  
 {eo2} trans'skrib/o \*b  
 {de1} Transkription \*a  
 {en1} transcription \*a  
 {fr1} transcription \*a

Transformado de teksto al alia alfabeto por indiki la proksimuman prononcon al la leganto. Ekzemploj: \Transskribo per → fonetika alfabeto (85/336). Transskribo de Rusaj nomoj en ĵurnaloj, kiuj uzas la Latinan alfabeton.\i \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b we;

### 85/339

Rim: we: {eo1} substrekas la agon, {eo2} la rezulton. =93/106 [94-02-26]

3.4 Interna formo de terminoj (n-roj 54 ĝis 82)

54

{U1} 001.425 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} laŭ'morfem/a senc/o de termin/o \*c  
 {eo2} laŭ'struktur/a senc/o de termin/o \*ĉ  
 {eo3} laŭ'ŝajn/a senc/o de termin/o \*ĉ  
 {eo4} morfem-seri/a senc/o de termin/o \*ĉ

{de1} innere Form \*a  
 {de2} buchstäbliche Bedeutung (eines Terminus) \*a

{en1} internal form \*a  
 {en2} literal meaning (of a term) \*a  
 {fr1} sens littéral (d'un terme) \*a

Baza signifo de → kompleksa termino (85/342) aŭ de → transigita termino (85/366). La □ de kompleksa termino determinas ĝian strukturon. La □ de transigita termino estas ĝia → primara senco (85/367). Ekzemploj: \La ~ de la termino "ĉeval-povo" estas la kombinaĵo de la du nocioj "ĉevalo" kaj "povo" en tiu ĉi ordo, kaj sen difino de la rilatoj ekzistantaj inter ili. Laŭmorfeme la signifo de la termino "kapo" (de ŝlosilo aŭ keĵlo) estas la "kapo de besto".\i \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei; \*c go; \*ĉ wor;

### 85/340 =ApE85 #028

Rim: ei: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53.

«93-11-13»

55

{U1} 001.425 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} motiv/it/a termin/o \*b  
 {eo2} tra'vid/eb/l/a termin/o \*c  
 {eo3} sin'motiv/a termin/o \*c  
 {eo4} sin'klar/ig/a termin/o \*c  
 {de1} motivierter Terminus \*a  
 {en1} motivated term \*a  
 {fr1} terme motivé \*a

Termino (85/317) kies → rezulta senco (85/370) estas derivita de ĝia → laŭmorfema senco (85/340) aŭ de ĝia son-formo (86/326). Je la unua okazo la motivita termino estas → kompleksa termino (85/342) aŭ → transigita termino (85/366), je la dua okazo onomatopea vorto. \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei; \*c wor;

### 85/341 =ApE85 #029

Rim: ei (88-12-16): Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53.

wor (90-07-19): {eo2} aludas, ke oni rekte vidas la sencon sen vidi la terminon. {eo3} kaj {eo4} diras, ke estas la termino mem, kiu sin motivas, ne ia eksterajo. «93-11-13»

3.4.1 Gramatika analizo de kompleksaj terminoj

(n-ro 56 ĝis 74)

56

{U1} 001.4251 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} kompleks/a termin/o \*b  
 {eo2} morfem-kombin/aj/o \*b  
 {eo3} vort-kombin/aj/o \*b  
 {de1} komplexer Terminus \*a  
 {de2} komplexe Form \*a  
 {de3} Morphemkombination \*a  
 {de4} Wortkombination \*a  
 {en1} complex term \*a  
 {en2} complex form \*a

{en3} combination of morphemes \*a  
 {en4} word combination \*a  
 {fr1} terme complexe \*a  
 {fr2} forme complexe \*a  
 {fr3} combinaison de morphèmes \*a  
 Termino (85/317) enhavanta kelkajn leksemojn (85/346). Gxi estas aŭ → kunmetita vorto (85/354), aŭ → derivita vorto (85/355) aŭ vortkomplekso (85/353). Ekzemploj: =85/354,355,359,360. \*b laŭ \*a  
 Fon: \*a R1087; \*b ei;

### 85/342

Rim: =[86/058] =93/061 [94-02-26]  
 57

{U1} 001.425.1 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} termin/o-analiz/o \*b  
 {eo2} gramatik/a analiz/o (de termino) \*c  
 {eo3} struktur/a analiz/o de termin/o \*ĉ  
 {de1} Analyse der grammatischen Form (eines Terminus) \*a  
 {de2} grammatische Analyse (eines Terminus) \*a  
 {en1} analysis of the grammatical form (of a term) \*a  
 {en2} grammatical analysis (of a term) \*a  
 {fr1} analyse de la forme grammaticale (d'un terme) \*a  
 {fr2} analyse grammaticale (d'un terme) \*a

Disigo de → kompleksa termino (85/342) en ĝiaj komponantoj (85/344). \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei; \*c go; \*ĉ wor;

### 85/343 =ApE85 #030

Rim: ei (89-06-05): Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53. Kvankam en la terminoj en la etnaj lingvoj troviĝas la vorto "gramatika", la difino diras nur, ke termino estas disigita en siaj komponantoj. Tial laŭ mi {eo1} pli klare indikas, pri kio temas. Vidu la aplikon de tiu termino en 85/344.

wor (90-07-19): Sxajnas al mi, ke temas pri du nocioj: unu de la difino kaj la alia de la terminoj. Pri tiu de la donita difino: sufiĉus diri "termin/o-dis/ig/o", ĉar temas pri "iaj elementoj". En tio mankas postulo pri gramatikaj kriterioj pri senpereco. PIV-e analizo <2> celas al specoj kaj funkcioj, kio signifas inter-elementajn rilatojn aŭ gramatikon. Se temos pri disigo en senperajn komponantojn, tio unuvorte estas gramatika. Pri tiu de la terminoj: la vorto gramatiko celas, ke la disigo analize klarigu gramatikan strukturon -- ekz. per konstato de la senperaj komponantoj. La plena termino do povas esti: "gramatika analizo de termino"; {eo1} kaj "gramatika analizo" estas mallongigoj. Iom pli preciza estus {eo3}. «93-11-13»

58

{U1} 001.425.1 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} kompon/ant/o (de termino) \*b

{de1} Bestandteil \*a  
 {de2} Konstituente \*a  
 {de3} Komponente (eines Terminus) \*a  
 {en1} constituent \*a  
 {en2} component (of a term) \*a  
 {fr1} composant (d'un terme) \*a

Iu ajn parto de → kompleksa termino (85/342), kiu havas propran signifon (85/369). Komponanto estas aŭ nedividebla elemento, morfemo (85/345), aŭ denove kompleksa termino. La unua paŝo de termino-analizo (85/343) apartigas la "tuj ekkoneblajn komponantojn" [senperaj komponantoj]. Kutime ekzistas du. Ekzemplo: \La oblikva streko en la termino "skrapatoro / por tranĉado de rapidumaj dentoj" apartigas la du tuj ekkoneblajn komponantojn.\i \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei;

### 85/344

Rim: ei: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53.

wor (90-07-19): Cxi tie temas pri analizo laŭ senperaj komponantoj, kiu konstatingante arbostrukturon de la analizado, laŭ mi konstatingas gramatikan informon. Gxi do ne kuniras kun la difino en 85/343.

ei (92-01-27): Sxajnas al mi, ke mi atribuas pli malvastan sencecon al gramatiko ol go kaj wor.

«93-11-13»

59

{U1} 001.425.1 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} morfem/o <2> \*b  
 {eo2} fin/a kompon/ant/o (de termino) \*b  
 {de1} letzte Konstituente (eines Terminus) \*a  
 {de2} Morphem \*a  
 {de3} Worthelement \*a  
 {en1} ultimate constituent (of a term) \*a  
 {en2} morpheme \*a  
 {en3} word element \*a  
 {fr1} morphème \*a

Iu ajn nedividebla komponanto de termino (85/317); t.e. komponanto, kiu ne povas esti disigata en aliajn elementojn sen perdo de ĝia signifo (85/369). Morfemo povas esti radiko (85/347), aŭ afikso (85/348), aŭ finaĵo (85/351). Ekzemplo: \En la termino "skrap/ator/o / por / tranĉ/ad/o / de rapid/um/a/j / dent/o/j" la morfemoj estas apartigitaj per oblikvaj strekoj.\i \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei;

### 85/345

Rim: =86/051

wor (90-07-19): La vorto "fina" en {eo2} estas ambigua, ĉar ĝi mispensigis min pri morfemo <1>. =93/054 [94-02-26]

60

{U1} 001.425.1 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} terminologi/a morfem/o \*b EVIT \*b  
 {eo2} leksem\*\*/o \*b

{eo3} leksikon/a morfem/o \*b  
 {de1} terminologisches Morphem \*a  
 {en1} terminological morpheme \*a  
 {fr1} morphème terminologique \*a

Iu ajn morfemo (85/345), kiu esprimas pli ol nur sintaksajn rilatojn; t.e. iu, kiu ne estas finaĵo (85/351). Gxi estas radiko (85/347) aŭ afikso (85/348). \*b laŭ \*a

Iu ajn morfemo, kiu esprimas pli ol nur sintaksajn rilatojn; t.e. morfemo, kiu ne estas finaĵo. En Esperanto ĝi estas radiko, parto de radiko aŭ afikso. \La vorto "hidrozoo" ekzistas el la du -oj ("hidro" kaj "zo") kaj el la finaĵo "o".i \*b

Fon: \*a R1087; \*b ei;

**85/346** =ApE85 #031

Rim: ei: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53.

kav (88-04-30): La difino devus esti modifita: "Ajna morfemo, kiu esprimas pli ol nur sintaksajn rilatojn. Gxi estas radikero, afikso aŭ radiko, sed ne finaĵo. Ekz-e "hidrozoo" konsistas el la du leksemoj "hidro-" kaj "-zo-" ambaŭ interpretendaj en Esperanto kiel leksemaj radikeroj, ne afiksoj.

ei: La termino "radikero" ne ekzistas en PIV; tie tiu leksemo nomiĝas "vortero". Estas diskutinde, ĉu ni en Esperanto bezonas plian terminon, kiu ne ekzistas etno-lingve. Nek en PIV nek en PAG mi trovis difinon por "radikero" aŭ "vortero". Cxu la difino por "radiko" ne estas sufiĉe vasta por esti aplikebla ankaŭ por "hidro-" kaj "-zo-"? (=85/347), PAG, p371: "La radikoj estas silaboj aŭ silabaroj, kiuj signas ian koncepton: objekton, nocion." Krome la sufikso -er/ indikas konsistigan elementon de de kutime homogena substanco. Nek "radikero" nek "vortero" estus homogenaj.

go: Forigu {eo2}.

ei (89-06-05): Kial? Laŭ mia memoro {eo2} estis uzata de sze kaj ankaŭ de aliaj lingvikistoj. Sed mi vane serĉis fontojn. Kiu povus komuniki al mi aplikojn de {eo2}, por ke mi povu aldoni ilin? Ne estis mi, kiu inventis la terminon "leksemo", ankaŭ kav uzis ĝin en la diskuto. Kvankam mi origine proponis la terminon {eo1} mi nun opinias, ke ĝi estas evitinda, ĉar ĝi pensigas, ke temas pri morfemo, kiun terminologoj aplikas, kiuj studas la nociojn kaj terminojn troviĝantajn en fakaj lingvoj (=86/100). Oni uzas etnolingve \terminologisch, terminological, terminologique\i, ĉar oni atribuas al \Terminologie, terminology, terminologie\i la signifon de "terminaro", kion mi taksas evitinda (=85/323).

wor (90-07-19): Ne estas certe, ĉu {eo2} taŭgas por ĉi tiu komplekso. Sencon de Angla \lexeme\i difinas Pei66: "Signifo-porta parolata formo (vorto aŭ stamo) kiu estas ero de vortprovizo, abstraktita de frazaj vortoj; kompleta gramatika formo. Sinonimo: lekso monemo (En. \lexical moneme\i)". Tiel radiko kun siaj fleksioj estus unu leksemo (ekz: skrib-, skribi, skribadi, skribas, skribis, skribota, ekskribi, ...). Derivaĵo kun siaj

fleksioj konstituus alian leksemon (ekz: skribist-, skribisto, skribistoj, skribista, ...). Tia leksemo estas pli vasta ol la nocio de tiu ĉi komplekso; en Esperanto ĝi ampleksas radikojn, sufiksoidojn, prefiksoidojn kaj radikalojn.

ei (91-08-09): En miaj Anglaj konsult-libroj nur <Termi-of-doc> listigis la terminon \lexeme\i (=88/113). Sed per la tute nova Germana <DUD-U> mi lernis, ke la vorto \Lexem\i venis en la Germanan lingvon tra la Rusa kaj signifas: \\"Einheit des Wortschatzes, die die begriffliche Bedeutung trägt. Bestandteil des Lexikons (3)".i "Unuo de vokablaro [1] (88/189), kiu portas la nocian sencon. Konsistiga parto de leksikono <3> (88/181)". Kaj "Lexikon (3)" estis difinita en <DUD-U>: \\"3a Gesamtheit der selbständigen bedeutungstragenden Einheiten einer Sprache: Wortschatz im Unterschied zur Grammatik einer Sprache; 3b (in der generativen Grammatik:) Sammlung der Lexikoneinheiten einer Sprache".i 3a Tutaĵo de la memstaraj signifon portantaj unuoj en iu lingvo: la vortrezoro kontraste al la gramatiko de iu lingvo. 3b (en generativa gramatiko:) Kolekto de leksikonaj unuoj de unu lingvo." Al mi nun ŝajnas, ke kav donis tre bonan ekzemplon por "leksemo" en nia lingvo, kiu parte akordiĝas kun la malklara difino de Pei, escepte, ke ne temas pri "kompleta gramatika formo". Tial wor atribuas malsaman signifon al la termino. Estus interese scii, kiun sencon oni atribuas en la Rusa lingvo al tiu ĉi vorto. Mi suspektas, ke temas pri "memstara signifon portanta unuo en iu lingvo, kiu povus esti ankaŭ radik-parto, kiel la de kav donita ekzemplo montras. Laŭ tiu interpreto mi prezentis en la difinkampo ankaŭ alian al Esperanto adaptitan difinon por "leksemo", kiun ni pro 88/181 povus nomi ankaŭ "leksikona morfemo". Tiukaze fonemo, morfemo kaj leksemo estus ĉiuj diversaj specoj de monemoj, de la plej malgrandaj konsistigaj elementoj de lingvo, kio faciligus memori ilin. «93-11-13»

61

{U1} 001.425.1 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} radik/o (3) \*b\*c  
 {de1} Stamm \*a  
 {de2} Wurzel \*a  
 {en1} stem \*a  
 {en2} root \*a  
 {fr1} racine \*a  
 {fr2} radical \*a

Leksemo (85/346), kiu povas esti uzata memstare kiel vorto (85/352), radik-vorto (85/356) - aŭ kiel bazo por → derivita vorto (85/355). Ekzemploj: \La vortoj "en", "dek". En la vortoj "t r a n ĉ /ado" kaj "s k r a p /atoro" la radikoj estas interspacigitaj.i \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei; \*c PIV;

**85/347**

Rim: =86/049, [86/050] =93/053 [94-02-26]

62

{U1} 001.425.1 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} afiks/o (1) \*b\*c  
 {de1} Affix \*a  
 {en1} affix \*a  
 {fr1} affixe \*a

Leksemo (85/346), kiu «en etnaj lingvoj» ĝenerale estas nur alpendaĵo al radiko (85/347). Afikso estas sufikso (85/349) aŭ prefikso (85/350). \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei; \*c PIV;

**85/348**

Rim: =86/052 go: Ankoraŭ unu speco de afikso estas "infikso" interne de vorto.

ei: Jes, sed en tiu ĉi difino, kiu estas traduko de norm-verko, mi ne rajtas aldoni tion. La difino de "infiks/o" troviĝas en PIV, do ne necesas krei apartan Pekoteko-komplekson.  
 =93/055 [94-02-26]

63

{U1} 001.425.1 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} sufiks/o (1) \*b\*c  
 {de1} Suffix \*a  
 {en1} suffix \*a  
 {fr1} suffixe \*a

Afikso (85/348), kiu rekte sekvas radikon (85/347) aŭ alian sufikson. Ekzemplo: \En la vorto "skrap/ator/o" la leksemo "ator" estas sufikso indikanta grandparte aŭtomate funkciantan maŝinon. \i \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei; \*c PIV

**85/349**

Rim: =[86/054] =93/057 [94-02-26]

64

{U1} 001.425.1 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} prefiks/o (1) \*b\*c  
 {de1} Präfix  
 {en1} prefix  
 {fr1} préfixe

Afikso (85/348), kiu rekte antaŭiras radikon (85/347) aŭ alian prefikson. Ekzemplo: \En la vorto "antaŭiras" la morfemo "antaŭ" estas prefikso indikanta pliproksimecon en spaco aŭ tempo, aŭ "apartenanta al la fronto" \i. \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei; \*c PIV

**85/350**

Rim: =[86/053] =93/056 [94-02-26]

65

{U1} 001.425.1 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} fin/aj/o (1) \*b\*c  
 {de1} Endung \*a  
 {en1} ending \*a

{en2} termination \*a  
 {fr1} désinence \*a

Fina morfemo (85/345) de vorto (85/352,353), kiu esprimas gramatikan fleksion, t.e. la kazon kaj nombron de substantivoj, la tempon [tenson] kaj modon de verboj. Ekzemploj: \En la vortoj "rapid/um/a/j" kaj "dent/o/j" la morfemo "j" indikas la pluralon. \i \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei; \*c PIV;

**85/351**

Rim: go: Estas bezonata ankaŭ morfemo havanta la samajn funkciojn ĉe la komenco de vorto; eble "komencaĵo".

= [86/055] =93/058 [94-02-26]

66

{U1} 001.425.1 (+)  
 {U2} 801.316.0 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} vort/o <6> \*b\*c  
 {eo2} vort/o en sintaks/a senc/o \*b  
 {de1} Wort \*a  
 {de2} Wort im syntaktischen Sinn \*a  
 {en1} word \*a  
 {en2} word in syntactic sense \*a  
 {fr1} mot (du point de vue syntaxique) \*a

Termino (85/317), kiu ne estas kompleksa (sed radik-vorto 85/356), aŭ kiu estas → nesintaksa vortgrupo (85/360). En la Angla lingvo vorto en sintaksa senco povas esti skribata ofte kiel unu aŭ pli da → ortografiaj vortoj (85/353), ekz-e: \ "slideway" \i aŭ: \ "slide way" \i « = glitejo». \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei; \*c PIV;

**85/352**

Rim: ei: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53.  
 go: Forigu {eo1}.

ei: Mi konsentas, ke {eo2} pli precize indikas la noción, sed en ĉiutaga vivo oni ja uzas por tiu nocio la terminon {eo1}. Cxar oni same agas etno-lingve, {eo1} ne estas foriginda. «93-11-13»

67

{U1} 001.425.1 (+)  
 {U2} 801.316.0 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} ortografi/a vort/o \*b  
 {eo2} vort/o (1) \*b\*c  
 {de1} orthografisches Wort \*a  
 {de2} Wort \*a  
 {en1} orthographic word \*a  
 {en2} word \*a  
 {fr1} mot (du point de vue orthographique) \*a

Termino (85/317), kies skrib-formo (85/328) estas apartigita de la alia teksto per du spacetoj unu post la alia. Ekzemploj: A: \slideway; slide-way; \i F: \glissière; chemin; \i G: \Bahn \i. \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei; \*c PIV

**85/353**

Rim: ej: Tio estas la laŭvorta traduko laŭ A, F kaj G, kiu tamen ne faras sencon al mi, ĉar la en la originala Angla teksto donitaj ekzemploj ne montras tiujn du spacetojn. Cxu la difino ne devus teksti: "... per du spacetoj unu antaŭ kaj la alia post la termino?" Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53.

go: Forigu "vorto".

ej: vidu mian rimarkigon en 85/352.

=93/049 [94-02-26]

68

{U1} 001.425.1 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} kun'met/it/a vort/o \*b  
{de1} zusammengesetztes Wort \*a  
{de2} Zusammensetzung \*a  
{de3} Kompositum \*a  
{en1} compound \*a  
{en2} compound word \*a  
{fr1} mot composé \*a

Vorto - → ortografia vorto (85/353) aŭ antaŭ ĉio → vorto en sintaksa senco (85/352), kies senperaj komponantoj (=85/344) estas radikoj (85/347) aŭ derivaĵoj (85/355). Ekzemploj: \slide way; slideway; gvidrelo; gvid-relo.ĵi \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ej;

### 85/354

Rim: ej: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53 kaj ankaŭ ne en R 1087 de 1990. =93/062 [94-02-26]

69

{U1} 001.425.1 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} deriv/aj/o (1) \*b\*c  
{eo2} deriv/it/a vort/o \*b  
{de1} abgeleitetes Wort \*a  
{de2} Ableitung \*a  
{de3} Derivation \*a  
{en1} derivative \*a  
{en2} derivative word \*a  
{en3} derived word \*a  
{fr1} mot dérivé \*a

→ Ortografia vorto (85/353), en kiu unu « en Esperanto estas aldonenda: aŭ pli » el la → senperaj komponantoj (=85/344) estas afikso(j) (85/348). Ekzemploj: \skrap/ator/o; antaŭ'ir/i. ĵi \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ej; \*c PIV;

### 85/355

Rim: =[86/056] =93/059 [94-02-26]

70

{U1} 001.425.1 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} radik-vort/o \*b  
{de1} Stammwort \*a  
{de2} Wurzelwort \*a  
{en1} root-word \*a  
{en2} morpheme-word \*a  
{fr1} mot-racine \*a

→ Ortografia vorto (85/353), kiu konsistas el unu sola leksemo (85/346), el radiko (85/347). « En Esperanto radik-vorto enhavas aŭ ne enhavas gramatikan finaĵon (65) » Ekzemploj: \termin/o; vort/oj; rel/on; unu; por.ĵi \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ej;

### 85/356

Rim: ej: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53. «93-11-13»

71

{U1} 001.425.1 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} vort-famili/o \*b  
{de1} Wortfamilie \*a  
{en1} word family \*a  
{fr1} famille de mots \*a

Grupo de → derivitaj vortoj (85/355) el unu sama radiko kaj de kunmetitaj vortoj (85/354) kun tiu radiko. Ekzemploj: \patr/o; patr/in/o; bo'patr/o; bo'ge'patr/oj; patr/uj/o; patr/o-land/o.ĵi \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ej;

### 85/357

Rim: ej: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53. «93-11-13»

72

{U1} 001.425.1 (+)  
{U2} 801.314.6 (+)  
{U3} 801.561.8  
{T1} RBN  
{eo1} vort-grup/o \*b  
{de1} Phrase \*a  
{de2} Wortgruppe \*a  
{en1} phrase \*a  
{en2} word group \*a  
{fr1} locution \*a  
{fr2} groupe (de mots) \*a

Termino (85/317) konsistanta el kelkaj → ortografiaj vortoj (85/353). Ekzemploj: =85/359, 360. \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ej;

### 85/358

Rim: =86/060, 88/122

wor (90-07-19): Nek {en1}, nek {en2} devas konsisti el pli ol unu ortografiaj vortoj. Por mi ankaŭ ne "vort-grupo" tion devas. Klariga analogio: molekulo ne devas havi pli ol unu atomo. «93-11-13»

73

{U1} 001.425.1 (+)  
{U2} 801.314.6 (+)  
{U3} 801.561.8  
{T1} RBN  
{eo1} sintaks/a vort-grup/o \*b  
{de1} syntaktische Phrase \*a  
{en1} syntactic phrase \*a  
{fr1} groupe syntaxique (de mots) \*a

Vort-grupo (85/358), kies komponantoj

(85/344) estas sintakse interligataj, t.e. per rilato karakteriza por fraz-strukturoj. Ekzemploj:  $\mathbb{V}$  Skrapatoro por tranĉado de rapidumaj dentoj; tranĉado de dentoj; konikaj dentoj.  $\mathbb{V}$  \*b laŭ \*a  
Fon: \*a R1087; \*b ei;

### 85/359

Rim: ei: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53. «93-11-13»  
74

{U1} 001.425.1 (+)  
{U2} 801.314.6 (+)  
{U3} 801.561.8  
{T1} RBN  
{eo1} ne'sintaks/a vort-grupo \*b  
{de1} asyntaktische Phrase \*a  
{en1} asyntactic phrase \*a  
{fr1} groupe asyntaxique (de mots) \*a

Vort-grupo (85/358), kies komponantoj (85/344) estas nesintakse interligataj, t.e. per rilato karakteriza por la strukturo de  $\rightarrow$  kunmetitaj vortoj (85/354). « Nesintaksaj vort-grupoj ne ekzistas en Esperanto. » Ili estas maloftaj en la Franca, Germana kaj Rusa, sed ne en la Angla. Ekzemplo:  $\mathbb{V}$  La nesintaksa vort-grupo "slide way" estas sinonima kun la ortografia vorto (85/353) "slideway".  $\mathbb{V}$  \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei;

### 85/360

Rim: ei: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53. «93-11-13»  
3.4.2 Terminologia analizo de kompleksaj terminoj (n-roj 75 ĝis 79)  
75

{U1} 001.425.2 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} terminologi/a signif/o-analiz/o (de termino) \*b  
{de1} terminologische Analyse (eines Terminus) \*a  
{de2} terminologische Analyse der Bedeutung (eines Terminus) \*a  
{en1} terminological analysis (of a term) \*a  
{en2} terminological analysis of the meaning (of a term) \*a  
{fr1} analyse terminologique (du sens) (d'un terme) \*a

La studo pri la signifo (85/369) de la komponantoj (85/344) de  $\rightarrow$  kompleksa termino (85/342), pri la implicitaj ideoj, kaj pri la  $\rightarrow$  rezulta signifo (85/370) de la termino. Ekzemplo: =85/363. \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei;

### 85/361

Rim: =86/102. wor (90-07-19): Bv. kompari (85/343) kaj noti, ke ĉi tie analizo ne egalas dismeton. «93-11-13»  
76

{U1} 001.425.2 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} determin/it/a kompon/ant/o \*b  
{de1} bestimmte Konstituente \*a  
{de2} bestimmtes Glied \*a  
{en1} determined constituent \*a  
{en2} determined member \*a  
{fr1} composant déterminé \*a

La baza komponanto (85/344) de  $\rightarrow$  kompleksa termino (85/342). Gxi estas la superordigita nocio (85/291) por la  $\rightarrow$  rezulta signifo (85/370) de la termino. Ekzemplo: =85/363. \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei;

### 85/362

Rim: ei: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53. «93-11-13»  
77

{U1} 001.425.2 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} determin/ant/a kompon/ant/o \*b  
{de1} bestimmende Konstituente \*a  
{de2} bestimmendes Glied \*a  
{de3} Bestimmungsglied \*a  
{en1} determining constituent \*a  
{en2} determining member \*a  
{en3} sub-member \*a  
{fr1} composant déterminant \*a

La al  $\rightarrow$  kompleksa termino (85/342) aldonita komponanto. Gxi indikas karakterizojn (85/289), kiu transformas la superordigitan nocion (85/291), kiu estas specifita per  $\rightarrow$  determinita komponanto (85/362), en subordigitan nocion (85/292).

$\mathbb{V}$  Ekzemplo:  $\mathbb{V}$  En la termino "rabot-maŝino" la komponanto "maŝino" estas la  $\rightarrow$  determinita komponanto (76), la resto de la termino estas la determinanta komponanto. \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei;

### 85/363

Rim: ei: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53. «93-11-13»  
78

{U1} 001.425.2 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} logik/a radik/o (en vort-familio) \*b  
{de1} logische Wurzel (einer Wortfamilie) \*a  
{en1} logical root (of a word family) \*a  
{fr1} racine logique (d'une famille de mots) \*a

Radiko (85/347) de vort-familio (85/357), indikanta fundamentan nocion (85/288) komunan al la tuta familio.

Gxenerale la logikan radikon formas radik-vorto (85/356). En kelkaj lingvoj tamen ne ekzistas radik-vorto, aŭ ĝi ekzistas nur etimologie.

$\mathbb{V}$  Ekzemploj:  $\mathbb{V}$  La radik-vortoj de la «Anglaj» vort-familioj "eruption, eruptive" kaj "intelligent, intelligence" estis uzataj en la Latina

(erumpere, intelligere); en la Franca tamen ili malaperis. En la Angla nur la modifita radik-vorto "erupt" restis. «Sed en Esperanto ekzistas la radiko "erupci/" kaj la radik-vortoj "erupcio, erupcia, erupcii".» \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei;

### 85/364

Rim: ei: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53. «93-11-13»

79

{U1} 001.425.2 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} sistem/aj termin/oj \*b  
{de1} systematische Termini \*a  
{en1} systematic terms \*a  
{fr1} termes systématiques \*a

Serio de → kompleksaj terminoj (56), kies strukturo reflektas la strukturon de nocio-sistemo (9).  
Ekzemploj: La kemiaj terminoj  $\setminus$  metano, etano, propano, butano, pentano, heksano, heptano, oktano ktp.; eteno/etileno, propeno/ propileno,  $\setminus$ ... ktp. (La terminoj finiĝantaj per -ileno estas pli malnovaj, sed en etnaj lingvoj ankoraŭ pli uzataj ol tiuj finiĝantaj per -eno, kvankam la lastaj estas rekomenditaj de la Internacia Unio por Pura kaj Aplikata Kemio.) \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei;

### 85/365

Rim: ei: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53.

wor (90-07-19): La senco de "sistema" ĉi tie ŝajnas malpli vasta ol tiu en 85/300 kaj 85/302.

«93-11-13»

3.4.3 Senco-transigo (n-roj 80 ĝis 82)

80

{U1} 001.425.3 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} trans'ig/it/a termin/o \*b  
{de1} übertragener Terminus \*a  
{en1} transferred term \*a  
{fr1} terme transféré \*a

Termino (31) uzata kun modifita ("transigita", 82) senco.  $\setminus$ Ekzemploj: Vidu 82. \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei;

### 85/366

Rim: ei: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53. «93-11-13»

81

{U1} 001.425.3 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} primar/a senc/o \*b  
{eo2} baz/a senc/o \*b  
{eo3} origin/a senc/o \*b  
{eo4} primar/a signif/o \*b  
{eo5} baz/a signif/o \*b  
{eo6} origin/a signif/o \*b  
{de1} ursprüngliche Bedeutung \*a

{en1} primary meaning \*a  
{en2} basic meaning \*a  
{en3} original meaning \*a  
{en4} primary sense \*a  
{en5} basic sense \*a  
{en6} original sense \*a  
{fr1} sens propre \*a

La primitiva signifo de → transigita termino (80).  
Ekzemplo: Vidu 82. \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei;

### 85/367

Rim: ei: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53.

go: Forigu {eo1}, {eo2}, {eo3}, uzu nur "signifo".

ei: Laŭ la difino de 85/367 la terminoj kun "senco" estas pli trafaj, ĉar ĝin PIV difinas: "Maniero, kiel vorto aŭ frazo estas komprenota", dum signifo: "Esenca kaj kerna ideo montrita de io". "Oni povas paroli pri la signifo de signo, sed ne pri ties senco. Celo de Pekoteko estas indiki ĉiujn eblajn tradukojn por difinitaj nocioj. Do {eo1-3} devus resti. «93-11-13»

82

{U1} 001.425.3 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} trans'ig/it/a senc/o \*b  
{eo2} trans'ig/it/a signif/o \*b  
{de1} übertragene Bedeutung \*a  
{en1} transferred meaning \*a  
{fr1} sens transféré \*a

La → rezulta signifo (84) de → transigita termino (80). Transigita senco naskiĝas el la → primara senco (81) aŭ per signifo-limigo (specialigo), per simileco (metaforo) aŭ per proksimeco (metonimio). Ekzemploj:  $\setminus$ El "kamero" (=ĉambreto) naskiĝis "kamero" (= fermita spaco en aparato) (signifo-limigo); el "kapo" (de besto) venis "kapo" (de bolto) (metaforo); "veneno" estas proksima al "morto", tial: verŝi al iu la morton (metonimio).  
\*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ei;

### 85/368

Rim: ei: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53.

wor (90-07-19): Kial ne allasi, ke transigita senco naskiĝu el alia jam ekzistanta transigita senco? Kial ankaŭ ne allasi peron de signifo-vastigo?

ei (91-08-10): Cxar tiu ĉi registraĵo estas traduko de norm-verko. Sed nenio malhelpas proponi alian difinon en alia nocio-komplekso.

«93-11-13»

3.5 Interrespondado inter termino kaj nocio (nroj 83 ĝis 94)

83

{U1} 001.426 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} signif/o (1) \*b\*c  
{eo2} senc/o (1) \*b\*c  
{de1} Bedeutung (eines Terminus) \*a

{en1} meaning (of a term) \*a  
 {en2} significance (of a term) \*a  
 {en3} sense (of a term) \*a  
 {fr1} sens (d'un terme) \*a  
 {fr2} signification (d'un terme) \*a  
 Nocio (85/288) respondanta al iu termino (85/317). \*b laŭ \*a  
Fon: \*a R1087; \*b ej;

### 85/369

Rim: ej: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53. «93-11-13»  
 84

{U1} 001.426 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} rezult/a senc/o (de termino) \*b  
 {eo2} rezult/a signif/o (de termino) \*b  
 {de1} resultierende Bedeutung (eines Terminus) \*a  
 {en1} resultant meaning (of a term) \*a  
 {fr1} sens résultant (d'un terme) \*a  
 Signifo (85/36983) de → kompleksa termino (85/342) aŭ de → transigita termino (85/366) kiel rezulto de → terminologia signifoanalizo (85/361). Antonimo: → laŭmorfema senc/o (85/340). Ekzemplo: =85/368. \*b laŭ \*a  
Fon: \*a R1087; \*b ej;

### 85/370

Rim: ej: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53. «93-11-13»  
 85

{U1} 001.426 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} noci/o-nom/o \*b  
 {eo2} nom/o (de nocio) \*b  
 {de1} verbale Bezeichnung \*a  
 {de2} Bezeichnung \*a  
 {de3} Name (eines Begriffs) \*a  
 {en1} verbal designation \*a  
 {en2} designation \*a  
 {en3} name (of a concept) \*a  
 {fr1} dénomination \*a  
 {fr2} appellation \*a  
 {fr3} nom (d'une notion) \*a  
 Termino (85/317), kiu respondas al iu nocio (85/288). \*b laŭ \*a  
Fon: \*a R1087; \*b ej;

### 85/371

Rim: ej: =93/036 [94-02-26]  
 86

{U1} 001.426 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} unu-senc/a (termino) \*b  
 {eo2} unu-signif/a (termino) \*b  
 {de1} einwertig (ein Terminus) \*a  
 {de2} monovalent \*a  
 {en1} one-valued (a term) \*a  
 {en2} single-valued (a term) \*a

{en3} monovalent (a term) \*a  
 {fr1} à un seul sens (terme) \*a  
 {fr2} monovalent \*a  
 Havanta nur unu solan sencon [signifon] (85/369). Substantivo indikanta tiun kvaliton: unusenceco [unusignifeco]. \*b laŭ \*a  
Fon: \*a R1087; \*b ej;

### 85/372

Rim: ej: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53. «93-11-13»  
 87

{U1} 001.426 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} monosemi\*\*/a (termino) \*b  
 {de1} monosem (ein Terminus) \*a  
 {en1} monosemantic (a term) \*a  
 {en2} monosemous (a term) \*a  
 {fr1} monosémique \*a  
 Ne estanta polisemia (85/375). Substantivo indikanta tiun kvaliton: monosemio. \*b laŭ \*a  
Fon: \*a R1087; \*b ej;

### 85/373

Rim: =86/038 ej: Kio estas la diferenco inter 85/372 kaj 373?, =85/375.  
 =93/037 [94-02-26]  
 88

{U1} 001.426 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} plur'signif/a (termino) \*b  
 {eo2} plur'senc/a (termino) \*b  
 {de1} mehrwertig (ein Terminus) \*a  
 {de2} multivalent (ein Terminus) \*a  
 {de3} plurivalent (ein Terminus) \*a  
 {en1} many-valued (a term) \*a  
 {en2} multiple-valued (a term) \*a  
 {en3} plurivalent (a term) \*a  
 {fr1} à plusieurs sens (terme) \*a  
 {fr2} plurivalent \*a  
 Havanta du aŭ pli da signifoj [sencoj] (85/369). Substantivo indikanta tiun ĉi kvaliton: plursenceco. Polisemio (=85/375) aŭ homonimio (=85/376) havas la kvaliton de plursenceco. \*b laŭ \*a  
Fon: \*a R1087; \*b ej;

### 85/374

Rim: ej: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53. «93-11-13»  
 89

{U1} 001.426 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} polisemi\*\*/a (termino) \*b  
 {de1} polysem (ein Terminus) \*a  
 {en1} polysemantic (a term) \*a  
 {en2} polysemous (a term) \*a  
 {fr1} polysémique (terme) \*a  
 Havanta du aŭ pli da interdependaj sencoj (85/369). Substantivo indikanta tiun kvaliton:

polisemio. Polisemia termino estas nomata "polisemo". Polisemion kaŭzas senco-transigo (=85/368) aŭ malsama interpreto de → kompleksa termino (85/342). Ekzemplo: \La vorto "kapo" povas indiki parton de vivanta korpo aŭ parton de objekto.\i \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ej;

### 85/375

Rim: =86/040 go: Kion signifas "interdependaj sencoj?" Cxu la kvin signifoj de "kanono" en PIV estas interdependaj aŭ sendependaj?

ej: Mi tradukis : \Having two or more interdependent meanings/ Qui a plusieurs sens interdépendants.\i En la ekzemploj donitaj \thead/talon litemas pri transigitaj signifoj. La tri signifoj de "kanono" en PIV laŭ mia opinio estas sendependaj, ĉar ne temas pri transigitaj signifoj.

=93/040 [94-02-26]

90

{U1} 001.426 (+)

{T1} RBN

{eo1} homonim/aj (terminoj) \*b

{de1} homonym (mehrere Termini) \*a

{en1} homonymous (several terms) \*a

{fr1} homonymes (adj. termes) \*a

Identaj laŭ ilia ekstera formo (85/326 aŭ 328), sed malsimilaj laŭ origino kaj signifoj (85/369). Du homonimoj estas "homofonoj" aŭ "homografoj" depende ĉu identas iliaj son-formoj (85/326) aŭ skrib-formoj (85/328). Tiu ĉi difino respondas al la uzado en la plej multaj lingvoj. La Anglaj terminoj "homonymous" kaj "homonyms" tamen multe pli ofte estas uzataj en la pli mallarĝa signifo de homofona kaj homofono. Ekzemploj: \A: "son"(=filo) "sun" (=suno) estas homofonoj.\i « Homofonoj ne ekzistas en Esperanto.»

La du Anglaj vortoj "tear" prononcataj aŭ kiel "tir" (=larmino) aŭ kiel "ter" (=ŝiri) estas homografoj. « Ankaŭ homografoj ne ekzistas en Esperanto. Tamen ekzistas en ĝi malmultaj veraj homonimoj: ero (=parto), ero (=erao).»

Rimarkigo: Ofte oni ne distingas en terminologia leksikografio inter homonimoj kaj diversaj signifoj de polisemoj (=85/375). Cxi-okaze la termino homonimo estas pli larĝsence uzata kaj entenas ambaŭ terminojn. \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ej;

### 85/376

Rim: =86/041 go: Homofonoj ja ekzistas en Esperanto: "bato" kaj "bat'o"; "koro" kaj "kor'o". Ankaŭ homografoj troviĝas en la lingvo: "ero" (elemento de objekto) kaj "ero" (jarkalkulo). Ankoraŭ du ekzemploj: "vasko" (gentnomo) kaj "vasko" (konkego de fontano); kaj "basko" (gentnomo) kaj "basko" (parto de vesto).

ej: "bat'o", "kor'o" estis provoj de Zamenhof per artefikaĵo eviti homonimojn. Laŭ mia scio feliĉe neniu post Zamenhof aplikis tiun trukon ĉe aliaj vortoj por eviti homonimecon, ĉar lerni tiujn

distingojn estus pli malfacila ol je paronimoj. go evidente miskomprenis la signifon de "homografo". La 9-a Regulo de la 16-regula gramatiketo de Esperanto postulas: "Cxiu vorto estas legata, kiel ĝi estas skribita". Tial ne povas ekzisti en nia lingvo vortoj, kiuj estas same skribitaj sed malsame prononcataj, kiel ekz-e en la Angla \lead'i, kiu estas prononcenda "li:d", se temas pri gvida funkcio aŭ rolo, kaj "led", se temas pri plumbo (= homografoj). "ero" estas homonimo kaj ne homografo, kiel mi menciis supre. "vasko" kaj "basko" estas homonimoj kaj ne homografoj, se oni skribas ilin kiel go. Ili fariĝas homofonoj, se oni distingas la gento-nomojn per majusklaĵ komencaj literoj, kio ŝajnas al mi rekomendinda. =93/041 [94-02-26]

91

{U1} 001.426 (+)

{T1} RBN

{eo1} ambigu/a (termino) \*b\*c

{de1} mehrdeutig (ein Terminus) \*a

{de2} uneindeutig \*a

{en1} ambiguous (a term) \*a

{en2} equivocal (a term) \*a

{fr1} équivoque (adj., terme) \*a

Havanta kelkajn signifojn (85/374), kiuj povus trafi eĉ en kunteksto (85/381). Antonimo: malambigua. \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ej; \*c PIV;

### 85/377

Rim: ej: Tiu ĉi nocio ne troviĝas en ISO/N53. «93-11-13»

92

{U1} 001.426 (+)

{T1} RBN

{eo1} sinonim/aj (terminoj) \*b\*c

{de1} synonym (mehrere Termini) \*a

{en1} synonymous (several terms) \*a

{fr1} synonymes (adj., termes) \*a

Havantaj la saman signifon (85/369) - ekzakte aŭ proksimume - sed malsamajn → eksterajn formojn (85/325). Substantivo: sinonimo. Ekzemploj: \I gazono - razeno; cefalalgio - kapdoloro.\i Rimarkigo: La plej multaj sinonimoj estas nur kvazaŭ-sinonimoj (85/379). \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ej; \*c PIV

### 85/378

Rim: =[86/039] =93/039 [94-02-26]

93

{U1} 001.426 (+)

{T1} RBN

{eo1} kvazaŭ-sinonim/aj (terminoj) \*b

{de1} quasi-synonym (mehrere Termini) \*a

{en1} quasi-synonymous (several terms) \*a

{fr1} quasi-synonymes (adj., termes) \*a

Havantaj preskaŭ la saman signifon, sed malsamajn → eksterajn formojn (85/325).

Ekzemploj: \Nemblemo - simbolo; kalva - senhara.  
\\*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ej;

**85/379**

Rim: =86/039 «93-11-13»

94

{U1} 001.426 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} respond/a ali/lingv/a termin/o \*b  
{eo2} traduk/a ekvivalent/o \*c  
{eo3} fremd-lingv/a ekvivalent/o \*c  
{eo4} laŭ'termin/a traduk/o \*ĉ  
{eo5} laŭ'vort-grup/a traduk/o \*ĉ  
{de1} fremdes Äquivalent \*a  
{de2} Übersetzungsäquivalent \*a  
{de3} entsprechender fremdsprachiger Terminus \*a  
{de4} fremde Entsprechung \*a  
{en1} foreign equivalent \*a  
{en2} translational equivalent \*a  
{en3} corresponding foreign term \*a  
{fr1} équivalent étranger \*a

Termino el alia lingvo havanta la saman → rezultan signifon (85/370). La → laŭmorfemaj sencoj (85/340) de du respondaj terminoj povas esti malsamaj; tiokaze unu ne estas "traduko" de la alia. Ekzemplo: \La Franca ekvivalento de la Angla termino "head" (of a key) (=ŝlosil-kapo) estas "talon", kies laŭmorfema traduko estus "kalkano"i.  
\*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ej; \*c go; \*ĉ wor;

**85/380** =ApE85 #032

Rim: =93/042 [94-02-26]

4. Vortaroj, glosaroj kaj terminaroj  
(Estos havebla en suplemento al tiu ISO-rekomendo.)

5. Apliko-kondiĉoj de terminoj (nro 94a)  
94a

{U1} 001.427 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} kun'tekst/o (de termino) \*b  
{de1} Kontext (eines Terminus) \*a  
{en1} context (of a term) \*a  
{fr1} contexte (d'un terme) \*a

La teksto ĉirkaŭanta la terminon (85/317) aŭ la situacio, en kiu la termino estas uzata. \*b laŭ \*a

Fon: \*a R1087; \*b ej;

**85/381**

Rim: =[86/081] =93/089 [94-02-27]

{U1} 501  
{U2} 53.085  
{U3} 681.32  
{T1} KBE  
{eo1} diĝit'/a \*a\*b\*c \*d  
{eo2} cifer/ec/a \*g

{de1} digital \*d\*f\*ĝ  
{en1} digital \*c\*ĉ  
{fr1} numérique \*ĉ  
{fr2} digital(e) \*h\*i  
{N11} digitaal \*j

Funkcianta per, respondanta al, aŭ alimaniere rilatanta al la uzado de nekontinuuaj unuoj (ili povas esti ciferoj) por prezenti aritmetikajn nombrojn, alproksimiĝojn al nombroj de kontinuo, aŭ por prezenti logikajn esprimojn aŭ variablojn. Antonimo: analoga (85/412). \*e

Apartenanta al dataoj (85/476), kiuj estas prezentataj per ciferoj. \*e laŭ ĉ.

Apartenanta al dataoj en formo de ciferoj. (85/487) \*e laŭ \*j.

Fon: \*a SV 69/13a; \*b IK 84/3; \*c Comp; \*ĉ GES/NGI-12; \*d KBT; \*e ej; \*f Mikro-comp-Lex; \*g Cab; \*ĝ iwt-Wö; \*h TANDY; \*i ShZ; \*j McGraw; \*j DEE;

**85/382**

Rim: pok: La malkontinuuaj unuoj matematike ekvivalentas al ciferoj, kio pravigas la metaforon {eo2}, uzatan en Ru kaj Fr (male al En kaj De).

ej: pok pravas: la Esperanta termino por la Angla \digitù estas "cifero" (=88/073). Tamen {eo1} estas laŭ mi preferinda, ĉar temas pri ofte ankaŭ en aliaj fakoj aplikata nova nocio, kiu meritas apartan radikon: diĝita horloĝo, diĝitigita bildo, diĝita sonregistraĵo. Mi intencas publikigi registraĵserion en kiu {eo1} pli taŭgas ol {eo2}.

«91-08-09»

{U1} 681.327.28  
{T1} KCA  
{eo1} blat/o <2> \*a  
{eo2} ĉip/o (1) \*b\*c\*d  
{eo3} split/o <3> \*j  
{de1} Chip \*f\*ĝ\*h  
{de2} Halbleiterchip \*ĥ  
{en1} chip \*e  
{fi1} siru \*j  
{fr1} puce \*ĉ  
{fr2} microplaquette \*ĉ  
{fr3} pastille \*ĉ

Duonpreta duonkonduktanta aranĝaĵo, formita substrato (85/433), en kiu troviĝas jam ĉiuj aktivaj kaŭ (85/409) pasivaj elementoj de transistoro, diodo, ico (85/410), ktp., produktitaj per procedoj de difuzado, pasivigo, maskado, foto-rezistado kaŭ → epitaksia kreskado. (89/274). Se ~o estas provizita per kontaktiloj oni nomu ĝin integrita cirkvitaro aŭ ico (85/410), sed fak-jargone la vorto ~o estas uzata ankaŭ kiel sinonimo por ico. Ekzistas jenaj tipoj: logikaj ~oj (89/275), memor--oj (89/276), sur--aj komputiloj (89/277), andikoj (89/278), special-celaj ~oj (89/279), programeraj ~oj (89/280) bit-diskaj ~oj (89/281) \*g laŭ \*i;

Fon: \*a hal, AkSt85,p315; \*b IK85/2; \*c SV77/25c; \*ĉ GES/NGI-12; \*d PIVS \*f CHIP; \*g ej; \*ĝ iwt-Wö; \*h Mikro-comp-Lex, \*ĥ CE; \*i ComGlo; \*j rau

en EP94/4,p1;

**85/383** =ApD3.7 #516, =ApE85 #033

Rim: «94-01-30»

{U1} 159.955.1  
{T1} REA  
{eo1} kognitiv\*\*/a \*a\*b  
{de1} kognitiv  
{en1} cognitive  
{fr1}

Konscia (pri si mem kaj la ĉirkaŭo);  
heŭristike komprenkapabla, pens-kapabla. \*a

Fon: \*a AkSt85,p315; \*b E-log2,p212;

**85/384**

Rim: «88-12-16»

{U1} 771.42  
{U2} 778.1  
{T1} LEC  
{eo1} mask/o <7> \*a  
{de1} Kopiermaske \*d  
{en1} masking frame \*b  
{fr1} cache \*c

Maldiafana folio el kartono, plasto aŭ  
metalo uzata de fotografisto por ~i <4>, por ke sur la  
kopio aŭ printaĵo (85/001) aperu nur parto de la  
reproduktota bildo aŭ teksto. =85/387. EB 112/22.  
\*a

Fon: \*a SV 72/25a; \*b DB-En; \*c DB-Fr; \*d DB-  
De;

**85/385**

Rim: «88-12-16»

{U1} 621.391.7  
{U2} 681.325.53  
{T1} KEE  
{eo1} mask/o <8> \*a  
{de1} Maske f\*b  
{en1} mask \*b\*c  
{fr1} masque \*c

8a Karto traruita per rektanguletoj, laŭ  
interkonsentita distribuo, por elstarigi nur la en tiuj  
"fenestroj" aperantajn vortojn aŭ simbolojn, ekz-e  
por povi legi sekretan mesaĝon kaŝitan interne de  
banala teksto.

8b Analoga sistemo por elektronika  
elfiltrado de informoj. \*a

Karaktro-paterno (89/087) uzata por  
determini la retenon aŭ eliminon de partoj de alia  
karaktro-paterno. \*ĉ laŭ \*c

Fon: \*a hal AkSt85,p315; \*b iwt-Wö; \*c GES/NGI-  
12; \*ĉ ej;

**85/386**

Rim: «91-01-11»

{U1} 771.42  
{U2} 778.1  
{T1} LEC  
{eo1} mask/o-kadr/o \*a  
{de1} Abdeckrahmen \*d

{de2} Vergrößerungsrahmen \*d  
{en1} composing frame \*b  
{en2} enlargement frame \*b  
{fr1} cadre de recouvrement \*c  
{fr2} cadre d'agrandissement \*c

Parto de projekcia print-aparato (85/001),  
kiu forprenas la ne reproduktotan bild-parton. EB  
112/34. \*a

Fon: \*a SV72/25a; \*b DB-En; \*c DB-Fr; \*d DB-De

**85/387**

Rim: «88-12-16»

{U1} 681.326.3  
{T1} KEG  
{eo1} metagraf\*\*/i tr \*a  
{eo2} kompil/i <2> \*b  
{eo3} kompil/i \*b  
{eo4} kompil/um/i \*c\*e  
{de1} kompilieren \*f  
{de2} übersetzen \*d\*f  
{de3} umwandeln \*f  
{en1} compile \*ĉ  
{fr1} compiler \*ĉ

Prepari komputoran programon pere de  
alilingva programo. Transskribi programon. (el:  
meta = trans; graf = skrib') \*a

Traduki komputoran programon el  
problem-orientita lingvo (86/180) al komputor-  
orientita lingvo (86/179). \*e laŭ ĉ

Fon: \*a hal (AkSt85,p315); \*b Comp; \*c KKV; \*ĉ  
GES/NGI-12; \*d Mikro-comp-Lex; \*e ej; \*f iwt-  
Wö;

**85/388** =ApE85 #034

Rim: ej: "metagrafi" indikas per Grekaj radikoj  
nenion alian ol "transskribi". Tial tiu termino laŭ mi  
ne estas sufiĉe priskriba. {eo2} havas en nia lingvo  
jam tute alian signifon, kiu povus kaŭzi  
miskomprenon. {eo3} (= uzi kompilon <PIV>)  
eblas. Sed la termino "kompilero" mispensigas pri  
ero de kompila laboro (=85/389). Tial, kvankam mi  
klopodas eviti la -um-vortojn, la termino  
"kompilumi" ŝajnas al mi la plej taŭga.

wor (90-07-19): Pri {eo1}: Laŭ mi ne  
sufiĉe analizita. Uzo de "graf" mem ŝajnas ne PIV-  
a. Pri {eo3}: Malkonsilinda, ĉar Anglisma k ĉar "-  
er" vole nevole estas sufikso ("kompil" ja estas  
radiko kun koncerna senco). Tiu "-er" havas mortan  
sencan pri ilo. Ak ej pri konfuzeblo kun viva senco  
pri elemento. Pri {eo4}: La sufikso /-um/, kiam ne  
sistema (85/365) (ekz: nazumo, kolumo, plandumo,  
...), estas laŭ mi afiksa paronimigilo. Por lingvo-  
uzanto paronimoj estas multe pli konfuzaj ol estas  
homonimoj. Se oni nun akceptos {eo4}-n, la sufikso  
"-um" vole nevole laŭ mi poste forfalos.

Pri {eo2}: Angle ~i kaj kompili (1)  
maksimume estas "homonimaj"; tio miasperte ne  
konfuzas la lingvo-uzanton. Fakte, ~i estas  
ekzemplo aŭ hiponimo de kompili (1), ĉar la maŝino  
ja deprenas el aliaj pretaj fontoj instrukciar-blokojn  
k, kunmetante tiujn blokojn laŭ plano priskribita en

la "tradukata" teksto, verkas neoriginale. Tio estas multe pli simpla agado ol tradukado -- ĝi proksimas al transkribado. Sxajnas do pli logike forigi numeron "<2>" en {eo2}, ĉar "kompili (1)" jam ampleksas la celatan sencon.

Trafa serĉo por nova termino por 85/388 el la perspektivo, traduki, celu laŭ mi la jenajn karakterizaĵojn: 1. stamo ne pli longa ol estas "kompil/"; 2. evito de paronimoj; 3. sinmotiveco: (a) aludo al tradukado; (b) aludo al direkto de tradukado -- de blokaj diroj al ties eroj (tian aludon faras {eo2}). Iuj eblaĵoj: "fajnduki" (el "fajnage traduki"), erduki (erige traduki), erigi kaj malbloki (surbaze de bloko <3>).

ei (91-08-10): Mi ne konsentas kun wor: kompili <2> estas tute alispeca agado ol kompili (1), kiu nepre meritas distingon terminon: Se mi per apliko de makrooj (89/317) duon-aŭtomate kompilas indekson por Pekoteko-terminoj pere de mia komputoro, tiam tio estas tute alispeca agado ol konverti programon aŭ registraĵon al maŝin-kodo. Se oni ŝpareme uzas "-um/" ĝi ja estas utila -- neniu dirus "nazo" aŭ "kolo" anstataŭ "nazumo" aŭ "kolumo", kaj same mi ne opinias, ke "-um" forfalos el "kompilumi". Ni zorgu, ke nia lingvo ne fariĝu same ambigua kiel la Angla. Ni povas kontraŭi tiuspecan degeneradon, la Angla-lingvanoj ne, ĉar ili uzas dekomence ambiguajn terminojn. Tio povos esti decida avantaĝo por Esperanto.

wor (91-11-11): "um" en "kompilumi" kaj "um" en "nazumo", "kolumo" ktp ne estas laŭ mi kompareblaj, ĉar, kiel mi atentigis supre en 90-07-19, tiuj lastaj estas sistemaj kaj ilia "um" signifas ion kiel: 'portajo destinita por la koncerna korpoparto'.

ei (91-12-31): La baza difino por "-um/" laŭ PIV. estas: \Suf. sen difinita senco\i. Do ĝi estas utiligebla ĉiucele por atribui novan distingindan signifon al iu ajn vorto. Ne ĝenas, ke krome ekzistas kvar difineblaj signifoj de "-um/". Kontraste al la de wor proponitaj novaj terminoj {eo4} estas facile memorigebla, ĉar \to compile\i estas internacie vaste konata.

«91-12-31»

```
{U1} 681.326.3
{T1} KEG
{eo1} kompilero (1) *a
{eo2} kompililo *b*c*d
{eo3} kompilum/ap**o *e
{de1} Kompilierer *d*f*ĝ
{de2} Übersetzer *f
{de3} Compiler *ĝ
{en1} compiler *d
{fr1} compilateur *ĉ*d
{fr2} programme de compilation *ĉ
```

Programo, kiu tradukas altnivelan komputoran lingvon en absolutan kodaĵon aŭ en asemblan lingvon (85/450). La fonto-kodaĵo metata en la ~on estas priskribo de algoritmo (91/017) aŭ programo en al iu problemo adaptita program-

lingvo. La eliranta kodaĵo estas la ekvivalenta priskribo de la algoritmo en maŝin-taŭga lingvo. \*e laŭ \*g

Fon: \*a PIV; \*b Comp; \*c IK 84/3; \*ĉ GES/NGI-12; \*d KBT; \*e ei; \*f Mikro-comp-Lex; \*g COMPUT; \*ĝ iwt-Wö;

**85/389 =ApE85 #035**

Rim: ei (88-12-16): {eo1} ne plaĉas al mi, ĉar ĝi pensigas pri ero de kompilaĵo; {eo2} ne plaĉas al mi, ĉar temas pri ilo, kiu "kompilas" (= verki ne originale). Mi rekomendus uzi la sufikson -il- kiel eble plej malofte (=89/380), kaj trovi por specialaj iloj novajn vortojn aŭ sufiksojn. Por komputora programo mi elpensis la sufikson -ap-. (85/432).

wor (1990-07-19): Pri {eo2}: Gxis ĝenerala (esperinda) akcepto de -ap-, {eo2} estas laŭ mi konvena, ĉar logika. Laŭ mi, ~o ja estas ilo (=tio, kio servas por efektiviĝi ion) uzata de la maŝino por kompili <1> (=verki ne originale); (=85/388). Pri "-il": Laŭ mia kompreno pri Esperantismo, sub intergenta interkompreno ĉefcelo estas Klaro. Post tio en ordinara teksto pli gravas Facilo ol Precizo, dum en teĥnika faka teksto pli gravas Precizo ol Facilo. Do, en ordinara teksto -il- estas preferinda ĉiam, kiam la rezulta senco en kunteksto ne tiom ampleksas, ke klareco difektigas. Tiaokaze, oni bezonus hiponimon. En preciza teĥnika teksto tamen oni povas prave preferi hiponimon. Konklude: "kompililo" eksterfake, kaj "kompilapo" enfake. «91-08-10»

```
{U1} 621.394.67
{U2} 681.3.023.42 (+)
{T1} KED
{eo1} modem"/o (1) *a*b
{de1} Modem *b*f
{de2} MODEM *e
{de3} Akustikkoppler m *f
{en1} modem *c*ĉ
{fr1} modem *c*ĉ
```

Akronimo el "modulato" kaj "demodulato" (=malmodulato). Aparato por konverti diĝitajn (85/382) signalojn al analogaj (85/390) signaloj taŭgaj por transmisio tra analogaj komunik-kanalo (=modulato) kaj por rekonverti la ricevatajn analogajn signalojn al diĝitaj (=malmodulato). Oni dezajnas (85/411) ~ojn por akordigi ilin kun naciaj kaj internaciaj normoj, por ke aparatoj de diversaj fabrikintoj povu "paroli" al aparatoj de aliaj fabrikintoj. \*d laŭ \*c

Fon: \*a Comp; \*b KTB; \*c COMPUT; \*ĉ GES/NGI-12; \*d ei; \*e Mikro-comp-Lex; \*f iwt-Wö;

**85/390**

Rim: «93-11-13»

```
{U1} 6
{U2} 621.3
{U3} 681.3
{T1} KEE
```

{T2} KGM  
 {eo1} modul"/o (1,2) \*a\*b  
 {eo2} modul/o <5> \*c\*ĉ\*d  
 {de1} Modul *m* \*d\*f  
 {de2} Baustein *m* \*f  
 {de3} Funktionseinheit *f* \*f  
 {de4} Baukasten *m* \*g  
 {de5} Element *n* \*g  
 {en1} module \*e\*f  
 {fr1} module \*e

1. Disigebla kaj kun aliaj ~oj interŝanĝebla materia parto de kompleksa sistemo. ~a konstruado de domoj kaj mebloj; ~a ŝranko EB#44/25; sur-Luniĝa ~o. Evidente tiu ĉi nocio estas tre ĝenerala: kartoĉoj estas cilindraj ~oj; komputoraj kartoj, diskedoj, kasedoj, ĉiuj estas disigeblaj kaj interŝanĝeblaj kaj pro tio ~oj. Pli ĝeneralan nocion havas unajo (89/044), kiu ne devas esti interŝanĝebla, do laŭnorme farita. Aliflanke unajoniam estas programo. \*a

2. Programo, kiu estas apartigebla kaj identigebla, ekz. ŝargapo (85/441) aŭ rezult-modjulo (85/456). ~a programado; \*a laŭ \*e.

Fon: \*a ei en AkSt85,p.241 kaj en EB; \*b PIVS; \*c Comp; \*ĉ IK 84/3; \*d KBT; \*e GES/NGI-12; \*f Mikro-comp-Lex; \*g iwt-Wö;

**85/391** =ApE85 #036

Rim: ei: {eo2} laŭ mia opinio ne taŭgas por tiu nocio, ĉar "modulo" havas jam kvar aliajn signifojn en PIV, kaj krome ekzistas la verbo "moduli" kun ankoraŭ aliaj sencoj. Ekzistas nun multaj aliaj module konstruitaj skatoloj aŭ ujoj utiligitaj por stori dataojn. Por ili mi proponas la novan akronimon modujo (91/003). «91-03-06»

{U1} 681.327.634  
 {T1} KDE  
 {eo1} mol-disk/o \*a\*d  
 {eo2} disk/et/o (1) \*b\*c\*h  
 {eo3} disked\*\*/o \*d\*i  
 {eo4} fleks/abl/a disk/o \*ĝ\*h  
 {eo5} fleks/a disk/o \*ĥ  
 {eo6} supl/a disk/o \*ĥ  
 {de1} Floppy-Disk \*f\*g  
 {de2} Diskette \*f\*g  
 {de3} Floppy \*g  
 {en1} floppy disk (in an 8" square envelope) \*ĉ\*e\*  
 {en2} diskette \*b\*e  
 {en3} minifloppy (in a 5 1/4" square envelope) \*ĉ  
 {en4} microfloppy (in a rigid 3 1/2" cartridge) \*ĉ  
 {fr1} disque souple \*e  
 {fr2} disquette \*e  
 {fr3} minidisque \*e

Elkomputorigebla stor-medio (94/672), unuopa ronda fleksebla disko interne de kvadrata ujo aŭ mujo (91/003) uzata en multaj komputoroj kaj teksto-prilaboraj sistemoj. Same kiel magneta bendo ~o estas registrebla, forviŝebla kaj reuzebla denove kaj denove. Kp: durdisko

(85/393) \*d laŭ \*ĉ Fon: \*a hal en AkSt85,p.316; \*b Comp; \*c IK; \*ĉ ComGlo; \*d ei; \*e GES/NGI-12; \*f Mikro-comp-Lex; \*g iwt-Wö; \*ĝ pre en WEs88,p79; \*h PIVS; \*ĥ wor; \*i @pfei93-01-06; \*j

**85/392** =ApE85 #037

Rim: ei (94-02-20): Sxajnas al mi nun preferinde atribui laŭ \*i al ĉiuj tiuspecaj stor-medioj la terminon {eo3}, ĉar la stor-medioj mem povas esti molaj aŭ flekseblaj, sed ili troviĝas en pli-malpli rigidaj ujoj. «94-02-28»

{U1} 681.327.635 (+)  
 {T1} KDE  
 {eo1} dur-disk/o \*a\*ĉ\*i  
 {eo2} Winchester-disk/o \*b EVIT \*ĉ  
 {eo3} vinĉestr\*\*/o \*e EVIT \*ĉ  
 {eo4} vinĉestr\*\*/a disk/o \*g EVIT \*ĉ  
 {eo5} firm-disk/o \*ĝ EVIT \*ĉ  
 {eo6} mal'mol/a disk/o \*h  
 {eo7} rigid-disk/o \*j  
 {eo8} disk/o <4> \*j\*1 EVIT \*ĉ  
 {de1} Magnetplatte *f* \*d\*f\*k  
 {de2} Hartplatte *f* \*k  
 {en1} hard disk \*c\*d\*k  
 {en2} metallic disk \*c  
 {en3} magnetic disk \*k  
 {fr1} disque dur \*ĥ

Ne el disko-drajvo (85/394) elprenebla disko por magneta registrado kune kun la drajva hardvo (85/398). La dur-disko mem konsistas el unu aŭ pluraj diskoj unu super la alia el dura alumina substrato (85/433) kovrita per aparte maldika magnetigebla tavolo. Pro la maldiko de la magnetigebla tavolo oni atingas multe pli grandan storivon ol ĉe diskedo (85/392). Al la hardvo de la durdiska drajvo apartenas flosantaj kapoj (87/500). ~a drajvo estas havebla ankaŭ sur karto, kiun oni metas kiel aliajn kartojn en personan komputoron por pligrandigi ties komputivon (=~ako 89/172). Ekzistas krome elpreneblaj ~oj, kiujn oni povas sendi per la poŝto, la t.n. data-pakoj (90/294) enmeteblaj en data-pakingon. Tiuj datapakoj fakte estas kompletaj drajvoj, en kiuj neelpreneble troviĝas ~o. La plej novaj ~oj estas moveblaj ~oj, kiuj similas al data-pakoj, sed ili ne bezonas data-pakingon, nur kablonekondan al la kablingo por la printatoro, kaj 12-voltan kurento-provizilon. Tiel oni facile povas movi grandan kvanton da dataoj de unu komputoro al alia. \*ĉ

Fon: \*a hal en AkSt85,p.316; \*b IK 84/3,p48; \*c COMPUT; \*ĉ ei; \*d Mikro-comp-Lex; \*e pok en letero al ei 87-07-19; \*f iwt-Wö; \*g kav; \*ĝ pre en WEs88, p79; \*h MpP8; \*ĥ WP5.1Fr; \*i PIVS; \*j wor; \*j @pfei93-01-06; \*k CE; \*l MON94/2,p12;

**85/393** =ApE85 #038

Rim: ei: Enkonduki vortojn kun ne-Esperantaj literoj laŭ mi ne estas rekomendinda. Mi ankaŭ rekomendus nek la neologismon de pok nek la terminon de kav, ĉar la termino \Winchester disk

jam arkaiĝis en la Angla. Ankaŭ {eo5} ne taŭgas, ĉar durdiskoj ne estas firmaj (laŭ PIV: "tiel fiksita, ke ne eblas ŝanceliĝo"). Tute male: Malavantaĝo de malnovaj durdiskaj draĵoj estis, ke ili estis tre sensitivaj kontraŭ malgrandaj skuoj. (Tial iliaj dum uzado flosantaj lego- aŭ registro-kapoj estas "parkadendaj" dum neuzo de draĵvo.)

ej (94-02-20): Nepre evitinda ŝajnas al mi ankaŭ la termino {eo8}, ĉar la disko mem estas nur relative malgranda parto en tiu ĉi komplika periferia aparato, kiu nepre devus havi klare distingeblan nomon, precipe se oni provas, kiel en la Monato-artikolo, klarigi la funkciadon de komputoro al komencantoj. «94-02-20»

{U1} 681.327.634  
 {T1} KDE  
 {eo1} disk/o-drajv"/o \*a\*1  
 {eo2} disk-aparat/o \*b  
 {eo3} disk/il/o \*c  
 {eo4} disk/et-funkci/ig/il/o \*ĉ  
 {eo5} fleks/eb1/a disk/il/o \*d  
 {eo6} fleks/eb1/a disk-unu/o \*e  
 {eo7} disk-unu/o \*f  
 {eo8} disk/o-staci/o \*k  
 {eo9} disk-funk\*\*/ig/il/o \*n  
 {eo10} disked\*\*/il/o \*o  
 {eo11} disked\*\*-aparato/o \*a  
 {eo12} disked\*\*-unaj\*\*/o \*a  
 {de1} Laufwerk \*h  
 {de2} Diskettenlaufwerk \*h  
 {de3} Plattenlaufwerk \*h\*j\*j  
 {en1} disk drive \*g  
 {en2} disk unit \*g  
 {fr1} mécanisme d'entraĴnement de disques \*i  
 {fr2} unité de disquettes \*m

Periferia aparato konektebla al aŭ konstruita en komputoro, kun rotaci-mekanismo, lego- kaj registro-kapoj kaj cirkvitaroj. ~o servas por registri dataojn (85/476) sur magnetaj aŭ optikaj diskoj kaj por legi ilin. =85/385 \*a

Fon: \*a ej; \*b IK83 p38; \*c IK84/1 p42; \*ĉ IK85/2 p59; \*d IK84/2 p19; \*e IK83 p4; \*f Comp; \*g COMPUT; \*h CHIP; \*i GES/NGI-12; \*j Mikro-comp-Lex; \*j iwt-Wö; \*k mau; \*l PIVS; \*m WP5.1Fr Ini.p6; \*n wor; \*o MON94/2,12;

**85/394** =ApE85 #039, #040

Rim: ej: Neologismo ŝajnas al mi preferinda, ĉar "draĵvo" utilas por multaj aliaj nocioj. "disko" laŭ BU, KR, WE signifas per numerdisko sur telefon-aparato elekti telefon-abonanton. Do "diskilo" devus esti nun ekzistanta aparato, kiu faciligas tiun elekton. "Disketfunkciigilo" ankaŭ ne taŭgas, ĉar disko neniam funkcias, do oni ne povus funkciigi ĝin. "Unuo" laŭ PIV estas abstrakta aŭ difinita kvanto. "stacio" estas loko, kie haltas publikaj trafikiloj, por ŝargi aŭ malŝargi pasaĝerojn aŭ varojn. En benzinstacio oni provizas sin per benzino, per la nocio de ĉi tiu komplekso oni ne provizas sin per diskoj, tial {eo8} laŭ mi ne trafas. Per ĝi oni ankaŭ ne povus

traduki kompleksojn 85/395 kaj 85/396.

W. Prent (WEs 88/9, p.79) opinias, ke "disko-aparato" estus taŭga. Laŭ mi tiu esprimo estas multe tro ĝenerala. Diskoaparato estas ankaŭ gramofono, disko-gurdo (EB 306/8), disko-ŝanĝilo (EB 306/32), disko-turnilo (EB 237/14), codoroma (89/164) legatoro (89/159) kaj multaj aliaj aparatoj, kiuj utiligas diskojn.

Draĵvo (85/395) ne ĉiam estas aparato, kiun oni uzas kun diskoj. Gxi povas esti parto de komputora memoro, kiun la programo tiel prezentas al la centra procesoro, ke tiu ĉi traktas ĝin kvazaŭ ĝi estus diskeda aŭ durdiska aparato. (=85/396)

wor (90-07-19): Mi akordas kun ej pri {eo5,6, 7} kaj malforte pri {eo2,3,4,8}. {eo4-6} estas tro longaj. Pri {eo2,3}: Mi akordas kun ej, ke ili estas ne precizaj. Tamen ili estas laŭ mi ĝustaj kaj uzeblaj eksterfakte. Pri {eo3}: temas pri mll de io, kiel "disk/o-uz/il/o" aŭ "disk/o-turn/il/o" aŭ {eo4}. Pri {eo4}: Disketo estas artefaritaĵo al kiu uzanto atribuas celon. G'i do estas ilo (=tio, kio servas por efektiviĝi ion). Kiam artefaritaĵo aŭ ilo difektiĝas kaj tial ne plu povas plenumi sian celon, oni diras, ke ĝi ne funkcias. Kiam disketo ne estas difekta kaj ja plenumas sian celon, kial oni ne diru, ke ĝi funkcias (=Plenumi la propran difinitan taskon)? Pri {eo9}: Mll de {eo4} sen la balastaĵo "ci". Pri {eo1} (=85/395).

ej (91-08-10): Kvankam PIV atribuas funkciadon al ĝenerale ĉia ilo, mi havas la impreson, ke oni en la vere uzata lingvo ne faras tion. Se mi ekzemple volas fosi per ŝpato, kaj mi konstatas, ke mi ne povus plenumi tiun laboron, ĉar fosota grundo estas tro malmola, mi ne dirus "la ŝpato ne funkcias", sed "ŝpato ne estas utiligebla por tiu ĉi laboro." Mi almenaŭ neniam dirus pri gramofona disko, ke ĝi ne funkcias, se ĝi difektiĝis kaj se pro tio la nadlo restas ĉiam en la sama kanelo. Mi dirus: "La disko ne plu estas uzebla". Sed se la turn-mekanismo ne turnas la diskon, tiam mi ja dirus, ke la gramofono ne funkcias. Analogie diskodraĵvo povas funkcii aŭ ne, sed neniam disko. Mi ne opinias, ke ni devus elimini ĉiun balastaĵon. Oni laŭ mia opinio pli facile memoros "funkcii" ol "funkci". Tiu ĉi estus falsa amiko por Germanoj, kiuj opinias, ke temas pri radio-telegrafado.

wor (91-11-11): Se fosota grundo tro malmolas, nur ironie mi povus diri, ke "la ŝpato ne funkcias". Malmoleco de grundo ne estas difekto de ilo, ŝpato. Se, kontraŭe, dum grundo sufiĉe molas, la tranĉa eĝo estas tro ŝirita kaj kurbigita, tiam mi certe diras, ke "La ŝpato ne funkcias". Verŝajne, proponinto de {eo4} ne atribuas la saman nocion al "funkcii", kiel ej. Pli grave: S'ajnas al mi nekonsilinde ŝanĝi la vastecon de PIV-a vorto sen aparta Pekoteca registraĵo "korektanta" PIV-on. Plej grave: "funkcii" estas komun-lingva vorto; laŭ mi, PIV-an konstato pri tiesa signifo oni povas dementi nur per pli profunda esploro ol tiu de PIV.

ej (91-12-31): Jen tipa ekzemplo, kiel la

denaska lingvo influas. En la Germana mi uzus la el la Franca pruntitan *Wfunktionieren* nur, se temus pri pli-malpli komplika aparato, kiu plenumas sian funkcion per kunago de diversaj teknikaj procedoj. Sed en la Angla *Wto function* simple signifas "plenumi specifan agon", tial por Usonano "La ŝpato ne funkcias" ŝajnas esti tute bona frazo. La problemon kaŭzas ne sufiĉe preciza difino en PIV: *WPlenumi la propran difinitan taskon, pp organo, maŝino k ĝenerale ĉia ilo aŭ organizo. W "...ĉia ilo" subtenus la opinion de wor, sed la poste indikitaj ekzemploj montras, ke nek ŝpato nek disko estas funkciigeblaj. Laŭ mi la Esperanta difino: (WFUNCTIONNER Remplir sa fonction; être mis en action: machine qui fonctionne automatiquement). Bv. en la enketilo indiki, la signifon, kiun ni devus atribui al "funkcii (2)".*

*ei* (94-03-03): Post mia akcepto de "diskedo" (85/392) {eo10} eble estas akceptebla, ĉar "diskedo" estas multe pli specifa termino ol la simpla "disko". Tamen mi jam ofte konsilis la kiel eble plej ŝpareman aplikon de la tre vast-signifa "-il/" (89/380). Tial {eo11} aŭ {eo12} ŝajnas al mi preferindaj, se oni nepre volas eviti la terminon {eo1}. «94-03-03»

{U1} 681.327.11  
 {T1} KEE  
 {eo1} drajv"/o \*a\*d  
 {de1} Laufwerk \*b\*c  
 {en1} drive \*b  
 {fr1} répertoire \*e

Parto de komputora sistemo aŭ de ĝia memoro, izolita de aliaj ~oj. Gxi povas esti periferia aparato aŭ mekanismo konstruita en la komputoro mem por manipuli persistantan memoron (85/472). Gxi povas ankaŭ esti per programo apartigita parto de la efemera memoro (85/415). Komputoro povas havi unu, du, tri aŭ pli da ~oj: A--o, B--o, C--o, ktp. Prompto (85/413) vidigas al la komputoranto, ke la komputoro atendas ordonon kaj al kiu ~o ĝi estas konektita. Je ekfunkciigo komputoro estas konektita al la defaŭlta ~o (85/414), kiu kutime estas la A--o, kaj kiun la maprodo (85/403) DOS indikas per: A>. En DOS oni povas ŝanĝi la ~ojn per komando, kiu konsistas el dupunkto post la litero de la dezirata ~o: A:, B:, C:. ~o-specoj: disko--o (85/394) diskeda aŭ durdiska; magnet-bend--o (86/166); ram--o (85/396). \*a

Fon: \*a Letriks; \*b Mikro-comp-Lex; \*c iwt-Wö; \*d PIVS; \*e WP5.1Fr-Ini.p6;

### 85/395

**Rim:** wor: (90-07-19) Pri la difino: La donita difino estas miksaĵo de nocioj, difinoj, komentoj, kaj komentoj pri marka normo, kiuj pli konvene trakiĝu aparte unu de la aliaj. Provo al pli bona difino:

Difino: Parto de komputora sistemo aŭ de ties memoro, izolita de aliaj ~oj.

Kom: Subnocioj:

~ [a]: periferia aparato aŭ mekanismo konstruita en la komputoro mem por manipuli neefemeran memoron. Ekz: disko--o (85/394) moldiska aŭ durdiska; magnet-bend--o (86/166).

~ [b]: per programo apartigita parto de la efemera memoro. Ekz: ram--o (85/396).

Kom: Pri ~oj ĝenerale: Komputoro povas havi unu, du, tri aŭ pli da ~oj. Prompto (85/413) vidigas al la komputoranto, ke la komputoro atendas ordonon kaj al kiu ~o ĝi estas (idee) konektita. Je ekfunkciigo komputoro estas (idee) konektita al la defaŭlta ~o (85/414), kiun oni povas ŝanĝi per komando.

Kom: Pri IBM-a maprodo (85/403) normo DOS: La ~oj nomiĝas A--o, B--o, C--o, ktp. La defaŭlta ~o kutime estas A--o. DOS indikas ĝin per: A>, ktp. La komando por ŝanĝi ~on konsistas el dupunkto post la litero de la dezirata ~o: A:, B:, C:.

Mi celis objektivan reformulon kaj mi sentas la rezulton ankoraŭ pliboniginda. Ekz:

1. La difina frazo ne sufiĉe limigas la nocion. Ekz. la elektran draton al la muro oni sendube ne konsideras ~o.

2. La difino entenu ĉiujn karakterizaĵojn, kiujn komune entenas la diversaj subnocioj. Ilin bone konstati postulas kompletan liston de subnocioj. Plibonigo eble entenu la vorton "manipuli".

Pri la nocio:

3. Sxajnas, ke la sola kialo por la nocio ~o estas ke ~ [a] kaj ~ [b] prezentiĝas same al la uzanto. Se jes, el tiu perspektivo, ~o estas posteno aŭ iluzio, kaj ~o [a] kaj ~o [b] plenumantoj. Gxuste kiel viro kaj virino ne estas hiponimoj de instruisto, tiel ~o [a] kaj ~o [b] ne konsideriĝu subnocioj de ~o. Tiaokaze, la terminoj por ~o [a] (=85/394), (=86/166) kaj ~o [b] (=85/396) ne entenu la vorton "drajvo".

4. Iomete maltrankviligas min, ke nocio pri aĵo, ~[a], kaj nocio pri ties simulaĵo, ~[b], ĉi tie ŝajnas prezentiĝi kiel subnocioj de la sama nocio ~o. Cxu terminologoj ĝenerale akceptas tion en nocio-sistemo? Se jes, ĉu ~[a] kaj ~[b] havas la saman → gradon de abstrakteco (=85/299)?

Pri {eo1}:

5. Mi kredas malkonsilinda la elekton de Angledevena termino post kontrolo de nur du lingvoj! (a) Kiam ne eblas purisma solvo kaj ne ekzistas Eŭrope internacia formo, tiam ni nepre pli bone kontrolu la plej gravajn ne-Eŭropajn lingvojn. (b) Mi kredas ĝenerale evitinda plian similigon de Esperanto al la Angla.

*ei* (91-08-10): Mi volonte konsentas, ke la difino estas pliboniginda, kaj mi dankas pro la klopodoj de wor. La problemo pri tiu nocio-komplekso estas, ke mi ĝis nun vane serĉis en miaj multaj konsult-libroj tradukindan difinon. Mi trovis difinojn por "disko-drajvo", sed ne por drajvo ĝenerale. La nocio estas tiel baza, ke ĝi troviĝas en neniu glosaro de iom detala instrulibro pri komputorado, kaj ankaŭ ne en komputika libro por

komencantoj, kiu ĝenerale klarigas, kiel komputoroj funkcias. Eĉ <McGraw>, en kiu mi preskaŭ ĉiam trovis utiligeblajn difinojn, neniel helpis. Tie estis trovebla difino nur por *ldisk drive*! Sub *ldrive*! sole <McGraw> menciis nociojn de tiu termino nur en la kampoj de elektroniko (=ekscito), mekanika inĝeriko, minado kaj psikologio. Tial mi sentis min devigita, mem krei la difinon. Ankaŭ mia literaturo en aliaj lingvoj ne helpis min. Por la ĝenerala nocio de {en1} la termino {de1} ofte ne taŭgas. En <CE> {en1} estis tradukita per *lAntrieb*, kio estus la Germana termino por la nocio de "pel-instalaĵo". Ankaŭ la termino {fr1}, kiun mi trovis en la Franc-Kanada versio de Vopo 5.1, kaj kiu signifas tradukita al Esperanto "repertuaro", ŝajnas esti maltrafa termino-elekto. Mi volonte enkondukis radikojn el aliaj lingvoj. Sed komputoroj estas fabrikataj ĉefe en Anglalingvaj landoj, aŭ almenaŭ oni aldonas uzo-instrukciojn preskaŭ nur en la Angla. Ni ne povos atendi, ĝis oni eble en iu lingvo kreos pli konvenajn terminojn. Se ni volas konkuri kun la Angla, niaj terminoj devas esti pretaj tuj, kiam oni bezonas ilin por iu novaĵo. Do ne estas eviteble, ke ni uzos la Anglan kiel font-lingvon por Esperantaj terminoj. Ankaŭ en etnaj lingvoj oni komence uzas Anglajn terminojn, kiuj estas multe pli ĝenaj tie, ĉar Anglaj terminoj devigas la homojn lerni la Anglan prononcon, dum ni en Esperanto povas devigi la homojn prononci niajn terminojn kiel Esperantajn vortojn. Cetere, ĝis nun mi ne trovis etnolingvan tradukon de Angla termino, kiu estus servinta kiel pli taŭga elirbazo por Esperanta termino. Do atendo ne estus helpinta. Ni teoriemu pri tiaj aferoj, tamen ni ne neglektu nian ĉefan taskon: rapide provizi uzeblajn terminojn, por ke ni povu apliki nian lingvon en ĉiuj novaj fakoj. <91-08-10>

{U1} 681.327.11  
 {T1} KDD  
 {T2} KEG  
 {eo1} ram-drajv"/o \*a\*d  
 {de1} virtuelles Diskettenlaufwerk *n* \*c  
 {de2} virtuelles Laufwerk *n* \*c  
 {en1} RAM drive \*f  
 {en2} electronic drive  
 {en3} dynamic drive  
 {en4} semidisk \*f  
 {en5} virtual disk \*b\*c\*g  
 {en6} memory drive \*c  
 {en7} RAM disk \*g  
 {en8} E-disk \*g  
 {en9} emulated disk \*g  
 {en10} pseudo disk \*g  
 {fr1} diske virtuel \*e

Drajvo (85/395) kreita per programo en la ramo (85/393). ~o rapidigas data-traktadon, ĉar neniuj mekanaj (87/237) funkciadoj kiel en disko-drajvo (85/394) necesas, nur data transigo en la memoro. \*a laŭ \*g

Fon: \*a *ei*; \*b WP5.1p458; \*c iwt-Wö; \*d PIVS; \*e WP5.1Frp476; \*f PMH; \*g ComGlo;

85/396

Rim: <92-01-05>

{U1} 681.327.2  
 {T1} KDD  
 {eo1} ram/o <3> \*a\*ĥ  
 {eo2} RAM- \*b  
 {eo3} operaci/a stor"/o \*c  
 {eo4} operativ\*\*/a stor"/o \*ĉ  
 {eo5} ajn-vic/a stor"/o \*d\*k  
 {eo6} ajn-vic/a memor/o \*a\*k  
 {eo7} konvenci/a memor/o \*a  
 {eo8} set"/ebl/a stor"/o \*q  
 {de1} Randomspeicher \*d\*ĵ  
 {de2} Speicher mit wahlfreiem Zugriff \*d\*ĵ  
 {de3} Direktzugriffsspeicher \*ĵ  
 {de4} RAM \*ĵ  
 {de5} Schreib-/Lesespeicher \*ĵ\*ĵ  
 {en1} random-access memory \*g\*h\*i\*ĵ  
 {en2} RAM \*g\*h\*i  
 {en3} random access storage \*i  
 {en4} random access store \*d\*ĵ  
 {en5} read-write memory \*i  
 {en6} direct access storage \*i\*ĵ  
 {en7} conventional memory \*l  
 {fr1} mémoire à accès sélectif \*i  
 {fr2} mémoire à accès direct \*h\*i  
 {fr3} mémoire vive \*h\*i  
 {fr4} mémoire active \*i  
 {fr5} mémoire conventionelle \*m  
 {fr6} RAM \*m  
 {fr7} antémémoire \*m  
 {N11} RAM \*p  
 {N12} interne geheugen \*p

Legebla kaj registrebla memoro en komputoro, en kiu la baza memorero (91/018) kapablas registri unu biton da informo. Larĝaj memoroj estas formitaj kiel dudimensiaj memoreroj. Individua memorero estas identigebla per laŭvicaj kaj laŭkolumnaj adresoj, kiuj estas derivitaj per malkodigo de adresvorto provizita de la uzanto. En ~o ĉiu memorero estas sendependa de la aliaj memoreroj kaj povas esti alirata en iu ajn sinsekvo dum sama tempoperiodo, tial la nomo: "random access" = ajnvica. ~o estas kutime efemera memoro (85/415) kaj uzata por dumtempa enmemorigo de dataj (85/476) aŭ programoj. \*a laŭ \*g.

Fon: \*a *ei*; \*b IK83 p41; \*c IK85/2 p23; \*ĉ IK84/3, p15; \*d KKV; \*e Comp; \*f KTB; \*g COMPUT; \*h GS1; \*ĥ PIVS; \*i GES/NGI-12; \*j Mikro-comp-Lex; \*ĵ iwt-Wö; \*k pok; \*l WP5.1p455; \*m WP5.1Fr,p475; \*p DOS-hl; \*q wor;

85/397 =ApE85 #041

Rim: *ei* (89/12/10): =86/140, 86/187. Laŭ \*i {en1} kaj {en5} estas sinonimoj, tamen oni uzas diversajn terminojn por substreki diversajn ecojn de la sama objekto.

wor (90-07-19): {en1-4} estas misnomoj

en la Angla, ĉar ankaŭ ROM estas ajnvica. Tial al mi ŝajnas malkonsilindaj {eo5,6} por la nuna nocio. {eo5,6} konvenas por la supernocio de RAM kaj ROM. Manke de referenco al registraĵo pri "operativa" aŭ "operat-", {eo4} estas laŭ mi evitinda. Gxi ŝajnas paronimo de "operacio", do denove evitinda. La fina parto "-iv" estas aŭ balastaĵao aŭ sufikso. Balastaĵoj ne estas enkondukindaj -- paronimo eĉ malpli. Gxis kiam ni trovos plene kontentigan solvon {eo2} ŝajnas taŭga provizoraĵo. Pri {eo8} =85/451. <91-08-10>

{U1} 681.322.25 (+)  
 {T1} KDG  
 {eo1} rigid/aĵ/ar/o \*a  
 {eo2} hardvar/o (1) \*b\*c  
 {eo3} aparat/ar/o \*b\*ĉ\*d  
 {eo4} maŝin-var/o \*f  
 {eo5} il-var/o \*g  
 {eo6} hard\*\*/o \*ĥ  
 {eo7} hardv\*\*/o \*h  
 {eo8} aparat/aĵ/o \*ĝ  
 {eo9} mal'mol/aĵ/o \*l  
 {eo10} durv\*\*/o \*k  
 {de1} Hardware \*j  
 {de2} materielle Ware \*ĉ  
 {en1} hardware \*e\*i  
 {fr1} matériel \*e\*i  
 {N11} hardware \*k

La materia parto de komputora sistemo, inkluzive de a) elektraĵ, b) elektronikaj, c) elektromekanikaj kaj ĉ) mekanaj konstru-elementoj. Ekzemploj: por a): ŝaltiloj; por b): icoj (85/410), monitoroj (85/416); por c): diskodrajvoj (85/394); por ĉ): komputora kesto. (=85/399) \*h  
 Fon: \*a hal en AkSt.85 p316; \*b Comp; \*c PIV; \*ĉ KBT; \*d KKV; \*e GS1; \*f al en letero al ei (86-06-20); \*g al en letero al ei (86-07-24) kaj en cirkulero 153 de la Akademio; \*ĝ bcu; \*ĥ ei; \*ĥ tau; \*i GES/NGI-12; \*j Mikro-comp-Lex; \*k wor; \*l ton en publika diskuto dum Esperantologio-konferenco 1990;

**85/398** =ApE85 #042

Rim: ei: Mia difino estis tradukita laŭ diversaj Anglalingvaj verkoj. Gxi estas pli preciza ol tiu de \*ĉ: \MCxiuj teknikaj partoj de komputilo\i, ĉar sub ~o oni komprenas ne nur "teknikajn partojn", sed ankaŭ kompletajn aparatojn, ekz-e la komputoron mem, aŭ aparatojn konektotajn al komputoro, ekz. printatoron, monitoron, modemon. PIV difinas pli trafe (bedaŭrinde - ĉar "hard/" ne estas Esperanta prefikso - sub la radiko "var"): \IKonvencia nomo por montri ĉiujn fizikajn elementojn de informadika sistemo, komputero ks.\i

Pure Esperanta termino ŝajnas al mi preferinda al la ĝis nun kutime uzata tro Anglisma "hardvaro" <Comp, PIV>. Tamen ankaŭ {eo1} ne ŝajnas al mi kontentiga, ĉar ne ĉiu ~o estas rigida. Moldiskoj, konekto-kabloj kaj multaj aliaj partoj de komputora sistemo estas flekseblaj. {eo3} ne sufiĉe

precize priskribas la enhavon de la nocio, ĉar simplajn konstru-elementojn ni ne nomas "aparato". En <Comp> troviĝas krome "materialo" kaj "ilaro" kiel eblaj tradukoj por la Angla termino. Ambaŭ certe ne taŭgas, precipe ĉar en <Comp> oni uzas la sufikson -il- por indiki ankaŭ programon. Do "ilaro" estus interpretebla ankaŭ kiel "programaro"!

Ankaŭ la proponoj de al ({eo4}, {eo5}) laŭ mi ne taŭgas. Mia difino klarigas, ke temas nek pri maŝinoj nek pri iloj.

bcu: Eĉ unu ŝraŭbo povas esti "hardware", sed tio estas "aĵo" kaj ne "aro"; tiu termino havas amas-karakteron, almenaŭ en la angla. Do mi proponas {eo8} anstataŭ {eo3}.

ei: {eo6} estis rekomendita al mi de s-ro Taurat, kiam mi vizitis Berlinon en 1987. Por la mala nocio li uzis "softo". Mi uzis tiun terminon kelkfoje, sed ankaŭ ĝi ne kontentigis min, ĉar ĝi mise pensigas pri iu hardeco. Mi nun preferas la terminon {eo7}, laŭ kiu oni analogie povas formi la terminojn: softvo (85/399), ŝarvo (89/074), firmvo (89/087), frivo (89/112), komvo (89/165), grupvo (89/181), kiuj sufiĉe similas al la Anglalingvaj originaloj kaj tial estas facile memorigeblaj, sed kiuj tamen ne impresas kiel Anglismoj kaj kaj ankaŭ ne havas la malavantaĝojn de la aliaj proponoj. Mi tial rekomendas, provu tiujn ĉi terminojn. Sed estu selektema kelkfoje {eo3} povas esti pli taŭga, ĉar ne tiel ĝenerala kiel {eo7}: \INi ankoraŭ ne finis nian transloĝigon, sed ni jam movis la aparataron.\i

ei: (90-08-30) Pri {eo9} vidu Rim. en 85/399.

wor (90-07-19): {eo10} estas pli klara, pli sinmotiva, pli purisma k malpli Anglisma ol formoj kun "hard". Gxi evitas pensigon pri hardeco kaj havas la avantaĝojn de la v-familio de ei (hardvo, ŝarvo, ktp). Laŭ mi ĝi estas pli klara kaj pli facile prononcebla ol "hardvo".

wor (91-11-11): Starigo de la v-familio egalas starigi terminon -v\*\*/o kiel teĥnika termino en la fako komputiko. G^ia signifo: 'aĵo aŭ afero, kiu, laŭ koncerna difino, manifestas koncernan econ (de flank-elemento).

ei (91-12-31): Ne ĉiu "hardvo" estas "dura" (ekz-e konekto-kablo). Laŭ mi "-v\*\*/" neniam povas fariĝi vera sufikso, ĉar forpreninte la literon, oni ne ĉiam ricevas Esperantan radikon. Gxi do estas nur radik-fina konsonanto, kiu en fako komputiko indikas grupon da programoj aŭ materiaĵoj. Jxus mi trovis pliajn tiajn terminojn en la Angla: \businessware, gameware, learningware, homeware\i <PC-Comp92/1.p140>, kiujn ni povus traduki per "negocvo, ludvo, lernvo kaj hejmvo". <91-12-31>

{U1} 681.3.06  
 {T1} KEE  
 {eo1} supl/aĵ/ar/o \*a  
 {eo2} softvar/o (1) \*b\*c  
 {eo3} program/ar/o \*b\*d\*e

{eo4} program-var/o \*f  
 {eo5} mens-var/o \*g  
 {eo6} soft\*\*/o \*ĥ  
 {eo7} softv\*\*/o \*ĉ  
 {eo8} program/aĵ/o \*ĝ  
 {eo9} mol/aĵ/o \*l  
 {eo10} farv\*\*/o \*ĵ  
 {de1} Software \*j  
 {de2} immaterielle Ware \*d  
 {en1} software \*h\*i  
 {fr1} périlogie \*d  
 {fr2} logiciel \*h\*i  
 {N11} software \*k

Gxenerala termino por tiuj partoj de komputora sistemo, kiuj ne estas palpeblaj aŭ materiaj, sed kiuj tamen povas esti vendataj pere de palpeblaj diskoj aŭ bendoj. La termino estas plej ofte uzata por programoj kontraste al 85/398. Kvankam la nocio de ĉi tiu komplekso kutime estas komerce havebla ~o, oni komprenas sub ĝi ne nur funkci-pretajn sed ankaŭ nur sur papero ellaboritajn programojn. Oni distingas inter sistema ~o, la programaro bezonata por ebligi la uzadon de komputora sistemo, kaj aplika ~o aŭ aplik-programoj, kiuj plenumas taskojn utilajn al la finuzanto. \*ĉ

Fon: \*a hal en AkSt.85 p316; \*b Comp; \*c PIV; \*ĉ ei; \*d KBT; \*e KKV; \*f al en letero al ei 86-06-19; \*g al en letero al ei 86-07-24 kaj en Cirk 153 de la Akademio; \*ĝ bcu; \*ĥ GS1; \*ĥ tau; \*i GES/NGI-12; \*j Mikro-comp-Lex; \*ĵ wor; \*k MMC; \*l ton en publika diskuto dum Esperantologio-konferenco

1990; **85/399** =ApE85 #043

Rim: ei: PIV difinas sub "var/o": V "soft~o: Konvencia nomo por montri la tuton de la programoj necesaj por utiligi informadkan sistemon, komputeron ks (=interelektroniko)vi.

KBT difinas: V Cxiuj programoj por la komputilo konsistantaj el la funkciadsistemoj kaj la programoj uzeblaj por ĝeneralaj problemoj.vi Tamen {eo3} ŝajnas al mi iom tro ĝenerala termino, ĉar iun ajn aron da programoj ni nomas "programaro".

hal difinas sian terminon en AkSt85: V Sxanĝataj, plejparte ne metalaj, partoj de elektronika instalaĵo; akcesoraĵoj de komputoro; programaro. Ekzemple, se magnetofono estas rigidaĵo, la kasedo aŭ bendo, kiun oni metas en ĝin, estas suplaĵo.vi Tiu difino korekte atentigas pri tio, ke oni uzas la vorton "software" en la Angla ne nur sur la kampo de komputoriko, sed en la elektronika industrio ĝenerale. Oni ekz-e malrekomendis la aĉeton de tipo da videomagnetofonoj, ĉar por ili ne estas havebla sufiĉe da "software". En la difino de hal estas i.a.malguste, ke kasedo aŭ bendo estas suplaĵo. La bendo kaj la kasedo mem estas (laŭ hal) "rigidaĵo", nur la sur la rigidaĵo registritaj programoj estas "suplaĵo".

{eo4} ŝajnas al mi pli trafa ol {eo5}, ĉar ankaŭ maŝinoj kaj iloj estas produkto de mensa laboro. Sed kiel ni nomu la aliajn ankoraŭ ne

tradukitajn komputikajn terminojn kun "ware" je la fino? Ekz. "firmware" (programoj neforviŝeble registritaj), "shareware" (programoj por ŝari (89/021), kiujn ĉiu rajtas kopii kaj libere uzi kaj por kiuj oni libervole pagu por registriĝo al la program-aŭtoro)? Diskutinda ŝajnas al mi, ĉu ni naturisme nomu ilin softvar/o, hardvar/o, firmvar/o kaj ŝarvar/o (kiel kompletaj radikoj + finaĵo) aŭ ĉu ni kreu ilin per kunmeto kun la vorto "varo", aŭ ĉu ni kreu el Esperantaj radikoj tute novajn terminojn. Pli facile memorigeblaj estas verŝajne la naturismaj neologismoj, kaj tial mi pledus por ili, sed ili ja malplaĉas al Esperantistoj, kiuj unue renkontas ilin, pro ilia evidenta Anglalingva deveno. En KBT oni donis kiel Germanan tradukon "immaterielle Ware", kiu sendube korekte esprimas la sencon de la nocio, tamen, kvankam mi abonis por tuta jaro la Germanan fakrevuon "Chip", mi legis en ĝi nur la terminon "Software". Evidente tiu termino ŝajnis pli taŭga al la artikol-verkintoj kaj anoncintoj. Mi tial ne mirus, se ankaŭ en nia lingvo "softvaro" kaj "hardvaro" venkus. Tio certe okazos, se ne iu povos proponi pli taŭgajn terminojn.

bcu: Eĉ unu linio de kodaĵo estas "software", sed tio estas "aĵo" kaj ne "aro". Vidu miajn komentojn pri 85/398. Mi preferus eviti la radikon "varo", ĉar oni ofte produktas tion ne por vendi.

ei: Mi konsentas kun bcu pri evitado de la radikoj var', tamen mi hezitas apliki la sufikson -aĵ/ por ĉi tiuj du nocioj: aparato jam estas io konkreta, kiel aĵ/ povus fari ĝin ankoraŭ pli konkreta? Se unu linio da kodaĵo same kiel kompleksega programaro estas "software", kial la konkretiga sufikso -aĵ/ indiku tion? La ĝeneraleco de la nocioj 85/398 kaj 399 malfaciligas al ni apliki iun el niaj nunaj sufiksoj.

ei (1989-12-01): La terminoj de tau (softo kaj hardo) donis al mi la ideon krei {eo7}. Legu pri tio en 85/398.

ei: (90-08-30) ton esprimis la opinion, ke {eo9} kaj "malmolaĵo" taŭgus por nocioj 85/398 kaj 85/399. Mi opinias, ke tiuj terminoj estas tro ĝeneralaj por indiki tiujn ĉi tre specifajn nociojn. "Molaĵo" povus esti iu ajn mola objekto, ekz-e spongo, kato, viandopeco, ŝlimo, ĵeleo. Atribui terminon kun tiel ĝenerala nocio al la nocio de "programo aŭ programaro" laŭ mia sento devas kaŭzi konfuzon. Krome la nocio de 85/398 konsistas ofte el molaj objektoj (moldisko, konektilaro). Estus konfuzige atribui al tiuj objektoj la terminon "malmolaĵo", ĉar tio ĉi laŭ mia kompreno estas iu ajn malmola objekto, ekz-e ŝtono, koralo, ŝtalo, diamanto. La termino-proponojn de ton mi ĝis nun nenie renkontis en nia faka literaturo, kaj mi certe ne rekomendas ilin. wor (90-07-19): Bv legi miajn komentojn en 85/398, kiuj plejparte validas ankaŭ ĉi tie. La termino {eo10} esprimu esencon kaj estu bela paro kun tiu de 85/398. Flanke, pri {de2}: Estus interese scii, ĉu oni sentas

la malsukceson rezulto de ĝia longeco kompare kun {de1}? Pri {en1}: Dum televida intervjuo la ĉefministro de Singapuro parolante pri triamonda evoluigo uzis la vortojn "hardware" kaj "software" por fabrikoj, vojoj, telefonoj unuflanke kaj eduko kaj kutimoj aliflanke.

ej (91-08-10): La propono de wor "durvo" por \hardware\i plaĉis al mi, sed al mi ŝajnas, ke ĝi ne formas belan paron kun "farvo". Analogie al durdisko/moldisko ni devus diri "molvo". Sed ĉu ni per tio ne tro distanciĝus de la originaj terminoj? Mi opinias, ke "hardvo" kaj "softvo" estas multe pli facile memorigeblaj. Gxuste ĉar \hardware\i kaj \software\i nun estas aplikataj ne nur en la kampo de informado-sciencoj (88/011), ni bezonas trafikajn terminojn en nia lingvo por tiuj nocioj. Mi petas pensu pri ĉiuj argumentoj kaj proponoj kaj indiku viajn preferojn, por ke niaj rekomendoj baziĝu sur firma grundo. «93-11-13»

Provtraduko fare de R.Eichholz de la labor-dokumento

\ Working paper: Revised version of ISO 1087

"Vocabulary of terminology" \i\-----

Reviziita de B.Golden.

En la nocio-kompleksoj 86/001-106 ne estas indikitaj terminoj en la Franca kaj Germana lingvoj kvankam multaj estis konataj al mi, ĉar ili troviĝis en la Franca kaj en la Germana versioj de R 1087. Mi ne registris ilin ĉi tie, ĉar kelkaj el ili estis eble ŝanĝitaj en la Franca kaj Germana versioj de la nova labor-dokumento. Nur post kiam iu povis konsulti la Francajn kaj Germanajn versiojn de la tiu nova dokumento, la Francajn kaj Germanajn terminoj el tiuj labor-dokumentoj ŝajnas al mi enmetindaj. Gxis tio okazis, bv konsulti la kompleksojn 85/287-381, al kiuj troviĝas referencoj en la teksto, por trovi Francajn kaj Germanajn terminojn por nocio-kompleksoj 86/001-106.

En 1990 ISO nuligis tiun ĉi labor-dokumenton kaj anstataŭigis ĝin per la rekomendo "Terminology principles and co-ordination", kies terminojn mi publikigis en termino-kompleksoj 93/001 ĝis 93/129. Mi decidis tial ne plu daŭrigi la publikigon de komentoj pri kompleksoj 85/288 ĝis 85/380 kaj 86/001 ĝis 86/106 kaj anstataŭe referenci al la terminoj en la 1993-a serio, en kiu la diskuto povas esti daŭrigata. La "fermon" de nocio-komplekso mi indikas en la fina dato, per tio, ke tiu ĉi dato ne plu estas ĉirkaŭita per duoblaj pintaj krampoj sed per rektaj krampoj. Se iu nocio-komplekso mankas en la nova rekomendo, oni rajtas ankoraŭ aldoni komentojn al tiuj kompleksoj kaj tial la duoblaj pintaj krampoj restas.

0 Amplekso kaj apliko-kampo

Tiu ĉi internacia normo establas terminaron por terminologio (86/100) kaj ĝiaj praktikaj aplikoj. Gxi estas aplikebla al ĉiuj terminologiaj agadoj sur nacia kaj internacia niveloj.

## 1 Lingvo kaj realeco

### 1.1

{U1} 001.40 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} objekt/o \*b  
{de1}  
{en1} object  
{fr1}

Iu parto de la observebla aŭ imagebla mondo.

Rimarkigo: Objektoj povas esti materiaj aŭ nemateriaj. \*b laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ej;

**86/001**

Rim: (=85/287) =93/002 [94-02-26]

### 1.2

{U1} 001.40 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} stud-kamp/o \*b  
{de1}  
{en1} subject field \*a  
{fr1}

Parto de homa sciado, kies limoj estas difinitaj per laŭcela vidpunkto.

Rimarkigo: En terminologio kaj ĝiaj praktikaj aplikoj la studkampo estas determinita per starigo de nocosistemoj. \*b+c laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ej; \*c go;

**86/002**

Rim: (=85/303) =93/003 [94-02-26]

### 1.3

{U1} 001.40 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} special/a lingv/o \*b  
{eo2} fak/a lingv/o \*b  
{de1}  
{en1} special language \*a  
{fr1}

Lingva subsistemo por malambigua komunikado en aparta stud-kampo uzanta terminaron (86/032) kaj aliajn lingvaj rimedojn. \*b laŭ \*a

Lingvistika subsistemo por malambigua komunikado en aparta stud-kampo uzanta terminaron (86/032) kaj aliajn lingvistikajn rimedojn. \*c laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ej; \*c go;

**86/003**

Rim: ej: \linguistic\i estas ambigua termino en la Angla. Cxi tie "lingva" sufiĉas, ĉar fakaj lingvoj kutime ne estas lingvike/lingvistike prilaboritaj. =93/004 [94-02-26]

## 2 Nocio

### 2.1

{U1} 001.411.1 (+)

{U2} 161.1  
{T1} RBN  
{eo1} noci/o (2) \*b  
{de1}  
{en1} concept \*a  
{fr1}

Pens-unuo kreita per tiuj karakterizaĵoj (86/014), kiuj estas atribuitaj al objekto aŭ al klaso de objektoj.

Rimarkigo: Nocioj ne estas ligataj al apartaj lingvoj. Ili estas tamen influataj per socia kaj kultura fonoj. \*b+c laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go;

**86/004**

Rim: (=85/288) =93/005 [94-02-26]

2.1.1

{U1} 001.411.1 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} kamp-specif/a noci/o \*c  
{de1}  
{en1} field specific concept \*a  
{fr1}

Nocio uzata en scio-kampo al kiu ĝi primare apartenas. \*c laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei;

**86/005**

Rim: (=85/305) «93-11-14»

2.1.2

{U1} 001.411.1 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} prunt/e-pren/it/a noci/o \*b  
{de1}  
{en1} borrowed concept \*a  
{fr1}

Nocio uzata en certa kampo, sed apartenanta primare al alia kampo. (=85/305) \*c laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go;

**86/006**

Rim: =93/006 [94-02-26]

2.1.3

{U1} 001.411.1 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} super'ord/ig/it/a noci/o \*b  
{eo2} super'ord/it/a noci/o \*c  
{eo3} super'noci/o \*ĉ  
{de1}  
{en1} superordinate concept \*a  
{fr1}

Nocio en hierarkia sistemo, kiu estas dividebla en plurajn pli malaltrajn nociojn, kiuj estas nomataj → subordigitaj nocioj (86/010).

Rimarkigo: La procedo, laŭ kiu tio estas farata, nomiĝas subordigo. \*b laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go; \*ĉ wor;

**86/007** =Ap86 #095

Rim: (=85/291) ei: hiperonim\*\*o estas la nomo de

termino, kiu troviĝas en superordigita rilato al aliaj terminoj. {eo2} laŭ mi ne eblas, ĉar "ordi" signifas laŭ PIV: "fari ion orda". Ne ekzistas "subordi", nur "subordigi".

go (90-09-29): Mi malsamopinionas kun ei, kiu, ne trovante "subordi" en PIV, asertas, ke ĝi ne ekzistas. Mia kontraŭargumento baziĝas sur sekvaj konstatoj: 1. PIV ne registras la tutan leksikon de Esperanto, sekve la plena gamo de esprimoj kaj lingvouzo ne estas spegulita en ĝia enhavo; 2. PIV neniel estas oficiala konsultlibro, do neniu estas devigata uzi nur la vortformojn registritajn en ĝi; 3. PIV estas dudekjarajn malaktuala, ĉar la lingvo evoluis post 1970, kiam ĝi estis eldonita; krom ankaŭ PIVS (1987) estas misa kaj mankhava; 4. PIV en la artikolo pri "ord/a" indikas, ke la verbo "ordigi" estas la ekvivalento de "ordi"; 5. "Ordi" estas transitiva verbo, do la transitiviga sufikso "-ig" estas superflua; 6. PAG (1980 - la 4-a eldono) uzas "subordita" kaj "kunordita" anstataŭ "subordigita" kaj "kunordigita", troviĝantaj en PIV. Tiuj vortformoj estis uzataj ankaŭ en la 3-a eldono de PG (1964).

ei (90-10-09): Mi ne rimarkis la uzadon de "subordi" kaj "kunordi" en PAG. "Subordi" simple agacis mian lingvan senton kaj mi ankoraŭ nun opinias, ke {eo2} ne estas preferinda al {eo1}, ĉar en la difino troviĝas jena frazo: \Rimarkigo: La procedo, laŭ kiu tio estas farata, nomiĝas subordigo. Ĉu la procedo, se oni akceptus {eo2} kiel preferindan terminon, do nomiĝu subordo? Laŭ mi tio estus konfuziga. Mi preferas apliki la Principon de Neceso kaj Sufiĉo nur, se la pli mallonga formo vere ne povus kaŭzi miskomprenojn. Ĉar ambaŭ terminoj estas allaseblaj, ĉu ne estus preferinde, ke go okupiĝu pri pli gravaj aferoj kaj atentigu pri la misaĵoj kaj mankoj, kiuj laŭ lia punkto 3 troviĝas en PIV, ol perdi tiom da vortoj pri la uzado aŭ neuzado de sufikso?

go (91-02-04): Via objekto kontraŭ "ordi" ne konvinkas min. Se vi ne volas akcepti "subordi" anstataŭ "subordigi" vi povas skribi "subordadi"; tiel la substantivo estos "subordado" anstataŭ "subordo". Mi skribis pli detale pri la demando en mia artikolo "'Ordi` aŭ `ordigi`" (L'Esperanto, 1980, oktobro, 58 (10): 27-28), ankaŭ en Marĝene de la Lernolibro, 1982, Budapeŝto; 44-46. =93/007 [94-02-26]

2.1.3.1

{U1} 001.411.1 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} genr/a noci/o \*b  
{de1}  
{en1} generic concept \*a  
{fr1}

Nocio en genra (89/055) rilato (86/021), kiu estas superordigita al alia nocio, nomata subnocio (86/010). Rimarkigo: La A-termino "genus" (E =

genro) estu aplikata nur al objektoj ne al nocioj. Tial oni uzu nur la terminon {eo1} kaj ne "genro", se oni parolas pri superordigitaj aŭ subordigitaj nocioj. =85/291. \*b+c laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go;

### 86/008

Rim: ei: La termino por genra nocio estas hiperonim\*\*o. (=85/291, 85/292).

go: "superordi" anstataŭu "superordigi" ĉie en Terminologia Vortaro.

ei: Mi ne konsentas. En PIV ne ekzistas "ordi", nur kunmetaĵoj kun ordigi: "kunordigi", "malordigi", "subordigi". =93/008 [94-02-26]

#### 2.1.3.2

{U1} 001.411.1 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} tut/ec/a noci/o \*b  
{eo2} tut'ampleks/a noci/o \*c  
{de1}  
{en1} comprehensive concept \*a  
{en2} integrative concept  
{fr1}

Nocio en → parteca rilato (86/022), kiu estas superordigita al alia nocio, nomita parteca nocio.(86/012) Rimarkigo: La A-termino \whole\ estu aplikata nur al objektoj ne al nocioj, tial \whole\ (en 85/297) fariĝis nerekomendinda por terminara uzado. \*b laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go;

### 86/009

Rim: =93/009 [94-02-26]

#### 2.1.4

{U1} 001.411.1 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} sub'ord/ig/it/a noci/o \*b  
{eo2} sub'noci/o \*b  
{eo3} sub'ord/it/a noci/o \*c  
{de1}  
{en1} subordinate concept \*a  
{fr1}

Nocio en hierarkia sistemo, kiu estas grupigebla kun almenaŭ unu plia samnivela nocio por formi pli altrangan nocion nomitan superordigita nocio (86/007). Rimarkigo: La procedo, laŭ kiu tio estas farata, nomiĝas superordigo. \*b+c laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go;

### 86/010

Rim: ei: "hiponimo" estas la nomo por termino, kiu troviĝas en subnokia rilato al aliaj terminoj. Pri {eo3} vidu 86/008. =93/010 [94-02-26]

#### 2.1.4.1

{U1} 001.411.1 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} speci/a noci/o (de ...) \*c  
{de1}  
{en1} specific concept \*a  
{fr1}

(=85/292): Nocio en genra rilato (86/021), kiu estas subordigita sub alia nocio, nomata → genra nocio (=85/291). Rimarkigo: La Angla termino \species\ estu aplikata nur al objektoj ne al nocioj, tial \species\ (en 85/292) fariĝis nerekomendinda por terminologia uzado. \*b+c laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go;

### 86/011

Rim: ei: La termino por specia nocio estas hiponim\*\*o. =93/011 [94-02-26]

#### 2.1.4.2

{U1} 001.411.1 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} part/ec/a noci/o \*b  
{de1}  
{en1} partitive concept \*a  
{fr1}

Nocio en parteca rilato, kiu estas subordigita al alia nocio, nomita → tuteca nocio (86/009). \*b laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei;

### 86/012

Rim: =93/012 [94-02-26]

#### 2.1.5

{U1} 001.411.1 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} sam-nivel/a noci/o \*b  
{eo2} kun'ord/it/a noci/o \*c  
{de1}  
{en1} co-ordinate concept \*a  
{fr1}

Nocio en hierarkia sistemo, kiu troviĝas samnivele kiel unu aŭ pli da aliaj nocioj. Rimarkigo: La kunekzisto de du aŭ pli da nocioj sur la sama hierarkia nivelo, estas nomita samniveleco. \*b laŭ \*a

kunordigo. \*c laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go;

### 86/013

Rim: ei: = RIM en 86/007. =93/013 [94-02-26]

#### 2.2

{U1} 001.411.1 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} karakteriz/aj/o \*b  
{de1}  
{en1} characteristic \*a  
{fr1}

Pensero, kiu esprimas econ de objekto, kaj kiu servas por formi kaj limigi ties nocion. Ekzemplo: \Unu el la karakterizaĵoj de la nocio "fiŝo" estas "havi naĝilojn".\ (en 85/289) \*b laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei;

### 86/014

Rim: =93/014 [94-02-26]

#### 2.3

{U1} 001.411.5 (+)

{T1} RBN  
{eo1} karakteriz/aj-tip/o \*b  
{de1}  
{en1} type of characteristic \*a  
{fr1}

Iu kategorio de karakterizaĵoj uzata kiel kriterio por la starigo de genra nocio-sistemo. Ekzemploj: Karakterizaĵoj: ruĝa, nigra, blanka, blua. ~o: koloro. Karakterizaĵoj: koloro, materialo, formo. ~o: ekstera aspekto \*b laŭ \*a  
Fon: \*a ISO/N53; \*b ei;

**86/015**

Rim: =93/015 [94-02-26]

2.4

{U1} 001.411.1 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} karakteriz/aj/ar/o (de nocio) \*b  
{eo2} noci/o-en'hav/o \*b  
{eo3} en'hav/o (2) (de nocio) \*c  
{de1}  
{en1} intension \*a\*ĉ  
{fr1}

Aro da karakterizaĵoj, kiuj formas nocion.  
\*b laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go; \*ĉ Fel,p116;

**86/016**

Rim: =93/016 [94-02-26]

2.5

{U1} 001.411.1 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} signif/o-ampleks/o \*c  
{eo2} noci/o-ampleks/o \*b  
{de1}  
{en1} extension \*a  
{fr1}

La tutaĵo de ĉiuj specifaj nocioj troviĝantaj en → genra nocio. (86/008)  
(=85/293, 85/294) \*b laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go;

**86/017**

Rim: =93/017 [94-02-26]

2.6

{U1} 001.411.3 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} klas/o <7> \*b  
{de1}  
{en1} class \*a  
{fr1}

La tutaĵo de ĉiuj objektoj, al kiuj nocio apartenas. \*b laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei;

**86/018**

Rim: =93/018 [94-02-26]

2.7

{U1} 001.411.3 (+)

{T1} RBN  
{eo1} rilat/o inter noci/oj \*b  
{de1}  
{en1} relation between concepts \*a  
{fr1}

Iu mensa ligo inter du aŭ pli da nocioj. \*b laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei;

**86/019**

Rim: =93/019 [94-02-26]

2.7.1

{U1} 001.411.3 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} hierarki/a rilat/o \*b  
{de1}  
{en1} hierarchical relation \*a  
{fr1}

Rilato inter nocioj establita per divido de → superordigita nocio (86/007) en → subordigitajn nociojn (86/010), per kiu estis kreita unu aŭ pli da hierarkiaj niveloj, aŭ rilato establita per la inversa procedo.

Rimarkigo: Tiu procedo kondukas ankaŭ al samnivelaj/ kunorditaj nocioj (86/013). \*b\*c laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go;

**86/020**

Rim: =93/019 [94-02-26]

2.7.1.1

{U1} 001.411.3 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} genr/a rilat/o \*b  
{de1}  
{en1} generic relation \*a  
{fr1}

Hierarkia rilato, kiu baziĝas sur la parta identeco de genraj (86/008), speciaj (86/011) kaj kunordigitaj (86/013) nocioj. \*b laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei;

**86/021**

Rim: =93/021 [94-02-26]

2.7.1.2

{U1} 001.411.3 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} part/ec/a rilat/o \*b  
{de1}  
{en1} partitive relation \*a  
{fr1}

Hierarkia rilato, en kiu la → superordigita nocio (86/007) rilatas al objekto kiel tutaĵo kaj en kiu la → subordigitaj nocioj (86/010) rilatas al ĝiaj partoj. \*b+c laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go;

**86/022**

Rim: =93/021 [94-02-26]

2.7.2

{U1} 001.411.3 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} ne'hierarki/a rilat/o \*b  
 {de1}  
 {en1} non-hierarchical relation \*a  
 {fr1}

Rimarkigo: Ekzistas aliaj nehierarkiaj rilatoj krom tiuj difinitaj en 86/024 kaj 86/025. \*b laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei;  
**86/023**

Rim: =93/022 [94-02-26]  
 2.7.2.1

{U1} 001.411.3 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} sin'sekv/a rilat/o \*b  
 {de1}  
 {en1} sequential relation \*a  
 {fr1}

Dependo-rilato inter nocioj rilatantaj al objektoj, kiuj space aŭ tempe troviĝas apude. Ekzemploj: "kaŭzo-efiko", "produktanto-produkto", "ŝtupoj de procedo." \*i \*b+c laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go;  
**86/024**

Rim: =93/023 [94-02-26]  
 2.7.2.2

{U1} 001.411.3 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} pragmat/a rilat/o \*b  
 {de1}  
 {en1} pragmatic relation \*a  
 {fr1}

Rilato inter nocioj, kiu povas esti starigata pro aparteno al komuna temo. Ekzemplo: "En la nocio-sistemoj pri eksedziĝaj leĝoj en kelkaj Eŭropaj landoj jenaj malsanoj - kaj nur tiuj ĉi - estas akceptitaj kiel leĝaj kialoj por eksedziĝo: - venerea malsano - gonoreo - sifiliso - ŝankro - ingvena limfogranulomo - nekuracebla mens-malsano - demenco - mania-deprimiĝa psikoza - skizofrenia paranojo. \*b+c laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go;  
**86/025**

Rim: =93/024 [94-02-26]  
 2.8

{U1} 001.411.3 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} noci/a inter'respond/o \*b  
 {de1}  
 {en1} concept correspondence \*a  
 {fr1}

Grado de koincido de la nocio-enhavo (86/016) de du aŭ pli da terminoj. Rimarkigo: Oni malkovras nocian interrespondon, se oni komparas la terminarojn (86/032) de malsamaj lingvoj, studkampoj, penso-skoloj ktp.. Ekzistas kvar eblecoj de

nocia interrespondo: - kompleta koincido de nocio-enhavo - inkludo de unu nocio-enhavo en la alia - parta surkovro aŭ imbrikiĝo de nocio-enhavo - ne koincido de nocio-enhavo. \*b+c laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go;

**86/026**

Rim: =93/025 [94-02-26]  
 2.9

{U1} 001.411.3 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} noci/o-kamp/o \*b  
 {de1}  
 {en1} concept field \*a  
 {fr1}

Grupo da laŭteme rilatantaj nocioj.

Rimarkigo: Gxi povas servi kiel deir-punkto por starigi nocio-sistemojn. \*b+c laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go;

**86/027**

Rim: =93/026 [94-02-26]  
 2.10

{U1} 001.411.4 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} noci/o-sistem/o \*b  
 {de1}  
 {en1} system of concepts \*a  
 {fr1}

Strukturita nociaro establita laŭ la rilatoj inter la nocioj. Cxiu nocio estas determinita per sia pozicio en la nocio-sistemo. (=85/295) \*b laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go;

**86/028**

Rim: ei: go preferas: determinita de sia pozicio. Laŭ mi "per" estas pli klara, ĉar la pozicio en nocio-sistemo determinas la limojn inter kiuj iuj nocioj estas entenataj kaj pro tio distingiĝas de aliaj nocioj. Oni determinas la sencon de iu nocio per vortoj. =93/027 [94-02-26]

3 Difino  
 3.1

{U1} 001.412 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} difin/o (1) \*b  
 {de1}  
 {en1} definition \*a  
 {fr1}

Eldiro, kiu priskribas nocion kaj ebligas ĝian diferencigon disde aliaj nocioj interne de nocio-sistemo. (=85/313, 314) \*c laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go;

**86/029**

Rim: =93/028 [94-02-26]  
 3.1.1

{U1} 001.412 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} difin/o per noci/o-en'havo \*c

{eo2} difin/o per super'noci-lim/ig/o \*ĉ  
{de1}  
{en1} intensional definition \*a  
{fr1}

Difino baziĝanta sur la listigo de la karakterizaĵoj de nocio. (=85/314) Rimarkigo: Tiucele necesas nomi la plej proksiman → genran nocion (86/008), kiu jam estas difinita, aŭ pri kiu oni povas supozi, ke ĝi estas ĝenerale konata, kaj aldoni la karakterizaĵojn, kiuj limigas la difinotan nocion. Ekzemplo: Ĥinkandeska ampolo: Elektra ampolo, en kiu materialo kun alta fandopunkto estas per elektra kurento tiom varmigita, ke la ampolo emisas lumon.Ĥ

\*b+c laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ej; \*c go; \*ĉ wor;

**86/030** =Ap86 #096

Rim: ej: go preferas: "estas vamigita per elektra kurento, tiel ke la ampolo komencas emisii lumon." Lia traduko estas pli laŭvorta. Tamen, mi opinias, ke mia traduko estas preferinda, ĉar mi ne volas esprimi la manieron, sed la gradon, la intenson de la varmigo. Ĥinkandeska ampolo ne komencu emisii lumon, ĝi daŭre emisiu ĝin. =86/007. = 93/029 [94-02-26]

3.1.2

{U1} 001.412 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} difin/o per noci/o-ampleks/o \*b  
{eo2} difin/o per signif/o-ampleks/o \*c  
{eo3} difin/o per sub'noci-list/ig/o \*ĉ  
{de1}  
{en1} extensional definition \*a  
{fr1}

Difino baziĝanta sur la kompleta listigo de objektoj inkludataj en la nocio aŭ de la specifaj nocioj je la posta nivelo de abstrakteco. (=85/315) \*b laŭ \*a

Difino bazita sur ĝisfunda listigo de objektoj aluditaj de la nocio, aŭ de la specifaj nocioj sur la sekva nivelo de abstrakteco. \*c laŭ \*a

Rimarkigo: La unua tipo de {eo1} povas esti realigata nur per uzado de propraj nomoj. La dua tipo de {eo1} utilas nur, se la nocio konsistas el limigita aro da specifaj nocioj. \*b laŭ \*a.

Rimarkigo: La unua {eo2} povas esti realigata nur per uzado de propraj nomoj. La dua tipo de {eo2} utilas nur, kiam nocio konsistas el limigita aro da specifaj nocioj. \*c laŭ \*a.

Ekzemploj: (a) Skandinavio: regiono konsistanta el Danlando, Norvegio, Svedio. (b) indikumo: (en ĉi tiu normo DIN 2330) terminoj, ideografiaĵoj, numeroj kaj notacioj. \*b laŭ \*a

(b) indik(aĵ)o (en ĉi tiu normo DIN 2330) terminoj, ideografiaĵoj, numeroj kaj notacioj. \*c laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ej; \*c go; \*ĉ wor;

**86/031** =Ap86 #097

Rim: =93/030 [94-02-26]

4 Terminaro

4.1

{U1} 001.43 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} termin/ar/o <2> \*b  
{eo2} termin/ologi/o (1) \*ĉ EVIT \*b  
{de1}  
{en1} terminology \*a  
{fr1}

Aro da terminoj prezentanta la nocio-sistemon de specifa fako. \*b laŭ \*a

Aro da terminoj prezentanta la nocio-sistemon de

specifa kampo (aŭ tereno). \*c laŭ \*a.

Fon: \*a ISO/N53; \*b ej; \*c go; \*ĉ PIV;

**86/032** =Ap86 #098

Rim: (=85/323) ej: En Esperanto ni nepre ne apliku la modelon de PIV kaj imitu malbonan termino-elekton en etna lingvo nur ĉar oni internacie faras tion. -olog/io (ankaŭ laŭ PIV) estas "Finaĵo de teknikaj vortoj, indikantaj ne matematikan scienccon: Ĥpsik-ĤioĤ." Do {eo2} devus en nia lingvo indiki la nocion de 86/100. Aro da terminoj, egale ĉu ĝi estas aranĝita en vortaro aŭ ne, ni devas nomi {eo1}. Vidu ankaŭ AkSt.87p97. =93/031 [94-02-26]

4.2

{U1} 001.43 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} nomenklatur/o (1) \*b  
{de1}  
{en1} nomenclature \*a  
{fr1}

Sistemo de terminoj, kiu estas ellaborita laŭ preestablitaj reguloj pri nomdonado. \*b laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ej;

**86/033**

Rim: (=85/323) =93/032 [94-02-26]

4.3 √Nocio-prezento:

4.3.1

{U1} 001.411.2 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} indik/um/o \*b  
{eo2} indik/o <3> \*c  
{eo3} indik/aj/o <2> \*c  
{de1}  
{en1} designation \*a  
{fr1}

Iu ajn nocio-prezento. \*b laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ej; \*c go;

**86/034** =Ap86 #099

Rim: ej: La nocio de tiu ĉi komplekso estas pli ĝenerala ol tiu de 86/035, ĉar ankaŭ man-signo povus esti {eo1}. Interpretisto por surduloj komunikas la enhavon de parolado per indikumoj kaj ne per simboloj. La Anglaj terminoj \designatĤion kaj \indicatĤion estas parte identaj, sed {en1} enhavas ankaŭ la nocion "nomumi, selekti

iun por iu ofico", nocio kiu ne troviĝas en \indication\i. Same kiel ni distingas inter "nomo" kaj "nomumo" ni distingu ankaŭ inter "indiko/indikaĵo" kaj "indikmumo".

go: {eo2} kaj {eo3} estas sinonimoj por anstataŭi {eo1}. =93/033 [94-02-26]

4.3.1.1

{U1} 001.411.2 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} simbol/o (3) \*b  
{de1}  
{en1} symbol \*a  
{fr1}

Indikumo (86/034) per literoj, ciferoj, piktogramoj aŭ per iu ajn kombino de ili. \*b laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei;

### 86/035

Rim: ei: Do {eo1} estas skribita, printita aŭ presita indikumo. (=85/334, 85/335) =93/034 [94-02-26]

4.3.1.2

{U1} 001.411.2 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} termin/o (1) \*b  
{eo2} esprim/o komun-lingv/a aŭ fak/a \*b  
{de1}  
{en1} term \*a  
{fr1}

Indikumo (86/034) per lingva esprimo.

\*b laŭ \*a.

Nocio-indiko per lingvistika esprimo. \*c laŭ \*a.

Rimarkigo: Termino povas konsisti el unu aŭ pli da vortoj (t.e. simpla termino, kompleksa termino aŭ terminara vort-grupo). ~o povas eĉ enhavi simbolojn. \*b laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go;

### 86/036

Rim: (=85/317) ei: Mi ne konsentas kun la revizio de go. "lingvistika esprimo" estas esprimo uzata en la fako lingvistiko. En natursciencoj oni certe ne indikas nociojn per lingvistikaj terminoj. Sxajnas al mi, ke la Anglalingva difino ne estas sufiĉe preciza, ĉar en ĝi termino povus esti ankaŭ \word\i (vorto). Mi difinus "termino" per: "Indikumo de faka nocio per lingva esprimo."

wor (91-11-11): Mi inklinas konsenti kun ei. Kial uzi "lingvistika" tie, kie "lingva" sufiĉas?

=93/035 [94-02-26]

4.4 \>Rilatoj inter terminoj kaj nocioj

4.4.1

{U1} 001.426 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} monosemi\*\*/o \*b  
{de1}  
{en1} monosemy \*a  
{fr1}

Rilato inter indikumo (86/034) kaj nocio, en

kiu la unua indikas nur unu nocio. \*b laŭ \*a

Rilato inter indiko/indikaĵo (86/034) kaj nocio, en kiu la unua indikas nur unu nocio. \*c laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go;

### 86/037

Rim: =[85/373] =93/037 [94-02-26]

4.4.2

{U1} 001.426 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} mononomi\*\*/o \*b  
{de1}  
{en1} mononymy \*a  
{fr1}

Rilato inter indikumo (86/034) kaj nocio, en kiu la nocio havas nur unu indikumon. \*b laŭ \*a

Rilato inter indiko/indikaĵo (86/034) kaj nocio, en kiu la nocio havas nur unu indikon/indikaĵon. \*c laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go;

### 86/038

Rim: =93/038 [94-02-26]

4.4.3

{U1} 001.426 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} sinonimi\*\*/o \*b  
{de1}  
{en1} synonymy \*a  
{fr1}

Rilato inter indikumo (86/034) kaj nocio, en kiu nocio havas pli ol unu indikumon. \*b laŭ \*a.

Rilato inter indiko/indikaĵo (86/034) kaj nocio, en kiu nocio havas pli ol unu indikon/indikaĵon. \*c laŭ \*a.

Ekzemplo: \natria klorido; NaCl.\i

Rimarkigo 1: Tiaj indikumoj estas nomitaj sinonimoj.

Rimarkigo 2: Sinonimio ekzistas nur, se temas pri precize la sama nocio, se la nocioj ne estas precize samaj, oni parolas pri kvazaŭ-sinonimio. \*b laŭ \*a

Rimarkigo 1: Tiaj indikoj/indikaĵoj estas nomitaj sinonimoj.

Rimarkigo 2: Sinonimio ekzistas nur, kiam estas kompleta interrespondado inter la nocioj; alimaniere, ĝi estas nomata kvazaŭ-sinonimio. \*c laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go;

### 86/039

Rim: =[85/378] =93/093 [94-02-26]

4.4.4

{U1} 001.426 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} polisemi\*\*/o \*b  
{de1}  
{en1} polysemy \*a  
{fr1}

Rilato inter indikumo (86/034) kaj nocio, en

kiu unu indikumo prezentas malsamajn nociojn, kiuj havas kelkajn komunajn karakterizaĵojn.

Ekzemplo: ponto:           ↳konstruaĵo   ponto:  
↳komandejo sur ŝipo   ponto:           ↳abstrakta  
interkomunikilo

\*b laŭ \*a

Rilato inter indiko/indikaĵo (86/034) kaj nocio, en kiu unu indiko/indikaĵo prezentas malsamajn nociojn, kiu dividas certajn karakterizaĵojn. \lbridge: part of string instrument\i = ponteto (EB 302/50) \lbridge: dental device\i = denta ponto / dento-ponto (EB 27/29) \*c laŭ \*a.

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go;

**86/040**

Rim: (=85/375) =93/040 [94-02-26]

4.4.5

{U1} 001.426 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} homonimi\*\*/o \*b  
{de1}  
{en1} homonymy \*a  
{fr1}

Rilato inter indikumo (86/034) kaj nocio en kiu identaj indikumoj prezentas malsamajn nociojn. \*b laŭ \*a.

Rilato inter indiko/indikaĵo (86/034) kaj nocio en kiu identaj indikoj/indikaĵoj prezentas malsamajn nociojn. \*c laŭ \*a.

Rimarkigo: Homonomio povas esti subdividata en homofonio (sama laŭsona formo) kaj homografio (sama skribata formo) aŭ ambaŭ: plena homonimio.

Ekzemplo: ero:           ↳elemento de objekto ero:  
↳erao  
\*b laŭ \*a

Rimarkigo: Homonomio povas esti subdividata en homofonio (sama parolata formo) kaj homografio (sama skribata formo) aŭ ambaŭ: plena homonimio.

Ankoraŭ unu ekzemplo: ↳bokso - ago de boksanto

↳bokso - fiŝo (Box) \*c laŭ \*a.

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go;

**86/041**

Rim: =[85/376] =93/041 [94-02-26]

4.4.6

{U1} 001.426 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} ekvivalent/o <4> \*b  
{de1}  
{en1} equivalence \*a  
{fr1}

Rilato inter indikumoj (86/034) prezentantaj la saman nocion en malsamaj lingvoj. \*b laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei;

**86/042**

Rim: =[85/380] =93/042 [94-02-26]

4.5 ↳Termino-kreado \*b

4.5 ↳Termino-formado \*c

4.5.1

{U1} 001.423 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} vari/aĵ/o <5> \*b\*c  
{de1}  
{en1} variant \*a  
{fr1}

Unu el la malsamaj formoj de termino.

Rimarkigo: Variaĵoj povas esti ortografiaj variaĵoj, morfologiaj variaĵoj kaj sintaksaj variaĵoj. \*c laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go;

**86/043** =Ap86 #100

Rim: =93/043 [94-02-26]

4.5.2

{U1} 001.423 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} mal'long/ig/it/a termin/o \*b  
{de1}  
{en1} abbreviated term \*a  
{fr1}

Termino formita per ellaso de iu terminparto, kiu tamen indikas la saman nocion. Rimarkigo: Cxiu mallongigita termino deriviĝis de nemallongigita termino. \*b laŭ \*a

Termino rezultanta de ellaso de iu terminparto, kiu tamen indikas la saman nocion. Rimarkigo: Cxiu mallongigita termino deriviĝis de plena (aŭ kompleta) termino. \*c laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go;

**86/044**

Rim: =[85/331] =93/044 [94-02-26]

4.5.2.1

{U1} 001.423 (+)  
{U2} 003.083  
{U3} 801.18  
{T1} RBN  
{eo1} mal'long/ig/o <1> \*b  
{de1}  
{en1} abbreviation \*a  
{fr1}

Mallongigita simpla termino formita per ellaso de kelkaj el ĝiaj literoj. \*b laŭ \*a

Mallongigita simpla termino rezultanta de ellaso de kelkaj el ĝiaj literoj. \*c laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go;

**86/045**

Rim: =[85/332] =93/045 [94-02-26]

4.5.2.2

{U1} 001.423 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} inicial-vort/o \*b  
{de1}  
{en1} initialism \*a  
{fr1}

Mallongigita kompleksa termino kreita el la unuaj literoj de la termin-elementoj (86/048). Rimarkigo: Inicial-vorto konsistas el sinsekvo de literoj prononcataj literume, silabe aŭ laŭ ambaŭ metodoj. Ekzemploj (en la Angla):

↳PTT: ↳post, telephone and telegraph  
↳radar: ↳radio detection and ranging  
↳UEFA: ↳Union of European Football

↳Associations \*b laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ej;

**86/046**

Rim: ej (91-06-27): "radaro" devus esti ekzemplo por akronimo (86/047), ĉar la dua litero en ĉi tiu vorto ne estas inicialo. Detalan artikolon "Inicial-vortoj kaj akronimoj" vi trovas en AkSt 88-90,p345. =93/046 [94-02-26]

4.5.2.3

{U1} 001.423 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} akronim"/o (1) \*b  
{de1}  
{en1} acronym \*a  
{fr1}

Mallongigita kompleksa termino kreita el literoj el la nemallongigita termino, kiuj estas kune ligataj kaj nur silabe prononcataj. \*b laŭ \*a. Mallongigita kompleksa termino kreita el literoj de la plena (aŭ kompleta) formo de termino, ligitaj kune en sinsekvo, kiu estas prononcata nur silabe. \*c laŭ \*a.

Ekzemplo: algol: ↳algebraically oriented language Fon: \*a ISO/N53; \*b ej; \*c go;

**86/047**

Rim: =93/047 [94-02-26]

4.5.3

{U1} 001.423 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} termin-element/o \*b  
{eo2} kompon/ant/o de termin/o \*c  
{de1}  
{en1} term element \*a  
{fr1}

Konsistiga termino-parto, minimume morfemo (86/051). \*b laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ej; \*c go;

**86/048**

Rim: =93/048 [94-02-26]

4.5.3.1

{U1} 001.423 (+)  
{U2} 801.541.1  
{T1} RBN  
{eo1} etimologi/a radik/o \*b  
{eo2} radik/o <4> \*c  
{de1}  
{en1} root \*a  
{fr1}

Vort-elemento formanta la etimologian bazon de vort-familio en unu aŭ kelkaj lingvoj. Rimarkigo 1: La etimologia radikoj povas esti komuna al kelkaj radikoj (86/050). Rimarkigo 2: La signifo de etimologia radikoj povas varii en diversaj lingvoj. \*b laŭ \*a

Rimarkigo 1: La radikoj povas esti komuna al kelkaj radikoj (86/050). Rimarkigo 2: La signifo de radikoj povas varii en diversaj lingvoj. \*c laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ej; \*c go;

**86/049**

Rim: =[85/347] =93/052 [94-02-26]

4.5.3.2

{U1} 001.423 (+)  
{U2} 801.541.1  
{T1} RBN  
{eo1} radik/o (3) \*b  
{eo2} termin/ar/a radik/o \*b  
{eo3} stam/o (3) \*c  
{eo4} radikal/o (1) \*c  
{de1}  
{en1} stem \*a  
{fr1}

Vort-elemento uzebla kiel termino mem aŭ kiel bazo de derivaĵo. Rimarkigo 1: Laŭ la analizo-tipo radikoj povas «en etnaj lingvoj» inkludi aŭ ekskludi afiksojn. «En Esperanto afiksoj ĉiam estas ekskluditaj.» Rimarkigo 2: En lingviko "radikoj" estas kutime malsame difinita. \*b laŭ \*a

Rimarkigo 1: Depende de la grado (aŭ ŝtupo) de analizo, la stamo (aŭ radikalo) povas inkludi aŭ ekskludi afiksojn. Rimarkigo 2: En lingvistiko "stamo" estas kutime difinita malsame. \*c laŭ \*a.

Fon: \*a ISO/N53; \*b ej; \*c go;

**86/050**

Rim: ej: En la origina normverko la terminoj {en1} en 86/049 kaj 86/050 estis sinonimoj: =85/347. En Esperanto ekzistas laŭ PIV klara diferenco inter radikalo/stamo (= pik' aŭ trapikil') kaj radikoj (nur pik'), sed evidente ne en la etnaj lingvoj. Ĉar neniu preciza difino estis donita, ankaŭ ne eblas elekti la ĝustajn terminojn.

wor (91-11-11): La diferenco en la Angla inter ↳stem'i kaj ↳root'i ofte kongruas kun la PIV-a diferenco inter "stamo" kaj "radikoj". =93/053 [94-02-26]

4.5.3.3

{U1} 001.423 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} morfem/o <2> \*b  
{de1}  
{en1} morpheme \*a  
{fr1}

La plej malgranda sencohava unuo de lingvo. \*c laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ej; \*c go;

**86/051**

Rim: ej: Tiu ĉi nocio estas multe pli vasta ol tiu donita en PIV. Mi rekomendas noti tion en via PIV. (=85/345).

wor (91-11-11): Sxajnas al mi, ke "morfemo <2>" pli konsekvence uzas la (lingvistike) fakan sufikson "-em-" ol "morfemo (1)". Inter aliaj laŭskolaj karakterizaĵoj, tiu sufikso kutime nomas laŭ senrestaĵa analizo la nepludivideblan eron de la koncerna fenomeno-medio. =93/054 [94-02-26]

#### 4.5.3.3.1

{U1} 001.423 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} afiks/o (1) \*b\*c  
{de1}  
{en1} affix \*a  
{fr1}

Morfemo, kiu estas nek stamo nek finaĵo sed aldonebla antaŭ aŭ post la stamo por ŝanĝi ties signifon aŭ ties leksikan aŭ gramatikan kategorion. \*b laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b go; \*c PIV;

**86/052**

Rim: =93/055 [94-02-26]

#### 4.5.3.3.1.1

{U1} 001.423 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} prefiks/o (1) \*b\*c  
{de1}  
{en1} prefix \*a  
{fr1}

Afikso, kiu rekte antaŭas radikon aŭ alian prefikson. \*b laŭ \*a

Afikso, kiu rekte antaŭas stamon aŭ alian prefikson. \*ĉ laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ej:; \*c PIV; \*ĉ go;

**86/053**

Rim: wor (91-11-11): En "fuŝmalŝarĝi" la prefikso "fuŝ" antaŭas la stamon "malŝarĝ"; en la difino de go la vortoj "aŭ alian prefikson" superfluas.

=93/056 [94-02-26]

#### 4.5.3.3.1.2

{U1} 001.423 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} sufiks/o (1) \*b\*c  
{de1}  
{en1} suffix \*a  
{fr1}

Afikso, kiu rekte sekvas radikon aŭ alian sufikson. \*b laŭ \*a

Afikso, kiu rekte sekvas stamon aŭ alian sufikson. \*ĉ laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ej:; \*c PIV; \*ĉ go;

**86/054**

Rim: wor (91-11-11): Sen la vortoj "kun aŭ sen afiksoj" la difino de go egalas tiun de ej:. =93/057 [94-02-26]

#### 4.5.3.3.2

{U1} 001.423 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} fin/aj/o (1) \*b\*c  
{de1}  
{en1} ending \*a  
{fr1}

Morfemo aŭ morfemaro, kiu indikas la fleksion aŭ deklinacion de vorto. \*ĉ laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ej:; \*c PIV; \*ĉ go;

**86/055**

Rim: Laŭ PIV: "En E-o la lasta, varia parto de vorto, kiu montras la genron, nombron, kazon, modon kaj tempon: Ĝia finaĵo aŭ estas ne finaĵo, sed simpla vort-fino.ĵi" =93/058 [94-02-26]

#### 4.5.4

{U1} 001.423 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} deriv/aj/o (1) \*b\*c  
{de1}  
{en1} derivative \*a  
{fr1}

Vorto formita per la aldono de unu aŭ pli da afiksoj al radiko. \*b laŭ \*a.

Vorto formita per la aldono de unu aŭ pli da afiksoj al stamo. \*ĉ laŭ \*a.

Rimarkigo: La procedo laŭ kiu derivaĵoj estas kreataj nomiĝas: derivado. \*b laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ej:; \*c PIV; \*ĉ go;

**86/056**

Rim: ej: Vidu mian rimarkon en 86/052. =93/059 [94-02-26]

#### 4.5.5

{U1} 001.423 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} simpl/a termin/o \*b  
{de1}  
{en1} simple term \*a  
{fr1}

Termino konsistanta el nur unu radiko kun aŭ sen afiksoj. \*b laŭ \*a.

Termino konsistanta el nur unu stamo kun aŭ sen afiksoj. \*c laŭ \*a.

Ekzemploj: libro, tondilo, tondilego, malfaciligi. \*b laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ej:; \*c go;

**86/057**

Rim: ej: Vidu mian rimarkon en 86/052. =93/060 [94-02-26]

#### 4.5.6

{U1} 001.423 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} kompleks/a termin/o \*b  
{de1}  
{en1} complex term \*a  
{fr1}

Termino konsistanta el du aŭ pli da radikoj kun aŭ sen aliaj termin-elementoj (86/048). Ekzemploj: vetperisto, fervojo. \*b laŭ \*a

Termino konsistanta el du aŭ pli da stamoj kun aŭ sen aliaj elementoj (86/048).

Ekzemplo: vetperisto \*c laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go;

### 86/058

Rim: ei: Vidu mian rimarkon en 86/052. =93/061 [94-02-26]

4.5.6.1

{U1} 001.423 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} kompon/a termin/o \*b  
{eo2} kun/met/it/a termin/o \*c  
{eo3} kompleks/a termin/o \*c  
{de1}  
{en1} compound term \*a  
{fr1}

Kompleksa termino, kies elementoj ne estas sintakse ligataj. Ekzemplo: book fair. \*b laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*go;

### 86/059 =Ap86 #101

Rim: ei: "Kompundaj terminoj" estas tipe por la Angla lingvo. En Esperanto ili ne ekzistas, ĉar ĉiuj termino-elementoj devige estas sintakse ligataj (=85/360). Tamen "kunmetitaj terminoj" kaj "kompleksaj terminoj" certe ekzistas en nia lingvo, kiel multaj ekzemploj en Pekoteko pruvas. Tial {eo2} kaj {eo3} ne trafas por esprimi la difinitan nocion. =93/062 [94-02-26]

4.5.6.2

{U1} 001.423 (+)  
{U2} 801.314.6 (+)  
{U3} 801.561.8  
{T1} RBN  
{eo1} termin/ar/a vort-grup/o \*b  
{eo2} termin/ar/a sintagm/o \*c  
{de1}  
{en1} terminological phrase \*a  
{fr1}

Kompleksa termino, kies elementoj estas sintakse ligataj por formi fiksitan sinsekvon. Ekzemploj: \booking a flight; \i intervagona transirejo. \*b laŭ \*a

Kompleksa termino, en kiu la elementoj estas sintakse ligitaj por formi fiksitan sinsekvon. Ekzemple: rezervado de aviadil-vojaĝo (aŭ flugo). \*c laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go;

### 86/060

Rim: (=85/358, 85/359, 85/360) «93-11-14»

4.5.7

{U1} 001.423 (+)  
{U2} 800.892.2 (+)  
{U3} 801.316.1  
{T1} RBN

{eo1} neologism/o (1) \*b\*c  
{de1}  
{en1} neologism \*a  
{fr1}

Termino nove kreita aŭ antaŭ nelonge prunteprenita el fremda lingvo aŭ el alia fako. \*b laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c PIV

### 86/061

Rim: Laŭ PIV: 1 Vorto, enkondukita en unu lingvon, kie ĝi ĝis tiam ne estis uzata. 2 (ĉe Z.) Nova formo de vorto fundamenta, uzebla paralele kun ĝi, sed neniam ĝin malaperigonta: \la vojo de ~oj, kiuj ne rompus la unuecon inter la akirita k akirota\Fz\F.i =93/063 [94-02-26]

4.5.8

{U1} 001.423 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} prunt/e-pren/it/a termin/o \*b  
{de1}  
{en1} borrowed term \*a  
{fr1}

Termino prunteprenita el fremda lingvo aŭ el alia fako. \*b laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei;

### 86/062

Rim: =93/064 [94-02-26]

4.6 \>Termino-taksado

4.6.1

{U1} 001.424 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} prefer/at/a termin/o \*b  
{de1}  
{en1} preferred term \*a  
{fr1}

Termino rekomendita de aŭtoritat-hava institucio. \*b laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei;

### 86/063

Rim: =[85/320] =93/066 [94-02-26]

4.6.2

{U1} 001.424 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} permes/it/a termin/o \*b  
{de1}  
{en1} admitted term \*a  
{fr1}

Termino akceptita de aŭtoritat-hava institucio kiel sininimo de preferata termino. \*b laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei;

### 86/064

Rim: =[85/321] =93/067 [94-02-26]

4.6.3

{U1} 001.424 (+)  
{T1} RBN

{eo1} ne'rekomend/it/a termin/o \*b\*c  
{de1}  
{en1} deprecated term \*a  
{en2} rejected term  
{fr1}  
Termino rifuzita de aŭtoritat-hava  
institucio. \*b laŭ \*a  
Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go;  
**86/065**  
Rim: =[85/322] =93/068 [94-02-26]  
4.6.4

{U1} 001.424 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} arkaik/a termin/o \*b  
{eo2} eks'mod/a termin/o \*c  
{eo3} el'mod/iĝ/int/a termin/o \*c  
{de1}  
{en1} obsolete term \*a  
{fr1}

Ne plu uzata termino. \*b laŭ \*a  
Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go;

**86/066**

Rim: ei: {eo1} estas pli malnova ol {eo2} aŭ {eo3}.  
Laŭ PIV: arkaika Malnoviĝinta k ne plu en uzado  
(precipe pp vorto, esprimo). Do tute trafe termino.  
=93/069 [94-02-26]

5 \>Vortaro

5.1 \>Preparado

5.1.1 Por la difino vidu nocio-komplekson 86/101

5.1.2

{U1} 001.431 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} termin/ar/a ekstrakt/ad/o \*b  
{de1}  
{en1} terminological exerpction \*a  
{fr1}

Traserĉado de korpuso (86/069) por  
terminoj kaj dataoj (85/476) necesaj por ilia  
priskribo kaj prezento. \*b laŭ \*a

Traserĉado de korpuso (86/069) por  
terminoj kaj donitaĵoj (85/476) necesaj por ilia  
priskribo kaj prezento. \*c laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go;

**86/067**

Rim: =93/073 [94-02-26]

5.1.2.1

{U1} 001.431 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} font/o <5> \*b  
{de1}  
{en1} source \*a  
{fr1}

Skriba aŭ parola registraĵo, el kiu oni  
ekstraktis terminarajn dataojn. \*b laŭ \*a

Skriba aŭ parola dokumento, el kiu  
terminologiaj donitaĵoj estis ekstraktitaj. \*c laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go;

**86/068**

Rim: =93/074 [94-02-26]

5.1.2.2

{U1} 001.431 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} korpus/o <2> \*c  
{eo2} font/ar/o \*b  
{de1}  
{en1} corpus \*a  
{fr1}

Fonto-kolekto pri iu temo. \*b laŭ \*a

Kolekto da fontoj pri iu temo. \*c laŭ \*a.

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go;

**86/069**

Rim: =93/075 [94-02-26]

5.1.2.3

{U1} 001.431  
{T1} RBN  
{eo1} termin-ident/ig/o \*b  
{de1}  
{en1} term identification \*a  
{fr1}

Analizo de materialo ekstraktita el korpuso  
(86/069) por determini ĝian terminaran statuson. \*b  
laŭ \*a.

Analizo de materialo ekstraktita el korpuso  
(86/069) por determini ĝian terminologian statuson.  
\*c laŭ \*a.

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go;

**86/070**

Rim: <90-01-26>

5.1.2.4

{U1} 001.431 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} pri'labor/ot/a termin/o-list/o \*b  
{eo2} termin/o-list/o \*c  
{de1}  
{en1} term list \*a  
{fr1}

Termino-kolekto terminologie prilaborota.

Rimarkigo: prilaborota termino-listo kutime  
enhavas pliajn informojn krom la nuraj terminoj. \*b  
laŭ \*a

Kolekto da terminoj prilaborota por plua  
terminologia laboro. Rimarkigo: Termino-listo  
kutime inkludas pliajn informojn krom la nuraj  
terminoj. \*c laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go;

**86/071**

Rim: ei: Laŭ difino kaj posta rimarko estas tute  
klara, ke temas pri specifa termino-listo, tial ŝajnas  
al mi dezirinde aldoni adjektivon, eĉ se ĝi ne  
troviĝas en la Angla. <93-11-14>

5.1.3

{U1} 001.431 (+)  
{T1} RBN

{eo1} termin/ar/a registr/aj/o \*b  
 {eo2} termin/ar/a dare\*\*/o \*b  
 {de1}  
 {en1} terminological record \*a  
 {fr1}

Strukturita kolekto de terminaraj dataoj (85/476) rilatantaj al unu nocio. \*b laŭ \*a

Strukturita kolekto da terminologiaj donitaĵoj rilatantaj al unu nocio. \*c laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ej; \*c go;

### 86/072

Rim: ej: En Pekoteko terminaraj registraĵoj estas strukturitaj kiel nocio-kompleksoj. =93/080 [94-02-26]

5.1.4

{U1} 001.431 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} format/o <3> \*b  
 {de1}  
 {en1} format \*a  
 {fr1}

Strukturo de terminara registraĵo. \*b laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ej;

### 86/073

Rim: «93-11-14»

5.1.5

{U1} 001.431 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} termin/ar/aj data"/oj \*b  
 {eo2} terminologi/a don/it/aj/o \*c  
 {de1}  
 {en1} terminological datum \*a  
 {fr1}

Datao (85/476) karakterizanta nocion aŭ ĝian indikumon (86/034). Rimarkigo: Terminaraj dataoj estas: gramatika etikedo, lingvo-kodaĵo, lando-kodaĵo, indico de terminologia akceptebleco, fak-etikedo, difino, kunteksto, ilustraĵo, rimarko, fonto ktp. \*b laŭ \*a

Donitaĵo prezentanta nocion aŭ ĝian indikon/ indikaĵon (86/034). Rimarkigo: Terminologiaj donitaĵoj estas: gramatika etikedo, lingvo-kodo, lando-kodo, indico de terminologia akceptebleco, fak-etikedo, difino, kunteksto, ilustraĵo, rimarko, fonto ktp. \*c laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ej; \*c go;

### 86/074 =Ap86 #102

Rim: ej: Laŭ PIV kod/o (2) estas sistemo de registritaj simboloj. Mi rekomendas fari distingon inter la sistemo kaj la unuopaj simboloj per tio, ke ni nomu la simbolojn "kodaĵoj". "donitaĵo" por mi estas pli ĝenerala nocio ol datao (85/476), ĝi estas iu ajn konkretajo donita, ekz-e la medio, en kiu iu terminologia laboro okazas. Pri "terminara : terminologia" =86/032 kaj 86/100. «93-11-14»

5.1.5.1

{U1} 001.431 (+)

{T1} RBN  
 {eo1} primar/a en'skrib/o \*b  
 {eo2} en'skrib/o-titol/o \*b  
 {eo3} kap-termin/o \*ĉ  
 {de1}  
 {en1} main entry \*a  
 {fr1}

Iu indikumo (86/034) de nocio-titolo antaŭ terminara registraĵo. Rimarkigo 1: Tiu ĉi titolo kutime estas termino. Rimarkigo 2: Aliaj enskriboj estas nomataj sekundaraj enskriboj. \*b laŭ \*a

Iu indiko/indikaĵo (86/034) titolanta terminologian registraĵon. Rimarkigo 1: Tiu ĉi titolo kutime estas termino. Rimarkigo 2: Aliaj enskriboj estas nomataj sekundaraj enskriboj. \*c laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ej; \*c go; \*ĉ wor;

### 86/075

Rim: ej (92-01-06): Cxiujn tri termino-pronojn mi taksas bonaj. =93/083 [94-02-26]

5.1.5.2

{U1} 001.431 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} gramatik/a etikedo/o \*b  
 {de1}  
 {en1} grammatical label \*a  
 {fr1}

Simbolo (86/035) donanta gramatikajn informojn pri termino. Rimarkigo: Tiuj ĉi informoj kutime konsistas el gramatika kategorio, nombro kaj genro. \*b+\*c laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ej; \*c go;

### 86/076

Rim: =93/084 [94-02-26]

5.1.5.3

{U1} 001.431 (+)  
 {T1} RBN  
 {eo1} lingv/o-kod/aj/o \*b  
 {eo2} lingv/o-kod/o \*c  
 {de1}  
 {en1} language code \*a  
 {fr1}

Kodaĵo uzata por indiki la lingvon, al kiu termino apartenas. \*b laŭ \*a

Kodo uzata por indiki la lingvon, al kiu termino apartenas. \*c laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ej; \*c go;

### 86/077 =Ap86 #103

Rim: ej: Mi rekomendas, ke ni distingu laŭ PIV inter "kodo" kaj "kodaĵo": "kodo" estas "konvencia sistemo....". Tial "lingvo-kodo" estas listo, en kiu troviĝas ĉiuj uzataj lingvo-kodaĵoj; "kodaĵo" estu pli ĝenerala termino ol "kod-vorto", ĉar je lingvo-kodaĵoj ofte temas nur pri unuopaj literoj, ekz-e: A = Angla, F = Franca.

=93/085 [94-02-26]

5.1.5.4

{U1} 001.431 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} land/o-kod/aj/o \*b  
{eo2} land/o-kod/o \*c  
{de1}  
{en1} country code \*a  
{fr1}

Kodaĵo uzata por indiki la landon, en kiu termino estas uzata. \*b laŭ \*a

Kodo uzata por indiki la landon, en kiu termino estas uzata. \*c laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ej; \*c go;

**86/078**

Rim: ej: Vidu miajn rimarkojn en 86/077. =93/086 [94-02-26]

5.1.5.5

{U1} 001.431 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} indic/o de termin/ar/a akcept/abl/ec/o \*b  
{eo2} indic/o de terminologi/a akcept/abl/ec/o \*c  
{de1}  
{en1} terminological acceptability rating \*a  
{fr1}

Indico indikanta la takson de termino laŭ antaŭdeterminita skalo de valoroj. Rimarkigo:

La sekvaj indicoj estas kutimaj: norma, preferata, permesita, nerekomendita. \*c laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ej; \*c go;

**86/079**

Rim: =93/087 [94-02-26]

5.1.5.6

{U1} 001.431 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} fak-etiked/o \*b\*c  
{de1}  
{en1} subject label \*a  
{fr1}

Indiko de la scio-fako, al kiu terminara registraĵo estas atribuita. \*b laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ej;

**86/080**

Rim: =93/088 [94-02-26]

5.1.5.7

difin/o vidu 3.1 (=86/029)

5.1.5.8

{U1} 001.431 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} kun'tekst/o (1) \*b  
{de1}  
{en1} context \*a  
{fr1}

Teksto aŭ parto de teksto, en kiu termino aperas. \*b laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ej;

**86/081**

Rim: =[85/381] =93/089 [94-02-26]

5.1.5.9

{U1} 001.431 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} ilustr/aj/o (1) \*b  
{de1}  
{en1} illustration \*a  
{fr1}

Figuro, bildo aŭ alia grafika prezento de objekto. Rimarkigo 1: Ilustraĵojn kutime akompanas teksto. Rimarkigo 2: Ilustraĵoj estas help-rimedo por difinado kaj ne povas anstataŭi ĝin. \*b laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ej;

**86/082**

Rim: =93/090 [94-02-26]

5.1.5.10

{U1} 001.431 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} rimark/ig/o <1> \*b  
{eo2} koment/o \*c  
{de1}  
{en1} note \*a  
{en2} remark \*c  
{en3} comment \*c  
{fr1}

Klarigo, kiu provizas plian informon pri iu ajn parto de terminara registraĵo. \*b laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ej; \*c wor;

**86/083**

Rim: ej (92-01-02): Mi korektis mian antaŭan "rimarko" al "rimarkigo", ĉar "rimarko" estas tio, kion oni rimarkis, sed ĉi tie temas pri komuniko de rimarko al iu alia, kion esprimas "rimarkigi" laŭ PIV. En Vopo (89/208) oni povas meti ~ojn en elektronikan registraĵon per frapo de <Ctrl-F5> =89/461. =93/091 [94-02-26]

5.1.5.11

{U1} 001.431 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} font/o-kod/aj/o \*b  
{eo2} font/o-kod/o \*c  
{de1}  
{en1} source code \*a  
{fr1}

Kodaĵo indikanta la fonton, el kiu terminara datao (85/476) estas ĉerpita. \*b laŭ \*a

Kodo indikanta la fonton, el kiu terminologia donitaĵo (85/476) estas abstraktita. \*c laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ej; \*c go;

**86/084** =Ap86 #104

Rim: ej: Vidu miajn rimarkojn en 86/077. {en1} signifas ankaŭ → programista program-lingvo (89/521). =93/092 [94-02-26]

5.2 >Prezentado

5.2.1

{U1} 001.432 (+)

{U2} 801.3  
{T1} RBN  
{eo1} vort/ar/o (1) \*b  
{de1}  
{en1} dictionary \*a  
{fr1}

Strukturita kolekto de leksikaj unuoj kun lingvaj informoj pri ĉiu el ili. \*b laŭ \*a

Strukturita kolekto de leksikaj unuoj kun lingvistikaj informoj pri ĉiu el ili. \*c laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go;

### 86/085

Rim: ei: Vlinguistic<sup>v</sup>i en la Angla povas signifi simple "lingva" aŭ "lingvistika/lingvika". Cxi tie temas pri simplaj informoj kiel maskla aŭ transitiva, kiuj certe ne meritas la nomon "lingvistika".

wor (91-11-11): Science kolektita kaj prezentita informo pri lingvaĵoj estas faka, do lingvistika. Dependas de la kvalito de la vortaro, ĉu ĝi prezentas lingvistikajn informojn aŭ nur lingvajn.

ei (92-01-02): Cxi tie temas pri difino por komun-lingve uzata vorto, tial laŭ mia opinio la pli ĝenerala "lingvaj informoj" estas preferinda.

=93/093 [94-02-26]

5.2.1.1

{U1} 001.432 (+)  
{U2} 801.3  
{T1} RBN  
{eo1} termin/ar/o (1) \*b  
{eo2} teknik/a vort/ar/o \*b  
{eo3} terminologi/a vort/ar/o \*c  
{de1}  
{en1} terminological dictionary \*a  
{en2} technical dictionary  
{fr1}

Vortaro enhavanta terminarajn dataojn (85/476) pri unu aŭ pli da specifaj fakoj. \*b laŭ \*a

Vortaro enhavanta terminologiajn donitaĵojn (85/476) pri unu aŭ pli da specifaj fakoj. \*c laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go;

### 86/086 =Ap86 #105

Rim: ei: Tipa ekzemplo kiel oni povas erari, se oni provas imiti malbone elektitajn etnolingvajn terminojn (=86/032, 86/100). La nocio de 86/086 -- kiel {en2} malkaŝas -- rilatas ne al terminoj de la fako terminologio, sed temas ĝenerale pri vortaro, en kiu troviĝas terminoj, tial nur {eo1} aŭ {eo2} estas trafaj. Ankaŭ mi unue miskomprenis la difinon tradukinte ĝin per "terminologie aranĝita vortaro".

wor (91-11-11): "termino" laŭ 86/036 ne limiĝas al fakaj esprimoj.

ei (92-01-02): wor pravus. Tial mi aldonis en 86/036: "esprim/o komun-lingv/a aŭ fak/a". Laŭ PIV "termino" estas "vorto aŭ esprimo speciala al iu scienco", kio taŭgas perfekte por la nocio de 86/086. =93/094 [94-02-26]

5.2.1.1.1

{U1} 001.432 (+)  
{U2} 801.3  
{T1} RBN  
{eo1} terminologi/e el'labor/it/a termin/ar/o \*b  
{eo2} glos/ar/o \*c  
{eo3} vort/ar/o \*c  
{eo4} leksikon/o \*c  
{de1}  
{en1} glossary \*a  
{en2} vocabulary \*a  
{fr1}

Teknika vortaro enhavanta kolekton da terminoj de speciala fako aŭ de parencaj fakoj kaj bazita sur terminologia laboro. \*b laŭ \*a

Teknika vortaro enhavanta la terminologion (86/032) de speciala fako (86/002) aŭ parencaj fakoj kaj bazita sur terminologia laboro. \*c laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go;

### 86/087

Rim: ei (91-06-29): {eo2} estas laŭ PIV: "Vortaro pri arkaikaj aŭ specialaj vortoj, uzitaj de unu aŭtoro aŭ troviĝantaj en unu verko." {eo3} laŭ PIV devus enhavi "ĉiujn aŭ preskaŭ ĉiujn vortojn de lingvo", sed laŭ la difino klare temas nur pri teknikaj vortoj, do terminoj. {eo4} laŭ PIV estas vortaro, en kiu troviĝas ĉiuj vortoj de unu lingvo, unu verko aŭ unu aŭtoro. Do {eo2-Eo4} ne taŭgas por la indikita nocio. (Pri la termino "terminologio" en la difino de go =86/032 aŭ AkSt87,p97,2-a kolono). =93/095 [94-02-26]

5.2.2

{U1} 001.432 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} mikro/struktur/o \*b  
{de1}  
{en1} microstructure \*a  
{fr1}

Aranĝo-maniero de dataoj en ĉiu artikolo (86/090) de terminaro (86/086). \*b laŭ \*a

Organizado de donitaĵoj en ĉiu enskribo (86/090) de terminologia vortaro. \*c laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go;

### 86/088

Rim: ei: Vidu mian rimarkon sub 86/089.

=93/096 [94-02-26]

5.2.2.1

{U1} 001.432 (+)  
{U2} 801.3  
{T1} RBN  
{eo1} kap-termin/o \*e  
{eo2} artikol-termin/o \*c  
{eo3} artikol-vort/o \*ĉ  
{eo4} kap-vort/o \*d  
{de1} Schlagwort *n* \*ĉ  
{de2} Stichwort *n* \*c  
{en1} entry term \*a  
{fr1}

Termino titolanta artikolon (86/090) en

terminaro. \*b laŭ \*a

Termino titolanta artikolon (86/090) en terminologia vortaro. \*c laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go; \*ĉ KR; \*d PIV; \*e wor;

**86/089** =Ap86 #106

Rim: ei (91-06-11): Jen alia ekzemplo kiel misgvida povas esti, se oni klopodas imiti malbone elektitajn etnolingvajn terminojn anstataŭ indiki la sencon: Legante la difinon de go ĉiu devas opinii, ke la nocio de la komplekso estas la titoloj de artikoloj, kiuj troviĝas en vortaro enhavanta terminologiajn terminojn. Tamen komplekso 86/086 pravas, ke en ĝi {en1} kaj {en2} estas sinonimoj.

{eo1} laŭ mi estas pli trafa ol la aliaj terminoj, ĉar en fakvortaroj la termino titolanta artikolon konsistas ofte al pluraj vortoj. Al {eo4} <BibTer> atribuis aliajn signifojn (=91/016). =93/097 [94-02-26]

5.2.2.2

{U1} 001.432 (+)

{U2} 801.3

{T1} RBN

{eo1} artikol/o (4) \*d

{eo2} artikol/et/o \*ĉ

{eo3} registr/aĵ/o <1> \*ĉ

{de1} Eintrag *m* \*c

{en1} entry \*a\*c

{es1} artículo \*c

{fr1} article \*c

{fr2} entrée \*c

Parto de teknika vortaro, kiu enhavas la terminarajn dataojn (85/476) por unu nocio. Rimarkigo 1: La terminaraj dataoj povas esti donataj aŭ komplete aŭ per kruc-referenco (88/547) al alia artikolo. Rimarkigo 2: En la fakoj indeksado kaj data-prilaborado la termino {en1} estas malsame difinita (=88/517). \*b laŭ \*a

Parto de teknika vortaro, kiu enhavas la terminologiajn donitaĵojn (85/476) rilatantajn al unu nocio. Rimarkigo 1: La terminologiaj donitaĵoj povas esti donataj aŭ komplete aŭ per kruc-referenco al alia enskribo. Rimarkigo 2: En la fakoj indeksado kaj donitaĵ-prilaborado ~o estas malsame difinita. \*c laŭ \*a

Cxiu unuopa enskribo en vortaro, kune kun siaj difinoj kaj aliaj materialoj. T□: kap-vorto (91/016), enskribo (88/517). \*ĉ

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go; \*ĉ BibTer; \*d PIV;

**86/090**

Rim: ei: =85/445, 86/072. Nepre distingindaj en nia lingvo ŝajnas al mi la du diversaj signifoj de {en1}, pri kiuj atentigas ISO/N53. =88/517. Mi preferas la pli ĝeneralan {eo1}, ĉar en teknika vortaro ne ĉiuj artikoloj estas mallongaj.

=93/098 [94-02-26]

5.2.3

{U1} 001.432 (+)

{T1} RBN

{eo1} makro'struktur/o \*b

{de1}

{en1} macrostructure \*a

{fr1}

La ĝenerala aranĝo de teknika vortaro. \*b laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei;

**86/091**

Rim: =93/099 [94-02-26]

5.2.3.1

{U1} 001.432 (+)

{T1} RBN

{eo1} list/o de kap-terminoj \*b

{de1}

{en1} entry term list \*a

{fr1}

Kolekto de kap-terminoj (86/089) de teknika vortaro. \*b laŭ \*a

Kolekto de artikol-terminoj (86/089) de terminologia vortaro. \*c laŭ \*a.

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go;

**86/092**

Rim: ei: Vidu miajn rimarkojn sub 86/089.

=93/100 [94-02-26]

5.2.3.2

{U1} 001.432 (+)

{T1} RBN

{eo1} sistem/a aranĝ/o \*b

{de1}

{en1} systematic arrangement \*a

{fr1}

Aranĝo de kap-terminoj (86/089) laŭ nocio-sistemo (86/028). \*b laŭ \*a

Aranĝo de artikol-terminoj (86/089) en ordo bazita sur sistemo de nocioj. \*c laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go;

**86/093**

Rim: =93/101 [94-02-26]

5.2.3.3

{U1} 001.432 (+)

{T1} RBN

{eo1} alfabet/a aranĝ/o \*b

{de1}

{en1} alphabetical arrangement \*a

{fr1}

Alfabeto aranĝo de kap-terminoj (86/089). \*b laŭ \*a

Aranĝo de artikol-terminoj (86/089) laŭ alfabeto ordo. \*c laŭ \*a.

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go;

**86/094**

Rim: =93/102 [94-02-26]

5.2.3.4

{U1} 001.432 (+)

{T1} RBN

{eo1} miks/it/a aranĝo \*b  
{de1}  
{en1} mixed arrangement \*a  
{fr1}

Alfabeta aranĝo de kap-terminoj (86/089)  
interne de klasifitaj sekcioj. \*b laŭ \*a

Laŭalfabeta aranĝo de artikol-terminoj  
(86/089) interne de klasifitaj sekcioj. \*c laŭ \*a.

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go;

**86/095**

Rim: =93/103 [94-02-26]

5.2.3.5

{U1} 001.432 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} indeks/o (1) \*b  
{de1}  
{en1} index \*a  
{fr1}

Alfabeta termino-listo en terminaro kune  
kun referencoj faciligantaj termino-trovon. \*b laŭ  
\*a.

Laŭalfabeta listo de terminoj en  
terminologia vortaro akompanata de referencoj  
ebligantaj ilian retrovon. \*c laŭ \*a.

Rimarkigo: En la fako dokumentado  
"indekso" estas malsame difinita (=88/584). \*b laŭ  
\*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go;

**86/096**

Rim: =93/104 [94-02-26]

5.2.3.6

{U1} 001.432 (+)  
{U2} 003.034  
{T1} RBN  
{eo1} trans'liter/ig/o \*b  
{eo2} trans'liter/ad/o \*b  
{de1}  
{en1} transliteration \*a  
{fr1}

La prezentado de literoj de iu alfabeto  
skrib-sistemo per literoj de alia alfabeto. \*b laŭ \*a

Procedo prezentanta la literojn de iu  
alfabeta skrib-sistemo per literoj de alia alfabeto.  
\*c laŭ \*a.

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go;

**86/097**

Rim: (=85/338)

wor (91-11-11): La PIV-a vorto "transliteri  
/tr/" donas subtenon al {eo2}.

ei (92-01-02): Laŭ mi temas pri iomete  
malsamaj nocioj: {eo1} indikas la rezulton de {eo2}.  
Mi dirus: "Estis eraroj en la transliterigo", se tajpisto  
kelkfoje misklavis; mi dirus "La transliterado estis  
erara", se fuŝa transliterada sistemo estis uzata.  
=93/105 [94-02-26]

5.2.3.7

{U1} 001.432 (+)

{U2} 003.035  
{T1} RBN  
{eo1} trans'skrib/ad/o (1) \*b  
{de1}  
{en1} transcription \*a  
{fr1}

La prezentado de literoj de iu skribsistemo  
per literoj de alia skribsistemo kun konsidero de la  
prononco de la konvertitaj literoj. Rimarkigo:  
Transskribado povas esti uzata ankaŭ por ebligi la  
registradon de lingvoj sen skrib-sistemoj, uzanta la  
prononcon kiel elirpunkton. \*b laŭ \*a

Procedo prezentanta la literojn de iu  
skribsistemo per literoj de alia skribsistemo kun  
konsidero de la prononco de la konvertitaj literoj. \*c  
laŭ \*a.

Rimarkigo: ~o povas esti uzata ankaŭ por ebligi la  
registradon de lingvoj sen skrib-sistemoj, per uzo de  
la prononco kiel deirpunkto. \*b laŭ \*a

Rimarkigo: ~o povas esti uzata ankaŭ por indiki la  
registradon de lingvoj sen skrib-sistemoj, per uzo de  
la prononco kiel deirpunkto. \*c laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go;

**86/098**

Rim: =[85/339] =93/106 [94-02-26]

5.2.3.8

{U1} 001.432 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} Latin-alfabet/ig/o \*c  
{de1}  
{en1} romanization \*a  
{fr1}

La konvertado de ne-Latina skrib-sistemoj  
al la Latina alfabeto. \*b laŭ \*a.

La konvertado de ne-latinaj skribsistemoj al  
la Latina alfabeto. \*c laŭ \*a.

Rimarkigo: Oni povas atingi Latin-alfabetigon aŭ  
per transliterado aŭ transskribado aŭ per kombino de  
tiuj du metodoj laŭ la karaktero de la konvertota  
sistemo. \*b laŭ \*a

Rimarkigo: Latin-alfabetigo povas esti atingita aŭ  
per transliterado aŭ per transskribado aŭ per  
kombino de tiuj du metodoj, laŭ la karaktero de la  
sistemo konvertota. \*c laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go;

**86/099**

Rim: =93/107 [94-02-26]

7 \>Teoriaj fundamentoj kaj praktikaj aplikoj

7.1

{U1} 001.44 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} terminologi/o <2> \*b  
{eo2} terminologi/a scienc/o \*c  
{de1}  
{en1} terminology science \*a  
{fr1}

La scienca studado de nocioj kaj terminoj  
troviĝantaj en specialaj lingvoj (86/003).

Rimarkigo 1: Tio ĉi inkludas teoriojn pri - nocioj - nocio-sistemoj - prezentado de nocioj per difinoj kaj terminoj - termino-kreado (laŭ go: termino-formado) - frazeologiaj aspektoj de specialaj lingvoj - principoj de terminologia kaj grafika laboroj - sistema aliro al unu aŭ pli da terminaroj. Rimarkigo 2: Por praktikaj, edukaj kaj esploraj celoj pruviĝis utile distingi inter ĝenerala teorio pri terminologio, t.e. iu ajn terminologia teorio (laŭ go: teorio en terminologia scienco), kiu kovras pli ol unu fakon aŭ pli ol unu lingvon, kaj speciala teorio pri terminologio, t.e. iu ajn terminologia teorio (laŭ go: teorio en terminologia scienco), kiu kovras nur unu fakon en unu lingvo. \*b+c laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go;

### 86/100

Rim: ei: Por ekscii, kial mi nepre rekomendas nur la terminon {eo1} bv legi AkSt87,p97. =93/121 [94-02-26]

7.2

{U1} 001.44 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} termin/ar/a labor/o \*b  
{de1}  
{en1} terminology work \*a  
{fr1}

Iu ajn agado, kiu okupiĝas pri sistematigo kaj prezentado de nocioj, aŭ pri la prezentado de terminaroj surbaze de establataj principoj kaj metodoj. \*b+c laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go;

### 86/101

Rim: =93/122 [94-02-26]

7.2.1

{U1} 001.44 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} terminologi/a analiz/o \*b  
{de1}  
{en1} terminological analysis \*a  
{fr1}

La sistema esploro de nocioj kaj terminoj laŭ terminologiaj principoj kaj metodoj. \*b laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei;

### 86/102

Rim: =93/123 [94-02-26]

7.2.2

{U1} 001.44 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} termin/o-trakt/ad/o \*b  
{eo2} terminografi\*\*/o \*c  
{de1}  
{en1} terminography \*a  
{fr1}

La registrado, traktado kaj prezentado de terminaraj dataoj (85/476) akiritaj per terminara esplorado. Rimarkigo: "termino-traktado" anstataŭas la pli malnovajn terminojn "terminara

leksikografio" kaj "speciala leksikografio". \*b laŭ \*a

La registrado, traktado kaj prezentado de terminologiaj donitaĵoj (85/476) akiritaj per terminara esplorado. Rimarkigo: "terminografio" anstataŭas la pli malnovajn terminojn "terminara leksikografio" kaj "speciala leksikografio". \*c laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go;

### 86/103 =Ap86 #107

Rim: ei: La neologismo {eo2} estas facile evitebla per la el niaj lingvo-elementoj formita {eo1}. Legu detale pri tiu nocio-komplekso en AkSt86,p94. Ne uzu la terminon {eo2} por la nocio difinita en der-e 4/1985. Ankaŭ "termino-grafiko" ne taŭgus, ĉar "grafika" fariĝis antonimo por "teksta", do mispensigus pri "per-desegna prezento de termino". =86/193, kie troviĝas alia difino por {eo2}.

=93/124 [94-02-26]

7.3

{U1} 001.44 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} termin/ar/a norm/ig/o \*b  
{eo2} terminologi/a norm/ig/o \*c  
{de1}  
{en1} terminological standardization \*a  
{fr1}

Starigo de normoj pri terminaraj principoj aŭ starigo de terminaraj normoj aŭ de terminaraj sekcioj en teknikaj normoj, kaj ilia aprobo fare de aŭtoritat-hava institucio. \*b laŭ \*a

Starigo de normoj pri terminologiaj principoj aŭ starigo de terminologiaj normoj aŭ de terminologiaj sekcioj en teknikaj normoj, kaj ilia aprobo fare de aŭtoritat-hava institucio. \*c laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go;

### 86/104 =Ap86 #108

Rim: ei: Laŭ mia scio ekzistas normoj nur por terminaroj kaj ne por terminologiaj principoj. En neniuj normigitaj terminaroj troviĝas terminologia sekcio, sed ja terminara sekcio. =93/125 [94-02-26]

7.3.1

{U1} 001.44 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} norm/ig/o de terminologi/aj princip/oj \*b  
{eo2} norm/ig/o de termin/ar/aj princip/oj \*b  
{eo3} metodologi/aj norm/oj \*c  
{de1}  
{en1} standardization of terminological principles \*a  
{fr1}

Starigo de metodikaj normoj por terminologia laboro. Rimarkigo: Tiuspecaj normoj nomiĝas normigitaj terminologiaj principoj. \*b laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go;

### 86/105

Rim: ei: {eo1} substrekas la teorian aspekton, {eo2} la praktikan aspekton de planado de terminaro.

{eo3} signifas "normoj pri sciencaj metodoj", sed ne indikas rilatojn al terminaro aŭ terminologio. =93/126 [94-02-26]

7.3.2

{U1} 001.44 (+)  
{T1} RBN  
{eo1} oficial/ig/o de termin/ar/o \*b  
{eo2} norm/ig/o de terminologi/o \*c  
{de1}  
{en1} standardization of terminology \*a  
{fr1}

La oficialigo de terminaro fare de aŭtoritat-hava institucio. Rimarkigo: Oficialigitaj terminaroj aperas en la formo de oficialigitaj vortaroj (ankaŭ nomitaj vortaraj norm-verkoj), aŭ en la terminaraj sekcioj de aliaj teknikaj norm-verkoj. \*b laŭ \*a

Rimarkigo: Normigitaj terminaroj estas prezentitaj en la formo de normigitaj vortaroj (nomataj ankaŭ terminologiaj normoj), aŭ en la terminologiaj sekcioj de aliaj teknikaj normoj. \*c laŭ \*a

Fon: \*a ISO/N53; \*b ei; \*c go;

**86/106**

Rim: ei: normo estas regulo difinanta kondiĉojn de produktado aŭ modelo kompare kun kiu oni juĝas la ĝustecon de samspecaj produktaĵoj. En ĉi tiu komplekso temas pri norm-verko, en kiu troviĝas rekomenditaj terminoj. =86/192, =93/127 [94-02-26]

{U1} 681.3.065.21 (+)  
{T1} KEG  
{eo1} data"\_baz/ap\*\*/ar/o \*a  
{de1} Datenbanksoftware f\*c  
{en1} database program \*b  
{en2} data base software \*c  
{fr1}

{nl1} database programmatuur \*ĉ  
Programaro por krei kaj mastrumi → databazajn dosierojn (89/105) kaj tiel databazon (89/142). La plej uzata ~o estas \dBase III\i aŭ \dBase IV\i. Pli malmultekostaj estas la 3-diska ŝarvo (89/074) \IPC-File:dB\i aŭ la ~o, kiu troviĝas en la programaro \IPC Tools\i. \*a

Fon: \*a ei; \*b PCTools,p279; \*c CE; \*ĉ esInfWoord [ei];

**89/100**

Rim: <93-12-07>

{U1} 681.3.065.5 (+)  
{T1} KEG  
{eo1} desegn/ap\*\*/o \*a  
{de1} Zeichenprogramm n \*c  
{en1} drawing program \*b  
{en2} graphics program \*b  
{fr1}

{nl1} tekenprogramma \*ĉ

Programo por fari ilustraĵojn, teknikajn desegnaĵojn aŭ grafikaĵojn. Sxarvo (89/074): \IPC-Key-Draw\i (3 diskaj). \*a

Fon: \*a ei; \*b ReaSol89/11,p17; \*c pb; \*ĉ es InfWoord [ei];

**89/101**

Rim: <93-12-07>

{U1} 681.3.065.67 (+)  
{T1} KEG  
{eo1} tri-dimensi/a desegn/ap\*\*/o \*a  
{de1} dreidimensionales Zeichenprogramm n \*c  
{en1} three-dimensional drawing program \*b  
{fr1}

{nl1} drie-dimensionaal tekenprogramma \*ĉ  
Programo por desegni 3-dimensiajn objektojn, kiujn oni povas movi, rotacii, pligrandigi aŭ malpligrandigi. Sxarvo (89/074): \Image-3D\i. \*a

Fon: \*a ei; \*b ReaSol89/11,p16; \*c pb; \*ĉ es InfWoord [ei];

**89/102**

Rim: <93-12-07>

{U1} 681.3.065.54 (+)  
{T1} KEG  
{eo1} difin- kaj sinonim-vortar/ap\*\*/o \*a  
{de1}  
{en1} RAM-resident dictionary/thesaurus  
{fr1}

{nl1} verklarende synoniemenlijst \*c

Elektronika vortara programo, kiu enhavas difinojn kaj sinonimojn. En la softvo (85/399) \CHOICE WORDS\i estas registritaj la difinoj por 80 000 Anglaj vortoj kaj pli ol 470 000 sinonimoj. Gxi funkcias kun 35 skribapoj (85/442). \*a laŭ \*b.

Fon: \*a ei; \*b PeCo89/1,p158; \*c es [ei];

**89/103**

Rim: <93-12-07>

{U1} 681.3.065.21 (+)  
{T1} KEG  
{eo1} instru/ap\*\*/o \*a  
{de1} Tutorsystem n \*c  
{en1} tutorial \*b  
{en2} tutorial system \*c  
{en3} courseware \*ĉ  
{fr1}

{nl1} lessen \*d

Komputara programo por instrui ion. ~oj por maprodo (85/403) DOS troviĝas en la ŝarvoj (89/074) \The DOS Learning System\i kaj \Computer/DS-TUTOR\i. La version 5.0 de Vopo oni povas lerni per la ŝarvo \WordPerfect 5.0 Learning\i (2 diskaj). Ekzistas ankaŭ programo, por ke oni povu prepari siajn proprajn ~ojn: \TUTOR.COM\i. \*a laŭ \*b.

Fon: \*a ei; \*b ReaSol89/11; \*c CE; \*ĉ she en letero al ei; \*d esWP5.1NIGb [ei];

**89/104**

Rim: «93-12-07»

{U1} 681.3.065.63 (+)  
{T1} KEG  
{eo1} data"\_baz/a dosier/o \*a  
{de1} Datenbankdatei f \*c\*ĉ  
{en1} database file \*b  
{fr1}  
{nl1} databasebestand \*d

Dosiero (85/434) en databazo (89/142). Gxi konsistas el dareoj (85/445), el kiuj ĉiu konsistas el strikte difinitaj kampoj. □o ekz-e povas enhavi liston de klientoj. Se oni surekranigas ĝin, aperas fenestro (86/189) en kiu aperas ĉiam samloke: nomo, adreso, urbo, ŝtato, poŝt-kodaĵo, telefonnumero, kaj iuj rimarkoj. Por aliaj dosier-specoj =85/434. \*a laŭ \*b.

Fon: \*a ej; \*b PCTools,p280; \*c CE=Datenbank, =Datei; \*ĉ pb; \*d es InfWoord[ej];

**89/105**

Rim: «93-12-07»

{U1} 681.3.065.63 (+)  
{T1} KEG  
{eo1} dur-disk/a dosier-ord/ig/ap\*\*/o kaj ŝarg/ap\*\*/o \*a  
{de1}  
{en1} hard disk file organizer  
{fr1}  
{nl1} bestandsorganisatie-programma voor harde schijf \*c

Softvo (85/399) por interligi programajn dosierojn kun tekstaj aŭ dataj dosieroj. Gxi ebligas per unu klavofrapo ŝargi la komputoran memoron per dosiero kune kun la por tiu dosiero bezonata aplikapo (85/401), transigi tekstojn inter dosieroj de diversaj aplikapoj, kaj reordigi dosierojn sur durdisko. \VIEWLINKi estas tiuspeca softvo. \*a laŭ \*b.

Fon: \*a ej; \*b PeCo89/7,p113; \*c es[ej];

**89/106**

Rim: «93-12-07»

{U1} 681.3.065.15 (+)  
{T1} KEG  
{eo1} data"-kun'prem/ap\*\*/o \*a  
{de1} Datenverdichtungsprogramm n \*c  
{en1} compressor \*b  
{fr1}  
{nl1} comprimeerprogramma \*d

Programo por kunpremi registraĵojn, por ŝpari spacon sur disko aŭ transsendo-tempon. Al ĝi apartenas alia programo, kiu malkunpremas la kunpremitajn registraĵojn, se oni bezonas legi aŭ prilabori ilin. \*a laŭ \*b

Fon: \*a ej; \*b ComGlo; \*c CE=Datenverdichtung; \*ĉ pb; \*d es laŭ InfWoord[ej];

**89/107**

Rim: «93-12-07»

{U1} 681.3.065.63 (+)  
{T1} KEG  
{eo1} dur-disk/a kaŝ-memor/ap\*\*/o \*a  
{de1} Schattenspeicherprogramm n \*ĉ  
{de2} Schnellpufferspeicherprogramm n \*ĉ  
{en1} hard disk cache program \*c  
{en2} disk cacher \*b  
{fr1}

Programo por krei kaŝ-memoron, en rezervita ramo-parto (85/397), en → etendita memoro (89/288) aŭ en → ekspansiigita memoro (89/180). Se iu registraĵo estas legata, larĝa databloko estas kopiata en la kaŝ-memoron. Se poste la sama data-bloko estas bezonata, la programo ne devas legi ĝin de la registraĵo, sed ĝi povas multe pli rapide kopii ĝin el la kaŝ-memoro. Ankaŭ je registrado la en la kaŝ-memoro troviĝantaj datablokoj ebligas pli rapidan tasko-plenumon. \*a laŭ \*b.

Fon: \*a ej; \*b Hard,p341; \*c Reklamilo de TC! Power; \*ĉ CE=Schattenspeicher;

**89/108**

Rim: «93-12-07»

{U1} 681.3.065.15 (+)  
{T1} KEG  
{eo1} en'ram"/a fenestr/o-redakt/ap\*\*/o \*a  
{de1}  
{en1} memory resident window editor \*b  
{fr1}  
{nl1} vensterzet-programma \*c

Programo por krei kaj redakti enramajn (85/397) fenestrojn (86/189), kiuj estas aldoneblaj al iu ajn programo por regi ties funkciojn. \Flash-Upi estas tiuspeca programo. \*a laŭ \*b.

Fon: \*a ej; \*b PeCo89/3,p96; \*c es[ej];

**89/109**

Rim: «93-12-07»

{U1} 681.3.065.61 (+)  
{T1} KEG  
{eo1} kalendar/ap\*\*/o \*a  
{de1}  
{en1} infinite calendar \*b  
{en2} calendar maker \*c  
{fr1}  
{nl1} calender \*ĉ

Programo por surekranigi aŭ printi kalendaron por iu ajn monato aŭ jaro, en kiu oni povas fari notojn. \Multiplusi enhavas tiuspecan programon. \Calendar Makeri estas tiuspeca ŝarvo (89/074). \*a.

Fon: \*a ej; \*b PeCo89/3,p167; \*c ReaSol89/11,p22; \*ĉ esInfWoord[ej];

**89/110**

Rim: «93-12-07»

{U1} 681.3.065.61 (+)  
{T1} KEG  
{eo1} etiked/ap\*\*/o \*a

{de1}  
{en1} label printing program \*b  
{en2} Labels feature \*c  
{fr1}  
{nl1} label-printprogramma \*c  
Programo por produkti diversspecajn etiketojn. La ŝarvo (89/074) \IMr. Labeli kapablas importi dataojn de tekstaj dosieroj (85/434) por adresi kovertojn, kaj por printi adres-, dosier- kaj disk-etikedojn. \*a laŭ \*b. \IWordPerfect 5.1\i enhavas ankaŭ ~on. \*c  
Fon: \*a ei; \*b ReaSol89/11,p22; \*c WP-5.1,p349; \*c es[ei];

**89/111**

Rim: <93-12-07>

{U1} 681.3.062 (+)  
{T1} KEG  
{eo1} friv\*\*/o \*a  
{de1}  
{en1} freeware \*b  
{en2} public domain software \*b  
{fr1}

Softvo (85/399), kiun oni rajtas senpage uzi. (=89/074, 89/087) \*a laŭ \*b.  
Fon: \*a ei; \*b ComGlo;

**89/112**

Rim: <93-12-07>

{U1} 681.3.065.2 (+)  
{T1} KEG  
{eo1} faktur/ap\*\*/ar/o \*a  
{de1} Fakturierprogramm n \*c  
{en1} invoicing program \*b  
{fr1}  
{nl1} factureerprogramma \*c

Programaro apartenanta al kontada softvo (85/399), ekz-e \IProfitwise\i, servanta por prepari fakturojn, aldoni mesaĝojn al ili, kaj por pere de la inventaria (89/113) modjulo (85/391) aŭtomate remendi stokon. \*a laŭ \*b.  
Fon: \*a ei; \*b PeCo89/3,p154; \*c CE=Fakturierung; \*c es[ei];

**89/113**

Rim: <93-12-07>

{U1} 681.3.065.22 (+)  
{T1} KEG  
{eo1} financ/a kalkul/ap\*\*/o \*a  
{de1}  
{en1} financial calculator \*b  
{fr1}  
{nl1} financieel rekenprogramma \*c

Kalkul-programo speciale taŭga por financaj kalkuloj. □o estas parto de la programaro \IPC TOOLS\i. \*a

Fon: \*a ei; \*b PCTools,p425; \*c esInfWoord [ei];

**89/114**

Rim: <93-12-07>

{U1} 681.3.065.52 (+)  
{T1} KEG  
{eo1} mastr/um/ap\*\*/ar/o por person/aj financ/oj \*a

{de1}  
{en1} personal finance manager \*c  
{en2} money management program \*b  
{fr1}  
{nl1} persoonlijke financiën-beheerder \*c

Programaro por individua persono por i.a.: \* mastrumi ies kontantan kaj surbankan monon kaj ties kredit-kartojn; \* prepari ies buĝeton kaj por kompari ĝin kun la veraj rezultoj; \* printi ĉekojn, financajn deklarojn kaj ĝeneralan kontlibron; \* taksi pagotajn impostojn; \* analizi financajn opciojn. \*a laŭ \*c  
Fon: \*a ei; \*b PeCo89/1,p37,p133; \*c PeCo89/12,p59 Money Counts; \*c es[ei];

**89/115**

Rim: =89/116 <93-12-07>

{U1} 681.3.065.22 (+)  
{T1} KEG  
{eo1} financ/ap\*\*/ar/o \*a  
{de1} Finanzbuchhaltungs-Software f \*c  
{en1} financial software \*b  
{fr1}  
{nl1} financieprogrammatuur \*c

Softvo (85/399) por prepari financajn raportojn, pri enspezoj kaj elspezoj, pri ludonitaj posedaĵoj, labor-kostoj, pagendaj fakturoj, ricevotaj kontoj. Gxi eĉ skribas ĉekojn kaj rekalkulas la konto-balancojn. \IQuicken\i estas tiuspeca financa softvo. \*a

Fon: \*a ei; \*b PeCo89/1,p221; \*c CE; \*c es[ei];

**89/116**

Rim: =89/115 <93-12-07>

{U1} 681.3.065.2 (+)  
{T1} KEG  
{eo1} formularj\*\*kre/ap\*\*/ar/o \*a  
{de1} Software f für Formularentwurf m \*c  
{en1} form design software \*b  
{fr1}  
{nl1} formulier-ontwerpprogrammatuur \*c

Softvo (85/399), por faciligi la kreadon de formularioj (87/126). Inter la programaroj de \IFormTool\i ekzistas jam 120 predezajnitaj (85/411) formularioj, taŭgaj por adapti ilin al specialaj bezonoj. Per malmultaj klavo-frapoj oni povas ŝanĝi kadrojn, retojn kaj rearanĝi ilin. \*a laŭ \*b.

Fon: \*a ei; \*b PeCo89/7,p124; \*c CE=Formularentwurf; \*c es laŭ InfWoord[ei];

**89/117**

Rim: <93-12-07>

{U1} 681.3.065.2 (+)  
{T1} KEG  
{eo1} formulari\*\*plen/ig/ap\*\*/o \*a

{de1}  
 {en1} form filler \*b  
 {fr1}  
 {nl1} formulier-invuller \*c  
 Programo por faciligi la plenigon de jam presitaj formularioj (87/126). La programo \FormFiller\i lokas plenigendajn spacojn en formulario per tio, ke ĝi printas kradon sur ĝin. De tiu krado ĝi kreas aŭtomate "mastro-ŝablonon", kiu difinas kampojn por ĉiu respondenda demando. Utiligantoj de la programo simple klavas <Tab> por movi de unu kampo al la neksta (87/682). \*a laŭ \*b.  
Fon: \*a ei; \*b PeCo89/7,p115; \*c es laŭ InfWoord [ei];

**89/118**

Rim: =89/119 «93-12-07»

{U1} 681.3.065.2 (+)  
 {T1} KEG  
 {eo1} formulari\*\*/ap\*\*/o \*a  
 {de1}  
 {en1} forms program  
 {fr1}  
 {nl1} formulierprogramma \*c  
 Programo por krei formulariojn (87/126) kaj por plenigi ilin (=89/117,118). La programaro \FormWorx\i ebligas facilan teksto-enigon en jam presitajn aŭ fotokopiitajn formulariojn, kiuj estis dezajnitaj per ĉi tiu programo, aŭ la printadon de jam plenigitaj formularioj. \*a laŭ \*b.  
Fon: \*a ei; \*b PeCo89/1,p22; \*c es laŭ InfWoord [ei];

**89/119**

Rim: «93-12-07»

{U1} 681.3.065.52 (+)  
 {T1} KEG  
 {eo1} genealogi/ap\*\*/ar/o \*a  
 {de1}  
 {en1} genealogy system \*b  
 {fr1}  
 {nl1} genealogisch programma \*c  
 Programaro por sisteme aranĝi gravajn dokumentojn kaj okazintaĵojn en historio de familio. La ~o \Family Reunion\i kreas malgrandan databazon (89/142) da informoj, kiun povas aranĝi en diversaj formatoj de genealogiaj arboj. \*a laŭ \*b  
Fon: \*a ei; \*b PeCo89/7,p122; \*c es [ei];

**89/120**

Rim: «93-12-07»

{U1} 681.3.065.5 (+)  
 {T1} KEG  
 {eo1} grafik/aĵ-kre/ap\*\*/o \*a  
 {de1} Programm n für graphische Eingabe \*c  
 {en1} graph utility \*b  
 {fr1}  
 {nl1} graaf-utiliteit \*ĉ  
 Program por krei divers-specajn grafikaĵojn rekte de dataaroj. La programo \Graph-in-the-Box\i

surekranigas kaj printas 11 diversajn grafikaĵ-tipojn pere de nombroj kaptitaj rekte de la ekrano. \*a laŭ \*b.

Fon: \*a ei; \*b PeCo89/1,p23; \*c CE=Eingabe, graphische; \*ĉ esInfWoord [ei];

**89/121**

Rim: «93-12-07»

{U1} 681.3.065.5 (+)  
 {T1} KEG  
 {eo1} grafik/ap\*\*/o \*a  
 {de1} Programm n für Bildverarbeitung \*c  
 {en1} program for mixing text with pictures \*b  
 {fr1}  
 {nl1} grafisch/beeld met tekst/programma \*ĉ  
 Grafika programo por printi tekston kun borderoj, grafikaĵoj kaj ilustraĵoj. Se temas pri multe da teksto, oni uzu je la programo \Fontasy\i skribapon por surdiskigi la tekston en ASCII-formato, kiun \Fontasy\i poste formatigas sur la ekrano aldonante la grafikaĵojn. \*a laŭ \*b.  
Fon: \*a ei; \*b Fontasy; \*c CE=Bildverarbeitung; \*ĉ es [ei];

**89/122**

Rim: «93-12-07»

{U1} 681.3.065.54 (+)  
 {T1} KEG  
 {eo1} grafologi/ap\*\*/o \*a  
 {de1}  
 {en1} handwriting analyser \*b  
 {fr1}  
 {nl1} handschrift analyseerprogramma \*c  
 Programo por analizi manuskribon por malkaŝi ies personecon. La programo \Write n' Tell\i produktas por la analizanto facile respondeblajn demandojn. Laŭ ricevitaĵoj respondoj ĝi kompilas multpaĝan raporton. \*a laŭ \*b.  
Fon: \*a ei; \*b PeCo89/11,p62; \*c es [ei];

**89/123**

Rim: «93-12-07»

{U1} 681.3.065.4 (+)  
 {T1} KEG  
 {eo1} grup-produkt/iv/ec-  
 pli'grand/ig/ap\*\*/ar/o \*a  
 {de1}  
 {en1} group productivity software \*b  
 {fr1}  
 {nl1} groepsproductiviteit programmatuur \*c  
 Programaro por pligrandigi la produktivon de per komputora reto kunligata labor-grupo. La softvo (85/399) \Office Works\i plenumas 5 funkciojn: 1. Elektronikaj mesaĝoj al personoj konektitaj al via reto kaj pere de telekopio (89/182), telekso (89/183) aŭ ordinara poŝto al aliaj personoj. 2. Sxedjulado (89/125) de labortaskoj kaj kunvenoj per aŭtomata trovado de la minimume konfliktantaj tempoj, per provizora notado de tiuj tempoj, kaj petante konfirmon de la koncernaj personoj. 3.

Dosier-kontrolado. Aŭtomate indeksanta sistemo por komputaraj kaj paperaj dosieroj, programoj kaj aliaj oficejaĵoj. 4. Databazo (89/142) por nomoj, adresoj, telefon-numeroj de klientoj, vendistoj kaj aliaj personoj. Per tiu ĉi programo oni povas selekti, ordigi kaj printi kovertojn aŭ adresetiketojn. 5. Telefonaj mesaĝoj. La programaro informas vin pri respondendaj telefonaj mesaĝoj. Oni ricevos ĉiujn gravajn informojn: daton kaj tempon, nomon kaj numeron de la telefoninto, kaj la tekston de la mesaĝo. La programo eĉ povas numerumi la numeron de la telefoninto. \*a laŭ \*b.

Fon: \*a ej; \*b PeCo89/1,p107; \*c es[ej];

### 89/124

Rim: <93-12-07>

{U1} 65.012.2  
{U2} 681.3.065.69 (+)  
{T1} AFZ  
{eo1} ŝedjul\*\*/i \*a  
{de1} terminieren \*c  
{en1} schedule tr \*b  
{fr1}  
{nl1} scheduleren \*ĉ

Prepari ~on aŭ enmeti ion en ~on, tempo-plani. ~o 1. Nombro da taskoj aŭ okazantaĵoj kutime laŭtempe listigitaj kaj kun la daŭro atribuita al ĉiu. 2. Farindaĵoj dum tempo-periodo. \*a laŭ \*b. ~apo ~-programo (A: \scheduleri; G: \Zeitsuordnungsprogramm\i); ~apo por dungitoj (89/141); ~ita bontenado Bontenado de maŝinoj aŭ aparatoj laŭ ~o. (A: \scheduled maintenance\i) \*a

Fon: \*a ej; \*b Rand; \*c Wah; \*ĉ es laŭ InfWoord [e];

### 89/125

Rim: <93-12-07>

{U1} 681.3.065.71 (+)  
{T1} KEG  
{eo1} impost-deklar/ap\*\*/ar/o \*a  
{de1} Steuererklärungssoftware f \*a  
{en1} income tax return preparation software \*b  
{fr1}  
{nl1} aangifte programma \*c

Softvo (85/399) por faciligi impost-deklarojn.

La programaro \Tax Shop\i sur-ekranigas tekstojn, kiuj similas al la veraj impost-formularioj (87/126), kaj post enmeto de la dataoj, ĝi kalkulas la pagendan imposton. \*a laŭ \*b.

Fon: \*a ej; \*b PeCo89/1,p84; \*c esCIB91/3,p17[e];

### 89/126

Rim: <93-12-07>

{U1} 681.3.065.22 (+)  
{T1} KEG  
{eo1} integr/it/a kont/ad/ap\*\*/ar/o \*a  
{de1} integriertes Abrechnungssystem n \*c  
{en1} integrated accounting system \*b  
{fr1}

{nl1} geïntegreerd accountantsprogrammatuur \*ĉ  
Softvo (85/399), en kiu estas integritaj diversaj kontadapoj. En \Bedford's integrated accounting system\i ekz-e troviĝas jenaj kontadapoj: ĉeflibrapo (89/017), salajro-pagapo (89/159), kontadapo por pagontaj klientoj (89/138), kontadapo por pagotaj fakturoj (89/138), stok-kontadapo (89/162), laborkost-kontadapo (89/181). \*a laŭ \*b.

Fon: \*a ej; \*b PeCo89/1,p243; \*c cE@; \*ĉ es laŭ InfWoord [e];

### 89/127

Rim: <93-12-07>

{U1} 681.3.065.68 (+)  
{T1} KEG  
{eo1} inter'skrib/ap\*\*/a dosier-konvert/ap\*\*/ar/o \*a  
{de1} Umsetzprogramm n \*c  
{en1} conversion program \*c  
{fr1}  
{nl1} conversieprogramma \*ĉ

Programoj por konverti dosierojn al la formatoj de diversaj skribapoj (85/442) aŭ tekstoprilaboraj programoj. La softvo (85/399) \Word For Word\i povas konverti 25 paĝojn da registraĵoj dum unu minuto al iu alia formato de 12 teksto-prilaborapoj. \*a laŭ \*b.

Fon: \*a ej; \*b PeCo89/7,p124; \*c CE; \*ĉ esInfWoord [e];

### 89/128

Rim: <93-12-07>

{U1} 681.3.065.2 (+)  
{U2} 681.3.065.70 (+)  
{T1} KEG  
{eo1} invest-konsil/ap\*\*/o \*a  
{de1}  
{en1} personal investment system  
{en2} portfolio manager  
{fr1}  
{nl1} investeringsprogramma \*c

Fon: \*a ej; \*b ?; \*c es[e];

### 89/129

Rim: <93-12-07>

{U1} 681.3.065.22 (+)  
{T1} KEG  
{eo1} kalkul/ap\*\*/o \*a  
{de1} Rechnerprogramm n \*ĉ  
{en1} calculator \*b\*c  
{nl1} rekenprogramma \*d

Kalkul-programo por ĝeneralaj aŭ specialaj celoj. ~o por financaj komputadoj, ~o por \----- programistoj, ~o por sciencaj komputadoj, \----- ~o por statistikaj komputadoj, ~o por\----- unito-konvertado. \*a laŭ \*b kaj \*c.

Fon: \*a ej; \*b PC Tools; \*c PeCo89/3; \*ĉ CE; \*d es[e];

### 89/130

Rim: «93-12-07»

{U1} 681.3.065.52 (+)  
{T1} KEG  
{eo1} kalori-kalkul/ap\*\*/o \*a  
{de1}  
{en1} program for weight control \*b  
{fr1}

Programo por konsili sanigan dieton. La programo \DietHelper\i kalkulas manĝitajn kaloriojn kaj registras la konsumon de kuir-salo, kolesterolo, fibroj kaj de 20 aliaj nutraĵ-elementoj. \*a laŭ \*b.

Fon: \*a ei; \*b PeCo89/11,62;

**89/131**

Rim: «93-12-07»

{U1} 681.3.065.21 (+)  
{T1} KEG  
{eo1} katalog/ad/ap\*\*/o \*a  
{de1} Katalogprogramm n \*c  
{en1} cataloging program \*b  
{fr1}

{nl1} catalogusprogramma \*ĉ  
Databazapo (89/100) por prepari katalogojn pri libroj, diskaj, kasedoj ktp. La programo \SuperCat\i povas katalogi laŭ temoj, aŭtoroj, artistoj, komponistoj, titoloj ktp. \*a

Fon: \*a ei; \*b PeCo89/11,62; \*c CE=Katalog; \*ĉ es laŭ InfWoord [ei];

**89/132**

Rim: «93-12-07»

{U1} 681.3.065.5 (+)  
{T1} KDA  
{eo1} komputor"-help/at/a dezajn"  
-sistem/o \*a  
{eo2} kohed\*\*/o \*a  
{de1} rechnerunterstützter Entwurf m \*c  
{de2} CAD \*c  
{en1} computer assisted design \*b  
{en2} CAD \*b  
{en3} computer-aided design \*c  
{fr1}

{nl1} automatisch ontwerpsysteem \*ĉ  
Kohedo-sistemo konsistas el alt-kapablaj personaj komputoroj, kiuj utiligas por dezajnado (85/411) kohedo-softvon (89/136) kaj enigatorojn (85/404) kiel diĝigitan tabuleton (89/191) kaj skenatorojn (87/327). \*a laŭ \*b.

Fon: \*a ei; \*b ComGlo; \*c CE; \*ĉ es InfWoord [ei];

**89/133**

Rim: «93-12-07»

{U1} 681.3.065.5 (+)  
{T1} KEG  
{eo1} kivivi-e-kiviro\*\*-ebl/ig/ap\*\*/o \*a  
{eo2} real-vid/ig/ap\*\*/o \*d  
{eo3} pridprek\*\*ap\*\*/o \*e  
{de1} Wysiwyg \*c

{de2} Programm n für druckidentische  
Bildschirmdarstellung \*e

{de3} WYSIWYG-Programm n" \*e  
{en1} preview utility \*b  
{en2} WYSIWYG (pron.:wizwig) preview utility  
\*b\*ĉ

{fr1}

Programo por surekranigi printotan tekston, kiu aspektu precize tiel, kiel ĝi poste printiĝos. En la Angla oni nomas tiun econ sloganece \WYSIWYG - What You See Is What You Get\i, kiun ni povus traduki Esperanten per "kivivi-e-kiviros" (kion vi vidas estas kion vi ricevos). Tiu ĉi programo ekzistas kiel subprogramo en teksto-prilaborapoj (85/442) kaj ankaŭ kiel memstara programo en \PrintVision\i. \*a laŭ \*b.

Fon: \*a ei; \*b PeCo??; \*c CE; \*ĉ BYTE89/12,p372; \*d es[ei]; \*e pb;

**89/134 =ApE89 #268**

Rim: pb (91-04-13): 1 Mi proponas deiri ne de traduko de la Angla WYSIWYG, oportune nur en tiu lingvo, ĉar ĉiu vorto konsistas el nur unu silabo, sed de - eble akronime mallongigita - priskriba termino, kiel 1.1 ekran-bildo egala al printaĵo, 1.2 ekran-prezento identa al printota teksto, 1.3 print-identata sur-ekrana tekst-prezento, 1.4 print-identata prezento sur la ekrano; do: pridprek\*\*/o. Malpli longe, pli bone prononcebla k eble pli facile memorebla ol la tre Volapukeca {eo1}.

2 Laŭ mi {de1} estas malĝusta, ĉar ĝi celas nur la tekst-prezenton sur la ekrano, k ne la programon, kiu ebligas tion. Do devus esti "WYSIWYG-Programm n".

ei (91-09-10): Certe ankoraŭ multaj aliaj traduk-proponoj eblas, kaj eble ni trovos iun, kiu klare estos preferata. Bv, voĉdoni kaj fari proponojn. «93-12-07»

{U1} 681.3.065.54 (+)  
{T1} KEG  
{eo1} klav-instru/ap\*\*/o \*a  
{de1}  
{en1} typing program \*b  
{en2} typing instructor \*c  
{fr1}

{nl1} typeprogramma \*ĉ  
Programo, kiu instruas rapidan kaj akuratan tuŝ-tajpadon aŭ tuŝ-klavadon. La programo \IMavis Beacon Teaches Typing\i enhavas horloĝon kaj metronomon, ĉar ritma tajpado helpas al nov-tajpantoj rapidigi kaj akuratiĝi la tajpadon. La programo \ITYPING INSTRUCTOR Encore\i vidigas la klavaron sur la ekrano, kaj diagnozas rapidon kaj akuraton de ĉiu fingro kaj klavo. \*a laŭ \*b\*c.

Fon: \*a ei; \*b PeCo89/7,p118; \*c PeCo89/1,p75; \*ĉ es laŭ VDwoord[ei];

**89/135**

Rim: «93-12-07»

{U1} 681.3.065.5 (+)  
 {T1} KEG  
 {eo1} kohed\*\*/o-softv\*\*/o \*a  
 {de1} CAD Software \*c  
 {en1} CAD software \*b  
 {fr1}  
 {nl1} CAD-programmatuur \*ĉ

Softvo (85/399) por kohedo (89/133). Gxin oni preparis por ĝenerala aŭ specialigita uzado, ekz-e por arkitekturo, aŭ dezajnado (85/411) de elektraj aŭ mekanaj aparatoj. Gxi estas ankaŭ utiligata por produkti presitajn konduktilarojn (89/193) kaj icojn (85/410). \*a laŭ \*b.

Fon: \*a ei; \*b ComGlo; \*c CE=CAD; \*ĉ es[ei];

**89/136**

Rim: «93-12-07»

{U1} 681.3.065.65 (+)  
 {T1} KEG  
 {eo1} klip-memor/ap\*\*/o \*a  
 {de1}  
 {en1} clipboard application program \*b  
 {fr1}  
 {nl1} prikbord-utiliteit \*c

Programo, kiu ebligas la konservadon kaj retrovon de notoj, kiujn oni povas per tiu ĉi programo kopii inter diversaj aplikapoj (85/401). Temas do pri elektronika versio de klip-tabuleto.

Fon: \*a ei; \*b PCTools,p407; \*c es[ei];

**89/137**

Rim: «93-12-07»

{U1} 681.3.065.22 (+)  
 {T1} KEG  
 {eo1} kont/ad/ap\*\*/o \*a  
 {de1} Abrechnungsprogramm n \*ĉ  
 {de2} Buchhaltungsprogramm n \*ĉ  
 {en1} accounting program \*b  
 {en2} money management program \*b  
 {fr1}  
 {nl1} boekhoudprogramma \*d

Programo por faciligi kontadon. Ekzistas multaj diversaj ~oj por specialaj celoj: persona ~o (89/146); ~o por salajroj (89/159); ~o por deprezeblaj (./...) posedaĵoj \fixed assets program\i; ~o por labor-kostoj \job costing program\i; ~o por pagotaj fakturoj \accounts payable program\i; ~o por pagontaj klientoj \accounts receivable program\i; laborkost-~o (89/181). \*a laŭ \*b+c.

Fon: \*a ei; \*b PeCo89/1,p37; \*c PeCo89/3,p154; \*ĉ CE; \*d es laŭ VDwoord[ei];

**89/138**

Rim: «93-12-07»

{U1} 681.3.065.63 (+)  
 {T1} KEG  
 {eo1} kre/ap\*\*/ar/o por ekspansi/ig/it/a memor/o \*a

{de1}  
 {en1} expanded memory simulator \*b  
 {en2} expanded memory builder \*c  
 {en3} expanded memory software \*c  
 {fr1}  
 {nl1} geheugenuitbreidingsprogramma \*ĉ

Softvo (85/399), kiu ebligas utiligon de etendita memoro (89/288) por → ekspansiigita memor-specifo (89/180), kaj kiu utiligas spacon sur dur-disko por imiti ekspansiigitan memoron. Tiuspecaj programoj estas: \AboveDISC\i kaj \ITC!POWER\i.

Fon: \*a ei; \*b PeCo89/7,p112; \*c TC!Power; \*ĉ es laŭ InfWoord;

**89/139**

Rim: =89/172 «93-12-07»

{U1} 681.3.065.68 (+)  
 {T1} KEG  
 {eo1} kre/ap\*\*/ar/o por jur/aj dokument/oj \*a  
 {de1}  
 {en1} program to prepare legal documents  
 {fr1}  
 {nl1} wetboekprogramma \*c

Softvo (85/399) por krei jurajn dokumentojn por kutimaj situacioj. Utiligante demando- kaj respondo-metodon specialaj programoj intervjuas la komputoranton ĝis ĉiuj bezonataj dataoj (85/476) estas donitaj, post tio ĝi povas surekrani kaj printi la pretajn dokumentojn. \Personal Lawyer\i estas tiuspeca programo. \*a laŭ \*b.

Fon: \*a ei; \*b PeCo89/7,p123; \*c es[ei];

**89/140**

Rim: «93-12-07»

{U1} 681.3.065.69 (+)  
 {T1} KEG  
 {eo1} ŝedjul\*\*/ap\*\*/o por dung/it/oj \*a  
 {de1} Zeitzuordnungsprogramm n für Angestellte \*c  
 {en1} scheduling program for employees \*b  
 {fr1}

Programo por ŝedjuli (89/125) dungitojn. \Who Works When\i estas tiuspeca programo. \*a laŭ \*b.

Fon: \*a ei; \*b PeCo89/11,223; \*c CE=Zeitzuordnungsprogramm;

**89/141**

Rim: «93-12-07»

{U1} 336.717.16  
 {U2} 681.3.065.21 (+)  
 {T1} KBE  
 {eo1} data"\_baz/o \*a  
 {eo2} datum\*\*/-bank/o \*g  
 {de1} Datenbank f \*c  
 {de2} Datenbasis f \*c  
 {en1} database \*b\*ĉ  
 {en2} data base \*c\*d

{en3} data bank \*d  
{fr1} base de données \*ĉ  
{nl1} database \*e  
{nl2} kaartenbak \*f

Kolekto da logike interrilatantaj dareoj (85/445) aŭ dosieroj (85/434). En ~o kuniĝis multegaj dareoj antaŭe storitaj en apartaj dosieroj, tiel ke komuna arego da dareoj servas kiel sola centra dosiero por multaj aplikapoj (85/401). \*a laŭ \*d.

Fon: \*a ei; \*b PCTools,p280; \*c iwt-Wö; \*ĉ COMPUT; \*d WebComp; \*e esInfwoord[ei]; \*f esInfWoord[ei]; \*g IK85/1,18[ei];

**89/142** =ApE89 #269

Rim: ei (92-05-16): "bazo (2)" laŭ mi trafas por tiu ĉi nocio pli ol iu el la signifoj de "banko". «93-12-07»

{U1} 681.3.065.53  
{T1} KEG  
{eo1} lud/ap\*\*/o \*a  
{de1}  
{en1} computer game \*b  
{fr1}  
{nl1} computerspel \*c

Komputora lud-programo. Ekzistas tre diversaj specoj. La ŝarvo (89/074) \IGraphic-Less Games 1, \iinter kies ludoj troviĝas ĝemelo (../...) de la Rusa \ITetris\i, kaj al kiu Esperantaj klarigoj estas aldonitaj, estas havebla laŭ la kutimaj kondiĉoj de la Terminologia Centro. Ankaŭ la ŝarvo \MED's Chess\i estas havebla, sed sen Esperantaj klarigoj. Kiu ŝatus aldoni ilin? \*a

Fon: \*a ei; \*b ReaSol; \*c esCIB-pc busware[ei];

**89/143**

Rim: «93-12-07»

{U1} 681.3.065.65 (+)  
{T1} KEG  
{eo1} mend/o-plen/um/ap\*\*/ar/o \*a  
{de1}  
{en1} order fulfillment software \*b  
{en2} order fulfillment system \*c  
{fr1}  
{nl1} bestellingen-utiliteit \*ĉ

Softvo (85/399) por faciligi plenumadon de mendoj. \IEasy Order\i provizas i.a.: facile uzeblan mendo-registradon, rapidan databazan serĉadon, konfirmadon de kredit-kartoj, faktur-printadon, printadon de kredit-karta debetilo, printadon de eksped-etikedo, printadon de eksped-listo, remendo-opcion. \*a laŭ \*b.

Fon: \*a ei; \*b PeCo89/11,68; \*c Selective Software, Summer 1991,p22; \*ĉ es[ei];

**89/144**

Rim: «93-12-07»

{U1} 681.3.065.64 (+)  
{T1} KEG  
{eo1} menu/o-kre/ap\*\*/o \*a

{de1}  
{en1} menu maker  
{fr1}  
{nl1} menu maker \*c

Programo por krei menuojn (85/446), kiuj estas aldoneblaj al propraj programoj kaj al aĉetita softvo (85/399). \IFlash-Up\i estas tiuspeca programo. Per la ŝarvo (89/074) \IAutomenù\i oni povas facile krei menuojn, kiuj faciligas la selektadon de programoj, per kiuj oni deziras ŝargi komputoron.

Fon: \*a ei; \*b PeCo89/3,p96; \*c es[ei];

**89/145**

Rim: «93-12-07»

{U1} 681.3.062 (+)  
{T1} KEG  
{eo1} tosoroo\*\*/ap\*\*/o \*a  
{eo2} ram-log/ant/a program/o \*a  
{de1}  
{en1} TSR program \*b  
{en2} terminate and stay resident program \*b  
{fr1}

Programo ĉiam restanta en la ramo (85/397) de komputoro por ke ĝi estu aktivebla iam ajn. Skribtablaĵ ilapoj (89/060), Letrikso (89/078) kaj Termekso (89/067) estas tiuspecaj programoj. \*a laŭ \*b.

Fon: \*a ei; \*b ComGlo;

**89/146**

Rim: «93-12-07»

{U1} 681.3.065.2 (+)  
{T1} KEG  
{eo1} negoc-aŭgur/ap\*\*/o \*a  
{de1}  
{en1} program for business forecasts  
{fr1}

Softvo (85/399), kiu helpas fari negocajn decidojn laŭ la dum la lastaj jaroj kreitaj dataoj: Kiom da varoj estos venditaj? Kiom da pecoj aŭ materialo oni aĉetu? Kiom altaj estos la elspezoj? Kiom da kontanta mono estos bezonata? La softvo \ITrendSetter Expert\i nur devas scii, kie la lastjaraj dataoj troviĝas, kiun tempo-periodon ĝi aŭguru, kaj kien ĝi metu la rezultojn. \*a laŭ \*b.

Fon: \*a ei; \*b PeCo89/1,p204;

**89/147**

Rim: «93-12-07»

{U1} 681.3.065.64 (+)  
{T1} KEG  
{eo1} not-al'don/ap\*\*/o \*a  
{de1}  
{en1} help note annotator \*b  
{fr1}

Programo kiu aldonas al menuoj helpajn informojn. \*a laŭ \*b.

Fon: \*a ei; \*b PeCo89/3,96;

**89/148**

Rim: «93-12-07»

{U1} 681.3.065.63 (+)  
{T1} KEG  
{eo1} tosoroo\*\*-mastr/um/ap\*\*/o \*a  
{de1}  
{en1} manager for RAM-resident programs \*b  
{fr1}

EB#267/21  
{de1} Strandjacke *f*  
{en1} beach-jacket  
{fr1} veste *f* de plage *f*
- MEV# 687.14  
{eo1} rajd-jak/o  
EB#272/52  
{de1} Reitjacke *f*  
{en1} riding jacket  
{fr1} veston *m* d'équitation  
{fr2} saute-en-bas *m*
- MEV# 627.957.4  
{eo1} sav-jak/o  
Jako, kies interno estas plenigita de aero, de korko aŭ de kapoko, kaj kiu tenas la kapon de homo, kiu surmetis ĝin, super la akvo.  
{de1} Rettungsweste *f*  
{en1} life-jacket
- MEV# 687.14 : 796.86  
{eo1} skerm/o-jak/o  
EB#277/29  
{de1} Fechtjacke *f*  
{en1} fencing jacket  
{fr1} veste *f* d'escrime *f*
- MEV# 687.15 : 793.38  
{eo1} smoking/a jak/o  
EB#34/62  
{de1} Smokingjackett *n*  
{en1} dinner jacket  
{en2} tūdo jacket {US}  
{en3} tūedo {US}  
{fr1} veste *f* de smoking *m*
- MEV# 687.14  
{eo1} sport-jak/o  
EB#31/40, EB34/2  
{de1} Sportjacke  
{en1} sports jacket  
{en2} sports coat  
{en3} sack coat {US}  
{fr1} vareuse *f* de sport
- MEV# 687.13  
{eo1} sport-jak/o ∞ knab/in/a  
EB#31/40  
{de1} Mädchenjacke *f*

{de2} Sportjacke *f*  
{en1} girl's jacket  
{en2} sports jacket  
{fr1} blouson *m* de sport *m* pour filles *f*

MEV# 687.12  
{eo1} tajlor-kostum/a jak/o  
EB#32/2

{de1} Kostümjacke *f*  
{en1} costume jacket  
{fr1} veste *f* de tailleur

MEV# 687.14 : 796.4  
{eo1} trejn-jak/o  
EB#280/58  
{de1} Trainingsjacke *f*  
{en1} training jacket  
{fr1} blouson *m* d'entraînement *m*  
{fr2} veste *f* d'entraînement *m*  
{fr3} jumper *m* d'entraînement *m*

MEV# 687.11  
{eo1} unu-buton-vic/a jak/o ∞ komplet/o kun  
EB#34/13, EB#33=2  
{de1} Einreihier *m*  
{de2} einreihige Anzug *m*  
{de3} Herrenanzug *m*  
{en1} single-breasted suit  
{en2} men's suit  
{fr1} complet *m* droit

MEV# 687.17  
{eo1} vent/o-jak/o  
EB#34/67  
{de1} Windjacke *f*  
{en1} wind-jacket  
{en2} wind-breaker  
{fr1} anorak *m*

MEV# 687.13  
{eo1} vent/o-jak/o ∞ knab/a  
EB#31/46  
{de1} Bubenanorak *m*  
{en1} boy's wind-jacket  
{fr1} anorak *m* de garçon *m*

MEV# 687.1  
{eo1} jak/et/o (1)  
Mallonga jako: jaketo de kelnero; jaketo de Eton-  
studentoj, jaketo de skiistoj.  
{de1} Jäckchen *n*  
{en1} small coat

MEV# 687.244  
{eo1} beb/a jak/et/o  
EB#31/20.  
{de1} Babyjäckchen *n*  
{de2} Babyjüppchen *n*  
{en1} baby's jacket  
{en2} baby's coat

{fr1} paletot *m* de laine *f*

MEV# 687.15  
{eo1} lit-jak/et/o  
{de1} Bettjäckchen *n*  
{en1} bed-jacket  
{fr1} liseuse *f*

MEV# 686.1  
{eo1} jak/et/o (2)  
Ne surgluita, deprenebla ŝirmo-kovrilo de bindita aŭ  
broŝurita libro, ordinare montranta koloran  
ilustrajon. EB#178/37, EB#185=37

{de1} Schutzumschlag *m*  
{en1} dust jacket  
{en2} dust cover  
{en3} bookjacket  
{en4} wrapper  
{fr1} jaquette *f*

MEV# 598.???  
{eo1} jakan\*\*/o  
Genro de akvaj birdoj (ĴJacanaĵi) kun sep aŭ ok  
specioj. Jakano havas araneajn ungojn, kiuj ebligas  
al ĝi iri sur flosantaj vegetaĵoj.  
{en1} jacana  
{en2} Lily-Trotter  
{en3} Lotus Bird

MEV# 582.???  
{eo1} jakarand/o  
BIB Genro (Jacaranda Juss. el bigoniacoj) de  
tropikaj arboj kun pinataj folioj k bluj funelformaj  
floroj panikle aranĝitaj en la fino de la ŝosoj.  
{de1} Jacaranda  
{en1} jacaranda  
{fr1} jacaranda

MEV# 801.313.12  
{eo1} Jakelin/o  
Nomo de virino. → Jakobino, Ĵakvino.

MEV# 801.313.11 : 222  
{eo1} Jakob/o (1)  
BIB Patriarko, filo de Izaako.

MEV# 801.313.11  
{eo1} Jakob/o (2)  
Virnomo. → Ĵakvo.

MEV# 281.83  
{eo1} Jakob/an/o  
KRI Ano de Siria kristana sekto.

MEV# 801.313.12  
{eo1} Jakob/in/o  
Nomo de virino.

MEV# 941.0 : 329  
{eo1} Jakob/ist/o

HIST Ano de la Angla partio, kiu apogis la Stuartojn.

MEV# 271.2

{eo1} Jakob/ul/o

Malnova nomo de la dominikanoj.

MEV# 944 : 329.15

{eo1} Jakoben/o (1)

HIST Membro de la "Klubo de l' Jakobenoj", revolucia maldekstra agadgrupo.

MEV# 944 : 329.15

{eo1} Jakoben/o (2)

Partiano de radikala demokratio: li estas pli malbona ol Jakobeno.

MEV# 391.1 & 687.4

{eo1} Jakoben/a ĉap/o

EB#36/2

{de1} Jakobinermütze *m*

{de2} Freiheitsmütze *m*

{de3} phrygische Mütze

{en1} Jacobin cap

{en2} liberty cap

{en3} Phrygian cap

{fr1} bonnet *m* jacobin

{fr2} bonnet *m* phrygien

MEV# 944 : 329.15

{eo1} Jakoben/ism/o

Opinio, doktrino de Jakobenoj.

MEV# 797.144

{eo1} jakt/o (1)

{eo2} jaht/o (1)

SHI Malpeza velŝipo aŭ velboato, tenata k konstruita por konkursoj.

MEV# 629.125.12

{eo1} jakt/o (2)

{eo2} jaht/o (2)

SHI Ŝipo aŭ barko, movata per ĉia movforto alia ol remiloj, kaj uzata por privataj plezurvoj-aĝoj, krozoj ktp.

MEV# 796.918

{eo1} glaci-jakt/o

EB#284/46

{de1} Eisjacht *f*

{en1} ice yacht

{en2} ice boat

{en3} ice scooter {US}

{fr1} yacht *m* à patins

{fr2} yacht *m* à glace

MEV# 797.144

{eo1} konkurs/a jakt/o

{eo2} kur-jakt/o

{eo3} kur-konkurs/a jakt/o

EB#270/5

{de1} Rennkieljacht *f*

{en1} racing keel yacht

{fr1} yacht *m* de course à quille *f* de plomb

MEV# 629.125.12

{eo1} kroz-jakt/o

EB#270/1-4

{de1} Fahrtenkieljacht *f*

{en1} sea-going keel yacht

{fr1} yacht *m* de croisière à quille *f*

MEV# 629.125.12

{eo1} motor-jakt/o

{eo2} privat/a jakt/o

EB#216/20

{de1} Motorjacht *f*

{de2} Privatjacht *f*

{en1} motor launch

{en2} private launch

{fr1} yacht *m* à moteur

{fr2} yacht *m* privé

MEV# 797.144

{eo1} jakt/ad/o

Veturado per jakto.

{de1} Jachtensegeln *n*

MEV# 629.125.12

{eo1} jakt/o-tipoj

EB#270/27-50

{de1} Jachttypen *m*

{en1} types of yachts

{fr1} types *m* de yacht *m*

MEV# 397

{eo1} Jakut/o

Ano de Siberia gento.

{de1} Jakute *m*

MEV# 581.47

{eo1} jakv/o

BOT Fruko de jakvujo.

MEV# 582.???

{eo1} jakv/uj/o

{eo2} jakv-arbo

Specio de panarbo (Artocarpus integrifolia L. fil. el morusacoj) kun nedividitaj folioj, per kio i.a. ĝi diferencas de la vera panarbo.

MEV# 581.43

{eo1} jalap/o

BOT La tuberforma kaj preskaŭ globforma rezinhava radiko de jalapujo, uzata medicine kiel drastaĵo, aŭ pulvoro, aŭ tinkture.

{de1} Jalapenwurzel *f*

{fr1} racine de jalap

MEV# 582.???

{eo1} jalap/uj/o  
{eo2} jalap-plant/o

Plurjara herbo (≠Exogonium purga≠ Hayne/Benth. el konvolvulacoj) kun ebenrandaj korformaj folioj kaj grandaj purpuraj floroj, kies stiluso kaj stamenoj estas pli longaj ol la funelforma korolo.

{de1} Jalape *f*  
{en1} jalap  
{fr1} jalap

MEV# (477.9)

{eo1} Jalt/o  
GEOG Konata ban-urbo, en Krimeo (34°03'E, 44°30'N).  
{de1} Jalta  
{en1} Yalta  
{fr1} Yalta

MEV# 801.27

{eo1} jam  
Adverbo esprimanta la ĝeneralan ideon pri ŝanĝiĝo de stato, kaj pli precize signifanta:

{eo1} jam (1)  
De nun; sen plua atendo; senplie: mi jam havas mian ĉapelon, nun serĉu vi vian; jam estas tempo iri domen; ni iras al nia celo jam kun plena trankvileco; riĉigadi la lingvon per novaj vortoj oni povas jam nun; ĉu vi forgesas jam, ke vi kristano estas?.

{eo1} jam (2)  
Tuj post tiam; tuj ekde tiam: post unu horo la forno estis jam varma; jam de tri tagoj mi ne fermis la okulojn; vi bezonas nur enmeti en la leteron iun vortareton kaj la adresito (= adresulo) vin jam komprenos; kiel longe (de kiam) vi estas jam fosisto?; jam dek jarojn (de antaŭ dek jaroj) li loĝas tie ĉi; tia uzado estus jam arbitraĵo kaj kondukus al ĥaoso; post unu sola duonhoro li ekposedas la tutan gramatikon kaj al li restas jam nur la simpla kaj facila akirado de provizo da vortoj; vi bezonas nur simple ekpensi pri la esenco de tiuj ĉi frazoj kaj vi jam komprenos, ke ili (la kritikoj) ne havas eĉ la plej malgrandan fundamenton.

{eo1} jam (3)  
Antaŭ nun: se li jam venis petu lin al mi; ĉu vi jam trovis vian horloĝon?; li jam kelkfoje demandis pri vi; mi jam diris al vi, ke mi foriras.

{eo1} jam (4)  
Antaŭ tiam: kiam vi venis, li jam diris (estis dirinta) al mi la veron; kiam via domo estis konstruata, mia domo estis jam longe konstruita; mi ŝin enbrakigis, sed ŝi jam mortis.

{eo1} jam (5)  
Pli frue, ol oni atendas aŭ atendis: post semajno eble vi trovos jam ian sciigon; la verko estas jam preta, li kredas sukcesi kaj jam ridetas.

RIM. Krom tiuj fundamentaj sencoj, Z. sub la influo de la germana lingvo uzis jam kun du apartaj signifoj, por esprimi nuancon: 1e de kontentigo, de sufiĉeco: ĝi estas jam tia enviinda loko; jam la

politiko povus ilin devigi, se li iris jam ekzameniĝi, mi dezirus almenaŭ, ke li sukcesu!; jam se estas soleno ĝi estu soleno! (=proksimume "sole per si mem", "do"); 2e de optimismo, de matura preteco: liaj filoj estas iom malbonkonduataj. . . sed kun la tempo ili jam solidiĝos; ili tion ankoraŭ ne povas fari bone, sed la afero jam iros; jam venos al mi en la kapo io; venu al mi, mi jam varmigis vin!; ne ploru, vi iel jam venos tien! (=finfine, pli-malpli baldaŭ). Tiujn ne internaciajn uzojn oni prefere ne imitu.

{de1} schon  
{de2} bereits  
{en1} already  
{en2} by now  
{en3} by then  
{fr1} déjà  
{fr2} désormais

MEV# 801.27

{eo1} jam ne  
Tiu esprimo havas la sencon de jam (1) kaj jam (2) sekvata de ne: ve, multaj el niaj pioniroj jam ne vivas; centoj da miloj da radiketoj subtenas nian arbon, kiu jam (de nun) ne timas la venton; la naciaj lingvoj havas akcenton malregulan kaj malfacilan, kiun ili jam (de nun) ŝanĝi ne povas; li ne estas sufiĉe klera, sed lerni nun li jam (de tiu momento) ne havas la eblon; eĉ se ni volus nun halti, ni jam ne povus; vidante la partiecon de la prezidanto, li jam (de tiam) ne parolis (li tute ne parolis); kiu okazon forŝovas ĝin jam ne retrovas. Kiel oni vidas per tiuj lastaj ekz-oj, jam ne ne ĉiam samsignifas kiel ne . . . plu, sed ĝi montras statŝanĝon kaj speciale neplenumiĝintan deziron aŭ intencon. ne jam. Tiu esprimo estas, laŭ la konsilo de Z., evitenda, kaj anstataŭigenda per ankoraŭ ne.

MEV# (729.2)

{eo1} Jamaik/o  
GEOG Unu el la Grandaj Antiloj, sude de Kubo (76°52'W, 17°57'N).  
{de1} Jamaika  
{en1} Jamaica  
{fr1} Jamaïque

MEV# 801.631

{eo1} jamb/o  
POE Versero, konsistanta el du silaboj, el kiuj la unua estas mallonga aŭ senakcenta, kaj la dua longa aŭ akcenta (2-). → trokeo, spondeo.  
{de1} Jambus *m*  
{de2} Jambe *f*  
{en1} iambus  
{fr1} iambe

MEV# 801.631

{eo1} jamb/a  
Rilata al jambo(j): jambaj versoj.  
{de1} jambisch

- {en1} iambic  
{fr1} iambique
- MEV# 801.631  
{eo1} jamb/in/o  
Familiara nomo, por montri la jambajn versojn, post kies fina akcenta silabo trovigas kroma, senakcenta: la jambinoj estas la regula formo de la jambaj versoj en E-o.
- MEV# 801.631  
{eo1} ĥor-jamb/o  
Versero, konsistanta el trokeo plus jambo (— 2 2 —).
- MEV# 801.631  
{eo1} tri-jamb/o  
Verso, konsistanta resp. el 3 jamboj, plus fina kromsilabo.
- MEV# 801.631  
{eo1} kvar-jamb/o  
Verso, konsistanta resp. el 4 jamboj, plus fina kromsilabo.
- MEV# 801.631  
{eo1} kvin-jamb/o  
Verso, konsistanta resp. el 5 jamboj, plus fina kromsilabo.
- MEV# 801.631  
{eo1} ses-jamb/o  
Verso, konsistanta resp. el 6 jamboj, plus fina kromsilabo.
- MEV# 801.631  
{eo1} sep-jamb/o  
Verso, konsistanta resp. el 7 jamboj, plus fina kromsilabo.
- MEV# 582.???  
{eo1} jambos/o  
BOT G. (AJambosa\i DC el mirtacoj) de Hindiaj kaj Malajaj tropikaj arboj kun sukaj, manĝeblaj beroj, kiuj havas rozan odoron. → kariofilarbo.  
{de1} Jambusenbaum *m*  
{en1} rose-apple tree  
{fr1} jambosier
- MEV# 292  
{eo1} Jan/o  
MIT Roma dio de la komencoj kaj malfermoj, prezentata kun du vizaĝoj kontraŭdirektaj: la pordoj de la templo de Jano estis fermitaj nur dum paco.  
EB#308/47,48  
{de1} Janus *m*  
{en1} Janus  
{fr1} Janus
- MEV# (282.252.3)  
{eo1} Jangzi
- GEOG Unu el la plej grandaj riveroj de Ĉinujo; = Rivero Blua (122°E, 31°30'N).  
{de1} Jangtsekiang  
{en1} Yangtze  
{en2} Yangtzekiang  
{fr1} Yangzi Jiang  
{fr2} Yang-tseu-kiang
- MEV# 956.0  
{eo1} janiĉar/o  
Membro de la persona gvardio de l' turka sultano (aboliciita en 1826).  
{de1} Janitschar *m*  
{fr1} janissaire
- MEV# 801.313 : (=1.73)  
{eo1} Janki/o  
Familiara nomo por Usonano.  
{de1} Yankee *m*  
{en1} Yankee  
{fr1} yankee *m*
- MEV# 801.313 : 273.7  
{eo1} Jansen/o  
Nederlanda episkopo de Ipro (1585-1638).
- MEV# 273.7  
{eo1} Jansen/ism/o  
REL Doktrino de Janseno pri la neebleco de la saviĝo per la solaj homaj fortoj, pri la antaŭdestinado de la animoj kaj la malgranda nombro de la savotoj.
- MEV# 273.7  
{eo1} Jansen/ist/o  
Ano de Jansenismo.
- MEV# "33.01"  
{eo1} Januar/o  
La unua monato de la nuna kristana jaro.  
{de1} Januar  
{en1} January  
{fr1} Janvier
- MEV# (=952)  
{eo1} Japan/o  
Ano de la ĉefgento loganta en Japanujo.  
{de1} Japaner *m*  
{en1} Japanese  
{fr1} Japonais
- MEV# (=952)  
{eo1} Japan/a  
Rilata al Japanoj aŭ al Japanujo: la Japana arto, civilizo, lingvo, skribo.  
{de1} japanisch  
{en1} Japanese  
{fr1} japonais
- MEV# 582.???

{eo1} Japan/a cidoni-arbed/o  
EB#357/17  
{de1} japanische Quitte *f*  
{en1} japonica  
{en2} Japanese quince  
{fr1} cognassier *m* du Japon

MEV# 929.9.021  
{eo1} Japan/a flag/o  
EB#245/20  
{de1} Sonnenbanner *n*  
{en1} Rising Sun  
{fr1} bannière *f* du soleil

MEV# 003.324  
{eo1} Japan/a skrib/o  
EB#324/6  
{de1} japanische Schrift *f*  
{en1} Japanese script  
{fr1} japonaise écriture

MEV# (520)  
{eo1} Japan/i/o  
{eo2} Japan/uj/o  
GEOG Ekstrem-Orienta ŝtato, konsistanta el insularo norde de Pacifiko (Tokio, 139°45'E, 35°43'N).  
{de1} Japan  
{en1} Japan  
{fr1} Japon

MEV# 800.7 : =956  
{eo1} Japan/ig/i  
Lernigi la Japanan lingvon aŭ civilizon al fremda gento.

MEV# (=952)  
{eo1} Japan/in/o  
Virino Japana.  
{de1} Japanerin *f*  
{en1} Japanese  
{fr1} Japonaise

MEV# "45"  
{eo1} jar/o (1)  
Tempomezur-unuo, egala al la daŭro de unu kompleta rondiro de la Tero ĉirkaŭ la Suno: natura, suna, tropika jaro (365 tagoj, 5h 48m 46s); astra, sidera jaro (pli longa je 20 m 23 s).

MEV# "45"  
{eo1} jar/o (2)  
Tiu tempodaŭro, proksimume kalkulita, uzata oficiale por datado kaj komenciĝanta unu difinitan tagon: la gregoria, julia jaro; la leĝa, civila jaro; en la jaro 1905 mia patro. . .; la pagoj estas renovigataj en Januaro de ĉiu jaro; la venonta, pasinta jaro; unu fojon en ĉiu jaro estas farata Internacia Kongreso; en la daŭro de la lastaj 5 jaroj; elektitaj en la Akademion por la sekvanta jaro; de jaro al jaro;

jaro post jaro; al la nova jaro 1893 mi gratulas ĉiujn amikojn; dezirante plej bonan novan jaron al vi.  
RIM. En la antikvaj tempoj la datado estis ofte kalkulata de la jarkomenca tago, kiu sekvis aŭ antaŭiris la surtroniĝon de ia reĝo: en la sepa jaro de Jehu Jehoas fariĝis reĝo.

MEV# "45"  
{eo1} jar/o (3)  
Samlonga periodo, komenciĝanta ian alian tagon, konata de la interesatoj: la eklezia (kristana) jaro (de Advento ĝis Advento); la lerneja jaro (de Septembro ĝis Julio en Eŭropo); la teatra jaro (de Novembro ĝis Aprilo); la budĝeta jaro (varianta laŭ la landoj); la akademianoj estas elektataj por naŭ jaroj; antaŭ 15 jaroj mi diris publike, ke...; virseksulo en la aĝo de dudek jaroj; aĝulo de kvin jaroj; en la unuaj jaroj de ekzistado de E-o; pasis jam unu jaro, de kiam ni renkontiĝis.

MEV# "45"  
{eo1} jar/o (4)  
Tiu periodo, rigardata rilate al tio, kio okazis en ĝi: li foriris du jarojn; mi dediĉis ĉ. 2 jarojn al la esplorado de tiu ĵargono; tio prezentas la laboraĵon de dek jaroj; dudek jaroj de servado; jaroj de vivo kaj paco; antaŭ ol venis la jaroj de malsato; jaroj da senlaboreco; per la saĝo aldoniĝos al vi jaroj da vivo; jarlonga atendado; lavu tutan jaron, negro ne blankiĝos; la sezonoj de la jaro.

MEV# "45"  
{eo1} jar/oj (5)  
Tempo, periodo de la homa vivo: la knabaj jaroj; de zorgoj, ne de jaroj blankiĝas la haroj; pagas maljunaj jaroj por junaj eraroj.

MEV# "55"  
{eo1} jar/a (1)  
Ĉiujara.

MEV# "55"  
{eo1} jar/a (2)  
Unujara.

MEV# "45"  
{eo1} jar/ar/o  
Serio da jaroj. → erao, periodo, epoko, aĝo.

MEV# "47"  
{eo1} cent-jar/o  
Jarcento: la mezaj centjaroj (= Mezepoko).

MEV# "57"  
{eo1} cent-jar/a  
Havanta la aĝon de cent jaroj, daŭrinta cent jarojn: ĉu de homo centjara fariĝos nasko?; centjaraj kverkoj; centjara fremda regado.

MEV# "57"

{eo1} cent-jar/a fest/o  
{en1} centenary

MEV# "57"

{eo1} cent/a-jar/a

Okazanta en la centa jaro.

RIM. Sencon analogan havas la ceteraj kunmetaĵoj:

dek-jara, dek/a-jara, unu-jara, unu/a-jar/a ktp;

→ dek-jar/a → cent-jar/a MEV#

→ dek/a-jar/a → cent/a-jar/a MEV#

→ unu-jar/a → cent-jar/a MEV#

→ unu/a-jar/a → cent/a-jar/a MEV#

MEV# -053.9

{eo1} cent-jar/ul/o

MEV# -053.8

{eo1} kvindek-jar/ul/o

MEV# "312"

{eo1} ĉi'jar/a

Okazanta, okazinta aŭ okazonta en la nuna jaro.

MEV# "55"

{eo1} ĉiu'jar/a

Okazanta en ĉiu jaro: ĉiujara repago de ŝuldo; ĉiujara oferado.

MEV# "440-06"

{eo1} duon'jar/o

Duono de jaro, semestro.

MEV# "440-03"

{eo1} kvaron'jar/o

Kvarono de jaro, trimestro.

MEV# "55"

{eo1} laŭ'jar/a

Rilata al la periodo de nur unu jaro: laŭjara dungito.

MEV# "48"

{eo1} mil'jar/o

Jarmilo: miljaroj ne povis, minuto elŝovis.

MEV# "58"

{eo1} mil'jar/a

Daŭrinta mil jarojn: miljara imperio.

MEV# "405"

{eo1} mult(e)jara (1)

Havanta daŭron de multaj jaroj: rezultato de multejara pacienca laborado; miaj multjaraj laboroj kaj suferoj.

MEV# 612.67

{eo1} mult(e)-jar/a (2)

Havanta la aĝon de multaj jaroj.

MEV# 581.149

{eo1} plur'jar/a

BOT Vivanta dum tri aŭ pli da jaroj, normale floranta en ĉiu kreska sezono (pp planto, precipe herbo).

MEV# 657.37

{eo1} buĝet/a jar/o

La jaro al kiu rilatas buĝeto.

{de1} Haushaltsjahr *n*

{en1} budget year

{en2} financial year

{es1} año económico

{fr1} année *f* budgétaire

MEV# "45"

{eo1} super'jar/o

Jaro, enhavanta 366 tagojn.

MEV# 264-04

{eo1} favor'jar/o

Jaro, en kiu oni esperas aŭ ricevis apartan favoron de Dio: por proklami favorjon de la Eternulo, en la favorjaro 1887 aperis E-o.

MEV# 657.37

{eo1} financ/a jar/o

12-monata konto-periodo de entrepreno, kiu ne bezonas esti kalendara jaro.

{de1} Rechnungsjahr *n*

{de2} Geschäftsjahr *n*

{de3} Betriebsjahr *n*

{de4} Wirtschaftsjahr *n*

{de5} Finanzjahr *n*

{en1} financial year

{en2} fiscal year {US}

{es1} año financiero

{es2} ejercicio *m*

{fr1} année *f* budgétaire

MEV# 657.37

{eo1} kalendar/a jar/o

La jaro komenciĝanta je la unua de januaro kaj finiĝanta je la tridek unua de decembro. → financa jaro.

{de1} Kalenderjahr *n*

{en1} calendar year

{es1} año *m* civile

{fr1} année civile

MEV# 377

{eo1} lern'jar/oj

Jaroj pasintaj en la lernejo, universitato ktp.

MEV# 523.81

{eo1} lum'jar/o

Unuo por mezuri grandegajn interastrajn distancojn, egalvaloranta la distancon trairatan de la lumo dum unu jaro.

MEV# 398.332.42

{eo1} nov'jar/a  
Rilata al la komenciĝo de nova jaro: novjara saluto  
nov(o)jaraj bondeziroj.

MEV# "311"  
{eo1} pas/int-jar/a  
Okazinta en la antaŭa jaro: li zorgas pri ĝi kiel pri  
neĝo pasintjara; en mia pasintjara letero.

MEV# 35.082.1  
{eo1} prov'jar/oj  
Tempo, dum kiu iu provlernis sian metion, profesion  
ktp: la provjaroj de Vilhelmo Meister (romano de  
Goethe).

MEV# 35.08  
{eo1} serv/o-jar/oj  
Tempo, dum kiu iu servadis en ofico.

MEV# "47"  
{eo1} jar-cent/o (1)  
Cento da jaroj: antaŭ kelkaj jarcentoj iliaj prapatroj  
loĝis ne en Ameriko: en la daŭro de jarcentoj, ĝi  
havis la aĝon de duono da jarcento.

MEV# "47"  
{eo1} jar-cent/o (2)  
Numerita periodo de cent jaroj, kalkulita de la  
naskojaro de Jesuo-Kristo: ĉirkaŭ la mezo de la  
dekkvara jarcento; la epoko de la mezaj jarcentoj  
(Mezepoko).

MEV# "47"  
{eo1} jar-cent/a  
Daŭrinta plurajn jarcentojn: jarcenta tradicio.

MEV# "46"  
{eo1} jar-dek/o (1)  
Deko da jaroj.

MEV# "46"  
{eo1} jar-dek/o (2)  
Numerita dekjara periodo en jarcento: en la tria  
jardeko de la lasta jarcento.

MEV# "48"  
{eo1} jar-mil/o (1)  
Milo da jaroj: post jarmiloj ili alflugos trans la  
oceano!.

MEV# "48"  
{eo1} jar-mil/o (2)  
Numerita miljara periodo, kalkulita de la naskojaro  
de Jesuo-Kristo: en la dua jarmilo antaŭ J-K.

MEV# "48"  
{eo1} jar-mil/a  
Daŭrinta tra pluraj jarmiloj: la Hebreoj uferis  
jarmilan martirecon.

MEV# 06.055.5  
{eo1} jar-raport/o  
{de1} Jahresbericht *m*  
{en1} annual report  
{es1} memoria *f* anual  
{fr1} rapport annuel

MEV# 629.12.014.2  
{eo1} jard/o (1)  
SHI Transversa velstango, al kiu la supra rando de  
velo estas fiksita: antaŭa, meza, posta jardo;  
topjardo, bramjardo, reĝjardo. → bumo, busprito,  
gafo.

MEV# 629.12.014.2  
{eo1} bram-jard/o  
EB#214/35, 36, 41, 42.  
{de1} Vor-Unterbrahmrah *f*  
{de2} Vor-Oberbrahmrah *f*  
{de3} Groß-Unterbrahmrah *f*  
{de4} Groß-Oberbrahmrah  
{en1} topgallant yard  
{fr1} petit perroquet *m*  
{fr2} grand perroquet *m*

MEV# 629.12.014.2  
{eo1} ĉef-jard/o  
{eo2} grand-jard/o  
EB#213/21.  
{de1} Rahsegel *n*  
{en1} squaresail  
{fr1} grand'vergue *f*  
{fr2} voile *f* carrée carguée

MEV# 629.12.014.2  
{eo1} mal'supr/a jard/o  
EB#214/32, 38; 215/25.  
{de1} Fockrah *f*  
{de2} Großrah *f*  
{de3} Bagienrah *f*  
{de4} Begienrah *f*  
{en1} fore yard  
{en2} mainyard  
{en3} crossjack yard  
{en4} cro'jack yard  
{fr1} vergue *f* de misaine *f*  
{fr2} grand'vergue *f*  
{fr3} vergue *f* barré

MEV# 629.12.014.2  
{eo1} post'jard/o  
EB#215/25.  
{de1} Bagienrah *f*  
{de2} Begienrah *f*  
{en1} crossjack yard  
{en2} cro'jack yard  
{fr1} vergue *f* barré

MEV# 629.12.014.2  
{eo1} reĝ-jard/o

- EB#214/37, 43.  
 {de1} Vor-Royalrah *f*  
 {de2} Groß-Royalrah *f*  
 {en1} fore royal yard  
 {en2} main royal yard  
 {fr1} vergue *f* de petit cacatois  
 {fr2} vergue *f* de grand cacatois
- MEV# 629.12.014.2  
 {eo1} top-jard/o  
 EB#213/39; 214/33,34,39,40.  
 {de1} Marsrah *f*  
 {en1} topsail yard  
 {fr1} vergue *f* de hunier
- MEV# 629.12.014.2  
 {eo1} jard-lift/oj  
 EB#214/47.  
 {de1} Toppnanten *f, pl*  
 {en1} lifts  
 {fr1} balancines *f, pl*
- MEV# 629.12.014.2  
 {eo1} jard/o-vel/ar/o  
 EB#214/55-66.  
 {de1} Rahsegel *n, pl*  
 {en1} square sails  
 {fr1} voiles *f, pl* carrées
- MEV# 629.12.014.2  
 {eo1} jard/o-vel/o  
 EB#213/33; 215/16.  
 {de1} Rahsegel *n*  
 {de2} Großsegel  
 {en1} mainsail  
 {en2} squaresail  
 {fr1} grand-voile *f* carrée
- MEV# 629.12.014.2  
 {eo1} jard-top-velo  
 EB#215/20.  
 {de1} Marssegel *n*  
 {en1} top-sail  
 {fr1} voiles *f, pl* carrées
- MEV# 629.12.014.2  
 {eo1} al'jard/ig/i  
 Fiksi la velon al la jardo, por ekuzado. → refi, brajli, ferli.
- MEV# 389.16  
 {eo1} jard/o (2)  
 Brita mezurunuo de longo (0,917 m). → metro, klafto. arŝino.
- MEV#  
 {eo1} jaroviz/i  
 = vernalizi.
- MEV# 582.????
- {eo1} jasmen/o  
 BOT Genro (*l*Jasminum<sup>li</sup> L. el oleacoj) de arbedoj, plejparte tropikaj, iometgrade volvaj, kun longaj, maldikaj, plej ofte verdaj, iom angulecaj tigoj, duope kontraŭesidantaj, pinataj aŭ nedividitaj folioj kaj pli-malpli primolsimilaj floroj unuopaj aŭ grupete en folianguloj; pluraj specioj ĝardene kaj subvitre kulturataj: jarda floro, laŭbo. → filadelfo.
- MEV# 549.???  
 {eo1} jasp/o  
 MIN Densa, bruneca variaĵo de kalcedono, prezentanta diverskolorajn striojn. → gemo.
- MEV# 686.123  
 {eo1} jasp/i *tr*  
 Kolorigi, imitante la kolorojn de jaspo: jaspi la randojn de libro. → vejni.
- MEV# 7.017  
 {eo1} jasp/ec/a  
 Simila al la kolordiverseco de jaspo: jaspeca marmoro, tulipo.
- MEV# 549.???  
 {eo1} jaspis/o  
 MIN Jaspo: multekostaj ŝtonoj, rubeno, topazo, jaspiso.
- MEV# 726.1  
 {eo1} jaŝir/o  
 REL Ŝintoa templo.
- MEV# 623.444  
 {eo1} jatagan/o  
 Sabro sen manŝirmilo kun klingo dukurba, uzata precipe de janiĉaroj.
- MEV# (922)  
 {eo1} Jav/o  
 GEOG Unu el la Indoneziaj insuloj (Ĝakarto, 106°49'E, 6°10'S).
- MEV# (=1.922)  
 {eo1} Jav/an/o  
 Indiĝeno loĝanta en Javo.
- MEV# (38)  
 {eo1} Javan  
 BIB Hebrea nomo de Helenujo.
- MEV# 231  
 {eo1} Jave/o  
 La propra nomo de Dio en la Biblio, mistradukita per "La Eternulo". → Adonaj, Jehovo, Alaho, Bramo.
- MEV# 231  
 {eo1} Jave/a  
 Rilata al tiu nomo aŭ ĝia uzado: la Javea dokumento

en la Pentateŭko. → elohima.

MEV# 582.???

{eo1} jazion/o

BOT Genro (Mjasionevi L. el kampanulacoj) de unu-, du- kaj plurjaraj herboj kun helbluaj floroj en kapo; kreskas ordinare en sekaj, sablaj lokoj.

MEV# 292

{eo1} Jazon/o

MIT Ĉefo de la ekspedicio de Argonaŭtoj, konkerinto de la Orfelo kaj edzo de Medea.

MEV# 801.28

{eo1} je

Komuna prepozicio, kies senco estas nedifinita kaj kiun oni ĉiam povas uzi, kiam la senco ne montras klare, kia prep. konvenas. En la komenco ĝi estis uzata en multaj okazoj, por kiuj oni poste preferis pli kutiman prep-on: "la pli kompetentaj E-istoj en la lasta tempo ne senprave evitadis tiun ĉi vorton" skribis Z. en 1894. Oni trovas ĝin nun preskaŭ nur en jenaj okazoj:

MEV# 801.28

{eo1} je (1)

Komuna prepozicio, antaŭ la suplemento de adj. signifanta abundon aŭ senigon, aŭ montranta malfacile difineblan rilaton al la suplemento: riĉa je brutoj; kripla, lama je unu membro; malsana je la brusto; graveda je filo; libera je tiuj mankoj; kapabla je ĉio; kontenta je sia sorto; bonŝanca je la monludoj. → pri, de;

MEV# 801.28

{eo1} je (2)

Komuna prepozicio, antaŭ la objekta komplemento de verb-subst., por eviti la konfuzon kun la agantsignifa "de": havi rajton je io; aspiro, kalkulo, klopodado, soifado, sufero de iu je io; ĉion ĉi tion elpensis la historioskribantoj pro mokado je la foririntaj generacioj; nekredo je Dio;

MEV# 801.28

{eo1} je (3)

Komuna prepozicio, antaŭ adjekto de horo: je la tria matene (sed: en la mateno, ĉe la sunleviĝo);

MEV# 801.28

{eo1} je (4)

Komuna prepozicio, antaŭ la adjekto esprimanta la tenatan korpoparton: ŝi eltiris je la kornaro nordan cervon; mi prenos vin je la mano (= je via . . .; per la mano= per mia...); ŝi eksentis, ke oni tenis ŝin je la brako; konduki iun je la nazo; (analoge) ŝi ekfrapis per la fingroj je la fenestro; ŝi ekfrotis la alumetojn je la muro; la ŝiprompiĝulo tenas sin je tabulo;

MEV# 801.28

{eo1} je (5)

Komuna prepozicio, antaŭ mezur-adjekto, kiam la mezursuplemento estas plurvorta: vi estas certe je duono da kapo pli alta ol mi; Mi estas je unu jaro pli juna, kaj tamen je kiom mi estas pli saĝa ol vi; ŝi retiriĝis je kelke da paŝoj; ili estas malproksimaj unu de la alia je tritaga vojaĝo; ĝi restis je granda distanco malantaŭen; ĉu la ombro iru antaŭen je dek gradoj?; (analoge) je la unua fojo ŝi sentis larmojn;

MEV# 801.28

{eo1} je (6)

Komuna prepozicio, antaŭ diversaj objektoj aŭ adjektoj, malfacile klaseblaj: mi ne kredas je Dio; kredi je la senmorteco de l' animo, je la fantomoj; la reĝo vetis kun li je ses berberaj ĉevaloj; malpaciĝinte kun sia edzino, li ekседziĝis je ŝi; malsaniĝi je lepro; gravediĝi je ĝemeloj; li prenas ĉion je la kalkulo kaj eĉ unu kopekon ne volas pagi; la pozon duonkuŝan ŝi ŝanĝis je pozo sida; mia popolo ŝanĝis sian gloron je idoloj; ties karnon mi disŝiros je pecetoj; junuloj ofte suferas je absoluta manko de singardo. → al, pri, disde, pro.

MEV# 801.313 : 22

{eo1} Jehoaŝ/o

BIB Reĝo de Judujo, post Atalja.

MEV# 801.313 : 22

{eo1} Jehojada

BIB Ĉefpastro en Jerusalemo, ŝirminto de Jehoaso, kiu lin poste mortigis.

MEV# 801.313 : 22

{eo1} Jehoŝafat

BIB Kvara reĝo de Judujo.

MEV# 801.311.33

{eo1} Val/o de Jehoŝafat/o

Valo inler Jerusalemo kaj la Olivmonto: mi kolektos ĉiujn naciojn en la valon de Jehoŝafato.

MEV# 231

{eo1} Jehov/o

Mislego de Javeo, disvastiĝinta jam en la mezepoko kaj uzita ĝis la 19a jc: Jehovo, kiu estas li do?

MEV# 801.313 : 221

{eo1} Jehu

BIB Uzurpinto de la Izraela reĝeco.

MEV# 801.313 : 221

{eo1} Jehud/o (1)

{eo2} Jehuda (1)

BIB Filo de Jakob: juna leono estas Jehudo.

MEV# (=924)

{eo1} Jehud/o (2)

{eo2} Jehuda (2)

La tribo, deveninta el tiu patriarko, kaj ties lando: la

viroj de Jehudo estas lia plej amata plantaĵo; perfidis Jehudo. → Judujo.

MEV# 801.313 : 221

{eo1} Jehezkel

BIB Unu el la grandaj profetoj. → Ezekielo.

MEV# 611.34

{eo1} jejun/o

ANA La meza parto de la maldika intesto, inter la duodeno kaj la ileo (Ujejunum*vi*).

MEV# 800.21

{eo1} jelp/i *nr*

Akre ekkrii, kiel vundita aŭ kolereta hundo.

MEV# (533)

{eo1} Jemen/o

GEOG Imamujo, sudokcidente de la Araba duoninsulo (44°E, 15°20'N).

MEV# (=1.533)

{eo1} Jemen/an/o

Indiĝeno loganta en Jemeno.

MEV# (534)

{eo1} Sud-Jemeno

GEOG Popolrespubliko, eksprotektorato Brita de Adeno.

MEV# 801.27

{eo1} jen (1)

Adverbo uzata por altiri la rigardon sur iun aŭ ion: jen mi estas!; ili preferus ankoraŭ longajn jarojn havi jen ĉi tiun favoran sinjoron; vi serĉas la princon? - jen li estas!.

MEV# 801.27

{eo1} jen (2)

Adverbo uzata por altiri la atenton sur ion: jen estas la brutoj, kiujn vi povas manĝi: bovo . . .; jen Ofelio perdis la prudenton!; jen la ĝusta tempo por lin kapti; jen por unu fojo ŝi diris la veron!; jen staras la bovoj antaŭ la monto (= jen la malfacilaĵo!); jen vi havas (tiu ĉi bato estas por vi!).

RIM. En tiu emfaziga senco, oni kutimas uzi la ekkriajn pronomojn anst la montraj: jen kiaj ni estas!, jen kio venas, se oni volas edziĝi kun fraŭlino!; jen kiel vi agis kun mi!; jen kion diris Aĥitofel; kvankam Z iafoje uzis la montrajn: jen tio min haltigas.

MEV# 801.27

{eo1} jen (3)

Adverbo uzata por prezenti pli vigle ian subitan okazaĵon: krak! jen ĝi falis de la ŝranko, jen la horloĝo sonis nokto-mezon; Faraono havis sonĝon, ke jen li staras apud la rivero; jen avineto ne plu vivas; jen oni devis fari la provon.

MEV# 801.28

{eo1} jen . . . jen . . .

Konjunkcie uzata duopo por esprimi, ke du ebloj efektivigās alterne (unufoje . . . alifoje . . .): ŝi kutimas havi ĉe sia zono jen rozon, jen diamanton; jen li ŝipveturis (songe) tra arbaroj, jen meze tra urbo; jen la arbaroj estis densaj kaj mallumaj, jen ili estis kiel bela parko; li estis jen vigla, jen malbonhumora; ĉirkaŭ la buŝo ludis svarmo de ridetoj, jen plaĉivolaj, jen petolaj, jen ŝercemaj; li okupadis sin jen per tio, jen per alio.

→ ĉu . . . ĉu . . ., aŭ . . . aŭ . . .

MEV# 801.23

{eo1} jen/a

Montra adj., signifanta "tiu sekvanta": ankoraŭ pli mallonga vojo estas jena; tuŝante la akuzativon mi povas al vi doni la jenan konsilon.

MEV# 801.27

{eo1} jen/e

Tiel, kiel oni tuj diras: tiam li respondis al mi jene: . . .; ni jene aranĝos la aferon.

MEV# 801.22

{eo1} jen/o (1)

Tio ĉi, kio sekvas: la principoj homaranaj konsistas en jeno: . . .; volu fari la jenen: volu ŝanĝi . . .; via unua afero, kiam vi venos al la urbo, devas esti jeno: . . .; mi volas komuniki al vi la jenen: . . .

MEV# 336.744

{eo1} jen/o (2)

= eno.

MEV# (282.251.2)

{eo1} Jenisej/o

GEOG Siberia rivero (80°E, 73°N).

MEV# 801.313 : 22

{eo1} Jeremia

{eo2} Jeremi/o

BIB Unu el la grandaj profetoj.

MEV# 393.9

{eo1} Jeremi/ad/o

Longa lamentado (ŝerca aludo al la Plorkantoj).

MEV# (569.5)

{eo1} Jeriĥ/o

{eo2} Jerik/o

GEOG Urbo en Jordanio, ĉe la norda fino de la Morta Maro (arabe: Ariĥa, 35°26'E, 31°52'N): malbenita estu tiu viro, kiu restarigos kaj konstruos ĉi tiun urbon Jeriko!.

MEV#

{eo1} Jerik/o-roz/o

= Anastatiko.

- MEV# (569.5)  
{eo1} Jerik/a  
Rilata al Jeriko: apud la Jerika Jordano.
- MEV# 801.313 : 221  
{eo1} Jerobeam  
BIB Unu el la reĝoj de Izrael.
- MEV# (569.5)  
{eo1} Jerusalem/o  
{eo2} Jeruzalem/o  
GEOG Sankta urbo de la religioj hebrea, kristana kaj islama (35°14'E, 31°47'N): la domo de Dio de Izrael, de tiu Dio, kiu estas en Jerusalemo; mi kreos Jerusalemon por ĝojo; mi vidis la sanktan urbon, novan Jerusalemon, malsupreniranta el la ĉielo.
- MEV# (=1.569.5)  
{eo1} Jerusalem/an/o  
Loĝanto en Jerusalemo.
- MEV# 801.316.5  
{eo1} jes (1)  
Adverb-interjekcio, per kiu oni asertas vera la tuton de la demanda frazo: vi komprenas? — jes; ĉu ĝi estas tiu juna kortegano, kiu loĝas . . . ? — jes, apud tiuj arboj; konservi bone la sekreton! — jes, jes!; ĉu ne estas eble, ke mi povu paroli kun ŝi? — jes, venu kun mi; ĉu per ĉi tie? — Mi pensas, ke jes; ĉu ili ne mortas? — Ho jes, ili ankaŭ devas morti.  
RIM. Evitinda estas la uzo de jes en la rolo kaj senco de ja.
- MEV# 801.316.5  
{eo1} jes (2)  
Tiu interjekcio, uzata substantive kun la sama senco: ĉu vi aŭdas? Li diras jes!; via jes estu jes, kaj via ne estu ne!.
- MEV# 801.283  
{eo1} jes ja  
Adverb-interjekcio, uzata por respondi pozitive al negativa demando: ĉu ŝi do ne venos? — jes ja, sed nur malfrue. → tamen.
- MEV# 801.23  
{eo1} jes/a  
Esprimanta aprobon, konsenton: jesa respondo; jese gesti, balanci la kapon.
- MEV# 801.25  
{eo1} jes/i ntr  
Diri jes, respondi jese: Mario faris jesantan kapoklinon; li jesis al la muta demando.
- MEV# 801.25  
{eo1} jes/ig/i (1)  
Jesi.
- MEV# 801.25  
{eo1} jes/ig/i (2)  
Konfirmi.
- MEV# 801.25  
{eo1} kap'jes/i ntr  
Montri sian jesadon per kapoklino: la najbaroj kapjesis al ili. → skui.
- MEV# 801.313 : 224  
{eo1} Jesaja  
BIB Unu el la grandaj profetoj, aŭtoro de la 39 unuaj ĉapitroj de la libro nomata laŭ li.
- MEV# 355.335 : (=1.470)  
{eo1} jesaul/o  
Kozakkapitano.
- MEV# 232  
{eo1} Jesu/o (1)  
HIST Juda profeto, kiu predikis la tujan alvenon de la Regno de Dio k, kiel naciista agitanto, estis ekzekutita le la Romia prokuratoro per krucumado; liaj disĉiploj kredis lin la Mesio kaj fondis super tiu kredo la kristanisman (-5? ĝis +30?).
- MEV# 232  
{eo1} Jesu/o (2)  
KRI Dua persono de la sankta Triunuo, kiu por la elaĉeto de la homaro enkarniĝis, mortis en Jerusalemo kaj reviviĝis la trian tagon.
- MEV# 296  
{eo1} Jesu/o (3)  
Iu al la aliaj Judoj, kiuj havis tiun nomon (postekzilan formon de: Josuo), i.a. Jesuo, filo de Sirah, aŭtoro de la "Saĝo".
- MEV# 232  
{eo1} Jesu/o Krist/o  
Rita vokformo de Jesuo ĉe la kristanoj: se iu ne amas la Sinjoron Jesuo Kristo, li estu anatemitita. → Nazaretano, Nazoreo.
- MEV# 271.5  
{eo1} Kompanio de Jesuo  
La jezuita ordeno.
- MEV# 629.7  
{eo1} jet/o  
AVI Avio movata per reaktoro.
- MEV# 629.735.036.2  
{eo1} puls/ad/a jet/o  
EB#226/21.  
{de1} Flugzeug *n* mit intermittierendem Staustrahlrohr *n*  
{en1} aircraft with pulse-jet tube  
{fr1} avion *m* à pulso-réacteur *m*
- MEV# 623.746.4.025.4

{eo1} sag-plane/a jet/o  
EB#225/27.  
{de1} Pfeilflügelflugzeug *n*  
{en1} swept-back wing aircraft  
{en2} arrow type wing aircraft  
{en3} swept-back airplane {US}  
{fr1} avion *m* à aile *f* en flèche *f*

MEV# 629.735.036.2  
{eo1} sen-kompresor/a jet/o  
EB#226/19-23.  
{de1} Staustrahlflugzeug *n*  
{en1} ram-jet aeroplane  
{fr1} avions *m* à statoréacteur

MEV# 629.735.036.22  
{eo1} super'prem/a jet/o  
EB#226/19.  
{de1} Staustrahltonnenflugzeug *n*  
{en1} ram-jet barrel-shaped aircraft  
{fr1} avion *m* à statoréacteur *m*  
{fr2} avion à fuseau-fuselage *m*  
{fr3} avion-tonneau *m*

MEV# 629.735.036.3  
{eo1} turbin/o-kompresor/aj jet/oj  
EB#226/13-18  
{de1} Turbinenflugzeuge *n*  
{en1} turbine aeroplanes  
{fr1} avions *m* à turboréacteurs

MEV# 53.07 : 629.7.036.2  
{eo1} jet-model/o  
EB#271/63  
{de1} düsengetriebene Modell ∞ das  
{en1} jet-propelled model  
{fr1} modèle *m* à propulsion *f* par réaction

MEV# 629.7.036.2  
{eo1} jet-motor/o (sur alo-pinto)  
EB#225/70; 226/20.  
{de1} Strahltriebwerke *m*  
{de2} Außenflügeltriebwerke *f*  
{en1} turbojet propulsion  
{en2} outer-wing turbine  
{fr1} turbo-réacteur *m*  
{fr2} réacteur en bout *m* d'aile *f*

MEV# 629.7.036.2  
{eo1} sub-ala jet-motor/o  
EB#226/18.  
{de1} Turbinengondel *f*  
{en1} turbine nacelle  
{fr1} fuseau-réacteur *m*

MEV# 629.7.036.2  
{eo1} sur'fuzelaĝ/a jet-motor/o  
EB#226/17.  
{de1} Turbinenaufbau *m* auf dem Rumpf  
{en1} turbine superstructure on the fuselage

{fr1} réacteur *m* dorsal

MEV# 629.7.036.24  
{eo1} puls/ad/a sen-kompresor/a jet-motor/o  
EB#227/12.  
{de1} intermittierende Staustrahlrohr ∞ das  
{de2} V-1-Antrieb ∞ der  
{en1} intermittent pulse-jet tube  
{en2} pulsojet tube  
{en3} V-1 propulsion  
{fr1} pulsoréacteur *m*  
{fr2} propulsion V 1 *f*

MEV# 629.7.036.22  
{eo1} superprem/a sen-kompresor/a jet-motor/o  
EB#227/19  
{de1} Staustrahlrohr *n*  
{en1} ram-jet tube  
{en2} athodyd  
{en3} propulsive duct tube  
{fr1} statoréacteur *m*

MEV# 629.7.036.2  
{eo1} turbin/o-kompresor/a jet-motor/o  
EB#226/50; 227/25, 41, 42.  
{de1} Turbinenstrahltriebwerk *n*  
{en1} turbojet engine  
{fr1} turboréacteur *m*

MEV# (524)  
{eo1} Jez/o  
GEOG Malnova nomo de Hokajdo.

MEV# 271.5  
{eo1} jezuit/o (1)  
Ano de la katolika ordeno, proprenomata kompanio, fondita de Ignaco de Lojola en 1540, por propagandi katolikismon ĉe la elitoj: la jezuitoj permesis fumi kaj flari tabakon; la generalo de la jezuitoj (ilia elektita ĉefo).

MEV# 801.22???  
{eo1} jezuit/o (2)  
{fig} Timinda hipokritulo (pro aludo al la "spiritaj rezervoj" multe uzataj de la jezuitaj kazuistoj.)

MEV# 271.5  
{eo1} jezuit/a (1)  
Rilata al la jezuitoj: la jezuitaj konstitucioj; ARKI la jezuita stilo (→ baroka).

MEV# 801.23???  
{eo1} jezuit/a (2)  
{fig} Hipokrita, ruza: malgraŭ ĉiuj perfidoj kaj jezuita subfosado de kelkaj personoj.

MEV# 726.9  
{eo1} jezuit/ej/o  
Domo, kie loĝas kaj instruas jezuitoj.

- MEV# 271.5  
{eo1} jezuit/ism/o  
Sistemo de la jezuitoj, bazita sur la principo, ke la celo pravigas la rimedojn, kaj utiliganta la politikon, por realigi la superregadon de la katolika eklezio.
- MEV# 803.0-088  
{eo1} Jid/o  
{eo2} Jud-German/a ĵargon/o  
{eo3} Jid/a lingv/o  
Germana dialekto, miksita per Hebrea kaj Slavaj vortoj, kaj uzata de la Orient-Eŭropaj Judoj.  
{de1} Jiddische ∞ das  
{en1} Yiddish  
{en2} Judeo-German  
{fr1} yiddish  
{fr2} judéo-allemand
- MEV# 801.313 : 22  
{eo1} Jiftan  
BIB Hebrea militestro, kiu oferbuĉis sian propran filinon.
- MEV# 598.???  
{eo1} jing/o  
ZOO Genro el la ordo de pegiformaj birdoj, kun relative mallonga beko kaj tre fleksebla kolo (Aljnxli).
- MEV# 801.313 : 22  
{eo1} Joab  
BIB Nevo kaj generalo de David.
- MEV# 801.313.11  
{eo1} Joakim/o  
Virnomo.
- MEV# 801.313 : 22  
{eo1} Job/o  
= Ijob.
- MEV# 546.15 & 661.471  
{eo1} jod/o  
KEM Elemento, atompezo 127, atomnumero 53, havanta formon de folietoj blue grizaj kun metala brilo, uzata en medicino kaj fotografado, J aŭ I: jodjoda tinkturo; joda klorido, JCl; joda triklorido, JCl<sub>3</sub>; jodaj kombinaĵoj; joda nombro (kvanto da jodo uzata, por kombini kun 1 g da nesaturita substanco).
- MEV# 66.09 & 628.162.9  
{eo1} jod/i tr  
Enkonduki jodon: jodi duoblan ligan.
- MEV# 546.15 & 661.474  
{eo1} jod/at/o  
Salo de jodata acido HJO<sub>3</sub>.
- MEV# 546.15 & 661.472  
{eo1} jod/id/o  
Salo de jodida acido HJ.
- MEV# 546.15  
{eo1} jod/il/o  
Radiko (JO): jodila sulfato, (JO)<sub>2</sub>SO<sub>4</sub>.
- MEV# 546.15  
{eo1} jod/it/o  
Salo de jodita acido HJO<sub>2</sub>.
- MEV# 543.242  
{eo1} jod/o-metr/i/o  
Kvanta analiza metodo, uzanta la oksidigon de J' al J.
- MEV# 546.15  
{eo1} hipo'jod/it/o  
Salo de hipojodita acido HJO.
- MEV# 546.15  
{eo1} per'jod/at/o  
Salo de perjodata acido HJO<sub>4</sub>.
- MEV# 784.4  
{eo1} jod/i ntr  
Kanti kun rapida alterno de kap- kaj brustvoĉo: la paŝtisto gaje jodlis en la valo.
- MEV# 784.4  
{eo1} jod/o  
Kanto de jodlanto, kutima ĉe la Alpanoj. → Tirolkanto.
- MEV# 546.15  
{eo1} jodo/  
KEM Vortero de substancnomoj, indikanta la ĉeeston de JO<sub>2</sub>-grupo: jodobenzeno C<sub>6</sub>H<sub>5</sub>JO<sub>2</sub>.
- MEV# 547.412.125  
{eo1} jodoform/o  
{eo2} tri-jod-metan/o  
KEM Kontraŭsepsa substanco, konsistanta el karbono, jodo kaj hidrogeno, CHJ<sub>3</sub>;
- MEV# 546.15  
{eo1} jodol/o  
KEM Tetrajodpirolo, C<sub>4</sub>H<sub>4</sub>NJ<sub>4</sub>.
- MEV# 546.15  
{eo1} jodoz/o  
KEM Vortero de substancnomoj, indikanta la ĉeeston de JO-grupo.
- MEV# 801.313 : 224  
{eo1} Joel  
BIB Unu el la profetoj.
- MEV# 801.313.12  
{eo1} Joel/a

Nomo de virino.

MEV# 294.527

{eo1} jog/o

Hindua sistemo de filozofia meditado kaj asketismo, destinita efektiviĝi la unuigon de la animo de la disĉiplo kun la universa spirito: joko estas malfacila por la hom' sen memregado.

MEV# 294.527

{eo1} jog/an/o

Adepto de tiu doktrino: la jogan' pli alte staras ol asket' aŭ erudito aŭ faranto de bonagoj (Bagavad-Gita).

MEV# 801.313.11

{eo1} Johan/o

Virnomo, i.a. de profeto (Johano Baptisto) kaj de evangeliisto. → Ĵano, Ivano (karesformoj: Jocjo, Johanĉjo, Hanĉjo).

MEV# 801.313.12

{eo1} Johan/a

Nomo de virino (karesformo: Janjo).

MEV# 582.???

{eo1} johimb/o

BOT Genro (Corynanthe yohimba) el rubiacoj en Okcidenta Afriko.

MEV# 615.3 & 615.71

{eo1} johimbin/o

KEM (Alkaloido, ekstraktita el johimbo kaj uzata kiel hipotensiiga, angioldilata kaj afrodiziiga drogo.

MEV# 796.21

{eo1} jojo\*\*/o

Bobeno uzata en ~ludo (EB#258/48), kiun per risortecaj supren- kaj malsupren-movoj de la mano oni igas supren- kaj malsupren-ruli sur la al la bobeno fiksita ŝnuro.

MEV# 663.916

{eo1} jokan/o

Japana dolĉa sukeraĵo el anno, sukero kaj agaragararo, ordinare en formo de rektangula stango.

MEV# 292

{eo1} Jokast/a

MIT Patrino kaj edzino de Edipo.

MEV# (520)

{eo1} Jokoham/o

GEOG Japana havenurbo (139°32'E, 35°30'N).

MEV# 629.125.13

{eo1} jol/o (1)

Malpeza, longa boato, por kvar aŭ ses remantoj.

MEV# 629.123.16

{eo1} jol/o (2)

Velŝipo kun du mastoj, ambaŭ kun laŭlongaj veloj, el kiuj la posta estas malpli alta ol la antaŭa.

MEV# 537.56 & 541.132

{eo1} jon/o

FIZ KEM Elektre ŝargita formo de tia molekulo aŭ de tia atomo, kiu akiris aŭ perdis elektronojn: en elektrolizo oni nomas ~o ĉiun el la du partoj de atomo aŭ molekulo altiritan aŭ de la anodo aŭ de la katodo.

MEV# 537.5

{eo1} jon/ig/i

Fendi en jonojn: elektra sparko jonigas la aeron.

MEV# 537.53

{eo1} impuls/a jon/ig/o

Jonigo de gasaj molekuloj pere de la trafo de elektronoj sur la anodon de elektrontubo.

MEV# 539.1.073

{eo1} jon/ig/a kamer/o EVIT

{eo2} jon/iz/a kamer/o

Partiklo-detektilo, kiu mezuras la ioniziĝon de gaso en la instrumenta kamero, produktita per rapide moviĝanta, tra la kamero pasanta, ŝargita partiklo. EB#2/2.

{de1} Ionisationskammer *m*

{en1} ion chamber

{en2} ionization chamber

{fr1} chambre *f* d'ionisation *f*

MEV# 537.5

{eo1} mall'jon/ig/i

Forigi gas-jonojn en elektrontubo.

MEV# 537.5

{eo1} jon/iĝ/i

Pasi al jona stato: salo joniĝas en akvo ĝis grado indikita per la joniĝa konstanto.

MEV# 621.385.832

{eo1} jon-kapt/il/o

Unaĵo (89/044) por preventi ~jonan makulon (94/450) per tio, ke jonoj estas defleksitaj el la elektrona fasko per permanenta magneto ĉirkaŭ la kolo de la bildotubo. EB#236/17. (94/451)

{de1} Ionenfalle *f*

{en1} ion trap

{fr1} piège à ions

MEV# 801.313 : 224

{eo1} Jona

BIB Profeto, pri kiu estas rakontite, ke li sidis tri tagojn en la interno de granda fiŝo.

MEV# 801.313.11

{eo1} Jonatan

BIB Virnomo.

- MEV# 294.51  
{eo1} joni/o (1)  
REL Virina seksorgano, kies ŝtonan figuron kultas la Hinduoj, kiel simbolon de fekundeco. → lingamo, piĉo
- MEV# 546.841  
{eo1} joni/o (2)  
→ ionio
- MEV# 582.???
- {eo1} jonkvil/o  
BOT Specio de narciso (*Narcissus jonquilla* L. el amarilidacoj) kun pure flavaj bonodoraj floroj, havantaj longan mallarĝan kromkorolan tubon, 2-4 floroj sur ĉiu pedunklo.
- MEV# 550.388.2  
{eo1} jonosfer/o  
MET La plej supra tavolo de la interna atmosfero (komenciganta en alto de 80 km), kies esenca karakterizaĵo estas la elektra konduktopovo.  
{de1} Ionosphäre *f*  
{en1} ionosphere  
{fr1} ionosphère *f*
- MEV# 656.61.052  
{eo1} jor/o (1)  
SHI Momenta, neaŭtaŭvidita voĵŝanĝo de ŝipo, ordinare kaŭzita de vento aŭ de fluo.
- MEV# 656.13  
{eo1} jor/o (2)  
AUT Abrupta flankenŝoviĝo de aŭto, kaŭzita ekz-e de pluvglitiga ŝoseo.
- MEV# 656.7.043  
{eo1} jor/o (3)  
AVI Angula moviĝo de aviadilo ĉirkaŭ ĝia normala akso.
- MEV# 656.13 & 656.61.052 & 656.7.043  
{eo1} jor/i *nt*  
Fari joron.
- MEV# (282.254.???)  
{eo1} Jordan/o  
GEOG Rivero, naskiĝanta el Hermono kaj enfluanta en la Mortan Maron (35°32'E, 31°45'N): transiru ĉi tiun Jordanon, vi kaj ĉi tiu tuta popolo, en la landon, kiun mi donas al ili; Ii estis baptita de Johano en Jordano.
- MEV# (569.5)  
{eo1} Jordan/i/o  
Ŝato en Proksim-Oriento, inter Irako kaj Izraelio (Amman, 35°52'E, 31°59'N).
- MEV# (=1.569.5)
- {eo1} Jordan/i/an/o  
Regnano de tiu ŝtato.
- MEV# (282.254.???)  
{eo1} trans-Jordan/a  
Situanta trans Jordano (se rigardi elde Jerusalemo).
- MEV# (282.254.???)  
{eo1} Trans-Jordan/i/o  
La lando trans-Jordan/a.
- MEV# 796.93  
{eo1} joring\*\*/o  
EB#283/5. (87/170)  
{de1} Schikjöring *n*  
{de2} Schijöring *n*  
{en1} ski kjoring  
{en2} ski joring  
{fr1} ski joring
- MEV# (427.4)  
{eo1} Jork/o  
GEOG Angla urbo (1°C04'W, 53°58'N).
- MEV# (948)  
{eo1} Jork/a  
Nomepito de la plej norda kabo de la Aŭstralia kontinento (142°30'E, 10°42'S).
- MEV# (747)  
{eo1} Nov-Jork/o  
Plej grava urbo en Usono (74°W, 40°43'N).
- MEV# (747)  
{eo1} Nov-Jork/i/o  
La Usona ŝtato, en kiu troviĝas Nov-Jorko.
- MEV# 801.313 : 224  
{eo1} Josu/o  
BIB Profeto, postirinto de Moseo.
- MEV# 801.313 : 22  
{eo1} Joŝija  
BIB Reĝo de Judujo, dum kies regado estis proklamita la Readmono.
- MEV# 003.341  
{eo1} jota  
{eo2} jot/o  
Naŭa litero de la greka alfabeto (I, senpunkta i), responda al la latina i, kaj uzata kiel simbolo de tre malgranda kvanto: nek unu joto nek unu streketo forpasos de la leĝo.
- MEV# 292  
{eo1} Jov/o  
MIT La plej granda el la dioj, en la Roma religio (= Zeŭso, en la Helena): kio estas permesata al Jovo ne estas permesata al bovo; per Jovo!  
{de1} Zeus

{de2} Jupiter  
{en1} Zeus  
{en2} Jupiter  
{fr1} Zeus  
{fr2} Jupiter

MEV# 801.316.03 (+)  
{eo1} jovial/a  
POE Gajema.

MEV# 801.313.11  
{eo1} Jovian/o  
Virnomo.

MEV# 801.313.11  
{eo1} Jozef/o  
Virnomo: Nikodemo batas Jozefon; ŝi ĵetis siajn rigardojn sur Jozefon kaj diris: kuŝiĝu kun mi.

MEV# 801.313.12  
{eo1} Jozef/a  
Nomo de virino.

MEV# 801.313.12  
{eo1} Jozef/in/o  
Nomo de virino.

MEV# 801.27  
{eo1} ju  
Adverbo, uzata antaŭ pli kaj malpli, responde al des, por montri ion, de kies varioj dependas la varioj de alio: ju cerbo pli prudenta, des lango pli silenta; ju pli da ĵuroj, des pli da suspekto; ju pli oni babilas, des pli oni al si malutilas; ju pli peza la aveno estis, des pli profunde ĝi kliniĝis; ju malpli ni okupos niajn kapojn per diversaj "pliboniĝoj" kaj ju pli ni simple propagandos la lingvon, des pli bone estos.

MEV# 726.59  
{eo1} jube/o  
ARKI Tribuno, en formo de galerio, troviĝanta en romanikaj aŭ gotikaj kirkoj, inter la navo kaj la ĥorejo. → ambono.

MEV# 245  
{eo1} jubil/i ntr  
Ĝojkrii; elmontri bruan ĝojon (ofte uzata kun religia koloro).

MEV# 22  
{eo1} jubile/o (1)  
BIB Ĉiu kvindeka jaro, en kiu estis ordonate liberigi la sklavojn kaj nuligi la ŝuldojn: en tiu jubilea jaro ĉiu revenu al sia posedaĵo.

MEV# 265.66  
{eo1} jubile/o (2)  
Solena pekabsolvo, kiun la papo konsentis al la Rom-pilgrimantoj unue po ĉiuj cent jaroj, poste po ĉiuj kvindek kaj hodiaŭ po ĉiuj dudek kvin.

MEV# 791.62  
{eo1} jubile/o (3)  
Festo, per kiu oni solenas la centan kvindekan aŭ iafoje eĉ la dudekkvinan datrevenon de iu grava fakto: la 25-jara jubileo de la tago de apero de E-o; festi jubileon; la kvarcentjara jubileo pri la eltrovo de Ameriko; la ora jubileo de geedzoj.

MEV# 791.62  
{eo1} jubile/ul/o  
Tiu kiu festas sian jubileon .

MEV# (=924)  
{eo1} Jud/o  
Nomo, per kiu oni nomas la Hebreojn, de post ilia forkaptiteco en Babilono: la Judoj apartenas al diversaj rastipoj: Majmonido, Spinozo, Bergson estis inter la plej famaj Judoj. → Izraeliano.  
Judon oni nomas homon, kiu mem aŭ kies antaŭuloj akceptis la "Judisman religion <296>". Nur proksimume 10% el ili estas Semitoj. Ili nomas sin "Sefardim" (=Hispanaj Judoj). La aliaj Judoj devenas de Azio, el la nuna Rusio. Ili nomas sin "Aŝkanazim" (=Germanaj Judoj), kiuj troviĝas ĉie en la mondo. Ili intermiksiĝis kun multaj aliaj rasoj.

MEV# (=924)  
{eo1} Jud/a  
Rilata al Judoj: vidu ilin la malbenitan Judan popolon!; Judaj moroj.

MEV# (=924)  
{eo1} Jud/ar/o  
Tuto de la Judoj.

MEV# (=924)  
{eo1} Jud/ec/o  
Aparta karaktero de la Judoj.

MEV# (=924)  
{eo1} Jud/ej/o  
= gett/o

MEV# (=924)  
{eo1} Jud/in/o  
Virino Juda.

MEV# 296  
{eo1} Jud/ism/o  
{eo2} judaism/o  
Religio kaj religia civilizo de la Judoj. → antisemitismo.

MEV# 933  
{eo1} Jud/uj/o (1)  
Ĝis la Babilona ekzilo, la pli suda el la du hebreaj ŝtatoj. → Izraelo.

MEV# 296

{eo1} judaiz/i *ntr*

Observi la judajn morojn aŭ ritojn: en Hispanujo oni ŝtiparumis la judaizantajn kristanojn.

MEV# 801.313 : 225

{eo1} Judas/o

Juda virnomo, i.a. de unu disĉiplo de Jesuo, kiu lin perfidis; de unu kristana apostolo ktp: kiso antaŭ amaso estas kiso de Judaso (=de perfidinto).

MEV# 933

{eo1} Jude/o

{eo2} Jud/uj/o (2)

HIST Teokratia ŝtato, starigita, en suda Palestino, de la revenintoj el la Babilona ekzilo. → Idumeo.

MEV# 801.313.12

{eo1} Judit/a

Nomo de virino, i.a. de la Judino, kiu, kuŝiĝinte kun Holoferno detrancis al li la kapon, por savi sian popolon.

MEV# 675.03

{eo1} juft/o

Fortika, akvomezista sed malbonodora ledo el junaj bestoj (ĉevalo, bovo, kapro ktp), tanita en speciala Rusa maniero kaj grasumita plejofte per betula gudro sur la interna flanko.

MEV# 629.1.013.1

{eo1} jug/o (1)

Transversa ligna peco, kiun oni ligas ĉe la kornoj aŭ sur la kolo de bovoj por ilin jungi.

MEV# 937

{eo1} jug/o (2)

Transversa lanco, ligita al du aliaj fiksitaj en la tero, sub kiu lanco la antikvaj Romanoj devigis la venkitojn trapasi.

MEV# 321.18

{eo1} jug/o (3)

Simbolo de submetiĝo sub trudordona potenco: li metos feran jugon sur vian kolon, ĝis li ekstermos vin; mi rompos la stangojn de ilia jugo kaj savos ilin; metu sur vin mian jugon, ĉar mia jugo estas facila; iri sub jugon; forskui, deĵeti la jugon; kurbiĝi sub la jugo de la despotismo; sin klini sub la feran jugon de la meĥanismo. → mallibera, kateno, karcero, tiraneco, premi.

MEV# 538.26

{eo1} jug/o (4)

ELET Organo el feromagnetna materialo en la magnetna cirkvito de elektra maŝino, servanta por magnetne interkonekti la kornojn de la elektromagnetoj aŭ la polusojn.

MEV# 621.397.62

{eo1} jug/o (5)

ELET Parto de televida ricevilo, troviĝanta ĉirkaŭ la kolo de bildotubo kaj konsistanta ĉefe el la horizontala kaj vertikala defleksbobenoj.

MEV# 631.31

{eo1} jug/i (1) *tr*

Jungi per jugo: jugi bovojn, taŭrojn.

MEV# 323.34

{eo1} jug/i (2)

Sklavigi, submeti al si.

MEV# 629.112

{eo1} jug/aj/o

Tuto de la du jugitaj bestoj.

MEV# 581.145.2 : 582.???

{eo1} jugland/o

BOT Nukso de juglandujo.

{de1} Walnuß *f*

{en1} walnut

{fr1} noix *f*

MEV# 582.???

{eo1} jugland/uj/o

{eo2} jugland-arb/o

Genro (Juglans L. el juglandacoj) de falfoliaj arboj kun grandaj, pinataj duope kontraŭesidantaj, tre aromaj folioj kun drupoj, kies ekstera, karneca tavolo ĉe kelkaj specioj defalas je maturiĝo.

{de1} Walnußbaum *m*

{en1} walnut tree

{fr1} noyer *m*

MEV# 582.???

{eo1} nigr/a jugland-arb/o

Arbo (Juglans nigra L.) kun plaĉa, malhela trunko-ŝelo kaj ligno uzata por meblo-fabrikado; kulturata en parkoj.

MEV# 582.???

{eo1} ordinar/a jugland-arb/o

Frukt-arbo multe kulturata (Juglans regia L.) pro la valora nukso, kies mangebla kerno konsistas ĉefe el du grandaj karakterize falditaj kotiledonoj.

MEV# (=1.497.1)

{eo1} Jugoslav/o

Ano de la Jugoslava Federacio.

MEV# (497.1)

{eo1} Jugoslav/a

Rilata al Jugoslavo aŭ Jugoslavio.

MEV# (497.1)

{eo1} Jugoslav/a Federaci/o

{eo2} Jugoslavi/o

GEOG Federacio el ses respublikoj, laŭlonge de Adriatiko (Beogrado, 20°28'E, 44°49'N).

MEV# 611.14  
{eo1} jugular/o  
ANA Unu el la ĉefaj vejnoj en la kolo (v. jugularis interna): la jugularo apudas la karotidon.  
{de1} Halsblutader *f*  
{en1} jugular vein  
{fr1} veine *f* jugulaire

MEV# 935  
{eo1} Jugurt/o  
HIST Reĝo de la Numidoj (160-104 a.K.): la Jugurta milito.

MEV# 340  
{eo1} juĝ/i (1) *tr*  
Laŭleĝe kaj jure decidi, ĉu iu estas kulpa aŭ ne, prava aŭ ne: juĝu mian aferon; laŭ iliaj meritoj mi juĝos ilin; juste juĝu vian proksimulon; ĝis kiam vi juĝos maljuste?; la Eternulo juĝu inter vi kaj mi; ĉefoj juĝas pro subaĉeto; la proceso, kiun oni juĝis hieraŭ; juĝi kiel arbitracianto; pri propra afero neniu juĝas libere; (figuracence) la historio juĝos lin senindulge.

MEV# 17.022  
{eo1} juĝ/i (2)  
{eo2} pri'juĝ/i  
Esprimi opinion, per kiu oni aprobas aŭ malaprobas iun aŭ ion: kiam oni juĝas pri homoj, oni devas ja konsideri iliajn kutimojn; la libristo, kiu juĝis la literaturan laboron de M.; juĝante laŭ la eksterajo; ne juĝu pri afero laŭ ĝia ekstero; arbon oni juĝas laŭ la fruktoj; la recenzisto juĝis tiun romanon ne sufiĉe severe. → taksi, ŝati, ekzameni, mezuri.

MEV# 17.022  
{eo1} juĝ/i (3)  
Esprimi malfavoran, kondamnan opinion: ebriulon kaj malsaĝulon oni ne juĝas; kiu kutimas ĉion juĝi, nenie povas rifuĝi; ne juĝu, tiam vi ne estos juĝata. → kritiki, ĉikani.

MEV# 347.9  
{eo1} juĝ/o (1)  
{eo2} juĝ-far/o  
Laŭleĝa esploro de ies kulpeco aŭ praveco: ni kune iru al juĝo!; ne eniru en juĝon kun via sklavo; havu juĝon kontraŭ via patrino; ne distingu vizaĝon ĉe la juĝo; kiu komencas juĝon, iras sub jugon; juĝo komencita paciĝon ne malhelpas; loko de juĝo; la sinjoroj de la juĝo pri morto kaj vivo; (religie) en la tago de la lasta, de la mondfina juĝo; la granda fina juĝo. → proceso.

MEV# 347.95  
{eo1} juĝ/o (2)  
Decido, kiu sekvas tian esploron: mi juĝos vin laŭ la juĝoj kontraŭ la adultulinoj; fari juĝon kontraŭ iu, super io; justaj estas viaj juĝoj. → verdikto.

MEV# 344 & 347  
{eo1} juĝ/o (3)  
Tuto de la sistemo, per kiu la leĝo estas aplikata al la homoj; = justico 1: aŭdu, kiel pardoneme la juĝo agas kun vi, malvirtulo! kontraŭ nehavo eĉ juĝo silentas; la milita juĝo; ho mia Dio! jen mi jam estas transdonita al la juĝo!; ili venigos sur vin ĉiun punon, kiun povos liveri al ili la decidoj de la juĝo; fripona atestanto mokas la juĝon.

MEV# 17.02 & 172  
{eo1} juĝ/o (4)  
{eo2} pri'juĝ/o  
Opinio aproba aŭ malaproba: ellabori al si tute klaran juĝon pri io; mi petis ĉiujn amikojn esprimi ilian juĝon pri la lingvo; mian juĝon pri la ŝanĝoj mi prezentos al la kongreso; kiom da juĝantoj, tiom da juĝoj; tiu ideo devas trairi la juĝon de la publiko; ni eldiru pri tiuj versoj unuanime nian juĝon.

MEV# 161.2  
{eo1} juĝ/o (5)  
PSI Mensa decido, per kiu oni konstatas opinion kaj deklaras ĝin ĝusta: laŭ Kantio, juĝo estas aplikado de aprioroj formoj al perceptoj ricevitaj tra sensoj; juĝo estas la psika aspekto de tio, kion gramatiko nomas propozicio.

MEV# 161.2  
{eo1} juĝ/a  
Rilata al juĝo: la juĝa ĉambro; mi faru juĝan analizon koncerne vin; juĝa disputo, afero; juĝa seĝo; juĝe batali kun iu; pli valoras interkonsento, ol juĝa dokumento.

MEV# 347.95  
{eo1} juĝ/ad/o  
Agado de tiu, kiu juĝas: ne faru maljustaĵon en la juĝado, konsideri personojn ĉe juĝado ne estas bone; dum la juĝado la akuzitino svenis.

MEV# 347.95  
{eo1} juĝ/ad/i *tr*  
Kutime, daŭre juĝi: ili juĝadis maljuste.

MEV# 161.2  
{eo1} juĝ/ant/o (1)  
Persono, kiu esprimas juĝan opinion: en la afero, kiu vin interesas, mi mem persone ne estas kompetenta juĝanto; vi ne rajtas esti samtempe juĝanto kaj juĝato; juĝanto decidis, kiel li vidas; juĝanto devas havi du orelojn.

MEV# 343.161  
{eo1} jug/ant/o (2)  
Ĵuriano.

MEV# 161.2  
{eo1} juĝ/ant/ar/o  
Grupo da personoj, al kiu estas komisiita juĝi:

membro de la decida juĝantaro; ĵura juĝantaro (ĉe asizo, =ĵurio).

MEV# 725.15

{eo1} juĝ/ej/o

Domo, ĉambro, kie oni juĝadas: la distrikta juĝejo; juĝeja servisto, oficisto → tribunalo, kortumo, areopago, forumo, agoro. EB#252/8

{de1} Gerichtsgebäude *n*

{de2} Justizgebäude *n*

{en1} law courts

{fr1} palais *m* de justice *f*

MEV#

{eo1} juĝ/ej/a bar/il/o

EB#248/35

{de1} Zeugenschanke *f*

{en1} witness barrier

{fr1} barre *f*

MEV#

{eo1} juĝ/ej/a medicin/ist/o

EB#248/37

{de1} Gerichtsarzt *m*

{en1} court doctor

{fr1} médecin *m* légiste

MEV# 347.96

{eo1} juĝ/ist/o

Persono, kies oficiala funkcio estas juĝadi: arbitracia, paciga, enketa juĝisto. EB#248/22.

{de1} Richter *m*

{de2} Beisitzer *m*

{en1} judge

{fr1} président *m*

{fr2} juge *m* assesseur

MEV# 796.072.4

{eo1} cel-juĝ/ist/o

EB#268/25; 272/20; 273/5; 280/10.

{de1} Zielrichter *m*

{en1} touch umpire

{en2} judge

{fr1} juge *m* d'arrivée *f*

{fr2} juge *m* à l'arrivée

MEV# 796.332.072.4

{eo1} futbal-juĝ/ist/o

EB#274/22.

{de1} Schiedsrichter *m*

{en1} referee

{fr1} arbitre *m*

MEV# 796.072.4

{eo1} gvid/a juĝ/ist/o

EB#281/37.

{de1} Ringrichter *m*

{en1} referee

{fr1} arbitre *m*

MEV# 796.072.4

{eo1} lini-juĝ/ist/o

EB#274/23, 47

{de1} Linienrichter *m*

{en1} linesman

{fr1} juge *m* de touche

{fr2} arbitre *m* de touche

MEV# 796.072.4

{eo1} pied\_erar-juĝ/ist/o

EB#276/25.

{de1} Fußrichter *m*

{en1} foot-fault judge

{fr1} juge *m* de touche

MEV# 796.072.4

{eo1} poent-juĝ/ist/o

EB#281/39

{de1} Punktrichter *m*

{en1} judge

{fr1} juge *m* de boxe *f*

MEV# 796.926 : 725.89

{eo1} salt-juĝ/ist/oj ∞ tur/o de

EB#283/13.

{de1} Schiedsrichterturm *m*

{en1} judges' stand

{fr1} tribune *f* des juges *m*

{fr2} tribune *f* des arbitres *m*

MEV# 796.072.4

{eo1} turn/o-juĝ/ist/o

EB#268/26.

{de1} Wenderichter *m*

{en1} turn umpire

{fr1} juge *m* de touche

MEV# 347.96

{eo1} juĝ/ist/a

Rilata al juĝisto(j): mi jam dekkvin jarojn sidas sur la juĝista seĝo.

MEV# 347.96

{eo1} juĝ/ist/ar/o (1)

Tuto de la juĝistoj en unu lando provinco ktp.

MEV# 377.99

{eo1} juĝ/ist/ar/o (2)

Tribunalo: la multestimata juĝistaro, kiu decidis pri vivo kaj morto.

MEV# 796.072.4

{eo1} konkurs/a juĝ/ist/ar/o

EB#273/4.

{de1} Rennleitung *f*

{en1} race committee

{fr1} direction *f* de la course

MEV# 347.95

{eo1} al'juĝ/i (1) *tr*

Atribui post juĝado: mi aljuĝis la unuan premion al la leporo; la tribunalo aljuĝis al li la bienon, sed ne la urban domon. → alskribi.

MEV# 381.7  
{eo1} al'juĝ/i (2)  
KOME Atribui al tiu konkurencanto, kies prezoj estas plej favoraj, la plenumadon de adjudikita laboro, livero ks.

MEV# 161.2  
{eo1} antaŭ'juĝ/i *tr*  
Formi al si opinion pri iu aŭ io, ne atendante maturan esploron: li antaŭjuĝis la decidon de la tribunalo kaj tre seniluziiĝis.

MEV# 161.2  
{eo1} antaŭ'juĝ/o  
Tro rapida, nesufiĉe informita juĝo: formetu tiun antaŭjuĝon, la glacia tavolo de antaŭjuĝoj estas rompita; senantaŭjuĝa homo.

MEV# 161.2  
{eo1} propr/a-juĝ/e  
Laŭ sia propra juĝkapablo: neniam mi havos la intencon proprajuĝe reformi E-on.

MEV#  
{eo1} juĝ-ag/ad/o  
= proceduro.

MEV#  
{eo1} juĝ-decid/o  
= verdikto.

MEV# 581.145.2 : 582.???  
{eo1} jujub/o  
BOT La frukto de jujub-arbo.

MEV# 582.???  
{eo1} jujub-arb/o  
Unu el iuj specioj (ŬZizyphus jujubaŭi Mill. kaj ŬZizyphus vulgarisŭi Juss. el ramnacoj) de arbedoj aŭ malgrandaj arboj tropikaj kaj subtropikaj, kies tre sukerhavaj prunograndaj drupoj estas manĝeblaj krudaj, sekigitaj aŭ konfititaj, kaj estas uzataj kiel popola kuracilo kontraŭ tusado. → lotuso 4.

MEV# 801.25  
{eo1} juk/i *ntr*  
Kaŭzi al iu malagrablan impreson en la haŭto, kvazaŭ de multaj incitetaj piketoj, pro kiuj oni sentas la bezonon sin grati: kie jukas, tie ni gratas; juku la haŭto, sed ne sur mia korpo!; jukas kaj tiklas al ni en la piedoj! (pro tro longa senmovo), la ŝtrumpo jukas al mi, {fig} la mano jukas lin (malpacemulo).

MEV# 159.937  
{eo1} juk/o  
{eo2} juk/ad/o

La impreso, ke io jukas: baldaŭ estos la tempo forveturi; mi sentas jam jukadon sub la flugiloj!. → prurito.

MEV# 159.937  
{eo1} juk/ig/a  
Sentiganta jukan impreson.

MEV# 582.???  
{eo1} juka/o  
BOT Genro (ŬYuccaŭi L. el liliacoj) de daŭrafoliaj, plurjaraj herboj kaj arbedoj kun longaj, ofte rigidaj, fibroz-marĝenaj folioj sur ligneca tigo, kaj kun alta pedunklo portanta paniklon el blankaj floroj; pluraj specioj ĝardene kaj subvitre kultivataj. EB#357/24.  
{de1} Palmlilie *f*  
{en1} yucca  
{fr1} yucca *m*

MEV# (726.4)  
{eo1} Jukatan/o  
GEOG Duoninsulo en Centra Ameriko.

MEV# (726.4)  
{eo1} Jukatan/i/o  
Ŝtato en Meksikio (89°W, 20°N).

MEV# (282.273.1)  
{eo1} Jukon/o  
GEOG Nord-Amerika rivero, fluanta tra Alasko (163°15'W, 61°54'N).

MEV# (712.1)  
{eo1} Jukon/i/o  
Unu el la Kanadaj Teritorioj (Dawson 139°27'W, 64°08'N).

MEV# 629.125.13  
{eo1} jul/o  
SHI Forta remilo, kiun oni uzas per tordaj movoj ĉe la pobo de boato, por antaŭenigi ĝin kvazaŭ per helico.

MEV# 629.125.13  
{eo1} jul/ad/i *ntr*  
Remi per julio.

MEV# 394.268  
{eo1} Jul/o (1)  
Nomo de antikva pagana festo en Nord-Eŭropo, poste anstataŭigita per Kristnasko, kaj sekve ofte uzata en tiuj landoj por ĉi tiu festo: Jul-arbo.

MEV# 801.313.11  
{eo1} Jul/o (2)  
Virnomo.

MEV# 801.313.12  
{eo1} Jul/in/o  
Nomo de virino.

MEV# 615.411  
{eo1} julep/o  
FAR Mildiga aŭ kvietiga pocio, farita el siropoj kaj distilita akvo.

MEV# 801.313.11  
{eo1} Juli/o (1)  
Latina virnomo: mi prezentis Julion Cezaron.

MEV# "33.07"  
{eo1} Juli/o (2)  
La sepa monato de la nuna kristana jaro: la 14a de Julio (Franca nacia festo).

MEV# 937  
{eo1} Juli/a (1)  
Rilata al Julio Cezaro: la Julia kalendaro (→ Gregoria).

MEV# 801.313.12  
{eo1} Juli/a (2)  
Nomo de virino.

MEV# 801.313.12  
{eo1} Juli/et/a  
Nomo de virino: Romeo kaj Julieta (dramo de Ŝekspiro).

MEV# 937  
{eo1} Julian/o  
Virnomo, i.a. de granda Romia imperiestro, kiu batalis kontraŭ la Kristanismo.

MEV# 801.23  
{eo1} jun/a  
Vivanta nur de relative ne longa tempo: la juna knabino, fraŭlino, edzino, vidvino, mi gratulis la junajn geedzojn; la pli juna filino; el ĉiuj miaj infanoj Ernesto estas la plej juna; mi estas je unu jaro pli juna ol vi; Plinio la juna; laboristinoj pli junaj eble ne per siaj jaroj de vivo, sed per siaj jaroj de suferado; juna katido, hundo, museto; junaj pizoj, folioj; {fig} juna vino (→ mosto); nia juna lingvoZ; la tiea E-a movado estas ankoraŭ tre juna, (analoge) la entuziasmo de juna brusto; junaj eraroj. → nova, beba, lulila, adoleska, frua, verda.

MEV# 801.27  
{eo1} jun/e  
En juna maniero: konduti, ridi, frenezumi june.

MEV# -053.7  
{eo1} jun/ec/o (1)  
{eo2} jun-aĝ/o  
FIZL Tempo de la homa vivo, inter la dentsangiĝo kaj la pubhareco.

MEV# -053.7  
{eo1} jun/ec/o (2)

{eo2} jun-aĝ/o  
Tempo de la vivo inter la infaneco kaj la matureco: via juneco renoviĝas kiel ĉe aglo; en la tagoj de via juneco; kiam la dioj ankoraŭ vagadis sur la tero en eterna juneco; la penso de la homa koro estas malbona jam de lia juneco; sango bolas, juneco petolas; se juneco estus sperta!; fleksu arbon dum ĝia juneco; tio estis ankoraŭ la juneco de la mondo.

MEV# -053.7  
{eo1} jun/ec/a  
Rilata al juneco: junecaj frivolaĵoj; junece gaja menso.

MEV# 615.775.5  
{eo1} jun/ig/i  
Fari iun, ion juna: la amo junigas.

MEV# -053.7  
{eo1} jun/ul/o  
Viro juna: ĉiu estis junulo, ĉiu estis pekulo; la junulo aliĝis al nia militistaro; junuloj kun viglaj vizaĝoj, en uniformoj de universitataj studentoj; junulaj jaroj. → fraŭlo. EB#261/22.  
{de1} Jüngling *m*  
{de2} junger Mann *m*  
{en1} young man  
{fr1} jeune homme *m*

MEV# 374.3  
{eo1} jun/ul/ar/o  
Tuto de la junuloj en unu loko aŭ tempo: li estas idolo de la junularo; la studenta junularo; la vira junularo.

MEV# -053.7  
{eo1} jun/ul/in/o  
Virino juna: la junulino, kiu plaĉos al la okuloj de la reĝo, fariĝos reĝino; la junulino estis belstatura kaj belvizaĝa; kiel eŭnuko deziranta senvirgigi junulino, tiel estas homo volanta fari juston per perforto; miaj junuloj kaj junulinoj falis de glavo. → fraŭlino. EB#261/23.  
{de1} junges Mädchen ∞ ein *n*  
{de2} Backfisch ∞ ein *m*  
{en1} young girl  
{en2} teenager  
{fr1} jeune fille *f*

MEV# 374.3  
{eo1} ge'jun/ul/oj  
Junuloj kaj junulinoj.

MEV# 591.139  
{eo1} mal'jun/a  
Vivanta jam de relative longa tempo: maljuna patro, servisto, amiko, stultulo; maljuna Moor; lernu juna, vi scios maljuna; resti maljuna knabino (= ne edziniĝi); tiu ĉi patrino amis sian pli maljunan filinon; maljuna ĉevalo, bovo, saliko; {fig} maljuna

vino; aspekti kiel maljuna pomo; (analoge) maljunaj jaroj, sed ne saĝaj faroj; aĝo maljuna ne estas oportuna; maljuna koro. → malfrua, glacia.

MEV# 613.98

{eo1} mal'jun/ec/o (1)

{eo2} mal'jun-aĝ/o

FIZL Tempo de la homa vivo, de la perdo de reprodukto ĝis la morto.

MEV# 613.98

{eo1} mal'jun/ec/o (2)

{eo2} mal'jun-aĝ/o

Tempo de la vivo post la matura aĝo: ankaŭ ĝis via maljuneco mi vin portas; ili floras ankoraŭ en la maljuneco; Elizabet gravediĝis je filo en sia maljuneco; ne ekzistas maljuneco sen malicoj; en juneco logas, en maljuneco tedas.

MEV# 591.139

{eo1} mal'jun/et/a

Ankoraŭ ne tute maljuna.

MEV# 591.139

{eo1} mal'jun/ig/i

Fari iun maljuna: la ĉagrenoj maljunigas.

MEV# 591.139

{eo1} mal'jun/iĝ/i

Fariĝi maljuna: se vi pri ĉio informiĝos vi baldaŭ maljuniĝos; ne malŝatu vian patrinon, kiam ŝi maljuniĝos; ĉu efektive mi naskos, kiam mi maljuniĝis?; nacioj maljuniĝas, kiel homoj.

MEV# 613.98

{eo1} mal'jun/ul/o

Maljuna viro: neniam estos maljunulo en via domo; li ne atentis la konsilon de la maljunuloj; nepoj estas krono por maljunuloj plej saĝa maljunulo ne estas tro saĝa; Abraham kaj Sara estis maljunuloj de profunda aĝo; maljunulaj faltoj. → plejaĝulo.

MEV# 725.56

{eo1} mal'jun/ul/ej/o

Domo destinita, por liveri kvietan restadon al maljunuloj. → kadukulejo.

MEV# 613.98

{eo1} mal'jun/ul/in/o

Maljuna virino: la maljunulino balancis la kapon kaj diris: Hm! Hm!; la senkoloriĝintaj pupiloj de la maljunulino ne malsekiĝis per larmo.

MEV# 591.139

{eo1} re'jun/ig/i

Fari denove juna: tiu nova hartinkuro ŝin rejuniĝas.

MEV# 591.139

{eo1} re'jun/iĝ/i

Fariĝi denove juna: post la kuracado, ŝi mirinde

rejuniĝis.

MEV# 631.312

{eo1} jung/i tr

{eo2} al'jung/i

Alligi per tiucela ligilo tirontan beston aŭ motorveturilon al tirotaĵo: li jungis sian ĉaron; ne jungu la bovon malantaŭ la plugilon; jungi ĉevalon al veturilo, vagonojn al lokomotivo; (figuracence:) por efektiviĝi la planon, oni jungis ĉiujn fortojn de la lando.

MEV# 631.312

{eo1} jung/ad/o

Ago de tiu, kiu jungas.

MEV# 62-872.8

{eo1} jung/aj/o (1)

Jungilaro: sur la jungaĵo de la bovoj li kuiris la viandon; la jungaĵo de la vagonoj rompiĝis ĉe la elreliĝo.

MEV# 62-872.8

{eo1} jung/il/ar/o (1)

Tuto de la pecoj, destinitaj por jungi bestojn al ia veturilo, ktp: surmeti la jungilaron al brutoj.

EB#72/7-25; 336/15.

{de1} Geschirr *n*

{de2} Gespann *n*

{en1} harness

{fr1} harnais *m*

{fr2} harnachement *m*

MEV# 629.734.7

{eo1} jung/il/ar/o <2>

Tuto de la pecoj, destinitaj por jungi homon al paraŝuto. EB#.228/54

{de1} Gurtwerk *n*

{en1} harness

{fr1} harnais *m*

MEV# 62-872.8 & 636.083.7

{eo1} brust-jung/il/ar/o

EB#72/26-36.

{de1} Sielengeschirr *n*

{en1} breast harness

{fr1} harnachement *m* de poitrail *m*

MEV# 631.3.071

{eo1} jung/il-kolum/a kusen/o

EB#123/1.

{de1} Kummetskissen *n*

{de2} Kutmkissen *n*

{en1} horse collar pad

{fr1} faŭ collier *m*

MEV# 631.3.071

{eo1} pint/a jung/il-kolum/o

EB#72/15.

{de1} Spitzkumt *n*

{de2} Kummet *n*  
{en1} horse collar  
{en2} pointed horse collar  
{en3} hames  
{fr1} collier *m*

MEV# 636.088.2  
{eo1} jung/it/a bov/uk-par/o  
EB#65/16.  
{de1} Ochsespann *n*  
{en1} ox team  
{en2} span of oxen {US}  
{fr1} attelage *m* de b  $\neq$ fs

MEV# 629.112  
{eo1} jung/it/ar/o  
{eo2} jung/aj/o (2)  
La du aŭ pluraj bestoj, kune jungitaj al veturilo.

MEV# 636.088.2  
{eo1} kvar/op/a jung/it/ar/o  
EB#257/54  
{de1} Viergespann *n*  
{en1} four-in-hand  
{en2} carriage and four  
{fr1} attelage *m* à quatre cheveaŭ

MEV# 636.088.2  
{eo1} tri/op/a jung/it/ar/o  
EB#179/45.  
{de1} Dreigespann *n*  
{de2} Troika *f*  
{en1} three-in-hand  
{fr1} attelage *m* à trois cheveaŭ

MEV# 629.112.013  
{eo1} jung-trab/ar/o  
EB#131/8+9.  
{de1} Geschirr *n*  
{en1} swingle set  
{fr1} attelage *m*

MEV# 629.112.013  
{eo1} ĉef/a jung-trab/o  
EB#131/8.  
{de1} Waage *f*  
{de2} Waagscheit *n*  
{en1} main swing-tree  
{fr1} volée *f*  
{fr2} corps *m* de volée

MEV# 629.112.013  
{eo1} en'jung/i *tr*  
Jungi inter du timonoj: ili enjungis la idolanojn kiel bruton antaŭ siaj veturiloj; kiu sin enjungis, devas tiri.

MEV# 629.112.013  
{eo1} el'jung/i *tr*  
Maljungo: dum la eljungado.

MEV# 629.112.013  
{eo1} kun'jung/i *tr*  
Jungi kune kun: la bovo rigardis al sia kunjungito.

MEV# 629.1.013  
{eo1} mal'jung/i *tr*  
{eo2} dis'jung/i  
Malligi la tirantan parton disde la tirata: maljungo kaleŝon, lokomotivon.

MEV# "33.06"  
{eo1} Juni/o  
La sesa monato de la nuna kristana jaro.

MEV# 582.???  
{eo1} juniper/o  
BOT Genro (VJuniperus\i L. el pinacoj) de dioikaj, escepte monoikaj arboj kaj arbedoj kun lancetformaj aŭ skvamformaj pingloj, kaj kun konuso, kiu havas malmultajn, plej ofte tri fine kunkreskantajn skvamojn, kiuj ĉe maturiĝo fariĝas sukoplenaj, formantaj kun la konuso t.n. berojn. EB#356/47.  
{de1} Wacholder *m*  
{en1} juniper  
{fr1} genévrier *m*

MEV# 663.51  
{eo1} juniper-brand/o  
Brando aromigita per la fruktoj de junipero. → ĝino 1.

MEV# 582.???  
{eo1} junk/o  
BOT Genro (VJuncus\i (L.) Lam. & DC. el junkacoj) de unu- kaj plurjaraj marĉoherboj, tuboformaj aŭ kun rampa rizomo, kun longaj, maldikaj tigoj enhavantaj spongecan histon, kun senombraj floroj kaj triĉambrajn kapsulojn enhavantajn multajn malgrandajn grajnoj; tigoj kaj folioj uzataj por fari matojn. → skirpo. EB#130/28  
{de1} Binse *f*  
{en1} reed  
{fr1} jonc *m*

MEV# 003.58  
{eo1} junk/a panikl/o  
EB#324/22.  
{de1} Binsenrispe *f*  
{en1} reed panicle  
{fr1} poinçon *m* égyptien en jonc

MEV# 929.7  
{eo1} junkr/o  
Kampnobelo (ofte en malŝata senco de reakciulo).

MEV# 355.231.1  
{eo1} sign/o-junkr/o  
Korneto, oficir-aspiranto.

MEV# (513.21)  
{eo1} Junnan  
GEOG Provinco en Ĉinujo (102°E, 25°N).

MEV# 292.21  
{eo1} Junon/a  
MIT Roma diino, edzino de Jovo. → Hera.  
EB#308/5  
{de1} Hera  
{de2} Juno  
{en1} Hera  
{en2} Juno  
{fr1} Héra  
{fr2} Junon

MEV# 624.023.672  
{eo1} junt/o (1)  
{eo2} junt/o-lini/o  
TEK La kuniga interspaco inter du kunigitaj ŝtonaj, brikaj, metalaj aŭ lignaj pecoj, kiun oni plenigas per gluo, mastiko, mortero. EB#117/94  
{de1} Stoß *m*  
{en1} join  
{fr1} raccord *m*

MEV# 624.023.86  
{eo1} junt-kovr/a/j/o  
EB#117/100.  
{de1} Überdeckung *f*  
{en1} lap  
{fr1} recouvrement *m*

MEV# 62-462  
{eo1} junt/o (2)  
{eo2} trans'ir/a junt/o  
La kunigo mem: transira junto (ekz. inter du tuboj de malsamaj diametroj).

MEV# 674.028 & 694.2  
{eo1} lign/o-junt/oj  
{eo2} ling/o-kun'ig/oj  
EB#116/84-98  
{de1} Holzverbindungen  
{en1} woodword joints  
{en2} timber joints  
{fr1} assemblages *m* du bois

MEV# 801.41  
{eo1} junt/o (3)  
FON Loko, kie fonologiaj unuoj kuniĝas, komenciĝas aŭ finiĝas; la okaziĝo de specialaj alofonoj ĉe tia loko, rigardata kiel mem fonemo.

MEV# 624.078  
{eo1} junt/o <4>  
{eo2} junt/ej/o  
{eo3} junt/o-pec/o  
Tiu loko en konstrukto (homfarita strukturo →85/420), kie kontaktas ĉu rekte, ĉu pere de speciala elemento aŭ substanco, du konsistigaj pecoj

[partoj] de la konstrukto tiel, ke la per junto kunigitaj pecoj [partoj] efikas same kiel la pecoj [partoj] mem. Diference de nura meĥana kunigo, junto devas plenumi postulon de funkci-kapablo de la konstrukto. Specon de junto determinas 1. metio, al kiu pretigo de la konstrukto apartenas, 2. teĥnologia procedo, resp. maniero de meĥana kunigo. <85/005>

{de1} Verbindung *f*  
{de2} Gelenk *n*  
{en1} connection  
{en2} joint  
{fr1} joint *m*

MEV# 62-821.18 (+)  
{eo1} artik/a junt/o  
Parto de tubkondukilo (85/255) ebliganta reciprokan angulan turniĝon de du partoj de tubo en ebena aŭ spaco. <85/257>

{de1} Rohrgelenk *n*  
{en1} swivel joint  
{fr1} joint articulé  
{fr2} joint à genouillère

MEV# 62-821.18 (+)  
{eo1} teleskop/a junt/o  
Parto de tubkondukilo (85/255) ebliganta reciprokan laŭaksan ŝoviĝon aŭ turniĝon de du partoj de tubo. <85/256>

{de1} Teleskoprohrverbindung *f*  
{en1} telescopic connection  
{fr1} joint télescopique

MEV# 621.315.687  
{eo1} junt/o de kabl/o  
{eo2} junt/o-kest/o  
{eo3} kabl/o-junt/ej/o  
ELET La elektre kaj meĥanike konekta ejo inter la ekstremaĵoj de du kablolongoj, kie oni juntas la apartajn konduktilojn de la kablo. EB#147/60.

{de1} Kabelanschluß *m*  
{en1} secondary terminal box  
{fr1} boîte *m* à bornes *f*  
{fr2} raccordement *m* de câbles *m*

MEV# 674.028.2  
{eo1} junto per foldo kaj lango  
TEK Lignojunto farita el du tabuloj, de kiuj unu havas foldon, la alia langon.

MEV# 694.2  
{eo1} junt/o per tenon/o kaj mortez/o  
{eo2} tenon-junt/o  
TEK Lignokunigo, en kiu elstara peco (tenono) estas enigita en precize samforma kaj sam-dimensia enĉizaĵo (mortezo). EB#116/84  
{de1} Holzverbindung durch einfachen Zapfen  
{en1} simple mortice and tenon joint

{en2} simple mortise and tenon joint  
{fr1} assemblage *m* à tenon *m* simple

MEV# 674.028.2

{eo1} bevel/it/a tenon-junt/o  
EB#116/90.  
{de1} einfacher Versatz *m*  
{en1} bevel shoulder notch  
{fr1} assemblage *m* à simple embrèvement

MEV# 694.2

{eo1} dent/a junt/o  
{eo2} duonum/a hok-junt/o  
TEK Lignojunto farita per rektaj tenonoj; plurdenta tenonkunigo. EB#116/87  
{de1} gerades Hakenblatt *n*  
{en1} scarf joint  
{fr1} assemblage *m* à trait *m* de Jupiter droit

MEV# 625.848

{eo1} dilat-junt/o  
EB#197/39+40.  
{de1} Wärmedehnungsfuge *f*  
{en1} expansion joint  
{fr1} joints *m* de dilatation *f* thermique

MEV# 674.028

{eo1} du/obl/e bevel/it/a junt/o  
EB#116/91.  
{de1} doppelter Versatz *m*  
{en1} double bevel shoulder notch  
{fr1} assemblage *m* à double épaulement

MEV# 674.028

{eo1} duon'ort/a junt/o  
EB#122/4.  
{de1} Gehrung *f*  
{en1} mitre joint  
{en2} miter joint {US}  
{fr1} onglet *m*

MEV# 694.2

{eo1} duon'um/a junt/o  
TEK Lignojunto, ĉe kiu la du kunigendaj pecoj (tabuloj aŭ latoj) estas elnoĉitaj ĉe la ekstremaĵo. EB#117/86  
{de1} gerades Blatt *n*  
{en1} straight halved joint  
{fr1} entaille *f* à mi-bois  
{fr2} entaille *f* à trait *m* droit

MEV# 694.2

{eo1} fork-junt/o  
EB#116/85  
{de1} Scherzapfen *m*  
{en1} forked mortice and tenon joint  
{en2} forked mortise and forked tenon  
{fr1} enfourchement *m*

MEV# 694.2

{eo1} hirund-vost/a junt/o  
TEK Kunigo de lignaj tabuloj per mortezo kaj tenono en formo de hirundvosto.  
~ei(94-11): EB#117/89  
{de1} schwalbenschwanzförmige Überblattung *f*  
{en1} dovetail halving  
{fr1} assemblage *m* à mi-bois *m* à queue *f* d'aronde

MEV# 694.2

{eo1} hok-junt/o  
EB#116/87.  
{de1} gerades Hakenblatt *n*  
{en1} scarf joint  
{fr1} assemblage *m* à trait *m* de Jupiter droit

MEV# 625.848

{eo1} inter'slab/a junt/o  
EB#197/46.  
{de1} Dübel *m*  
{en1} slab junction  
{fr1} goujon *m*

MEV# 625.848

{eo1} kver-junt/o  
EB#197/40.  
{de1} Querfuge *f*  
{en1} transverse joint  
{fr1} joint *m* transversal

MEV# 625.848

{eo1} laŭ'long/a junt/o  
EB#197/39.  
{de1} Längsfuge *f*  
{en1} longitudinal joint  
{fr1} joint *m* longitudinal

MEV# 694.2

{eo1} lign/o-junt/oj  
EB#116/84-98.  
{de1} Holzverbindungen *f*  
{en1} woodwork joints  
{en2} timber joints  
{fr1} assemblages *m* du bois

MEV# 625.143.4

{eo1} rel-junt/o  
EB#198/42.  
{de1} Schienenstoß *m*  
{en1} rail joint  
{fr1} joint *m* des rails *m*

MEV#

{eo1} junt/o-pec/o  
= fitingo.

MEV# 621.791.034

{eo1} lut-junt/o (1)

- {eo2} veld-junt/o  
ELET La fendo inter du metalaj pecoj, kiuj estas lutitaj/velditaj unu kun la alia.  
~ei(94-11): EB#135/8  
{de1} Schweißbraupe *f*  
{en1} welding bead  
{en2} weld  
{en3} welded joint  
{fr1} chenille *f* de soudure *f*  
{fr2} joint *m* de soudure *f*
- MEV# 685.31  
{eo1} lut-junt/o (2)  
{eo2} kabl/o-muf/o  
Kablomufo.  
EB#147/40, 87/562  
{de1} Einführungsbuchse *f*  
{en1} plumbing gland  
{fr1} manchon *f* d'entrée *f*
- MEV# 625.143.4  
{eo1} plat-junt/o EVIT  
{eo2} rel-junt/o  
TEK Kunigo inter du reloj, sojloj, traboj ks per plato konsistanta el la sama materialo, kiu surkunigas la du apudajn ekstremojn.  
EB#198/43  
{de1} Schienenlasche *f*  
{en1} rail fish plate  
{en2} joint bar {US}  
{fr1} éclisse *f*
- MEV# 625.84-1  
{eo1} junt/o-tranĉ/ador/o  
EB#197/16.  
{de1} Fugenschneidergerät *n*  
{de2} Fugenschneider *m*  
{en1} transverse-joint cutter  
{en2} joint cutter  
{fr1} machine *f* à couper les joints *m*
- MEV# 625.84-1  
~ei(95-2):  
{eo1} junt/o-tranĉ/il/eg/o  
EB#197/17.  
{de1} Fugenschneidmesser *n*  
{de2} Fugenmesser *n*  
{en1} joint-cutting knife  
{en2} joint knife  
{fr1} couteau *m* pour couper les joints *m*
- MEV# 323.27  
{eo1} junt/o <5>  
Koterio de ribeluloj formata por regi kaj administri ŝtaton post ribelo. {de1} Junta *f*  
{en1} Junta  
{es1} junta *f*  
{fr1} junte *f*
- MEV# 694.2
- {eo1} junt/i (1) *tr*  
Kunigi per junto.  
MEV# 621.3 & 696/697  
{eo1} junt/i (2)  
TEK ELET Fari junton ĉe tuboj aŭ kabloj; kunligi la konduktilojn (cirkvitojn) de kablo en juntejo aŭ kabloŝakto. → geri.  
MEV# 687.12  
{eo1} jup/o  
Virina vesto, kovranta la malsupran parton de la korpo, ekde la talio: laŭ la modo jupoj longiĝas aŭ mallongiĝas; timulinetoj ĵus dekoĉitaj de la patrino jupo.  
MEV# 687.13 & 687.16  
{eo1} jup/et/o  
Mallonga jupo por knabinoj, baletistinoj ktp: la infana jupeto atingis nur ĝis ŝiaj genuoj.  
MEV# 687.12.08  
{eo1} jup/ist/in/o  
Kudristino specialigita pri la farado de jupoj.  
MEV# 687.254  
{eo1} sub'jup/o  
Jupo el tolaĵo, portata sub la drapa ekstera jupo.  
MEV# 292.21  
{eo1} Jupiter/o (1)  
Solena nomo de Jovo (= Jovopatro): en peza nubo faras Jupitero decidojn; kun alta frunto, kvazaŭ Jupitero.  
MEV# 523.45  
{eo1} Jupiter/o (2)  
AST La plej granda planedo de la Sunsisistemo, la kvina ekde la Suno.  
MEV# 292.21  
{eo1} Jupitera (1)  
Rilata al Jupitero 1: fiereco lin por ĉiam de l' tablo Jupitera defaligis; (figurasence:) ili kun Jupitera graveco respondas . . .  
MEV# 523.45  
{eo1} Jupiter/a (2)  
Rilata al Jupitero 2: la 11 Jupiteraj satelitoj.  
MEV# 34  
{eo1} jur/o  
Tuto de devigaj reguloj (normoj) kun sankcioj, ordigantaj la rilatojn inter homoj kaj homkolektivoj, kaj difinantaj iliajn rajtojn kaj devojn: interna, internacia juro; konstitucia juro; la Romana juro. → leĝo, moro, jurisprudenco; kodo, leĝaro, medicino.  
MEV# 34

{eo1} jur/a  
Rilata al juro: juraj studoj; via edzo estas posedanto en rilato jura.

MEV# 347.96  
{eo1} jur/ist/o  
Specialisto en la juraj kaj juĝaj aferoj.

MEV# 340.141  
{eo1} kutim-jur/o  
Juro bazita sur tradiciaj kutimoj, ne sur skribitaj leĝoj.

MEV# 34.038  
{eo1} jurisdikci/o (1)  
{eo2} juĝ/o-pov/o  
JUR Rajto juĝi.

MEV# 347.98  
{eo1} jurisdikci/o (2)  
{eo2} juĝ/o-distrikt/o  
Teritorio, sur kiu sin etendas la rajto de iu jura instanco: la juro de la kasacia kortumo sin etendas sur la tuta teritorio de la ŝtato.

MEV# 34.01  
{eo1} jurisprudenc/o (1)  
{eo2} jur/ik/o  
JUR Juroscienco, filozofio pri juro.

MEV# 340.142  
{eo1} jurisprudenc/o (2)  
{eo2} tribunal/a interpret/ad/o  
JUR Interpretado de la juro fare de la tribunaloj.

MEV# 094.9  
{eo1} jurisprudenc/o (3)  
{eo2} tribunal/aj decid/oj  
JUR Tuto de tribunalaĵaj decidadoj pri unu jurpunkto: juro pri aŭtora proprieto.

MEV# 397 & 727.7  
{eo1} jurt/o  
Tendo aŭ kabano de Siberiaj, Mongolaj nomadoj.

MEV# 347  
{eo1} just/a (1)  
Respektanta egale kaj senpartie la rajtojn de la aliaj homoj, kaj haviganta al ĉiu lian apartenaĵon: nia provincestro estas severa, sed justa; la homoj estas justaj precipe al tiuj, kiujn ili amas; kiom ajn justaj vi penas esti kontraŭ diversaj gentoj. . . ; justa juĝisto.

MEV# 17.024  
{eo1} just/a (2)  
Konforma al la interna juĝo de la konscienco: tio estas tute justa kaj tute laŭ la ordo; viaj justaj postuloj; li juĝu la popolon per juĝo justa; justa divido; li ricevu justan punon por lia krueleco

kontraŭ mi!; certigi al la laboristoj justan salajron. → meritita, deca.

MEV# 165.0  
{eo1} just/a (3)  
Bazita sur la realo: vi havis justan kaŭzon por maltrankviliĝi; ĉu tion vi opinias justa, ke vi diras . . . ? . → prava, ĝusta.

MEV# 179.9  
{eo1} just/a (4)  
Virta.

MEV# 37.035.1  
{eo1} just/e (1)  
En justa maniero: oni scias agi kun ili juste; juĝi juste;

MEV# 37.035.1  
{eo1} just/e (2)  
En justa maniero: sed mi suferas juste; vi havas juste tion, kion vi meritis.

MEV# 37.035.1  
{eo1} just/o  
Tio, kio estas justa, rigardata en abstrakta, absoluta maniero: la devo de juĝisto estas diri la juston; mi estos ilia Dio en vero kaj justo.

MEV# 37.035.1  
{eo1} just/aj/o  
Ago, faro justa: farado de justaĵo estas ĝojo por la virtulo.

MEV# 37.035.1  
{eo1} just/ec/o (1)  
Eco de tio, kio estas justa: viaj gepatroj konvinkiĝos pri la justeco de miaj plendoj, justeco havas nenion komunan kun leĝo, kiu estas nur ĝia karikaturo; pli bona estas malmulto, sed kun justeco.

MEV# 37.035.1  
{eo1} just/ec/o (2)  
Sento de la konscienco, per kiu oni redonas al ĉiu lian rajtaĵon: pardonemeco superas justecon; justecon sekvu; se vi, reĝo, la voĉon de l' justeco aŭskultas. . . ; lacaj havi, por nin defendi kontraŭ maljustuloj, nur justicon sen justeco . . .

MEV# 216  
{eo1} just/ec/o (3)  
Plenumado de tio, kio estas justa: ni estas pretaj doni al vi justecon pri tio; vi estus nun libera fari al vi justecon per bona porcio da bastonbatoj; ho, dioj! se vi amas la justecon, nun per mi la veron vi honoru!; sed justeco fluu kiel akvo!; per justeco staras fortike la trono.

MEV# 351.87 & 354.51  
{eo1} just/ec/o (4)

Justico: mi iras mem transdoni min al la manoj de la justeco; kovri per arĝento la okulon de la justeco; aŭdu vi, kion la justeco per mi sciigas al vi!.

MEV# 37.035.1  
{eo1} just/ul/o (1)  
Homo justa.

MEV# 265.6  
{eo1} just/ul/o (2)  
KRI Homo pia kaj virta: mi venis alvoki ne justulojn, sed pekulojn al pento.

MEV# 340  
{eo1} mal'just/a (1)  
Ne haviganta al ĉiu lian rajtaĵon: kontraŭ neniu oni devas esti maljusta; mi maljuste ŝin senigis de la antikvaj oferondoj.

MEV# 340  
{eo1} mal'just/a (2)  
Ne konforma al la juĝo de la konscienco: maljusta profito; sur la maljustaj vojoj de la tero; maljusta puno, milito; maljustaj pretendoj.

MEV# 340  
{eo1} mal'just/a (3)  
Ne bazita sur la realo: maljustaj suspektoj, motivoj.

MEV# 340  
{eo1} mal'just/aj/o  
Ago, faro maljusta: li al iu malgraŭvole faris maljustaĵon; la tero pleniĝis de maljustaĵoj.

MEV# 340  
{eo1} mal'just/ec/o  
Eco de iu, io maljusta: la maljusteco de partia tribunalo; maljusteco de ne meritita puno; (figurasence:) maljusteco de la sorto.

MEV# 340  
{eo1} mal'just/ul/o  
Tiu, kiu estas maljusta.

MEV# 801.313.11  
{eo1} Justen/o  
Virnomo.

MEV# 351.87 & 354.51  
{eo1} justic/o  
JUR Ŝtata organismo, kiu zorgas pri elekto de juĝistoj, kontrolo de ilia agado, plenumo de difinitaj punoj ktp: justic-ministro, justic-oficisto; ministrejo pri justico.

MEV# 323.38 : 34  
{eo1} klas-justic/o  
Tiu organismo, efikanta kiel ilo de reganta klaso.

MEV# 801.313.11

{eo1} Justinian/o  
Virnomo, i.a. de Romia imperiestro, kiu kompiligis la faman kodon.

MEV# 677.13  
{eo1} jut/o (1)  
BOT Teksmaterialo, konsistanta el la tigoj de diversaj specioj de Genro Corchorus el tiliacoj; krom kotonon, la plej grava plantfibrospeco por fabrikado de teksaĵoj.

MEV# 621.798.15  
{eo1} jut/o (2)  
Teksajo farita el tiu materialo: sakoj el juto.

MEV# (489.4)  
{eo1} Jutland/o  
GEOG Kontinenta parto de Danlando (9°E, 56°N).

MEV# 671.12  
{eo1} juvel/o (1)  
Ornamaĵo, ordinare malgranda, tre multekosta pro la materio (oro, argento, gemoj) aŭ la prilaboriteco: en silka vesto kaj brilanta de juveloj; la virinoj portis ĉirkaŭ la kolo siajn orajn kaj perlajn juvelojn.

MEV# 339.11  
{eo1} juvel/o (2)  
(figurasence:) Grandvaloraĵo: li estas efektive la juvelo de la nacio sia;

MEV# 671.12  
{eo1} juvel/ar/o  
Pluraj juveloj, formantaj tutaĵon: juvelaro el diamantoj.

MEV# 671.1 : 725.21  
{eo1} juvel/ej/o  
Butiko de juvelisto.

MEV# 671.1.08  
{eo1} juvel/ist/o  
Homo, kies metio estas fari aŭ vendi juvelojn: la juvelisto atente rigardis la desegnaĵon.

MEV# 739.2  
{eo1} juvel/ist/a  
Rilata al juvelisto: juvelista arto; juvelistaj laboraĵoj; juvelista desegnisto.

MEV# 671.13  
{eo1} juvel/uj/o  
Skatolo destinta por enteni juvelojn: ĝardenoj puraj kaj elegantaj kiel juvelujo.

MEV# 739.2  
{eo1} juvel-art/o  
La arto dezajni kaj elfari juvelojn.

MEV# 622.37

{eo1} juvel-ŝton/o  
= gemo.

MEV# 801.313.11

{eo1} Juvenal/o  
Virnomo, i.a. de fama Roma satiristo.

La dosiero J-MEV-U.V60 estas la J-MEV-U.V42-dosiero konvertita la Vopo 6.0 post apliko de la makrooj 42-AL-61.WPM kaj 42-AL-62.MPM. La dosiero J-MEV-U.V42 estis kreita el J-MEVEI2.W42, post kiam tiu estis ordigita laŭ UDoKo-numeroj, kaj UDoKo-titoloj surkopiitaj:  
"311" Pasinteco

MEV# "311"

{eo1} pas/int-jar/a  
Okazinta en la antaŭa jaro: li zorgas pri ĝi kiel pri neĝo pasintjara; en mia pasintjara letero.  
"312" Estanteco

MEV# "312"

{eo1} ĉi'jar/a  
Okazanta, okazinta aŭ okazonta en la nuna jaro.  
"33" Monatoj, monataj tempo-periodoj

MEV# "33.01"

{eo1} Januar/o  
La unua monato de la nuna kristana jaro.  
{de1} Januar  
{en1} January  
{fr1} Janvier

MEV# "33.06"

{eo1} Juni/o  
La sesa monato de la nuna kristana jaro.  
{de1} Juni  
{en1} June  
{fr1} Juin

MEV# "33.07"

{eo1} Juli/o (2)  
La sepa monato de la nuna kristana jaro: la 14a de Julio (Franca nacia festo).  
{de1} Juli  
{en1} July  
{fr1} Juillet  
"4" Tempodaŭroj  
"405" Longaj daŭroj

MEV# "405"

{eo1} mult(e)jara (1)  
Havanta daŭron de multaj jaroj: rezultato de multejara pacienca laborado; miaj multjaraj laboroj kaj suferoj.  
"44" Monatoj

MEV# "440-03"

{eo1} kvaron'jar/o  
Kvarono de jaro, trimestro.

MEV# "440-06"

{eo1} duon'jar/o  
Duono de jaro, semestro.  
"45" Jaroj

MEV# "45"

{eo1} jar/o (1)  
Tempomezur-unuo, egala al la daŭro de unu kompleta rondiro de la Tero ĉirkaŭ la Suno: natura, suna, tropika jaro (365 tagoj, 5h 48m 46s); astra, sidera jaro (pli longa je 20 m 23 s).

MEV# "45"

{eo1} jar/o (2)  
Tiu tempodaŭro, proksimume kalkulita, uzata oficiale por datado kaj komenciĝanta unu difinitan tagon: la Gregoria, Julia jaro; la leĝa, civila jaro; en la jaro 1905 mia patro. . .; la pagoj estas renovigataj en Januaro de ĉiu jaro; la venonta, pasinta jaro; unu fojon en ĉiu jaro estas farata Internacia Kongreso; en la daŭro de la lastaj 5 jaroj; elektitaj en la Akademion por la sekvanta jaro; de jaro al jaro; jaro post jaro; al la nova jaro 1893 mi gratulas ĉiujn amikojn; dezirante plej bonan novan jaron al vi.  
RIM. En la antikvaj tempoj la datado estis ofte kalkulata de la jarkomenca tago, kiu sekvis aŭ antaŭiris la surtroniĝon de ia reĝo: en la sepa jaro de Jehu Jehoaŝ fariĝis reĝo.

MEV# "45"

{eo1} jar/o (3)  
Samlonga periodo, komenciĝanta ian alian tagon, konata de la interesatoj: la eklezia (kristana) jaro (de Advento ĝis Advento); la lerneja jaro (de Septembro ĝis Julio en Eŭropo); la teatra jaro (de Novembro ĝis Aprilo); la budĝeta jaro (variante laŭ la landoj); la akademianoj estas elektataj por naŭ jaroj; antaŭ 15 jaroj mi diris publike, ke...; virseksulo en la aĝo de dudek jaroj; aĝulo de kvin jaroj; en la unuaj jaroj de ekzistado de E-o; pasis jam unu jaro, de kiam ni renkontiĝis.

MEV# "45"

{eo1} jar/o (4)  
Tiu periodo, rigardata rilate al tio, kio okazis en ĝi: li foriris du jarojn; mi dediĉis ĉ. 2 jarojn al la esplorado de tiu jargono; tio prezentas la laboraĵon de dek jaroj; dudek jaroj de servado; jaroj de vivo kaj paco; antaŭ ol venis la jaroj de malsato; jaroj da senlaboreco; per la saĝo aldoniĝos al vi jaroj da vivo; jarlonga atendado; lavu tutan jaron, negro ne blankiĝos; la sezonoj de la jaro.

MEV# "45"

{eo1} jar/oj (5)  
Tempo, periodo de la homa vivo: la knabaj jaroj; de zorgoj, ne de jaroj blankiĝas la haroj; pagas maljunaj jaroj por junaj eraroj.

MEV# "45"  
 {eo1} super'jar/o  
 Jaro, enhavanta 366 tagojn.  
 {de1} Schaltjahr *n*  
 {en1} leap year

MEV# "45"  
 {eo1} jar/a (2)  
 {eo2} jar-aĝ/a  
 Unujara.  
 {en1} one year old  
 "46" Jardekoj

MEV# "46"  
 {eo1} jar-dek/o (1)  
 Deko da jaroj.  
 {en1} decade

MEV# "46"  
 {eo1} jar-dek/o (2)  
 Numerita dekjara periodo en jarcento: en la tria jardeko de la lasta jarcento.  
 "47" Jarcentoj

MEV# "47"  
 {eo1} jar-cent/o (1)  
 Cento da jaroj: antaŭ kelkaj jarcentoj iliaj prapatroj loĝis ne en Ameriko: en la daŭro de jarcentoj, ĝi havis la aĝon de duono da jarcento.  
 {en1} century

MEV# "47"  
 {eo1} jar-cent/o (2)  
 Numerita periodo de cent jaroj, kalkulita de la naskojaro de Jesuo-Kristo: ĉirkaŭ la mezo de la dekkvara jarcento; la epoko de la mezaj jarcentoj (Mezepoko).

MEV# "47"  
 {eo1} cent-jar/o  
 Jarcento: la mezaj centjaroj (= Mezepoko).

MEV# "47"  
 {eo1} jar-cent/a  
 Daŭrinta plurajn jarcentojn: jarcenta tradicio.

MEV# "47"  
 {eo1} cent-jar/a  
 Havanta la aĝon de cent jaroj, daŭrinta cent jarojn: ĉu de homo centjara fariĝos nasko?; centjaraj kverkoj; centjara fremda regado.

MEV# "47"  
 {eo1} cent-jar/a fest/o  
 {en1} centenary

MEV# "47"  
 {eo1} cent/a-jar/a  
 Okazanta en la centa jaro.  
 RIM. Sencon analogan havas la ceteraj kunmetaĵoj:

dek-jara, dek/a-jara, unu-jara, unu/a-jar/a ktp;  
 "48" Jar-miloj

MEV# "48"  
 {eo1} jar-mil/o (1)  
 Milo da jaroj: post jarmiloj ili alflugos trans la oceano!.

MEV# "48"  
 {eo1} jar-mil/o (2)  
 Numerita miljara periodo, kalkulita de la naskojaro de Jesuo-Kristo: en la dua jarmilo antaŭ J-K.

MEV# "48"  
 {eo1} mil'jar/o  
 Jarmilo: miljaroj ne povis, minuto elŝovis.

MEV# "48"  
 {eo1} jar-mil/a  
 Daŭrinta tra pluraj jarmiloj: la Hebreoj suferis jarmilan martirecon.

MEV# "48"  
 {eo1} mil'jar/a  
 Daŭrinta mil jarojn: miljara imperio.  
 "5" Periodoj  
 "55" Ĉiujare. Periodo de jaro

MEV# "55"  
 {eo1} ĉiu'jar/a  
 Okazanta en ĉiu jaro: ĉiujara repago de ŝuldo; ĉiujara oferado.  
 {en1} annual

MEV# "55"  
 {eo1} jar/a (1)  
 Ĉiujara.

MEV# "55"  
 {eo1} laŭ'jar/a  
 Rilata al la periodo de nur unu jaro: laŭjara dungito.

MEV# "55-02"  
 {eo1} ĉiu'du-jar/a  
 {en1} biennial  
 "57" Ĉiuj cent jaroj. Periodo de cent jaroj

MEV# "57"  
 {eo1} cent-jar/a  
 Havanta la aĝon de cent jaroj, daŭrinta cent jarojn: ĉu de homo centjara fariĝos nasko?; centjaraj kverkoj; centjara fremda regado.

MEV# "57"  
 {eo1} cent-jar/a fest/o  
 {en1} centenary

MEV# "57"

{eo1} cent/a-jar/a  
Okazanta en la centa jaro.  
RIM. Sencon analogan havas la ceteraj kunmetaĵoj:  
dek-jara, dek/a-jara, unu-jara, unu/a-jar/a ktp;  
"58" Periodo de mil jaroj

MEV# "58"  
{eo1} mil'jar/a  
Daŭrinta mil jarojn: miljara imperio.  
"78" Tempa maldifiniteco

MEV# "78"  
{eo1} jar/ar/o  
Serio da jaroj. → erao, periodo, epoko, aĝo.  
La signo por maldekstra ronda krampo havas la  
ASCII kodaĵon 40, kaj la signo de egaleco la ASCII-  
kodaĵon 61. Tiel komenciĝas la ĝeneralaj allig-  
numeroj de UDoKo indikantaj rasojn kaj popolojn.  
La ordiga programo de Vopo 4.2 metas tiujn  
allignumerojn post la temp-indikaj:  
(=...) Rasoj kaj popoloj  
(=1.4)/(=1.9) Popoloj de difinitaj landoj  
(=1.4)/(=1.9) ≡ (4/9)  
(=1.4) Popoloj en Eŭropo  
(=1.470) Popolo el Rusio

MEV# (=1.470) & 355.335  
{eo1} jesaul/o  
Kozakkapitano.  
(=1.497) Popoloj sur Balkano

MEV# (=1.497.1)  
{eo1} Jugoslav/o  
Ano de la Jugoslava Federacio.

MEV# (=1.497.1) & (497.1)  
{eo1} Jugoslav/a  
Rilata al Jugoslavo aŭ Jugoslavio.  
(=1.5) Popoloj en Azio

MEV# (=1.57) & 397  
{eo1} Jakut/o  
Ano de Siberia gento.

MEV# (=1.533)  
{eo1} Jemen/an/o  
Indiĝeno loganta en Jemeno.

MEV# (=1.569.5)  
{eo1} Jordan/i/an/o  
Regnano de tiu ŝtato.

MEV# (=1.569.4-21)  
{eo1} Jerusalem/an/o  
Loĝanto en Jerusalemo (Israela parto).

MEV# (=1.569.5-21)  
{eo1} Jerusalem/an/o  
Loĝanto en Jerusalemo (Jordania parto).

MEV# (=1.73) : 801.312.29  
{eo1} Janki/o  
Familara nomo por Usonano.  
{de1} Yankee *m*  
{en1} Yankee  
{fr1} yankee *m*

MEV# (=1.922)  
{eo1} Jav/an/o  
Indiĝeno loĝanta en Javo.  
(=2) Blanka raso ĝenerale. Okcidentaj rasoj  
(=81) Slavoĵ ĝenerale  
(=9) Orientaj rasoĵ ĝenerale. Koloraj rasoĵ  
(=91) Arĵoj. Hind-Eŭropaj rasoĵ  
(=92) Semitoĵ ĝenerale  
(=924) Judoĵ. Israelanoĵ

MEV# (=924)  
{eo1} Jud/o  
Nomo, per kiu en Okcident-Eŭropo oni nomas la  
Hebreojn, de post ilia forkaptiteco en Babilono: la  
Judoĵ apartenas al diversaj rastipoĵ; Majmonido,  
Spinozo, Bergson estis inter la plej famaj Judoĵ. →  
Izraeliano.

MEV# (=924)  
{eo1} Jud/a  
Rilata al Judoĵ: vidu ilin la malbenitan Judan  
popolon!; Judaj moroj.

MEV# (=924)  
{eo1} Jud/ar/o  
Tuto de la Judoĵ.

MEV# (=924)  
{eo1} Jud/ec/o  
Aparta karaktero de la Judoĵ.

MEV# (=924)  
{eo1} Jud/in/o  
Virino Juda.  
(=924.1) (+) Juda tribo

MEV# (=924.1)  
{eo1} Jehud/o (2)  
{eo2} Jehuda (2)  
La tribo, deveninta el tiu patriarko, kaj ties lando: la  
viroĵ de Jehudo estas lia plej amata plantaĵo; perfidis  
Jehudo. → Juduĵo.  
(=956) Japanoj

MEV# (=956)  
{eo1} Japan/o  
Ano de la ĉefgento loganta en Japanuĵo.  
{de1} Japaner *m*  
{en1} Japanese  
{fr1} Japonais

MEV# (=956)  
{eo1} Japan/a

Rilata al Japanoj aŭ al Japanujo: la Japana arto  
EB#319/7-11, civilizo, lingvo, skribo.

{de1} japanisch  
{en1} Japanese  
{fr1} japonais

MEV# (=956)

{eo1} Japan/in/o  
Virino Japana.

{de1} Japanerin f  
{en1} Japanese  
{fr1} Japonaise

(2) Lokoj el fiziogeografiaj vidpunktoj

(28) Surfacaĵ, ne-salaj akvoj

(282) Fluantaj akvoj, riveroj

(282.25) Riveroj en Azio

MEV# (282.251.2)

{eo1} Jenisej/o

GEOG Siberia rivero (80°E, 73°N).

MEV# (282.252.3)

{eo1} Jangzi

GEOG Unu el la plej grandaj riveroj de Ĉinujo; =  
Rivero Blua (122°E, 31°30'N). ~

{de1} Jangtsekiang

{en1} Yangtze

{en2} Yangtzekiang

{fr1} Yangzi Jiang

{fr2} Yang-tseu-kiang

MEV# (282.254.???)

{eo1} Jordan/o

GEOG Rivero, naskiĝanta el Hermono kaj enfluanta  
en la Mortan Maron (35°32'E, 31°45'N): transiru ĉi  
tiun Jordanon, vi kaj ĉi tiu tuta popolo, en la landon,  
kiun mi donas al ili; Ii estis baptita de Johano en  
Jordano.

MEV# (282.254.???)

{eo1} trans-Jordan/a

Situanta trans Jordano (se rigardi elde Jerusalemo).

MEV# (282.254.???)

{eo1} Trans-Jordan/i/o

La lando trans-Jordan/a.

(282.27) Riveroj en Nord-Ameriko

MEV# (282.273.1)

{eo1} Jukon/o

GEOG Nord-Amerika rivero, fluanta tra Alasko  
(163°15'W, 61°54'N).

(3) Lokoj en la malnova mondo

MEV# (38)

{eo1} Javan

BIB Hebra nomo de Helenujo.

(4) Lokoj en Eŭropo

(420) Lokoj en Anglujo

MEV# (427.4)

{eo1} Jork/o

GEOG Angla urbo (1°C04'W, 53°58'N).

(477) Lokoj en Ukrainio

MEV# (477.9)

{eo1} Jalt/o

GEOG Konata ban-urbo, en Krimeo (34°03'E,  
44°30'N).

{de1} Jalta

{en1} Yalta

{fr1} Yalta

(48) Lokoj en Skandinavio

MEV# (489.4)

{eo1} Jutland/o

GEOG Kontinenta parto de Danlando (9°E, 56°N).

(497) Lokoj sur Balkano

(497.1) Lokoj en Jugoslavio

MEV# (497.1)

{eo1} Jugoslav/a Federaci/o

{eo2} Jugoslavi/o

GEOG Federacio el ses respublikoj, laŭlonge de  
Adriatiko (Beogrado, 20°28'E, 44°49'N).

MEV# (497.1) & (=1.497.1)

{eo1} Jugoslav/a

Rilata al Jugoslavo aŭ Jugoslavio.

(5) Lokoj en Azio

(510) Lokoj en Ĉinio

MEV# (513.21)

{eo1} Junnan

GEOG Provinco en Ĉinujo (102°E, 25°N).

(520) Lokoj en Japanio

MEV# (520)

{eo1} Japan/i/o

{eo2} Japan/uj/o

GEOG Ekstrem-Orienta ŝtato, konsistanta el  
insularo norde de Pacifiko (Tokio, 139°45'E,  
35°43'N).

{de1} Japan

{en1} Japan

{fr1} Japon

MEV# (520-21)

{eo1} Jokoham/o

GEOG Japana havenurbo (139°32'E, 35°30'N).

MEV# (524)

{eo1} Jez/o

GEOG Malnova nomo de Hokajdo.

(53) Lokoj sur Araba duon-insulo

MEV# (533)

{eo1} Jemen/o

GEOG Imamujo, sudokcidente de la Araba  
duoninsulo (44°E, 15°20'N).

MEV# (534)  
{eo1} Sud-Jemeno  
GEOG Popolrespubliko, eksprotektorato Brita de Adeno.  
(569.4) Israelo

MEV# (569.44-21) & (569.5-21)  
{eo1} Jerusalemo/o  
{eo2} Jeruzalemo/o  
GEOG Sankta urbo de la religioj hebrea, kristana kaj islama (35°14'E, 31°47'N): la domo de Dio de Izrael, de tiu Dio, kiu estas en Jerusalemo; mi kreos Jerusalemon por ĝojo; mi vidis la sanktan urbon, novan Jerusalemon, malsupreniranta el la ĉielo.

MEV# (569.48-21)  
{eo1} Jaf/o  
GEOG Havenurbo najbara al Tel-Aviv, en Izraelio (34°45'E, 32°03'N).  
{de1} Tel Aviv-Jaffa  
{en1} Tel Aviv-Yafo  
{fr1} Tel-Aviv-Jaffa  
(569.5) Jordanio

MEV# (569.5)  
{eo1} Jordan/i/o  
Ŝato en Proksim-Oriento, inter Irako kaj Israelo (Amman, 35°52'E, 31°59'N).

MEV# (569.5-21)  
{eo1} Jerusalemo/o  
{eo2} Jeruzalemo/o  
GEOG Sankta urbo de la religioj hebrea, kristana kaj islama (35°14'E, 31°47'N): la domo de Dio de Izrael, de tiu Dio, kiu estas en Jerusalemo; mi kreos Jerusalemon por ĝojo; mi vidis la sanktan urbon, novan Jerusalemon, malsupreniranta el la ĉielo.

MEV# (569.5-21)  
{eo1} Jeriĥ/o  
{eo2} Jerik/o  
GEOG Urbo en Jordanio, ĉe la norda fino de la Morta Maro (arabe: Ariĥa, 35°26'E, 31°52'N): malbenita estu tiu viro, kiu restarigos kaj konstruos ĉi tiun urbon Jeriko!.

MEV# (569.5-21)  
{eo1} Jerik/a  
Rilata al Jeriko: apud la Jerika Jordano.  
(6) Lokoj en Afriko  
(7) Lokoj en Nord- kaj Meza Ameriko  
(71) Kanado

MEV# (712.1)  
{eo1} Jukon/i/o  
Unu el la Kanadaj Teritorioj (Dawson 139°27'W, 64°08'N).  
(72) Meksikio

MEV# (726.4)  
{eo1} Jukatan/i/o  
Ŝtato en Meksikio (89°W, 20°N).

MEV# (726.4)  
{eo1} Jukatan/o  
GEOG Duoninsulo en Centra Ameriko.  
(729) Teritorioj en la Kariba Maro  
(729.1) Kubo  
(729.2) Jamaiko

MEV# (729.2)  
{eo1} Jamaik/o  
GEOG Unu el la Grandaj Antiloj, sude de Kubo (76°52'W, 17°57'N).  
{de1} Jamaika  
{en1} Jamaica  
{fr1} Jamaïque  
(73) Usono  
(747) Nov-Jorkio

MEV# (747)  
{eo1} Nov-Jork/i/o  
La Usona ŝtato, en kiu troviĝas Nov-Jorko.

MEV# (747-25)  
{eo1} Nov-Jork/o  
Plej grava urbo en Usono (74°W, 40°43'N).

(8) Lokoj en Sud-Ameriko  
(9) Lokoj en Aŭstralio, Oceanio, kaj en arkta kaj antarkta regionoj  
(922) Javo

MEV# (922)  
{eo1} Jav/o  
GEOG Unu el la Indoneziaj insuloj (Ĝakarto, 106°49'E, 6°10'S).

MEV# (948)  
{eo1} Jork/a  
Nomepito de la plej norda kabo de la Aŭstralio kontinento (142°30'E, 10°42'S).  
-05 Allignumeroj por klasifi personojn:  
-053 laŭ-aĝa klasifo

MEV# -053.7  
{eo1} jun/ec/a  
Rilata al juneco: junecaj frivolaĵoj; junece gaja menso.

MEV# -053.7  
{eo1} jun/ec/o (1)  
FIZL Tempo de la homa vivo, inter la dentŝangiĝo kaj la pubhareco.

MEV# -053.7  
{eo1} jun/ec/o (2)  
Tempo de la vivo inter la infaneco kaj la matureco: via juneco renoviĝas kiel ĉe aglo; en la tagoj de via

juneco; kiam la dioj ankoraŭ vagadis sur la tero en eterna juneco; la penso de la homa koro estas malbona jam de lia juneco; sango bolas, juneco petolas; se juneco estus sperta!; fleksu arbon dum ĝia juneco; tio estis ankoraŭ la juneco de la mondo.

MEV# -053.7

{eo1} jun/ul/in/o

Virino juna: la junulino, kiu plaĉos al la okuloj de la reĝo, fariĝos reĝino; la junulino estis belstatura kaj belvizaĝa; kiel eŭnuko deziranta senvirigigi junulinon, tiel estas homo volanta fari juston per perforto; miaj junuloj kaj junulinoj falis de glavo. → fraŭlino.

MEV# -053.71

{eo1} jun/ul/o

Viro juna: ĉiu estis junulo, ĉiu estis pekulo; la junulo aliĝis al nia militistaro; junuloj kun viglaj vizaĝoj, en uniformoj de universitataj studentoj; junulaj jaroj. → fraŭlo.

MEV# -053.8

{eo1} kvindek-jar/ul/o

MEV# -053.9

{eo1} cent-jar/ul/o

{en1} centenarian

= Allignumeroj por indiki lingvojn:

MEV# =956 : 800.7

{eo1} Japan/ig/i

Lernigi la Japanan lingvon aŭ civilizon al fremda gento.

ĈEFAJ UDOKO-NUMEROJ

KLASO: 0 Ĝeneralaĵoj

003 Semiotiko, sintakso kaj semantiko ĝenerale.

Skriboj. Signoj. Simboloj. Skribmaterialoj

MEV# 003.324 : (=956)

11):

{eo1} Japan/a skrib/o EB#324/6

{de1} japanische Schrift *f*

{en1} Japanese script

{fr1} japonaise écriture

MEV# 003.341

{eo1} jota

{eo2} jot/o

Naŭa litero de la greka alfabeto (I, senpunkta i), responda al la latina i, kaj uzata kiel simbolo de tre malgranda kvanto: nek unu joto nek unu streketo forpasos de la leĝo.

06.05 Agadoj de asocioj

06.053 Kunvenoj. Kunsidoj

GEOG Urbo en Jordanio, ĉe la norda fino de la Morta Maro (arabe: Ariĥa, 35°26'E, 31°52'N): malbenita estu tiu viro, kiu restarigos kaj konstruos ĉi tiun urbon Jeriko!.

#(569.5-21) @003  
{eo1} Jerik/a  
Rilata al Jeriko: apud la Jerika Jordano.

(6) Lokoj en Afriko  
(7) Lokoj en Nord- kaj Meza Ameriko  
(71) Kanado  
#(712.1)  
{eo1} Jukon/i/o  
Unu el la Kanadaj Teritorioj (Dawson 139°27'W, 64°08'N).

(72) Meksikio  
#(726.4) @001  
{eo1} Jukatan/i/o  
Ŝtato en Meksikio (89°W, 20°N).

#(726.4) @002  
{eo1} Jukatan/o  
GEOG Duoninsulo en Centra Ameriko.

(729) Teritorioj en la Kariba Maro  
(729.1) Kubo  
(729.2) Jamaiko  
#(729.2)  
{eo1} Jamaik/o  
GEOG Unu el la Grandaj Antiloj, sude de Kubo (76°52'W, 17°57'N).  
{de1} Jamaika  
{en1} Jamaica  
{fr1} Jamaïque

(73) Usono  
(747) Nov-Jorkio  
#(747)  
{eo1} Nov-Jork/i/o  
La Usona ŝtato, en kiu troviĝas Nov-Jorko.

#(747-25)  
{eo1} Nov-Jork/o  
Plej grava urbo en Usono (74°W, 40°43'N).

(8) Lokoj en Sud-Ameriko  
(9) Lokoj en Aŭstralio, Oceanio, kaj en arkta  
kaj antarkta regionoj

(922) Javo  
#(922)  
{eo1} Jav/o  
GEOG Unu el la Indoneziaj insuloj (Ĝakarto,  
106°49'E, 6°10'S).

#(948)  
{eo1} Jork/a  
Nomepito de la plej norda kabo de la Aŭstralia  
kontinento (142°30'E, 10°42'S).

-05 Allignumeroj por klasifi personojn:  
-053 laŭ-aĝa klasifo

#-053.7 @001  
{eo1} jun/ec/a  
Rilata al juneco: junecaj frivolaĵoj; junece gaja  
menso.

#-053.7 @002  
{eo1} jun/ec/o (1)  
FIZL Tempo de la homa vivo, inter la dentŝangiĝo  
kaj la pubhareco.

#-053.7 @003  
{eo1} jun/ec/o (2)  
Tempo de la vivo inter la infaneco kaj la matureco:  
via juneco renoviĝas kiel ĉe aglo; en la tagoj de via  
juneco; kiam la dioj ankoraŭ vagadis sur la tero en  
eterna juneco; la penso de la homa koro estas  
malbona jam de lia juneco; sango bolas, juneco  
petolas; se juneco estus sperta!; fleksu arbon dum  
ĝia juneco; tio estis ankoraŭ la juneco de la mondo.

#-053.7 @004  
{eo1} jun/ul/in/o  
Virino juna: la junulino, kiu plaĉos al la okuloj de la  
reĝo, fariĝos reĝino; la junulino estis belstatura kaj  
belvizaĝa; kiel eŭnuko deziranta senvirgigi  
junulinon, tiel estas homo volanta fari juston per  
perforto; miaj junuloj kaj junulinoj falis de glavo.  
→ fraŭlino.

#-053.71 @005  
{eo1} jun/ul/o  
Viro juna: ĉiu estis junulo, ĉiu estis pekulo; la  
junulo aliĝis al nia militistaro; junuloj kun viglaj  
vizaĝoj, en uniformoj de universitataj studentoj;  
junulaj jaroj. → fraŭlo.

#-053.8  
{eo1} kvindek-jar/ul/o

#-053.9  
{eo1} cent-jar/ul/o  
{en1} centenarian

= Allignumeroj por indiki lingvojn:

#=956 : 800.7  
{eo1} Japan/ig/i  
Lernigi la Japanan lingvon aŭ civilizon al fremda  
gento.

ĈEFAJ UDOKO-NUMEROJ  
KLASO: 0 Ĝeneralajoj

003 Semiotiko, sintakso kaj semantiko ĝenerale.  
Skriboj. Signoj. Simboloj. Skribmaterialoj

#003.324 : (=956)  
11):  
{eo1} Japan/a skrib/o EB#324/6  
{de1} japanische Schrift *f*  
{en1} Japanese script  
{fr1} japonaise écriture

#003.341  
{eo1} jota  
{eo2} jot/o  
Naŭa litero de la greka alfabeto (I, senpunkta i),  
responda al la latina i, kaj uzata kiel simbolo de tre  
malgranda kvanto: nek unu jota nek unu streketo  
forpasos de la leĝo.

06.05 Agadoj de asocioj  
06.053 Kunvenoj. Kunsidoj  
06.055 Publikaĵoj pri faritaj laboroj  
#06.055.5  
{eo1} jar-raport/o  
{de1} Jahresbericht *m*  
{en1} annual report  
{es1} memoria *f* anual  
{fr1} rapport annuel

KLASO: 1 Filozofio  
11/12 Metafiziko  
111 Metafiziko ĝenerale. Ontologio  
111.8 Transcenda difino de estado  
111.83 Vereco  
111.84 Boneco  
111.85 Beleco

13 Filozofio de menso kaj spirito  
14 Filozofiaj sistemoj  
141 Vid-punkto-tipoj  
141.1 laŭ nombro kaj kvalito de principoj

159.9 Psikologio

159.9.01 Filozofio. Teorioj. Leĝoj. Metafizika psikologio  
 159.9.07 Esplorado. Instruado  
 159.9.072 Eksperimento. Testo

159.92 Evoluo kaj kapabloj de la animo. Kompara psikologio  
 159.925 Korpa esprimo de mensaj kaj karakteraj ecoj  
 159.925.6 Grafologio

159.93 Sencoj  
 159.932 Aŭdado  
 159.937 Perceptado

#159.937 @001  
 {eo1} juk/ad/o  
 {eo2} juk/o  
 La impresoj, ke io jukas: baldaŭ estos la tempo forveturi; mi sentas jam jukadon sub la flugiloj!. → prurito.

#159.937 @002  
 {eo1} juk/ig/a  
 Sentiganta jukan impreson.

159.94 Plenum-funkcioj  
 159.946 Specialaj mov-funkcioj  
 159.946.4 Skriba esprimo. Legado. Skribado. Desegnado  
 159.947 Volo  
 159.947.5 Intencoj. Kialoj. Dezir  
 159.95 Pli altaj mensaj fenomenoj  
 159.952 Atento  
 159.952.13 Intereso. Ekspekto. Intenco

159.953 Memoro. Lernado. Mnemotekniko  
 159.953.4 Memor-helpiloj. Mnemotekniko

159.955 Pensado. Imagado  
 159.955.1 Imagokapablo. Ideoformiĝo

16 Logiko. Ekkono-teorio. Logika metodologio  
 161/162 Logikaj elementoj  
 161.1 Nocio  
 161.11 Karakterizaĵoj kaj specoj de nocioj  
 161.114 Specoj de nocioj. Nomo. Ĝenerala nocio  
 161.2 Dedukto-procedoj  
 #161.2 @001  
 {eo1} juĝ/o (5)  
 PSI Mensa decido, per kiu oni konstatas opinion kaj deklaras ĝin ĝusta: laŭ Kantio, juĝo estas aplikado de aprioroj formoj al perceptoj ricevitaj tra sensoj; juĝo estas la psika aspekto de tio, kion gramatiko nomas propozicio.  
 #161.2 @002

{eo1} juĝ/a  
 Rilata al juĝo: la juĝa ĉambro; mi faru juĝan analizon koncerne vin; juĝa disputo, afero; juĝa seĝo; juĝe batali kun iu; pli valoras interkonsento, ol juĝa dokumento.  
 #161.2 @003  
 {eo1} juĝ/ant/o (1)  
 Persono, kiu esprimas juĝan opinion: en la afero, kiu vin interesas, mi mem persone ne estas kompetenta juĝanto; vi ne rajtas esti samtempe juĝanto kaj juĝato; juĝanto decidis, kiel li vidas; juĝanto devas havi du orelojn.

#161.2 @004  
 {eo1} juĝ/ant/ar/o  
 Grupo da personoj, al kiu estas komisiita juĝi: membro de la decida juĝantaro; ĵura juĝantaro (ĉe asizo, =ĵurio).

#161.2 @005  
 {eo1} antaŭ'juĝ/i tr  
 Formi al si opinion pri iu aŭ io, ne atendante maturan esploron: li antaŭjuĝis la decidon de la tribunalo kaj tre seniluziiĝis.

#161.2 @006  
 {eo1} antaŭ'juĝ/o  
 Tro rapida, nesufiĉe informita juĝo: formetu tiun antaŭjuĝon, la glacia tavolo de antaŭjuĝoj estas rompita; senantaŭjuĝa homo.

#161.2 @007  
 {eo1} propr/a-juĝ/e  
 Laŭ sia propra juĝkapablo: neniam mi havos la intencon proprajuĝe reformi E-on.

164 Logistiko  
 165 Ekkono-teorio  
 165.0 La ekkono-problemo ĝenerale. Vero.  
 Ĝusteco. Eraro. Malvero

#165.0  
 {eo1} just/a (3)  
 Bazita sur la realo: vi havis justan kaŭzon por maltrankviliĝi; ĉu tion vi opinias justa, ke vi diras . . . ? . → prava, ĝusta.  
 165.2 La esenco de ekkonado  
 165.21 Bildigo. Simbola prezento

168 La scienca sistematiko  
 168.1 Difinado  
 168.2 Subdividado. Klasifikado

17 Etiko. Praktika filozofio →241  
 17.02 La esenco de la moralo

#17.02 @001 & 172  
 {eo1} juĝ/o (4)  
 Opinio aproba aŭ malaproba: ellabori al si tute klaran juĝon pri io; mi petis ĉiujn amikojn esprimi

ilian juĝon pri la lingvo; mian juĝon pri la ŝanĝoj mi prezentos al la kongreso; kiom da juĝantoj, tiom da juĝoj; tiu ideo devas trairi la juĝon de la publiko; ni eldiru pri tiuj versoj unuanime nian juĝon.

#17.022 @002

{eo1} juĝ/i (2)

Esprimi opinion, per kiu oni aprobas aŭ malaprobas iun aŭ ion: kiam oni juĝas pri homoj, oni devas ja konsideri iliajn kutimojn; la libristo, kiu juĝis la literaturan laboron de M.; juĝante laŭ la eksterajo; ne juĝu pri afero laŭ ĝia ekstero; arbon oni juĝas laŭ la fruktoj; la recenzisto juĝis tiun romanon ne sufiĉe severe. → taksi, ŝati, ekzameni, mezuri.

#17.022 @003

{eo1} juĝ/i (3)

Esprimi malfavoran, kondamnan opinion: ebriulon kaj malsaĝulon oni ne juĝas; kiu kutimas ĉion juĝi, nenie povas rifuĝi; ne juĝu, tiam vi ne estos juĝata. → kritiki, ĉikani.

17.024 La fontoj de morala percepto.

Konscienco. Emocio.

Komprenemo. Sperto

#17.024

{eo1} just/a (2)

Konforma al la interna juĝo de la konscienco: tio estas tute justa kaj tute laŭ la ordo; viaj justaj postuloj; li juĝu la popolon per juĝo justa; justa divido; li ricevu justan punon por lia krueleco kontraŭ mi!; certigi al la laboristoj justan salajron. → meritita, deca.

172 Sociala etiko →30; 340.12

#172 & 17.02

{eo1} juĝ/o (4)

Opinio aproba aŭ malaproba: ellabori al si tute klaran juĝon pri io; mi petis ĉiujn amikojn esprimi ilian juĝon pri la lingvo; mian juĝon pri la ŝanĝoj mi prezentos al la kongreso; kiom da juĝantoj, tiom da juĝoj; tiu ideo devas trairi la juĝon de la publiko; ni eldiru pri tiuj versoj unuanime nian juĝon.

179.9 Virtoj. Humileco. Afableco. Saĝeco. Pacienco.

Diligenteco. Modesteco. Fideleco

#179.9

{eo1} just/a (4)

Virta.

KLASO: 2 Religio. Teologio

21 Natura teologio. Teodize\*\*/o (??)

216 Bono kaj malbono. Dualismo. Malmoraleco de la naturo.

Ekesto de malbono. Justeco kaj kompatemo de Dio. →233.2

#216 & 340.1

{eo1} just/ec/o (3)

Plenumado de tio, kio estas justa: ni estas pretaj doni al vi justecon pri tio; vi estus nun libera fari al vi justecon per bona porcio da bastonbatoj; ho, dioj! se vi amas la justecon, nun per mi la veron vi honoru!; sed justeco fluu kiel akvo!; per justeco staras fortike la trono.

{de1} Gerechtigkeit *f* <BT>

{en1} justice

{en2} equity

{en3} fairness <BU>

{fr1} justice <GD>

22 : 801.313 Bibliaj nomoj

#22 : 801.313 @001

{eo1} Jabin\*\*/o

Reĝo de la Kanaanidoj.

{de1} Jabin (Kanaaniterkönig)

#22 : 801.313 @002

{eo1} Jehoŝ/o

BIB Reĝo de Judujo, post Atalja.

#22 : 801.313 @003

{eo1} Jehojada

BIB Ĉefpastro en Jerusalemo, ŝirminto de Jehoaso, kiu lin poste mortigis.

#22 : 801.313 @004

{eo1} Jehoŝafat

BIB Kvara reĝo de Judujo.

#22 : 801.313 @005

{eo1} Jeremia

{eo2} Jeremi/o

BIB Unu el la grandaj profetoj.

#22 : 801.313 @006

{eo1} Jiftan

BIB Hebrea militestro, kiu oferbuĉis sian propran filinon.

#22 : 801.313 @007

{eo1} Joab

BIB Nevo kaj generalo de David.

#22 : 801.313 @008

{eo1} Joŝija

BIB Reĝo de Judujo, dum kies regado estis proklamita la Readmono.

#22 : 801.313 @009

{eo1} Jehezkel

BIB Unu el la grandaj profetoj. → Ezekielo.

#22 : 801.313 @010

{eo1} Jehu

BIB Uzurpinto de la Izraela reĝeco.

#22 : 801.313 @011

{eo1} Jehud/o (1)

{eo2} Jehuda (1)  
 BIB Filo de Jakob: juna leono estas Jehudo.

#22 : 801.313 @012  
 {eo1} Jerobeam  
 BIB Unu el la reĝoj de Izrael.

222 : 801.313 Nomoj el la Historiaj Libroj de MT  
 #222 : 801.313 @001  
 {eo1} Jafet/o  
 BIB Unu el la filoj de Noa, mita prapatro de la blanka ne-semida raso.  
 {de1} Japhet  
 {fr1} Japhet

#222 : 801.313 @002  
 {eo1} Jakob/o (1)  
 BIB Patriarko, filo de Izaako.

#222.2 : 801.313 @003  
 {eo1} Josu/o  
 BIB Profeto, postirinto de Moseo.

224 : 801.313 Nomoj el Profetaj libroj de MT  
 #224.1 : 801.313  
 {eo1} Jesaja  
 BIB Unu el la grandaj profetoj, aŭtoro de la 39 unuaj ĉapitroj de la libro nomata laŭ li.

#224.7 : 801.313  
 {eo1} Joel  
 BIB Unu el la profetoj.

#224.9 : 801.313  
 {eo1} Jona  
 BIB Profeto, pri kiu estas rakontite, ke li sidis tri tagojn en la interno de granda fiŝo.

226 La evangelioj. Apostola historio  
 #226  
 {eo1} Judas/o  
 Juda virnomo, i.a. de unu disĉiplo de Jesuo, kiu lin perfidis; de unu kristana apostolo ktp: kiso antaŭ amaso estas kiso de Judaso (=de perfidinto).

231 Dio  
 #231 @001  
 {eo1} Jave/o  
 La propra nomo de Dio en la Biblio, mistradukita per "La Eternulo". → Adonaj, Jehovo, Alaho, Bramo.

#231 @002  
 {eo1} Jehov/o  
 Mislego de Javeo, disvastiĝinta jam en la mezepoko kaj uzita ĝis la 19a jc: Jehovo, kiu estas li do?

#231 @003  
 {eo1} Jave/a  
 Rilata al tiu nomo aŭ ĝia uzado: la Javea dokumento

en la Pentateŭko. → elohima.

232 Kristologio  
 232 @001  
 {eo1} Jesu/o (1)  
 HIST Juda profeto, kiu predikis la tujan alvenon de la Regno de Dio k, kiel naciista agitanto, estis ekzekutita le la Romia prokuratoro per krucumado; liaj disĉiploj kredis lin la Mesio kaj fondis super tiu kredo la kristanisman (-5? ĝis +30?).

#232 @002  
 {eo1} Jesu/o (2)  
 KRI Dua persono de la sankta Triunuo, kiu por la elaĉeto de la homaro enkarniĝis, mortis en Jerusalemo kaj reviviĝis la trian tagon.

#232 @003  
 {eo1} Jesu/o Krist/o  
 Rita vokformo de Jesuo ĉe la kristanoj: se iu ne amas la Sinjoron Jesuo Kristo, li estu anatemita. → Nazaretano, Nazoreo.

245 Kristanaj himnoj. Himnaroj →264  
 #245  
 {eo1} jubil/i  
 Ĝojkrii; elmontri bruan ĝojon (ofte uzata kun religia koloro).

264 Liturgio. Diservo  
 264-04 Liturgiaj tempoj

#264-04  
 {eo1} favor'jar/o  
 Jaro, en kiu oni esperas aŭ ricevis apartan favoron de Dio: por proklami favorjaron de la Eternulo, en la favorjaro 1887 aperis E-o.

265 Sakramentoj  
 265.6 Absolva sakramento. Indulgenco  
 #265.6  
 {eo1} just/ul/o (2)  
 KRI Homo pia kaj virta: mi venis alvoki ne justulojn, sed pekulojn al penton.

#265.66  
 {eo1} jubile/o (2)  
 Solena pekabsolvo, kiun la papo konsentis al la Rompilgrimantoj unue po ĉiuj cent jaroj, poste po ĉiuj kvindek kaj hodiaŭ po ĉiuj dudek kvin.

271 Religiaj ordenoj. Monahismo  
 271.2 Dominikanoj  
 #271.2  
 {eo1} Jakob/ul/o  
 Malnova nomo de la dominikanoj.  
 EB#314/19  
 {de1} Jakobiner *m*  
 {en1} Jacobin  
 {fr1} dominicain

- 271.5 Jezuitoj  
 #271.5 @001  
 {eo1} jezuit/a (1)  
 Rilata al la jezuitoj: la jezuitaj konstitucioj; ARKI la jezuita stilo (→ baroka).
- #271.5 @002  
 {eo1} jezuit/ism/o  
 Sistema de la jezuitoj, bazita sur la principo, ke la celo pravigas la rimedojn, kaj utiliganta la politikon, por realigi la superregadon de la katolika eklezio.
- #271.5 @003  
 {eo1} jezuit/o (1)  
 Ano de la katolika ordeno, proprenomata kompanio, fondita de Ignaco de Lojola en 1540, por propagandi katolikismon ĉe la elitoj: la jezuitoj permesis fumi kaj flari tabakon; la generalo de la jezuitoj (ilia elektita ĉefo).
- #271.5 @004  
 {eo1} Kompani/o de Jesu/o  
 La jezuita ordeno.
- 273 Herezoj kaj skismoj →232.2  
 273.7 Jansenismo  
 #273.7 @001  
 {eo1} Jansen/o  
 Nederlanda episkopo de Ipro (1585-1638).
- 273.7 @002  
 {eo1} Jansen/ism/o  
 REL Doktrino de Janseno pri la neebleco de la saviĝo per la solaj homaj fortoj, pri la antaŭdestinado de la animoj kaj la malgranda nombro de la savotoj.
- 273.7 @003  
 {eo1} Jansen/ist/o  
 Ano de Jansenismo.
- 28 Kristanaj eklezioj kaj sektoj  
 281 Praeklezio. Orienta eklezio  
 281.83 Siria, Jakobita eklezio  
 #281.83  
 {eo1} Jakob/an/o  
 KRI Ano de Siria kristana sekto.
- 292 Helena kaj Romia religioj. Klasika mitologio  
 292.11 Religioj de la Helenoj
- #292.11 @001  
 {eo1} Jazon/o  
 MIT Ĉefo de la ekspedicio de Argonaŭtoj, konkerinto de la Orfelo kaj edzo de Medea.
- #292.11 @002  
 {eo1} Jokast/a  
 MIT Patrino kaj edzino de Edipo.
- 292.21 Religioj de Romanianoj  
 #292.21 @001  
 {eo1} Jan/o  
 MIT Roma dio de la komencoj kaj malfermoj, prezentata kun du vizaĝoj kontraŭdirektaj: la pordoj de la templo de Jano estis fermitaj nur dum paco.  
 EB#308/47,48  
 {de1} Janus *m*  
 {en1} Janus  
 {fr1} Janus
- #292.21 @002  
 {eo1} Jov/o  
 MIT La plej granda el la dioj, en la Roma religio (= Zeŭso, en la Helena): kio estas permesata al Jovo ne estas permesata al bovo; per Jovo!.
- #292.21 @003  
 {eo1} Junon/a  
 MIT Roma diino, edzino de Jovo. → Hera.
- #292.21 @004  
 {eo1} Jupiter/a (1)  
 Rilata al Jupitero 1: fiereco lin por ĉiam de l' tablo Jupitera defaligis; (figurasence:) ili kun Jupitera graveco respondas . . .
- #292.21 @005  
 {eo1} Jupiter/o (1)  
 Solena nomo de Jovo (= Jovopatro): en peza nubo faras Jupitero decidojn; kun alta frunto, kvazaŭ Jupitero.
- 294 Hindiaj religioj  
 294.51 Hinduismo  
 #294.51  
 {eo1} joni/o (1)  
 REL Virina seksorgano, kies ŝtonan figuron kultas la Hinduoj, kiel simbolon de fekundeco. → Iingamo, piĉo
- 294.527 Jogo  
 #294.527 @001  
 {eo1} jog/an/o  
 Adepto de tiu doktrino: la jogan' pli alte staras ol asket' aŭ erudito aŭ faranto de bonagoj (Bagavad-Gita).
- #294.527 @002  
 {eo1} jog/o  
 Hindu sistema de filozofia meditado kaj asketismo, destinita efektivigi la unuigon de la animo de la disĉiplo kun la universa spirito: jogo estas malfacila por la hom' sen memregado.
- 296 Judismo  
 #296 @001  
 {eo1} Jesu/o (3)  
 Iu al la aliaj Judoj, kiuj havis tiun nomon

(postekzilan formon de: Josuo), i.a. Jesuo, filo de Sirah, aŭtoro de la "Saĝo".

#296 @002

{eo1} Jud/ism/o

{eo2} judaism/o

Religio kaj religia civilizo de la Judoj. → antisemitismo.

#296 @003

{eo1} judaiz/i

Observi la judajn morojn aŭ ritojn: en Hispanujo oni ŝtiparumis la judaizantajn kristanojn.

KLASO: 3 Socialaj sciencoj. Juro. Administrado

321 Formoj de politika organizado. La ŝtatoj kiel politikaj potencoj

321.18 Despotismo. Diktaturo dum antikva epoko

#321.18

{eo1} jug/o (3)

Simbolo de submetiĝo sub trudordona potenco: li metos feran jugon sur vian kolon, ĝis li ekstermos vin; mi rompos la stangojn de ilia jugo kaj savos ilin; metu sur vin mian jugon, ĉar mia jugo estas facila; iri sub jugon; forskui, deĵeti la jugon; kurbiĝi sub la jugo de la despotismo; sin klini sub la feran jugon de la meĥanismo.

→ mallibera, kateno, karcerio, tiraneco, premi.

323.2 Rilatoj inter loĝantoj kaj ŝtato. Internaj konfliktoj

323.27 Revolucioj. Puĉoj

#323.27

{eo1} junt/o <5>

{de1} Junta *f*

{en1} Junta

{es1} junta *f*

{fr1} junte *f*

Koterio de ribeluloj formata por regi kaj administri ŝtaton post ribelo.

323.34 Sklavoj. Servutuloj

#323.34

{eo1} jug/i (2)

Sklavigi, submeti al si.

323.38 Rilatoj inter sociaj klasoj

#323.38 : 34

{eo1} klas-justic/o

Tiu organismo, efikanta kiel ilo de reganta klaso.

329 Politikaj partioj kaj movadoj

#329 : 941.0

{eo1} Jakob/ist/o

HIST Ano de la Angla partio, kiu apogis la Stuartojn.

329.15 Komunista sinteno

#329.15 @001

{eo1} Jakoben/ism/o

Opinio, doktrino de Jakobenoj.

#329.15 @002

{eo1} Jakoben/o (1)

HIST Membro de la "Klubo de l' Jakobenoj", revolucia maldekstra agadgrupo.

#329.15 @003

{eo1} Jakoben/o (2)

Partiano de radikala demokratio: li estas pli malbona ol Jakobeno.

339 Distribuado, konservado kaj konsumado de varoj

339.11 Prospero. Riĉeco. Prospero

#339.11

{eo1} juvel/o (2)

(figurasece:) Grandvaloraĵo: li estas efektive la juvelo de la nacio sia;

34 Juro. Leĝdonado

#34 @001

{eo1} jur/a

Rilata al juro: juraj studoj; via edzo estas posedanto en rilato jura.

#34 @002

{eo1} jur/o

Tuto de devigaj reguloj (normoj) kun sankcioj, ordigantaj la rilatojn inter homoj kaj homkolektivoj, kaj difinantaj iliajn rajtojn kaj devojn: interna, internacia juro; konstitucia juro; la Romana juro. → leĝo, moro, jurisprudenco; kodo, leĝaro, medicino.

#34 @003 : 323.38

{eo1} klas-justic/o

Tiu organismo, efikanta kiel ilo de reganta klaso.

34.01 La eco de la juro

#34.01

{eo1} jurisprudenc/o (1)

{eo2} jur/ik/o

JUR Juroscienco, filozofio pri juro.

34.038 Jurisdikcio. Teritoria kaj tema kompetenteco

#34.038

{eo1} jurisdikci/o (1)

JUR Rajto juĝi.

340 Juro ĝenerale. Kompara juro

#340 @001

{eo1} juĝ/i (1)

Laŭleĝe kaj jure decidi, ĉu iu estas kulpa aŭ ne, prava aŭ ne: juĝu mian aferon; laŭ iliaj meritoj mi juĝos ilin; juste juĝu vian proksimulon; ĝis kiam vi juĝos maljuste?; la Eternulo juĝu inter vi kaj mi; ĉefoj juĝas pro subaĉeto; la proceso, kiun oni juĝis

hieraŭ; juĝi kiel arbitracianto; pri propra afero neniŭ juĝas libere; (figurasence) la historio juĝos lin senindulge.

#340 @002

{eo1} mal'just/a (1)

Ne haviganta al ĉiu lian rajtaĵon: kontraŭ neniŭ oni devas esti maljusta; mi maljuste ŝin senigis de la antikvaj oferdonoj.

#340 @003

{eo1} mal'just/a (2)

Ne konforma al la juĝo de la konscienco: maljusta profito; sur la maljustaj vojoj de la tero; maljusta puno, milito; maljustaj pretendoj.

#340 @004

{eo1} mal'just/a (3)

Ne bazita sur la realo: maljustaj suspektoj, motivoj.

#340 @005

{eo1} mal'just/aj/o

Ago, faro maljusta: li al iu malgraŭvole faris maljustaĵon; la tero pleniĝis de maljustaĵoj.

#340 @006

{eo1} mal'just/ec/o

Eco de iu, io maljusta: la maljusteco de partia tribunalo; maljusteco de ne meritita puno; (figurasence:) maljusteco de la sorto.

#340 @007

{eo1} mal'just/ul/o

Tiu, kiu estas maljusta.

340.1 Ĝeneralaĵoj pri juro. Juro-specoj kaj -formoj

#340.1 & 216

{eo1} just/ec/o (3)

Plenumado de tio, kio estas justa: ni estas pretaj doni al vi justecon pri tio; vi estus nun libera fari al vi justecon per bona porcio da bastonbatoj; ho, dioj! se vi amas la justecon, nun per mi la veron vi honoru!; sed justeco fluu kiel akvo!; per justeco staras fortike la trono.

{de1} Gerechtigkeit

{en1} justice

{en2} equity

{en3} fairness

{fr1} justice

#340.141

{eo1} kutim-jur/o

Juro bazita sur tradiciaj kutimoj, ne sur skribitaj leĝoj.

#340.142

{eo1} jurisprudenc/o (2)

{eo2} tribunal/a interpret/ad/o

JUR Interpretado de la juro fare de la tribunaloj.

#340.142.088

{eo1} jurisprudenc/o (3)

{eo2} tribunal/aj decid/oj

JUR Tuto de tribunalaj decidoj pri unu jurpunkto: juro pri aŭtora proprieto.

343 Kriminala juro

343.1 Kriminalaj procesoj kaj esploroj →347.9

343.16 Oficistoj de kriminala justico

#343.161

{eo1} juĝ/ant/o (2)

Ĵuriano.

344 Speciala kriminala juro. Militista juro

#344 & 347

{eo1} juĝ/o (3)

Tuto de la sistemo, per kiu la leĝo estas aplikata al la homoj; = justico 1: aŭdu, kiel pardoneme la juĝo agas kun vi, malvirtulo! kontraŭ nehavo eĉ juĝo silentas; la milita juĝo; ho mia Dio! jen mi jam estas transdonita al la juĝo!; ili venigos sur vin ĉiun punon, kiun povos liveri al ili la decidoj de la juĝo; fripona atestanto mokas la juĝon.

347 Civila juro

#347

{eo1} just/a (1)

Respektanta egale kaj senpartie la rajtojn de la aliaj homoj, kaj haviganta al ĉiu lian apartenaĵon: nia provincestro estas severa, sed justa; la homoj estas justaj precipe al tiuj, kiujn ili amas; kiom ajn justaj vi penas esti kontraŭ diversaj gentoj. . .; justa juĝisto.

347.9 Procesaj proceduroj. Kortumaj personaro kaj organizoj

#347.9

{eo1} juĝ/o (1)

Laŭleĝa esploro de ies kulpeco aŭ praveco: ni kune iru al juĝo!; ne eniru en juĝon kun via sklavo; havu juĝon kontraŭ via patrino; ne distingu vizaĝon ĉe la juĝo; kiu komencas juĝon, iras sub jugon; juĝo komencita paciĝon ne malhelpas; loko de juĝo; la sinjoroj de la juĝo pri morto kaj vivo; (religie) en la tago de la lasta, de la mondfina juĝo; la granda fina juĝo. → proceso.

#347.95 @001

{eo1} juĝ/ad/i

Kutime, daŭre juĝi: ili juĝadis maljuste.

#347.95 @002

{eo1} juĝ/ad/o

Agado de tiu, kiu juĝas: ne faru maljustaĵon en la juĝado, konsideri personojn ĉe juĝado ne estas bone;

dum la juĝado la akuzitino svenis.

#347.95 @003

{eo1} juĝ/o (2)

Decido, kiu sekvas tian esploron: mi juĝos vin laŭ la juĝoj kontraŭ la adultulinoj; fari juĝon kontraŭ iu, super io; justaj estas viaj juĝoj. → verdikto.

#347.95 @004

{eo1} al'juĝ/i (1)

Atribui post juĝado: mi aljuĝis la unuan premion al la leporo; la tribunalo aljuĝis al li la bienon, sed ne la urban domon. → alskribi.

347.96 Kortuma personaro

#347.96 @001

{eo1} juĝ/ist/a

Rilata al juĝisto(j): mi jam dekkvin jarojn sidas sur la juĝista seĝo.

#347.96 @002

{eo1} juĝ/ist/ar/o (1)

Tuto de la juĝistoj en unu lando provinco ktp.

#347.96 @003

{eo1} jur/ist/o

Specialisto en la juraj kaj juĝaj aferoj.

#347.96 @004

{eo1} juĝ/ist/o (1)

Persono, kies oficiala funkcio estas juĝadi: arbitracia, paciga, enketa juĝisto.

347.98 Kompetenteco de tribunaloj

#347.98

{eo1} jurisdikci/o (2)

Teritorio, sur kiu sin etendas la rajto de iu jura instanco: la juro de la kasacia kortumo sin etendas sur la tuta teritorio de la ŝtato.

#347.99

{eo1} juĝ/ist/ar/o (2)

Tribunalo: la multestimata juĝistaro, kiu decidis pri vivo kaj morto.

35 Publika administrado. Milit-arto.

Militaj sciencoj

35.08 Personaro de publikaj instancoj. Oficistoj.

Dungitoj

#35.08

{eo1} serv/o-jar/oj

Tempo, dum kiu iu servadis en ofico.

#35.082.1

{eo1} prov'jar/oj

Tempo, dum kiu iu provlernis sian metion, profesion ktp: la provjaroj de Vilhelmo Meister (romano de Goethe).

351.87 Jur-administrado →34

#351.87 @001 & 354.51

{eo1} juĝ/o (3)

Tuto de la sistemo, per kiu la leĝo estas aplikata al la homoj; = justico 1: aŭdu, kiel pardoneme la juĝo agas kun vi, malvirtulo! kontraŭ nehavo eĉ juĝo silentas; la milita juĝo; ho mia Dio! jen mi jam estas transdonita al la juĝo!; ili venigos sur vin ĉiun punon, kiun povos liveri al ili la decidoj de la juĝo; fripona atestanto mokas la juĝon.

#351.87 @002

{eo1} justic/o

JUR Ŝtata organismo, kiu zorgas pri elekto de juĝistoj, kontrolo de ilia agado, plenumo de difinitaj punoj ktp: justic-ministro, justic-oficisto; ministrejo pri justico.

#351.87 @003

{eo1} just/ec/o (4)

Justico: mi iras mem transdoni min al la manoj de la justeco; kovri per arĝento la okulon de la justeco; aŭdu vi, kion la justeco per mi sciigas al vi!.

354 Plej supera tavolo:

Centrala, ŝtata, federacia

administrado

354.51 Ministrejo por justico

#354.51 @001 & 351.87

{eo1} juĝ/o (3)

Tuto de la sistemo, per kiu la leĝo estas aplikata al la homoj; = justico 1: aŭdu, kiel pardoneme la juĝo agas kun vi, malvirtulo! kontraŭ nehavo eĉ juĝo silentas; la milita juĝo; ho mia Dio! jen mi jam estas transdonita al la juĝo!; ili venigos sur vin ĉiun punon, kiun povos liveri al ili la decidoj de la juĝo; fripona atestanto mokas la juĝon.

#354.51 @002 & 351.87

{eo1} justic/o

JUR Ŝtata organismo, kiu zorgas pri elekto de juĝistoj, kontrolo de ilia agado, plenumo de difinitaj punoj ktp: justic-ministro, justic-oficisto; ministrejo pri justico.

#354.51 @003 & 351.87

{eo1} just/ec/o (4)

Justico: mi iras mem transdoni min al la manoj de la justeco; kovri per arĝento la okulon de la justeco; aŭdu vi, kion la justeco per mi sciigas al vi!.

355/359 Milit-arto. Militaj sciencoj

355.23 Rezervoj por oficiroj kaj suboficiroj.

Militraj lernejoj kaj akademioj

#355.231.1

{eo1} sign/o-junkr/o

Korneto, oficir-aspiranto.

355.335 Malaltrangaj oficiroj  
#355.335 : (=1.470)  
{eo1} jesaul/o  
Kozakkapitano.

37 Edukado. Instruado. Libertempado

37.01 Bazoj de edukado  
37.014 Eduka politiko. Publika eduk-laboro  
37.03 Eduko de intelekto kaj personeco  
37.031 Ĝenerala edukado  
37.034 Morala edukado  
37.035 Sociala edukado  
37.035.1 Eduko al justec-sento

#37.035.1 @001

{eo1} just/o  
Tio, kio estas justa, rigardata en abstrakta, absoluta maniero: la devo de juĝisto estas diri la juston; mi estos ilia Dio en vero kaj justo.

#37.035.1 @002

{eo1} just/e  
En justa maniero: 1 oni scias agi kun ili juste; juĝi juste;  
2 sed mi suferas juste; vi havas juste tion, kion vi meritis.

#37.035.1 @003

{eo1} just/aj/o  
Ago, faro justa: farado de justaĵo estas ĝojo por la virtulo.

#37.035.1 @004

{eo1} just/ec/o (1)  
Eco de tio, kio estas justa: viaj gepatroj konvinkiĝos pri la justeco de miaj plendoj, justeco havas nenion komunan kun leĝo, kiu estas nur ĝia karikaturo; pli bona estas malmulto, sed kun justeco.

#37.035.1 @005

{eo1} just/ec/o (2)  
Sento de la konscienco, per kiu oni redonas al ĉiu lian rajtaĵon: pardonemeco superas justecon; justecon sekvu; se vi, reĝo, la voĉon de l' justeco aŭskultos. . .; lacaj havi, por nin defendi kontraŭ maljustuloj, nur justicon sen justeco . . .

#37.035.1 @006

{eo1} just/ul/o (1)  
Homo justa.

374 Eksterlerneja klerigo kaj edukado

374.3 Edukado de junuloj

#374.3 @001

{eo1} jun/ul/ar/o  
Tuto de la junuloj en unu loko aŭ tempo: li estas idolo de la junularo; la studenta junularo; la vira junularo.

#374.3 @002

{eo1} ge'jun/ul/oj  
Junuloj kaj junulinoj.

377 Fak-edukado. Profesia edukado

#377

{eo1} lern'jar/oj  
Jaroj pasintaj en la lernejo, universitato ktp.

381 Enlanda komerco

381.7 Komerco-teknikaj demandoj

#381.7

{eo1} al'juĝ/i (2)  
KOME Atribui al tiu konkurencanto, kies prezoj estas plej favoraj, la plenumadon de adjudikita laboro, livero ks.

389 Metrologio. Mezur-unitoj.

389.16 Mezur-unitoj

#389.16

{eo1} jard/o (2)  
Brita mezurunuo de longo (0,917 m). → metro, klafto. arŝino.

393.9 Specialaj sepultaj tradicioj. Funebra procesio. Lamentado pri

mortinto.

Oferajoj. Funebra festeno. Vidvin-bruligo

#393.9

{eo1} Jeremi/ad/o

Longa lamentado (ŝerca aludo al la Plorkantoj).

394 Publika vivo (societa, popola, monduma, kortega, strata)

394.26 Libertempoj. Ferioj

394.268 Specialaj tagoj kaj tempo-periodoj

#394.268

{eo1} Jul/o (1)

Nomo de antikva pagana festo en Nord-Eŭropo, poste anstataŭigita per Kristnasko, kaj sekve ofte uzata en tiuj landoj por ĉi tiu festo: Jul-arbo.

397 Natur-popoloj. Nomadoj. Ciganoj

(specialaj rasoj kaj gentoj laŭ

vidpunkto de iliaj moroj kaj kutimoj)

#397 @001 & (=1.52)

{eo1} Jakut/o

Ano de Siberia gento.

#397 @002 & 727.7

{eo1} jurt/o

Tendo aŭ kabano de Siberiaj, Mongolaj nomadoj.

398.33 Kredo kaj tradicio rilate al difinitaj tempoj kaj festoj

398.332 Sezonoj kaj ĉefaj festoj

#398.332.42

{eo1} nov'jar/a

Rilata al la komenciĝo de nova jaro: novjara saluto

nov(o)jaraj bondeziroj.

KLASO 5 Matematiko. Natur-sciencoj

52 Astronomio. Geodezio

523 Astrofiziko kaj priskribanta astronomio

523.4 La planedoj, iliaj satelitoj kaj ringoj

#523.45 @001

{eo1} Jupiter/a (2)

Rilata al Jupitero 2: la 11 Jupiteraj satelitoj.

#523.45 @002

{eo1} Jupiter/o (2)

AST La plej granda planedo de la Sunsistemo, la kvina ekde la Suno.

523.81 Ĝeneralajoj. Stellokoj, paralaksoj, distancoj.

#523.81

{eo1} lum'jar/o

Unuo por mezuri grandegajn interastrajn distancojn, egalvaloranta la distancon traŭtratan de la lumo dum unu jaro.

{de1} Lichtjahr *n*

{en1} light year

53 Fiziko

537 Elektriko →621.3

537.5 Elektraĵoj malŝargiĝoj. Elektra radiado

#537.5 @001

{eo1} jon/ig/i

Fendi en jonojn: elektra sparko jonigas la aeron.

#537.5 @002

{eo1} jon/iĝ/i

Pasi al jona stato: salo joniĝas en akvo ĝis grado indikita per la joniĝa konstanto.

#537.5 @003

{eo1} mal'jon/ig/i

Forigi gas-jonojn en elektrontubo.

#537.53 @004

{eo1} impuls/a jon/ig/o

Jonigo de gasaj molekuloj pere de la trafo de elektronoj sur la anodon de elektrontubo.

537.56 Diversaj problemoj de gas-joniĝo. Joniĝ-potencialo. Jon-

specoj. Puŝ-joniĝo.

Maljonizo →541.132

#537.56 & 541.132

{eo1} jon/o

FIZ KEM Elektre ŝargita formo de tia molekulo aŭ de tia atomo, kiu akiris aŭ perdis elektronojn: en elektrolizo oni nomas □o ĉiun el la du partoj de atomo aŭ molekulo altiritan aŭ de la anodo aŭ de la katodo.

538 Magnetiko. Elektromagnetiko

538.2 Magnetigaj procezoj

538.26 Magneta cirkvito

#538.26

{eo1} jug/o (4)

ELET Organo el feromagneta materialo en la magneta cirkvito de elektra maŝino, servanta por magnete interkonekti la kernojn de la elektromagnetoj aŭ la polusojn.

539 Materiiko. Fizika naturo de la materio

539.1 Nuklea fiziko. Atom-fiziko. Molekul-fiziko

539.1.073 Aparatoj por vidigo de korpusklo-ŝpuroj

#539.1.073

{eo1} jon/ig/a kamer/o

Aparato uzata en la kernfiziko.

54 Kemio. Mineralogiaj sciencoj

541.1 Fizika kemio

541.13 Elektrokemio

541.132 Elektroliza disiĝo. Jonoj

#541.132 & 537.56

{eo1} jon/o

FIZ KEM Elektre ŝargita formo de tia molekulo aŭ de tia atomo, kiu akiris aŭ perdis elektronojn: en elektrolizo oni nomas □o ĉiun el la du partoj de atomo aŭ molekulo altiritan aŭ de la anodo aŭ de la katodo.

543 Analiza kemio

543.2 Specialaj kemiaj metodoj de analizo

543.24 Laŭ-volumena analizo. Titrometrio

#543.242

{eo1} jod/o-metr/i/o

Kvanta analiza metodo, uzanta la oksidigon de J' al J.

546 Neorganika kemio

546.1 Ĝeneralajoj pri metaloidoj

546.15 Jodo, J

#546.15 @001

{eo1} jod/o

KEM Elemento, atompezo 127, atomnumero 53, havanta formon de folietoj blue grizaj kun metala brilo, uzata en medicino kaj fotografado, J aŭ I: jodjoda tinkturo; joda klorido, JCl; joda triklorido, JCl<sub>3</sub>; jodaj kombinaĵoj; joda nombro (kvanto da jodo uzata, por kombini kun 1 g da nesaturita substanco).

#546.15 @002

{eo1} jod/at/o

Salo de jodata acido HJO<sub>3</sub>.

#546.15 @003

{eo1} per'jod/at/o

Salo de perjodata acido HJO<sub>4</sub>.

#546.15 @004  
{eo1} jod/id/o  
Salo de jodida acido HJ.

#546.15 @005  
{eo1} jod/il/o  
Radiko (JO): jodila sulfato, (JO)2SO4.

#546.15 @006  
{eo1} jod/it/o  
Salo de jodita acido HJO2.

#546.15 @007  
{eo1} hipo'jod/it/o  
Salo de hipojodita acido HJO.

#546.15 @008  
{eo1} jodo/  
KEM Vortero de substancnomoj, indikanta la ĉeeston de JO2-grupo: jodobenzeno C6H5JO2.

#546.15 @009  
{eo1} jodol/o  
KEM Tetrajodpirolo, C4HNJ4.

#546.15 &010  
{eo1} jodoz/o  
KEM Vortero de substancnomoj, indikanta la ĉeeston de JO-grupo.

547 Organika kemio  
547.4 Plurvalentaj senringaj kombinaĵoj  
#547.412.125  
{eo1} jodoform/o  
{eo2} tri-jod-metan/o  
KEM Kontraŭsepa substanco, konsistanta el karbono, jodo kaj hidrogeno, CHJ3;

549 Mineralogio  
#549.??? @001  
{eo1} jacint/o  
MIN Oranĝeruĝa gemo, speco de zirkono: la unua fundamento estis jaspiso ... la dek-unua jacinto.  
{en1} jacinth  
{en2} hyacinth  
{fr1} hyacinthe

#549.??? @002  
{eo1} jad/o  
MIN Densa, polurebla variaĵo de amfibolo aŭ pirokseno, kun koloro varianta de la hela grizverdo ĝis la blanko, uzata en Oriento por etaj art-objektoj: koliero el jado; jada statueto.  
{de1} Jade *m*  
{de2} Nephrit *m*  
{en1} jade  
{fr1} jade

#549.??? @003  
{eo1} jasp/o

MIN Densa, bruneca variaĵo de kalcedono, prezentanta diverskolorajn striojn. → gemo.

#549.??? @004  
{eo1} jaspis/o  
MIN Jaspis: multekostaj ŝtonoj, rubeno, topazo, jaspiso.

55 Geologio kaj parencaj sciencoj.  
550 Help-sciencoj de geologio  
550.3 Geofiziko →525.2  
550.38 Geomagnetismo  
550.388 Fenomenoj pro aktivigo de la jonosfero  
#550.388.2  
{eo1} jonosfer/o  
MET La plej supra tavolo de la interna atmosfero (komenciganta en alto de 80 km), kies esenca karakterizaĵo estas la elektra konduktopovo.

58 Botaniko  
581 Ĝenerala botaniko  
581.1 Fiziologio de plantoj  
581.14 Evoluo. Kreskado  
581.149 Vivodaŭro. Morto  
#581.149  
{eo1} plur'jar/a  
BOT Vivanta dum tri aŭ pli da jaroj, normale floranta en ĉiu kreska sezono (pp planto, precipe herbo).  
{en1} perennial

581.4 Morfologio kaj anatomio de plantoj  
581.43 Radikoj. Nutrad-organoj  
#581.43 : 582.???  
{eo1} jalap/o  
BOT La tuberforma kaj preskaŭ globforma rezinhava radiko de jalapujo, uzata medicinale kiel drastaĵo, aŭ pulvoro, aŭ tinkture.  
{de1} Jalapenwurzel *f*  
{fr1} racine de jalap

581.47 Fruktoj  
#581.47 @001 : 582.???  
{eo1} jakv/o  
BOT Frukto de jakvujo.

#581.47 @002 : 582.???  
{eo1} jugland/o  
BOT Nukso de juglandujo.

#581.47 @003 : 582.???  
{eo1} jujub/o  
BOT La frukto de jujub-arbo.

582 Sistema botaniko →561  
#582.??? @001  
{eo1} jaborand/o  
BOT Genro (Pilocarpus el rutacoj) de Brazilaj arbedoj, el kies folioj oni tiras la pilokarpinon.

{de1} Jaborandi  
{en1} jaborandi  
{fr1} jaborandi

#582.??? @002

{eo1} jakarand/o

BIB Genro (Jacaranda Juss. el bigoniacoj) de tropikaj arboj kun pinataj folioj k bluj funelformaj floroj panikle aranĝitaj en la fino de la ŝosoj.

{de1} Jacaranda  
{en1} jacaranda  
{fr1} jacaranda

#582.??? @003

{eo1} jakv/uj/o

{eo2} jakv-arbo

Specio de panarbo (Artocarpus integrifolia L. fil. el morusacoj) kun nedividitaj folioj, per kio i.a. ĝi diferencas de la vera panarbo.

#582.??? @004

{eo1} jalap/uj/o

{eo2} jalap-plant/o

Plurjara herbo (Exogonium purga Hayne/Benth. el konvolvulacoj) kun ebenrandaj korformaj folioj kaj grandaj purpuraj floroj, kies stiluso kaj stamenoj estas pli longaj ol la funelforma korolo.

{de1} Jalapef  
{en1} jalap  
{fr1} jalap

#582.??? @005

{eo1} jalap/o

BOT La tuberforma kaj preskaŭ globforma rezinhava radiko de jalapujo, uzata medicine kiel drastaĵo, aŭ pulvoro, aŭ tinkture.

{de1} Jalapenwurzel f  
{fr1} racine de jalap

#582.??? @006

{eo1} jambos/o

BOT G. (Jambosa DC el mirtacoj) de hindiaj kaj malajaj tropikaj arboj kun sukaj, manĝeblaj beroj, kiuj havas rozan odoron. → kariofilarbo.

{de1} Jambusenbaum m  
{en1} rose-apple tree  
{fr1} jambosier

#582.??? @007

{eo1} Japan/a cidoni-arbed/o

EB#357/17

{de1} japanische Quitte f  
{en1} japonica  
{en2} Japanese quince  
{fr1} cognassier m du Japon

#582.??? @008

{eo1} jasmen/o

BOT Genro (Jasminum L. el oleacoj) de arbedoj, plejparte tropikaj, iometgrade volvaj, kun longaj,

maldikaj, plej ofte verdaj, iom angulecaj tigoj, duope kontraŭesidantaj, pinataj aŭ nedividitaj folioj kaj pli-malpli primolsimilaj floroj unuopaj aŭ grupete en folianguloj; pluraj specioj ĝardene kaj subvitre kulturataj: jarda floro, laŭbo. → filadelfo.

#582.??? @009

{eo1} jazion/o

BOT Genro (Jasione L. el kampanulacoj) de unu-, du- kaj plurjaraj herboj kun helbluaj floroj en kapo; kreskas ordinare en sekaj, sablaj lokoj.

#582.??? @010

{eo1} johimb/o

BOT Genro (Corynanthe yohimba) el rubiacoj en Okcidenta Afriko.

#582.??? @011

{eo1} jonkvil/o

BOT Specio de narciso (Narcissus jonquilla L. el amarilidacoj) kun pure flavaj bonodoraj floroj, havantaj longan mallarĝan kromkorolan tubon, 2-4 floroj sur ĉiu pedunklo.

#582.??? @012

{eo1} jugland/uj/o

{eo2} jugland-arb/o

Genro (Juglans L. el juglandacoj) de falfoliaj arboj kun grandaj, pinataj duope kontraŭesidantaj, tre aromaj folioj kun drupoj, kies ekstera, karneca tavolo ĉe kelkaj specioj defalas je maturiĝo.

#582.??? @013

{eo1} nigr/a jugland-arb/o

Arbo (Juglans nigra L.) kun plaĉa, malhela trunko-ŝelo kaj ligno uzata por meblo-fabrikado; kulturata en parkoj.

#582.??? @014

{eo1} ordinar/a jugland-arb/o

Frukt-arbo multe kulturata (Juglans regia L.) pro la valora nukso, kies mangebla kerno konsistas ĉefe el du grandaj karakterize falditaj kotiledonoj.

#582.??? @015

{eo1} jujub-arb/o

Unu el iuj specioj (Zizyphus jujuba Mill. kaj Z. vulgaris Juss. el ramnacoj) de arbedoj aŭ malgrandaj arboj tropikaj kaj subtropikaj, kies tre sukerhavaj prunograndaj drupoj estas manĝeblaj krudaj, sekigitaj aŭ konfititaj, kaj estas uzataj kiel popola kuracilo kontraŭ tusado. → lotuso 4.

#582.??? @016

{eo1} juka/o

BOT Genro (Yucca L. el liliacoj) de daŭrafoliaj, plurjaraj herboj kaj arbedoj kun longaj, ofte rigidaj, fibroz-marĝenaj folioj sur ligneca tigo, kaj kun alta pedunklo portanta paniklon el blankaj floroj; pluraj specioj ĝardene kaj subvitre kultivataj.

#582.??? @017  
{eo1} juniper/o  
BOT Genro (*Juniperus* L. el pinacoj) de dioikaj, escepte monoikaj arboj kaj arbedoj kun lancetformaj aŭ skvamformaj pingloj, kaj kun konuso, kiu havas malmultajn, plej ofte tri fine kunkreskantajn skvamojn, kiuj ĉe maturiĝo fariĝas sukoplenaj, formantaj kun la konuso t.n. berojn.

#582.??? @018  
{eo1} junk/o  
BOT Genro (*Juncus* (L.) Lam. & DC. el junkacoj) de unu- kaj plurjaraj marĉoherboj, tuboformaj aŭ kun rampa rizomo, kun longaj, maldikaj tigoj enhavantaj spongecan histon, kun sesnombraj floroj kaj triĉambrajn kapsulojn enhavantajn multajn malgrandajn grajnoj; tigoj kaj folioj uzataj por fari matojn. → skirpo.

59 Zoologio  
598 Reptilioj. Birdoj  
#598.??? @001  
{eo1} jakan\*\*/o  
Genro de akvaj birdoj (*Jacana*) kun sep aŭ ok specioj. Jakano havas araneajn ungojn, kiuj ebligas al ĝi iri sur flosantaj vegetaĵoj.  
{en1} jacana  
{en2} Lily-Trotter  
{en3} Lotus Bird

#598.??? @020  
{eo1} jing/o  
ZOO Genro el la ordo de pegoformaj birdoj, kun relative mallonga beko kaj tre fleksebla kolo (*Jynx*).

#598.34  
{eo1} jabiru\*\*/o  
Amerika cikonio (de Meksiko ĝis Argentino), apartenanta al la familio de cikoniedoj kaj ordo de cokoniformaj birdoj. Unu el la plej larĝaj Amerikaj birdoj, 1,40 metrojn alta.  
{en1} jabiru  
{fr1} jabiru

599 Mamuloj  
599.74 Karnivoroj. Karnomanĝuloj  
599.742.7 Felisedoj  
#599.742.7  
{eo1} jaguar/o  
ZOO Specio de Amerikaj mamuloj el la subordo de rabobestoj, genro de felisoj, flava kun nigraj makuloj aŭ ringoj, mis-nomata "Amerika tigro" (*Felis onca*). → leopardo.  
{de1} Jaguar *m*  
{en1} jaguar  
{fr1} jaguar *m*

KLASO: 6 Aplikataj sciencoj. Medicino. Tekniko

61 Medicino  
611 Anatomio  
611.1 Sistemo de la cirkulado. Angia sistemo  
611.14 Venoj.  
#611.14  
{eo1} jugular/o  
ANA Unu el la ĉefaj vejnoj en la kolo (v. jugularis interna): la jugularo apudas la karotidon.

611.3 Digestaj organoj  
611.34 Intesto  
#611.34  
{eo1} jejun/o  
ANA La meza parto de la maldika intesto, inter la duodeno kaj la ileo (jejunum).

612 Fiziologio  
612.6 Fiziologio de la seksaj organoj, de generado,

gravedeco kaj de maljuniĝado  
612.68 Longviveco

#612.68 @001  
{eo1} mult(e)-jar/a (2)  
Havanta la aĝon de multaj jaroj.

#612.68 @002 & 613.98  
{eo1} mal'jun/ec/o (1)  
FIZL Tempo de la homa vivo, de la perdo de reproduktivo ĝis la morto.

613 Privata higieno  
613.98 Higieno de maljunuloj  
#613.98 @001 & 612.68  
{eo1} mal'jun/ec/o (2)  
Tempo de la vivo post la matura aĝo: ankaŭ ĝis via maljuneco mi vin portos; ili floras ankoraŭ en la maljuneco; Elizabet gravediĝis je filo en sia maljuneco; ne ekzistas maljuneco sen malicoj; en juneco logas, en maljuneco tedas.

#613.98 @002 & 612.68  
{eo1} mal'jun/ul/in/o  
Maljuna virino: la maljunulino balancis la kapon kaj diris: Hm! Hm!; la senkoloriĝintaj pupiloj de la maljunulino ne malsekiĝis per larmo.

#613.98 @003 & 612.68  
{eo1} mal'jun/ul/o  
Maljuna viro: neniam estos maljunulo en via domo; li ne atentis la konsilon de la maljunuloj; nepoj estas krono por maljun uloj plej saĝa maljunulo ne estas tro saĝa; Abraham kaj Sara estis maljunuloj de profunda aĝo; maljunulaj faltoj. → plejaĝulo.

615 Farmacio. Farmakologio. Terapeŭtiko. Toksologio  
615.3 Organikaj medikamentoj

#615.3 & 615.71  
{eo1} johimbin/o  
KEM (Alkaloido, ekstraktita el johimbo kaj uzata kiel hipotensiiga, angioldilata kaj afrodiziiga drogo.

615.4 Praktika farmacio. Medicinaj kaj kirurgiaj iloj  
615.41 Farmaciaĵoj

#615.411  
{eo1} julep/o  
FAR Mildiga aŭ kvietiga pocio, farita el siropoj kaj distilita akvo.

615.7 Medikamentoj klasifitaj laŭ iliaj ĉefaj efikoj.

#### Kemia

terapeŭtiko.

615.71 Medikamentoj efikantaj al sango-cirkulado

#615.71 & 615.3

{eo1} johimbin/o  
KEM (Alkaloido, ekstraktita el johimbo kaj uzata kiel hipotensiiga, angioldilata kaj afrodiziiga drogo.

615.77 Deekstere efikantaj medikamentoj

615.775 Vund-krustojn kreantaj, kaŭstikaj medikamentoj

615.775.5 Kerato-plastaj (??), junigaj medikamentoj

#615.775.5

{eo1} jun/ig/i

Fari iun, ion juna: la amo junigas.

615.85 Diversaj kurac-metodoj

615.851 Psikoterapio

#615.851 & 616.89

{eo1} frenez-jak/o

{eo2} per'fort/a jak/o

Speco de kruda jako, kun allig-ebloj manikoj, uzata por senmovigi frenezulojn dum krizo.

{de1} Zwangsjacke

{en1} strait-jacket

616.8 Neŭrologio. Nervo-malsanoj. Neŭropatologio

616.89 Psikiatrio. Patologia psikologio. Malsanaj menso-statoj

#616.89 & 615.851

{eo1} frenez-jak/o

{eo2} per'fort/a jak/o

Speco de kruda jako, kun allig-ebloj manikoj, uzata por senmovigi frenezulojn dum krizo.

{de1} Zwangsjacke

{en1} strait-jacket

62-1/-9 Detaloj pri iloj (maŝinoj, aparatoj, instrumentoj, instal-

ajoj, procedoj kaj il-partoj)

62-4 Materia kondiĉo. Surfaca kondiĉo. Formoj

de objektoj

62-462 Fermitaj kavaj objektoj, ekz-e tuboj, hosoj

#62-462

{eo1} junt/o (2)

La kunigo mem: transira junto (ekz. inter du tuboj de malsamaj diametroj).

62-8 Klasifo de iloj laŭ energi-fonto

62-81 Iloj funkciigataj per vaporo

62-82 Iloj funkciigataj hidraŭle

62-821 per akvopremo

62-821.18 (+) Kondukiloj de likvo kaj iliaj partoj

62-821.181 (+) Ŝraŭbumaj tub-juntiloj

#62-821.181 @001(+)

{eo1} artik/a junt/o

Parto de tubkondukilo (85/255) ebliganta reciprokan angulan turniĝon de du partoj de tubo en ebena aŭ spaco. <85/257>

{de1} Rohrgelenk *n*

{en1} swivel joint

{fr1} joint articulé

{fr2} joint à genouillère

#62-821.181 @002(+)

{eo1} teleskop/a junt/o

Parto de tubkondukilo (85/255) ebliganta reciprokan laŭaksan ŝoviĝon aŭ turniĝon de du partoj de tubo. <85/256>

{de1} Teleskoprohrverbindung

{en1} telescopic connection

{fr1} joint télescopique

62-822 Iloj funkciigataj per prem-akvo

62-824 " " per akvo-turbinoj

62-83 " " per elektro

62-835 " " per akvoj

62-843 " " per benzin-motoroj

62-851.1 " " per prem-aero

62-87 " " per muskol-  
forto

62-872.8 " " " de bestoj

#62-872.8

{eo1} jung/aĵ/o (1)

Jungilaro: sur la jungaĵo de la bovoj li kuiris la viandon; la jungaĵo de la vagonoj rompiĝis ĉe la elreliĝo.

#62-872.8

{eo1} jung/il/ar/o

Tuto de la pecoj, destinitaj por jungi bestojn al ia veturilo, ktp: surmeti la jungilaron al brutoj.

621.3 Elektrotekniko

#621.3 & 696/697

{eo1} junt/i (2)

TEK ELET Fari junton ĉe tuboj aŭ kabloj; kunligi la konduktilojn (cirkvitojn) de kablo en juntejo aŭ kabloŝakto. → geri.

621.31 Tekniko de elektra energio. Produktado kaj

distribuado de elektra energio. Elektraĵaj aparatoj ĝenerale.

621.315 Transsendo de elektra energio  
621.315.687 Kablo-ligiloj, kablo-mufoj, kablo-  
ŝuoj

#621.315.687 @001

{eo1} junt/o de kabl/o

ELET La elektra kaj meĥanika konekta ejo inter la  
ekstremaj de du kablolongoj, kie oni juntas la  
apartajn konduktilojn de la kablo.

#621.315.687 @002

{eo1} lut-junt/o (2)

Kablomufo.

621.397 Televido

#621.397.62

{eo1} jug/o (5)

ELET Parto de televida ricevilto, troviĝanta ĉirkaŭ la  
kolo de bildotubo kaj konsistanta ĉefe el la  
horizontala kaj vertikala defleksbobenoj.

621.7 Sentajla form-dono ĝenerale

621.791 Veldado kaj parencaĵaj procedoj

#621.791.034

{eo1} lut-junt/o (1)

{eo2} veld-junt/o

ELET La fendo inter du metalaj pecoj, kiuj estas  
lutitaj/velditaj unu kun la alia.

EB#135/8

{de1} Schweißraupe *f*

{en1} welding bead

{en2} weld

{en3} welded joint

{fr1} chenille *f* de soudure *f*

{fr2} joint *m* de soudure *f*

621.798 Pakado kaj pak-ekipaĵoj

#621.798.15

{eo1} jut/o (2)

Teksaĵo farita el tiu materialo: sakoj el juto.

623 Milit-tekniko. Armil-produktado.

Armea kaj mar-armea inĝeriko

623.4 Artileriaĵoj. Armiloj. Municio.

Atom-armiloj. Gas-armiloj

623.44 Porteblaj armiloj

#623.444

{eo1} jatagan/o

Sabro sen manŝirmilo kun klingo dukurba, uzata  
precipe de janiĉaroj.

624 Konstru-inĝeriko

624.02 Konstru-elementoj

624.023 Volbitaj konstru-elementoj

#624.023.672

{eo1} junt/o (1)

TEK La kuniga interspaco inter du kunigitaj ŝtonaj,  
brikaj, metalaj aŭ lignaj pecoj, kiun oni plenigas per  
gluo, mastiko, mortero.

EB#117/94

{de1} Stoß *m*

{en1} join

{fr1} raccord *m*

624.078 Kalkulado de konstruaj ligoj

#624.078

{eo1} junt/o <4>

Tiu loko en konstrukto (homfarita strukturo  
→85/420), kie kontaktas ĉu rekte, ĉu pere de  
speciala elemento aŭ substanco, du konsistigaj pecoj  
[partoj] de la konstrukto tiel, ke la per junto  
kunigitaj pecoj [partoj] efikas same kiel la pecoj  
[partoj] mem. Diference de nura meĥana kunigo,  
junto devas plenumi postulon de funkci-kapablo de  
la konstrukto. Specon de junto determinas 1. metio,  
al kiu pretigo de la konstrukto apartenas, 2.  
teĥnologia procedo, resp. maniero de meĥana  
kunigo. <85/005>

{de1} Verbindung *f*

{de2} Gelenk *n*

{en1} connection

{en2} joint

{fr1} joint *m*

625.1 Fervojoj ĝenerale. Fervojaj linioj. Trak-  
konstruado

625.143 Reloj. Rel-fiksiloj

#625.143.4

{eo1} plat-junt/o

{eo2} rel-junt/o

TEK junto, kunigo inter du reloj, sojloj, traboj ks  
per plato konsistanta el la sama materialo, kiu  
surkunigas la du apudajn ekstremojn.

EB#198/43

{de1} Schienenlasche *f*

{en1} rail fish plate

{en2} joint bar {US}

{fr1} éclisse *f*

627 Naturaj enlandaj akvo-vojoj. Ĉemara kaj  
ĉerivera konstruado.

Baraĵegoj

627.9 Aliro al la bordo. Navigaciaĵaj signaloj.

Surmara savado

627.95 Surmara savado. Apudmara savado.

627.957 Diversaj naĝiloj por savado

627.957.4 Sav-vestoj. Sav-ringo

#627.957.4

{eo1} sav-jak/o

